

& Kavaliro en tigra felo:

< Rekante 29 el 61 batoj por strofo, entute 96 807 paŝoj dum 16 horoj. Verkis Ŝota Rustaveli (eble ĉirkaŭ 1206). El kartvela tradukis Zurab Makaŝvili (1989). Baladigis Martin Strid (2016) per kartvela popolmelodio kaj nova rekantaĵo. Liston de 64 partoj trovi post la strofoj.>

(#Melodioj:

<1,6:61> (

/TiTi TiTi TiTi TiLalTi dodo dodo dodo dolTiLa; doTi LaSo FaMi MiRelMi MiTi TiTi rere reTi;
TiTi TiTi TiTi TiLalTi dodo doTi dodo dolTiLa; doTi LaSo LaSo FaMi MiMi MiMalMi TiTi TiTi;

(Rekantaĵo: dodo doremi redo Ti; doTi LaSo FaMi Fa MiTi TiTi Tidolre doTi La; doTi LaSo FaMi Fa; MiTi TiTi; mimi miremi redo Ti; doTi LaSo FaMi Fa Mi i;)

)×1587) +

(&Strofoj:

,& Prologo:

'1 Kiu kreis universo²ⁿ per potenca ĉiopo^{2vo},
; Tiu de ĉiel' animi^{2s} la estaĵojn per la blovo, ;
Al ni, homoj li donaci^{2s} variecon de
terglo^{2bo}, ; Kaj devenis de li reĝoj laŭ similo²
kaj la volo.

(×:; **Fidu ke vi revidos min ; Ĵuris ni fidelon
dum vivo kaj la ĉeno² iras plu ; Venu, tenu
manon jen ; Paŝu vigle ; Fidus ke vi revidos
min ; Ĵuris ni fidelon dum viv'.)**

'2 Ho, unika plejaltulo, aĵojn faris via mano, ;
Helpu min potenco via piedpremi la satanon, ;
Donu al mi la ĝismortan, de miĝnuroj* ardan
flamon, ; Malpezigu terajn pekojn dum la horo
de kondamno.

'3 La leono de Tamari* dece portas ŝildon,
glavon, ; De reĝino sunvizaĝa, kiu havas
nigrajn harojn, ; Mi kuraĝas ilin glori,
esprimante grandan ravenon, ; Sentas ĉiu la
dolĉecon, kiu vidas tiun paron.

'4 Ni glorkantu la reĝinon per varmegaj sangaj
larmoj, ; Jam pli frue mi ŝin gloris per ekstazaj
ditiramboj. ; Mi por skribo uzis kanon, inkon
el okulaj lagoj, ; Koron de la aŭskultanto pro
amego piku glavo.

'5 Oni donis al mi taskon – verki belsonontajn
strofojn, ; Pri beleco de okuloj, okulharoj,
nigraj brovoj, ; Badaĥŝanaj* rozaj lipoj,
kristaldentoj, ĉarma kolo, ; Sur amboso
plumba, mola ja rompiĝis eĉ la ŝtono.

'6 Mi bezonas miajn vortojn, koron arton nun
apliki, ; Dio donu al mi forton kaj racion
utiligi, ; Ja pri Tariel* en versoj indas tutan
veron diri, ; Kaj pri tri herooj, kiuj kunbatalis
kaj amikis.

'7 Ni kunvenu kaj sidiĝu, verŝu malsekigajn
larmojn, ; Tariel' – similan homon ĉu jam vidis
la homaro? ; Rustaveli – mi eksidis kun
korvundo, ama fajro, ; Kaj versigis la
rakonton, kiel brilan juvelaron.

'8 Mi - poeto Rustaveli, faris tion en torturo, ;
Ŝin* obeas regimentoj, por ŝi estas mi mortulo,
; Mi nenie trovis helpon, kuracilon,
proksimulon, ; Vi mortigu min aŭ donu
resanigon al miĝnuro.

'9 Jen elektis mi la persan historion por la
temo, ; Kartveligis ĝin kaj faris tre ŝatatan mi
aferon, ; En versaĵon transformigis, kreis belan
mi poemon, ; Ĝin transdonu homaj manoj kiel
admirindan gemon.

'10 Ŝi blindigis min – poeton, sed mi revis pri
l'reĝino, ; Enamiĝis mi kaj tial migras tra la
mond' sen fino, ; Forbruligu ĝi la korpon, nur
ekĝoju la animo, ; Tri herooj kante gloros mi
en panegiraj rimoj.

'11 Ĉiu devas kontentiĝi, kion donas la kreinto
– ; Laborulo pri laboro, batalanto pri milito. ;
La miĝnur' ekkonas amon, kvankam restas
turmentito, ; Al neniu li malhelpu kaj ne kaŭzu
do aflikton.

'12 De komenco poezio estas parto de la scio, ;
Ĝi ekzistas por legantoj, diajn farojn faras dio,
; Ŝatas ĝin prudenta homo, kiu volas scii ion. ;
Parolado longa kurtas – jen valor' de poezio.
.....

'13 Ekzameno por ĉevalo estas longa galopado, ; Sur areno oni vidas kiel lertas pilkludanto, ; Ankaŭ la poeto estas rekonebla en verkado, ; Sed la vortoj ne sufiĉas – verso estas turmentado.

'14 Ĉu dubinda poetaĉo povas verki kaj ŝairi? ; Kartvellingvon li ne scias kaj la vers' ne povas iri. ; Ĉu multvorta babilulo povas ion taŭgan diri? ; Ĉu li frapas per ĉogano* brave, ke nur indas miri?

'15 Ĉu jam estas la poeto, kiu du-tri versojn rimas? ; Lin la homoj ne agnoskas kaj leganto ne estimas, ; Kvankam tia poetaĉo kun aplombo laŭte krias: ; "Mia verso – la plej bona" – kiel mulo li obstinas.

'16 Due, estas fuŝpoetoj, kiuj kreas sensencaĵojn, ; Ne kapblas ili verki emociajn do versaĵojn, ; Malsukcese ili skribas, faras ĉiam la stultaĵojn, ; Ne mortigas ili beston – nur malgrandan do ĉasaĵon.

'17 Tria spec' de poezio por kantado ege bonas, ; Dum festeno kun fidelaj kamaradoj ĝi imponas, ; Kaj plezuron, bonhumoron al la aŭskultantoj donas, ; Nur venkinton de poemo granda ni poeto nomas.

'18 Do poeto la talenton devas ne elspezi vane, ; Unusolan belulinon li adoras arde, ame, ; Nur pri ŝi li devas verki, glori, laŭdi ŝin konstante, ; Kaj por ŝi parolo lia sonas ĉiam dolĉe, kante.

'19 Nun vi scias, kiun arde mi en la poemo gloras, ; Por mi estas la honoro, ŝin prikanti mi ne hontas, ; Ŝi por mi tigrino estas, vane mi ne fanfaronas, ; Kaj per versoj de l'poemo la reĝinon mi honoras.

'20 Diros mi, ke vera amo estas sento altspirita. ; Malfacile esprimebla, nur por noblaj destinita. ; Ĝi al ni flugilojn donas, por ĉielo ĝi kreita, ; Kiu volas ĝin ekkoni, estu ja la amon inda.

'21 Tian amon ne komprenas homa saĝo kaj genio, ; Ĉar laciĝas niaj sensoj kaj samtempe la racio. ; Mi ĉi tie gloras amon, teran senton kaj pasion, ; Ne malĉaston, ne fiaĵon – fortan homan afekcion.

'22 "Amo estas frenezaĵo" – la araba saĝo diras, ; Ĉar miĝnuro nevidante amatinon, freneziĝas. ; Malespero tiam unujn al pieco forte ligas, ; Sed aliaj kun virinoj amindumi nur deziras.

'23 Do miĝnuro devas esti tiel bela kiel suno, ; Saĝa, riĉa, bona, juna, ŝia paro – egalulo, ; Devas li necese venki kontraŭulon en la lukto; Ne havante ĉion tion, li ne estas la miĝnuro.

'24 Vera amo – bela speco, ĉielalta la ĝuado, ; Estas ĝi nekomparebla kun malĉasto, delogado, ; Do ne miksas la saĝuloj ĝin kun distro kun konatoj, ; Kredu vi al mi – poeto, ĝusta estas parolado.

'25 La miĝnuro devas esti pura, nobla de deveno, ; Se disiĝas de virino, havu en la koro splenon; Lin – konstantan kaj fidelan, plibeligas nur plorĝemo. ; Mi malŝatas ŝmacajn kisojn kaj senkorajn ĉirkaŭprenojn.

'26 Kaj ne donu nomon "amo" al ŝajniga koketado, ; Kiu ŝanĝas ĉiutage la objekton de la amo, ; Tiel ofte en la vivo ludas vanta junularo; La miĝnur' nur tiu estas, kiu venkas delogadon.

'27 Plena de misteroj diaj devas esti vera amo, ; Oni ĝin ne rajtas tuŝi per malmilda, kruda mano, ; La miĝnuro do suferas, sole vagas en kamparo, ; Eĉ se amatin' koleras, li konservas sian ravon.

'28 Li ne devas al la homoj montri sian ekzaltiĝon ; Kaj ne povas ĝemi, krii por la homa amasiĝo. ; Li nur devas kaŝi amon – ne elmontri al publiko, ; La sufero pro la amo al li ŝajnu nur feliĉo.

'29 Kiu diras amsekretion, ĉu konfidon li meritas? ; Tia homo sian propran senton tute neniigas, ; Li kaj ŝi eksentas honton, se sekreto disvastiĝas, ; Kaj ĉu sian amatinon tiel dolorigi indas?

'30 Miras mi, se la amanto pri la amo nur babilas, ; Se ne amas – malestimas, tio vere ĝin signifas. ; Li per vana babilado sian celon ne atingas, ; Fia homo fian vorton kun plezuro ĉiam diras.

'31 Se miĝnuro pro la amo kun la larmoj multe ploras, ; Tio ĉi signifas vere – li amanto esti povas, ; Kaj interne en la koro nur vizaĝo ŝia floras, ; Tamen estas ja pli bone, se li amon ne elmontras.

& Rakonto pri la araba reĝo

Rostevano:

'32 Vivis en araba lando saĝa reĝo Rostevano, ; Dio benis feliĉulon, kiu estis ne tirano, ; Elokventa kaj bonkora, malestimis reĝ' gloramon, ; Multenombrajn trupojn havis li kaj ankaŭ fortan manon.

'33 Li edukis nur filinon, unusolan, veran ĉarmon, ; Estis ŝi la lumigilo – suno inter astra svarmo. ; Kiu vidis ŝin – tuj perdis la trankvilon kaj la kapon, ; Por ŝin glori la saĝuloj devis havi parolarton.

'34 Tinatin' – baptnomo ŝia, estis suna virgulino; Ne trovita estis edzo por la juna belulino. ; Rostevan' ne havis filon kaj li pensis: "La virino ; Povas esti, kiel viro, ŝtata homo kaj reĝino".

'35 Rostevan' vezirojn vokas kaj al ili tiel plendas: ; "Tago mia jam foriras, do la nokto min kunprenas, ; Kiam rozo forvelkinta en ĝardeno ne plu belas, ; Baldaŭ sur la sama branĉo nova floro reaperas".

'36 "Do mi mortos proksimtempe, maljuneco min jam venkas; Ja ne estas tio lumo, se obskuro ĝin malhelpas; Tinatin' – filino mia, leĝe tronon ŝi heredas; Kroni ŝin, mi, patro, volas, ĉar ŝi pli ol suno belas".

'37 La veziroj al li diris jenan flatan komplimenton: ; "Frue estas, reĝa moŝto, lasi jam la testamenton; Kvankam velkas bela rozo, ni ne sentu malkontenton; Ĉu superi povas lunon astro sur la firmamento?"

'38 "Dume en ĝardeno via freŝaj rozoj bonodoras; Eĉ severa opinio via por ni ĉiam bonas, ; Kaj se vi decidis tiel, estu, kiel vi ordonas: ; Estas bona la reĝino, kiu sunon samvaloras".

'39 "Kvankam estas ŝi virino – la devenon havas dian, ; Ŝi scipovas la regadon en araba lando nia, ; Kiel suno brilas faroj kune kun saĝeco ŝia, ; La geidoj de leonoj egalrajtaj estas ĉiam".

'40 Avtandil' – spaspeto* estis fil' de amirspasalaro*, ; Svelta kiel la cipreso, bela kiel la stelaro. ; Sed al li ankoraŭ mankis sur vizaĝo la hararo; Amis li la reĝidinon, ŝiajn ravajn okulharojn.

'41 Li suferis tre sekrete, sed li kaŝis amo-flamon; Dum foresto ŝia palis de junulo rozaj vangoj, ; Post revido tiuj vangoj rericevis sian sangon; Pro turmentoj de la koro kompatinda estas amo.

'42 La kronadon de l'filino poste Rostevan' intencis, ; Avtandil' ekĝojis multe, revu pri reĝin' komencis, ; "Mi nun vidos ŝin pli ofte," la junulo tiam pensis, ; "Trovos mi la kuracilon, por sopiron mian venki".

'43 Poste Rostevan' deklaris, ke la trono estas ŝia, ; "Mia Tinatin' heredos oran kronon arabian, ; Kaj anstataŭinte sunon ŝi radios brilon sian, ; Venu ĉiuj, venu vidi la reĝinon saĝan vian".

'44 Kaj kunvenis la araboj, granda nombro de la ĥasoj*, ; Avtandil' antaŭe iris – ĉefo de militistaroj, ; Sekvis lin veziro Sograt, la gvidant' de nobelaro; Pri ortrono oni diris: "Jen, la plej valora aĵo".

'45 Kaj la reĝo la filinon akompanis ĝojoplena, ; Ŝin sidigis sur la tronon, ŝi silentis obeema, ; Multekostan sceptron prenis kun rubeno lumludema, ; Kapon de la belulino ekornamis krono gema.

'46 Retiriĝis ĉiuj kune, riverence ŝin adoris, ; Benis reĝo la filinon, ĉiu la reĝinon gloris, ; Belaj muzikiloj, flutoj kaj cimbaloj tie sonis, ; La reĝino klinis kapon kaj ŝi kaŝe multe ploris.

'47 Ploris tial ĉar ne estis la reĝino konvinkita, ; Ke la tronon de la patro ŝi heredi jam meritias, ; Tamen al ŝi sin turninte Rostevan' kontenta diras: ; "Nun filino, mi – la patro, de hodiaŭ trankviliĝas".

'48 Li riproĉas al filino: "Via plor' al mi ne plaĉas, ; Ekde nun araba lando novan monarĥinon havas, ; Vi jam estas regantino, la popolo vin jam ŝatas, ; Saĝe solvu ŝtataferojn, la justecon ĉiu amas.

'49 ' Por la rozoj kaj herbaĉoj sun' egale lumi povas, ; Por la grandaj kaj malgrandaj esti bona dio volas, ; Malavaro senvirtulon forte ligas kaj imponas, ; Malavaru, eĉ la maro akvon prenas kaj redonas.

'50 ' La boneco por la reĝoj kiel ornamaĵo estas, ; Same kiel la cipreso svelta en edeno kreskas, ; Perfidulon la bonkora malavaro ĉiam venkas, ; Fordonita restas via, kion vi konservas – perdas".....

'51 La instruon de la patro ŝi aŭskultis ĝis la fino ; Kaj komprenis ĉion bone, obeema la filino. ; Reĝo drinkis, multe ĝojis – la festeno en kulmino; Tinatin' malŝatis sunon – sun' imitis Tinatinon.

'52 Ŝi alvokis edukiston – la fidelan protektanton, ; Kaj ordonis trezorejon alportigi per servantoj, ; "Metu ĝin ĉi tien, ĉar ĝi havas jam la posedanton". ; Kaj senlime ŝi disdonis oron kaj eĉ diamanton.

'53 La reĝino disdonadis ĉion, kion ŝi jam havis, ; La riĉaĵoj de l'kortego eĉ al malriĉuloj trafis, ; Poste diris la reĝino: "La trezoron mi ne ŝparis, ; Laŭ konsilo de la patro ĉion obeeme faris".

'54 Kaj krom tio, ŝi ordonis: "Vi malfermu trezorkestojn, ; Plenigitajn jam per perloj, diamantoj, ormoneroj; Amilaĥor*, vi alpelu de ĉevaloj multajn gregojn". ; Kaj alportis trezorstojn valoraĵojn el la keloj.

'55 Ŝi disdonis oron kvazaŭ estus ĝi rabaĵo turka, ; Ankaŭ la arabĉevalojn de koloro nigra, bruna; Estis ŝia bonkoreco neĝa uragan' abunda, ; Do forgesis ŝi neniun, ĉiu diris dankon multan.

'56 La unua tag' forpasis, ĉiuj drinkis, sin regalis, ; Militistoj kaj nobeloj multajn tostojn ja proklamis, ; Malgajiĝis nur la reĝo, ian li malĝojon havis, ; Kaj ekflustris tiam gastoj: "Kio do al li okazis?"

'57 Avtandil' ĉe tablo sidis, li – leono, lerta tigo, ; La spaspeto de armeo, li alvokis nur admiron, ; Kaj Sograt apude sidis – maljunulo kaj veziro, ; Ambaŭ pri la reĝo diris: "Havas li ĉagreno-signon".

'58 "Ŝajne reĝo havas plagon, io lin maltrankviligas, ; Sed ĉu ebla estas tio, ja ĉi tie suno brilas", ; Diris Avtandil': "Ni scias, kial reĝo kapon klinas, ; Kvazaŭ ŝerce ni demandu, kial gaje li ne ridas".

'59 Avtandil', Sograt ekstaris, al la reĝo proksimiĝis, ; La kalikon por trinkaĵo propramane li plenigis, ; Trankviligi reĝon volis, bonhumoris kaj ekridis, ; La veziro tamen ŝercis, gajan vorton li aldiris:

'60 "Kial estas vi malĝoja, kial havas vi angoron? ; Vere perdis vi kortegan valoraĵon kaj trezoron, ; Ĉion la filin' bonkora jam disdonis al popolo, ; Por vi estus ja pli bone ne sidigi ŝin sur tronon".

'61 Kiam reĝo paroladon de l'veziro finaŭskultis, ; Estis li tre mirigita: "Kun ĉi vortoj vi trouzis, ; Vi vezir' – servanto mia, kiu diris, ke mi stultis, ; Kaj ĉu povus iu iam pri avaro min akuzi?

'62 ' Ne pri tio mi malgajas, jen alia tragedio, ; Kaŭzo, ke mi maljuniĝis – proksimiĝas jam la fino, ; Malfacilas en la regno trovi tian bravan viron, ; Kiu povas plidaŭrigi kavaliran tradicion.

'63 ' Do mi havas nur filinon – dio ne donacis filon, ; La virino estas ino, ŝi nur penas fari ion, ; En juneco mi pilkludis – estis ĉiam la venkinto, ; Eble Avtandil' similas, mia juna edukito".

'64 Al paroloj de la reĝo Avtandil' ridetis kore, ; Li mallevis sian kapon kaj aŭskultis laŭdon vole, ; Brilis liaj blankaj dentoj memkontente kaj petole, ; Rostevan' demandis: "Kial vi ridetas nun fripone?"

'65 Avtandil' aŭdacis fine kaj respondis kun respekto: ; "Donu al mi la farmanon* kaj atentu argumenton, ; Ke vasalon vi aŭskultos kiel patro, kun prudento, ; Ne koleros kaj ne punos pro ne deca elokvento".

'66 Je filino ĵuras reĝo – ne koleros kiel patro, ; Avtandil' komencis poste: "Nun mi diras sen singardo: ; Ne tre taŭgas fanfaroni pri la pafarkista arto, ; Pli konvenas modesteco ol la vana parolado.

'67 ' Avtandil' – mi, polvo via, estas juna kaj spaspeto, ; Mi kun vi konkuri volus sur la kamp', sen pardonpeto, ; Ni alvoku niajn trupojn por la ĝusta pri atesto, ; Ili nomos la venkinton, kiu ĉasos pli da bestoj".

'68 Rostevan' denove diras: "Mi ne estas la profeto, ; Sed konkuri kun vi volas, mi konsentas fari veton. ; La plej spertajn militistojn ni invitos por atesto; Kampo montros, kiu venkos – mi maljuna aŭ spaspeto.

'69 ' Malvenkito de l'konkuro sen kapvesto dum tri tagoj ; Devos ĉie promenadi". Finis reĝo sian blagon. ; La sekvantan tagon ili planis iri al ĉasado, ; Gastoj ridis, estis gajaj, sklavoĵoj prenis multajn sagojn.

'70 "Estu por ĉasado pretaj!" – reĝo kriis al la sklavoĵoj, ; "Iru peli la ĉasistojn, venu ĉiuj kun pafarkoj". ; Li invitis kunĉasistojn en arbaroj kaj sur kampoj, ; Do finiĝis la festeno, kie kantis oni kantojn.

, & La ĉasado de Rostevan' kun Avtandil' :

'71 Svelta liliflor' spaspeto matenfrue galopvenis, ; Li – rubena kristalvitro en purpuro sin belvestis, ; Orteksaĵa pelerino por junulo tre konvenis, ; Ekridetis kavaliro kaj ĉasadon eki petis.

'72 Sin ekipis la monarĥo kaj sidiĝis sur ĉevalon, ; Ĉeno de la trupoj liaj ĉirkaugis verdan valon, ; Regis tie festa bruoj, kiel apud akvofalo, ; Kaj konkuris dum ĉasado la rivalo kun rivalo.

'73 Reĝo vokas dek du sklavojn – la fidelajn kunĉasantojn: ; "Sklavoj, portu por ĉasado streĉajn arkojn, akrajn sagojn, ; Vi kalkulu niajn pafojn kaj komparu ĝustajn trafojn, ; Mortigitajn bestojn metu por kalkuli en la arojn".

'74 Estis granda sangverŝado, kuris ĉiaj animaloj, ; La onagroj, cervoj, kaproj kaj malicaj leopardoj, ; Mortigitaj ili estas per rapidaj, akraj sagoj, ; Jen pafarko de l'ĉasisto, jen senlacaj liaj manoj.

'75 Polvo de ĉevalaj hufoj sunan lumon preskaŭ kaŝis, ; Sango de la bestoj fluis, ĉar ĉasistoj lerte trafis, ; Avtandil' kaj reĝo ambaŭ evidente bone ĉasis, ; Tamen la vunditaj bestoj nun forkuri ne kuraĝis.

'76 Ili gregojn persekutis, multajn kampojn tragalopis; Ankaŭ dio mem tro grandan sangverŝadon malaprobis. ; Ĉie herbo en ĉasejo pro la sango ruĝkoloris, ; Avtandilon observantoj pro sukceso laŭde gloris.

'77 Kaj ĉasistoj jam trarajdis ĝis la fino verdajn kampojn, ; Jen rivero inter rokoj, al ĉielo flugis falkoj, ; Ĉiu besto jam sin kaŝis en densejoj kaj arbaroj; Kvankam lacaj homoj montris bonhumoron per aklamoj.

'78 Avtandil' kaj Rostevan' ĉi kune estis, multe ridis, ; "Mi – gajninto", ambaŭ diris, kvankam veron eĉ ne sciis, ; "Nun kalkulu, kian nombron ambaŭ el ni du mortigis". ; Al servistoj kaj aliaj atestantoj reĝo diris.

'79 "Ni sincere diras, reĝo, ne mensogas viaj sklavoj, ; Ni ne volas vin ofendi, sangoriĉa estas tago, ; Avtandil' ja pli sukcesis, bone trafis liaj sagoj, ; Estis ĝojo por ĉasisto, por la bestoj granda plago.

'80 ' Kune vi mortigis aron el centoble dudek bestoj, ; Avtandil' vin ja superis je dudekoj da aferoj. ; Eĉ mistrafojn ni ne vidis, liaj sagoj trafis celojn, ; Viaj sagoj kelkajn fojojn enpikiĝis en la teron".

'81 Avtandilon laŭdis ĉiuj – feliĉigis Rostevanon, ; Kiu sentis ravon kvazaŭ post sukcesa ĵet' de nardoj*, ; Ĉar li amis edukiton, kiel rozon najtingalo, ; Kvankam li malgajnis veton, li ridetis al rivalo.

'82 Kaj eksidis ili ambaŭ en la arba freŝa ombro, ; Estis lacaj kaj ne povis elparoli unu vorton, ; Dek du sklavoj – la plej bravaj, staris antaŭ la sinjoro, ; Do ripozis la ĉasistoj ĉe arbaro, apud fonto.

, & Pri tio, kiel arabreĝo ekvidis tigrofelulon:

'83 Ĉe la font' sidanta ploris iu bela aliulo, ; Rajdĉevalon nigran tenis je rimeno li – fortulo. ; Perloj dense kovris selon kaj ĉevalon de l'solulo, ; Liaj vangoj palis prujne, gutis larmoj el okuloj.

'84 Tiu estis kavaliro, alta, svelta, kiel kano, ; Li – en tigra fel' vestita havis tigrofelan ĉapon, ; Tenis li grandegan skurĝon, dikan kiel lia mano, ; Lin proksime volis vidi de ĉasistoj karavano.

'85 Kaj sendita estis sklavo por rekoni nekonaton, ; Kiam li alproksimiĝis, tute perdis parolarton, ; Kristalvitra pluvo falis teren apud la ploranto, ; Eĉ ne vorton la junulo diris re al demandanto.

'86 Pro timo la sendito ne kuraĝis ion diri, ; Li rigardis kavaliro, iomete trankviliĝis, ; Poste diris li mallaŭte: "Reĝo vin deziras vidi", ; La fremdulo tamen mutis, lia ploro koron ŝiris.

'87 La ploranto ne ekaŭdis nek ekvidis la senditon, ; Ne rimarkis li bruegon, nek fanfarojn de ĉasistoj, ; Ĉar bruligis flamo koron de la juna turmentito, ; Sangajn larmojn kaj ĝemadon kaŭzis granda malmemfido.

'88 Liaj revoj, liaj pensoj vagis en alia lando; Ripetita estis peto, sed ne ĉesis la plorado, ; Ne atentis kavaliro pri la vortoj de la sklavo ; Kaj ne malfermiĝis lipoj – tiuj ruĝaj rozpetaloj.

'89 La sendito sen respondo al la reĝo fine venis; ; "Li ne volas nin ekkoni, mi nur tiel lin komprenis; Li blindigis kiel suno, mi vidinta preskaŭ svenis. ; li ne aŭdis vian peton kaj respondi li ne emis".

'90 Ofendita kaj kolera Rostevan' esprimis miron; Dek du sklavojn li venigis kaj ordonis sen hezito; ; "Iru tuj al la strangulo, prenu kune la armilojn, ; Kiu ajn li estus – urĝe alkonduku tiun viron".

'91 La armitaj pafarkistoj proksimiĝis al la viro, ; Nun ekvidis realaĵon la ploranta kavaliro, ; Li ĉirkaŭrigardis fine kaj rimarkis militistojn, ; Kriis li nur unu vorton* "Ve" kaj eĉ ne prenis tranĉarmilon.

'92 Kavaliro viŝis larmojn, prenis siajn glavon, sagon ; Kaj eksidis sur ĉevalon ne aŭskultis paroladon, ; Tenis ĉevalkondukiĵojn per fortegaj siaj manoj, ; Kaj subite forgalopis de armitaj arabsklavoj.

'93 Lin la sklavoj vokis kapti, la aŭdacan kavaliro, ; Sed al ili jen okazis granda plago, aĉa fino: ; Li iliajn brustojn sekis per la forta leda vipo, ; Kapon al la kap' kunpuŝis de la povraj turmentitoj.

'94 Rostevan' ekfuriozis, lin ekkapti vivan volis, ; Sed portanto de fel' tigra batalinte forgalopis, ; Homon sur la homo puŝis, kun neniŭ ekparolis, ; Vane Rostevan' – la reĝo, persekuti lin ordonis.

'95 Ambaŭ – Avtandil' kaj reĝo – sur ĉevalojn tuj eksidis, ; Lin postrajdi kaj atingi la rajdantoj tre deziris, ; Sed ĉeval' de nekonato kvazaŭ nevidebla iĝis, ; Tamen tiu, kiu fuĝis, persekuton bone vidis.

'96 Skurĝis li ĉevalon sian kaj forrajdi tre rapidis, ; Malaperis tuj la viro, kaj neniŭ lin plu vidis, ; Eble li ĉielon flugis aŭ abismo lin entiris, ; Estis vero – la rajdanto eĉ la spuron ne restigis.

'97 Ili serĉis liajn spurojn kaj nenie ilin trovis, ; Miris ĉiu: "Tiu Devo* kiel malaperi povis". ; La mortintoj tie kuŝis, la vunditoj ĝeme ploris, ; Kaj la reĝo gajan feston ne daŭrigi tuj ordonis.

'98 Diris li: "Por mi, verŝajne jam finiĝis difavoro, ; Ĉar la gaja fest' fariĝis nur malĝojo kaj doloro, ; Kuracisto ne kuracos mian vundon en la koro, ; Estu laŭ la dia volo, kaj al dio sola gloro".

'99 Kaj al hejmo sin direktis de ĉasad' la maljunulo, ; Ĉiuj sklavo, militistoj, siajn lasis jam okupojn, ; Ĉiuj metis la armilojn, ĉagreniĝis eĉ la trupoj, ; Kelkaj diris: "Reĝo pravus, tio estas dia puno"

'100 Reĝ' malgaje hejmen venis, perdis ĝojon kaj esperon, ; Avtandil' – la edukito, ĉe li restis ĉi vesperon, ; Kaj foriris de kortego la veziroj, kurieroj, ; Ĉangon* jam neniŭ ludis, ĉie regis la sufero.

'101 Tinatin' eksciis baldaŭ pri ĉagreno de la patro, ; Al la pordo proksimiĝis ŝi mem suno kaj la astro, ; Kaj demandis trezoriston: "Ĉu jam dormas la monarko?" ; Li respondis: "Tute pala sidas nia kara mastro"

'102 Kun la reĝo en la ĉambro sidas nur nomita filo, ; Estas reĝo ĉagrenita, ne parolas kun facilo, ; Tinatin' ekflustras time: "Nun al patro mi ne iros, ; Se demandos li, respondu: "Estis tie ĉi virino".

'103 Post nelonge reĝ' demandis: "Kion faras la filino, ; Mia perlo, mia ĝojo, viva akvo, belulino?" ; "Ŝi ĵus estis ĉi", respondis trezoristo pri reĝino, ; Vi ne estis en humoro, do reiris la fraŭlino".

'104 Kaj la reĝ' ordonis: "Iru kaj ŝin petu min viziti, ; Diru, kial ŝi foriris, ĉu malĝojon ŝi evitis? ; "Venu tuj al mi, filino, vi min povas resanigi, ; Mi rakontos pri evento, kiun ni dum ĉaso vidis".

'105 Tinatin' tuj venis reen, obeeme al la patro, ; La vizaĝo ŝia lumis, kiel surĉiela astro, ; Apud reĝo ŝi sidiĝis, li ŝin kisis sur la vangon ; Kaj riproĉis: "Ho, filino, vi forgesis pri zorgado"

'106 Kaj respondis junulino: "Kial vi, ho, ĉef, koleras? ; Ĉu kuraĝas vin viziti eĉ la homo memfidema? ; La kolero via povas ja estingi lumojn stelajn, ; La agado pli valoras, ol ĉagreno forgesema"

'107 Li ripetis: "Ho, infano, estas mi la feliĉulo, ; Ĉar mi vidas belulinon, vi ĝojigas min – oldulon, ; Certe, via ekzistado por mi estas hela luno, ; Vi por mi signifas ĉion, vi kuracas min – solulon.

'108 ' Mi renkontis strangan viron, bela estis li – fremdulo, ; Universon mem lumigis brilradia lia lumo, ; Mi ne sciis, kial ploris tiu juna ĉagrenulo, ; Li rifuzis min viziti, kapti volis mi solulon.

'109 ' Min vidante, larmojn viŝis, poste li surĉevaliĝis, ; Miajn dek du sklavojn murdis, kiujn tie li ekvidis, ; Kiu estis li – diablo aŭ la homo, mi ne sciis, ; Tamen mi eĉ nun ne scias, kial li min malestimis.

'110 ' Ĝis hodiaŭ mi ne scias, kiun vidis, kiu estis, ; Sangavida nekonato miajn sklavojn tute tretis, ; Ĉu li vere karnon havis, mi ne pensis kaj ne kredis, ; Eble min ne amas dio, eble li pri mi forgesis.

'111 ' Li venenis miajn tagojn, mian vivon amariĝis, ; Mi forgesis feliĉegon, mi do reĝe amuziĝis, ; Min neniuj konsolos, en malĝoj' mi trankviliĝis, ; Ke mi estis malfeliĉa, tion mi bonege sciis".

'112 Ŝi respondis: "Kial, patro, vi akuzas karan dion? ; Ĉu malbonon povas fari tiu, kiu kreas virton? ; Lin insultas nur la homo, kiu estas mem nenio, ; Dio povas homojn juĝi, nur li havas la klarvidon.

'113 ' Mi konsilas, via moŝto, esti nun la plej prudenta, ; Vi ja estas inter reĝoj la unua, eminenta, ; Sendu ĉien viajn homojn, plej aŭdacajn, serĉi pretajn, ; Por lin trovi, ĉar vi perdis homon do senprecedantan".

'114 Li decidis kurierojn sendi en la fremdajn landojn ; Kaj ordonis: "Vi vojaĝu, kuraĝuloj, ĝis la maroj, ; Vi pri li demandu ĉie homojn kaj kunvojaĝantojn, ; Kaj leterojn sendu tien, kien ne atingas manoj".

'115 Kavaliron serĉi ĉien kurieroj tuj foriris ; Ĝis mondlimo dum la jaro, sed serĉaton ne ekvidis, ; Ili povis nur respondi: "Ni la celon ne atingis", ; Kiam sklavoj hejmen venis, ili al la reĝo diris:

'116 "Ni esploris firman teron, ĉiun landon kaj la ŝtaton, ; Ni pri li demandis ĉiun – la fremdulon kaj konaton, ; Sed videble vanaj estis niaj penoj kaj vagadoj, ; Nin pardonu, reĝa moŝto, senrezultis la serĉado".

'117 Reĝo diris: "Estas prava la reĝino arabia, ; Tiu homo tigrofela estis ne mortulo dia, ; Sub ĉi tiu korpo kaŝis sin diablo fantazia, ; Nun sufiĉas ĉagreniĝi, iru for, malĝojo mia".

'118 Tiel pensis reĝo, poste al veziroj li anoncis; La kantistojn kaj verkistojn arablandajn oni vokis, ; Kaj aranĝis oni feston, ĉar humoron li retrovis; Ĉu pli bonan reĝon trovi la potenca dio povis?

, & Tinatin' sendas Avtandilon por serĉi tiun kavaliron:

'119 Avtandil' sur lito sidis en katuna pelerino, ; Per la ĉango bele ludis kaj prikantis iujn rimojn, ; Sed surprize negro venis kaj informis lin sen timo: ; "Kiel poplo svelta volas vidi vin – la ĉarmulino".

'120 Tre agrabla estis tiu vortanonco pri l'reĝino; Li sin vestis, sin ornamis, kiel vera kavaliro, ; Li ja volis rozon vidi, longe havis la deziron, ; Ŝin apude vidi – ĝojo, kaj ne vidi – la sopiro.

'121 Avtandil' – la kavaliro paŝas kiel reĝo vera, ; Sed okuloj liaj estas ekscititaj, larmoplenaj; Tie sidis ŝi kaj brilis kiel fulmo malserena, ; Antaŭ ŝi mem luno ŝajnis tute pala, nelumema.

'122 Tinatin' sur la talio portis belan ermenfelon, ; Tre ornamis la reĝinon bela ĉeno el rubenoj. ; Nigraj brovoj, okulharoj plibeligis la mienon, ; Densaj haroj ĉirkaŭvolis blankan kolon de l'anĝelo.

'123 La reĝin' en ruĝkovrilo sidis tamen ĉagrenita, ; Petis lin sidiĝi tie, estis tiel bonanima, ; Altvalora seĝo estis laŭ ordono alportita, ; Kaj apude sidas paro, unu la alian indas.

'124 Poste la reĝino diris: "Mi hezitas, estas vero, ; Ĉu silenti aŭ rakonti pri premanta min afero. ; Ĉu vi scias, kial petis mi pri via tuja veno? ; Kial sidas mi ĉi tie en la trist' kaj malsereno?"

'125 Diris li: "Vi – suno hela, kion devas mi nun fari? ; Apud suno lun' ne lumas, ĝi nur povas vane flagri, ; Ne divenos mi la kaŭzon, do mi petas rakontadi, ; Kaj mi estas ĉiam preta vin en plago akompani".

'126 Ŝi respondis elegante kaj sufiĉe elokvente: ; "Mi ne vidas vin tre ofte, do aŭskultu nun atente, ; Kaj ne miru, ke mi diras pri sekreto espereble, ; Tamen volas mi vin peti ion fari proksimtempe.

'127 ' Avtandil', vi ja memoras, Rostevan' dum la ĉasado ; Vidis strangan kavaliron, ploris tiu nekonato, ; Jen al vi petego mia, ankaŭ malfacila tasko: ; Trovu lin, eĉ tutan mondon traserĉinte sen prokrasto.

'128 ' Ne parolis mi, sed tion jam delonge mi divenis, ; Kial vi solece ploris, kia fajro vin turmentis. ; Sciis mi, ke vian koron ama sento jam konkeris, ; Ke vi amas min sindone, kaj mi tion bone sentis.

'129 ' Pro du kazoj, kavaliro, al mi servi vi ja devas, ; Ĉar, unue, vi vasalo forta kaj fidela estas; Due, vi – miĝnuro mia, kaj sendube tio veras, ; Do vi trovu la strangulon, kiu nekonata restas.

'130 ' Plifortigu vian amon per la ago sukcesplena, ; Neniigu la satanon, vi ja estas batalema, ; Ĉirkaŭ mia kor' disŝutu roz-violejn aromplenajn, ; Poste venu vi – leono, kun vi sun' kuniĝos bela.

'131 ' Dum tri jaroj serĉu tiun tigrafelan kavaliron, ; Se vi trovos lin – atendos vin laŭdego kaj admiro, ; Ĉar ne kredas mi, ke estas nevidebla tiu viro; Tiam trovos vi la rozon, freŝan, kiel dum foriro.

'132 ' Ĵuras mi – alia viro mia edz' neniam estos, ; Eĉ se suno homiĝinta min pri tio iam petos; Se mi malfidela iĝos, en infero mi pereos, ; Min mortigu per ponardo, se mi veron ne alcelos".

'133 Li respondis : "Ho, vi, suno, kun belegaj okulharoj, ; Mi aliajn vortojn diri ne intencas al monarko, ; Pensis mi, ke morton trovos, vivon donis vi – la astro, ; Mia estas vi reĝino, mi plenumos tiun taskon".

'134 Li denove: "Ho, vi, suno, ĉar vin tia kreis dio, ; Vin obeas ĉiuj astroj, gloras vin konstelacioj; La favor' al mi montrita estas beno, estas ĉio, ; Kaj ne velkas mia rozo – ĝin varmigas sunradioj".

'135 Kaj ankoraŭ ili ĵuris pri la sento sankta, pura, ; Jen konfirmis sian amon, kiu estis vere brua; Unu koro trankviliĝis kaj feliĉe batis dua, ; De ridetoj brilis dentoj, kiel blanka neĝo frua.

'136 Ili sidis vid-al-vide, gaje fluis la parolo, ; Brilis en rigard' ĝiŝero*, vangoj en rubenkoloro, ; Kavaliro diris: "Fajro forbruligis mian koron, ; Vin vidante freneziĝas mi kaj dronas en adoro".

'137 Nun foriris kavaliro, la korŝira estis dramo, ; Volis ŝin denove vidi, belan sunon svelta kano, ; Li silentis, ĉar ne kantas ja sen rozo najtingalo, ; Por la kor' li donis koron, tion ja postulis amo.

'138 Diris li al ŝi: "Ho, suno, sen vi rozo tuj paliĝos, ; Mi – rubeno, kristalvitro, nur sukceso flava iĝos, ; Kion fari, se mi sunon longan tempon ne ekvidos, ; Mortos mi pro amo mia, tiu sent' la vivon gvidos".

'139 Volis dormi kavaliro, sed la dormo lin ne tuŝis, ; Akvofalo de la larmoj sur la teron longe fluis, ; En la lito tremis viro, ŝian nomon lipoj flustris, ; Rememoroj en soleco koron ŝiris kaj torturis.

'140 La diŝig' kun amatino lin plenigis per sopiro, ; Perlaj larmoj forruliĝis de rozvangoj de la viro, ; Kaj matene sin belvestis la belega kavaliro, ; Lerte li surĉevaliĝis, forgalopis kun inspiro.

'141 Li transdonis al la reĝo per eĝibo*, kiu diris: ; "Havas mi honoron, reĝo, min prezenti kaj aliri, ; Via glavo tutan mondon jam konkeris, al militis, ; Certe la popolo volas ĉion pri vi, reĝo, scii.

'142 Mi trarajdos tutan landon, mi atingos ĉiujn limojn, ; Disvastigos mi sciigon pri kronaĵo de l'filino, ; Certe ĝojos obeemaj – malamikoj havos finon, ; Mi sendados la leterojn kaj donacojn kun estimo".

'143 Tre dankema estis reĝo, aŭskultinte tiajn vortojn, ; Li resendis: "Scias ĉiu vin, leonon, vian forton; La konsilo via bonas, ĝi atestas bravan moron, ; Iru, tamen, kion faros mi, restinta ĝis la morto?"

'144 Baldaŭ Avtandil' alvenis kaj ekvidis suverenon; "Via moŝto, mi verdire ne meritas ĉi laŭdegon; Se favoros dio, tiam certas mi pri la reveno, ; Vin denove vidi gaja por mi estos granda beno".

'145 Ĉirkaŭbrakis reĝo patre kavaliron, multe kisis, ; Edukito, edukinto – ambaŭ do kontentaj ridis. ; Kavaliro ekstaris poste, adiaŭis kaj foriris, ; Kaj eklarmis reĝo, kvazaŭ kun la filo li disiĝis.

'146 Avtandil' galopis hejmen kun la reĝa maniero, ; Dudek tagojn li jam rajdis, spiris freŝan li aeron, ; Ĉiam pensis kun honoro plenumigi sian devon, ; Tinatin' – vizaĝo ĉie ne forlasis lian revon.

'147 Li atingis sian landon kaj ekĝojis lia domo, ; Nobelaro lin gratulis, donis altvaloran donon; Avtandil' la sunvizaĝa ĉie vidis grandan ĝojon, ; Ĉiuj lin salutis kore, ĉar li estis la patrono.

'148 Ĉirkaŭita per muregoj, staris lia fortikaĵo,
; Ĝin evitis malamikoj, ĉar timigis li fiaĵon. ;
Avtandil' pasigis tie tagojn, serĉis la ĉasaĵon. ;
Poste por konsilo vokis Ŝermadinon kun
omaĝo.

'149 " Ŝermadin', mi devas honti, ke al vi – al
la helpanto ; Mi ankoraŭ ne rakontis pri suferoj
de la amo, ; Do ne scias vi pri tiu, kiu kaŭzis
miajn larmojn; Nun al mi ŝi donas ĝojon – por
korvundoj la balzamon.

'150 ' Mi ekamis Tinatinon, tiu sento estas
vola, ; Varmaj larmoj – la narcisoj falis sur la
rozojn noblajn ; Mi sekreton ne malkaŝis, ĉar
ĝis nun mi estis sola, ; Nun esperon ŝi donacis,
tio ege min konsolas.

'151 ' Ŝi ordonis: "Se vi havas la kuraĝon en
animo, ; Dum tri jaroj devas trovi arogantan
kavaliron, ; Lin trovinte, vi revenos, mi satigos
la deziron". ; Ŝi balzamis koron mian, kiu
sentis nur sopiron.

'152 ' Mi unue nur vasalo, devas servi al
patrono, ; Fideleco al la reĝoj estas nia sankta
moro, ; Due, ŝi estingis fajron, bruligintan
mian koron, ; Ĉiun plagon kun kuraĝo devas
superforti homo.

'153 ' Estas ambaŭ ni amikoj, scias bone la
kreinto, ; Tial mi vin petas frate, regu kiel la
venkinto, ; Mi konfidas al la trupoj, estas vi
okulvidinto, ; Kaj mi scias – ne kuraĝos vin
ataki agresinto.

'154 ' Estu la gvidant' de trupoj, sklavo, ĥasoj,
nobelaro, ; Sendu viajn kurierojn al la reĝ' kaj
registaro, ; Skribu al li la leterojn kaj sendadu
donacaron, ; Ĉar ne devas senti mian
forveturon la reĝaro.

'155 ' Min similu kiel homo, batalanto kaj
ĉasisto, ; Kaj atendu dum tri jaroj, ĝis revenos
mi, venkinto; Mi esperas, ke mi venos – ĝojos
reĝo – edukinto, ; Sed se mia rozo velkos –
min priploru en la tristo.

'156 ' Vi nur tiam al la reĝo sendu la funebr-
informon, ; Skribu, ke mi trovis morton, estas
jam en frida tombo, ; Diru, ke min trafis sorto,
kiun ne evitas homoj, ; Kaj disdonu al povruloj
la arĝenton kaj la oron.

'157 ' Tiam estu pli utila, ne forgesu amikecon,
; Foje-foje rememoru min velkintan jam
cipreson, ; Por animo mia preĝu, kiel ĝin
postulas deco, ; Ne forgesu miajn zorgojn, agu
kiel la parenco".

'158 Aŭskultinte tion, ĉion, la vasalo multe
miris, ; En okuloj liaj larmoj kiel diamantoj
brilis, ; "Mi sen vi ne povas gaji", li sincere
tion diris, ; "Sed reteni mi ne povos, se vi tiel
jam decidis.

'159 ' Sen vi iĝos la ekzisto tre ĉagrena,
malfacila, ; Vin ĉi tie anstataŭi – estas faro
senutila, ; Jam pli bone estus morti, ol vin vidi
sole migran, ; Mi vin petas min kunpreni, estos
mi helpanto via".

'160 Avtandil' respondis: "Al vi diras mi nur
puran veron: ; Se miĝnuro ege amas, sole
devas treti teron, ; Oni trovas ne sen peno sur
marfundo la perleron, ; Malbonulon,
perfidulon oni sendas al infero.

'161 ' Nur al vi konfidi povis mi sekreton de la
koro, ; Kaj nur vi amike indas regi miajn
terojn, homojn; Landajn limojn kaj la urbojn
fortikigu kun fervoro, ; Kaj esperu – mi
revenos, ĉar kun mi ja di-favoro.

'162 ' Plago ja egale murdas unu homon aŭ la
centojn, ; Mi ne timas la solecon, mi ne petas
la kunsenton; Nur post paso de tri jaroj vi
proklamu la funebrojn; Nun mi donos al vi
skribon devigantan al obeo".

, & La letero de Avtandil' al siaj homoj:

'163 "Miaj karaj edukitoj" – Skribis Avtandil'
per plumo, ; "Vi por mi ja ĉio estas, vi, fidelaj
proksimuloj, ; La leteron tiun legu, ĉar
intencas mi veturon, ; Atenteme min aŭskultu,
mi parolas pri futuro.

'164 ' Vi aŭskultu, kion skribas Avtandil' kun
la omaĝo, ; Al vi, homoj miaj estas direktita ĉi
mesaĝo, ; Kaj anstataŭ la festenoj, kelkan
tempon mi vojaĝos, ; Mi konfidos al pafarko
mian sorton kaj nutraĵon.

'165 ' Do mi devas iri ien kaj forlasi la patron,
; Estos sola mi dum jaro, en la mano tenos
bridon, ; Tial petas mi vin ege, ne forgesu
mian diron, ; Vi defendu mian regnon de
diversaj militiroj.

'166 ' Mi postlasas Ŝermadinon, por ke estu li
gvidanto, ; Ĝis ekscios li, ke estas mi mortinto
aŭ vivanto, ; Kiel suno abelvakson, neniigos li
pekantojn, ; Ne permesos li al rozo morti, nia
bonfaranto.

'167 ' Vi ja scias, mi edukis Ŝermadinon kiel filon, ; Mi vin petas, lin obeu, donos li al vi konsilon, ; Kiam vokos la trumpetoj, helpos vi al li sen timo, ; Se mi mortos, ploru multe, kiel ploras la patrino".

'168 Tiel finis li leteron, ĝin skribinta elokvente, ; Zonis sin per ora zono, por vojaĝ' ekipis plene, ; Kaj ekkriis: "Sur la selon!" kiel vokis alitempe, ; Ĉar ne volis kavaliro sen agado sidi hejme.

'169 Li ordonis: "Vi foriru, restos sole mi en valo". ; Restis sola kavaliro sen servistoj kaj sen sklavoj, ; La solulo tra arbustoj forgalopis sur ĉevalo, ; Tinatin' en lia koro iĝis lia idealo.

'170 Preterpasis li densejojn kaj direktis sin al kampo, ; Kaj lin plu neniu vidis, nek ĉasisto, nek servanto, ; Lin eĉ per la sagoj akraj ne atingus la serĉanto, ; Li kunprenis la sopiron, ĉar li estis la amanto.

'171 Jam finiĝis la ĉasado kaj laciĝis ĉiuj sklavoj, ; Lin – sunklaran, oni serĉis en arbaroj, sur la kampoj, ; Grandan ĝojon anstataŭis la ĉagren' kaj malbonstato, ; Serĉis lin ĉasistoj ĉie kaj precipe la rajdantoj.

'172 Ĉiu kriis: "Ho, perdiĝis la leono, nia amo". ; Kaj komencis ĉie serĉi, demandadi vojirantojn, ; Sed neniu ion vidis, eĉ la spuron de rajdanto, ; Kaj la trupoj verŝis larmojn pri ĉagreno kaj amaro.

'173 Ŝermadin' kunvokis homojn: sklavojn, ĥasojn, nobelarojn, ; Montris li leteron lian, kiun skribis li per plumo, ; Kun tranĉitaj koroj staris la silentaj korteguloj, ; Sur la brustojn sur la kapojn ili batis sin per pugnoj.

'174 Kaj al Ŝermadin' estime ĉiuj diris sen prokrasto: ; "Kvankam estos malfacila nia vivo en la vasto, ; Vin elektis kiel ĉefon nia Avtandil' – la mastro, ; Do ordonu, ni obeos kaj plenumos lian taskon".

, & Forveturo de Avtandil', por serĉi la tigrofelulon:

'175 Dionos* – la saĝa, Ezros* por ni lasis la edifon: ; Kompatinda estas rozo en la stato de frostigo, ; Same velkas ankaŭ homo, kiel svelta kana tigo, ; Kiam li vagadi iras el la hejm' en malproksimon.

'176 Tragalopis kavaliro ebenaĵojn de l'patrio; Jam finiĝis ter' gepatra, foris arablanda limo, ; Sur ĉevalo li sidante, pensis pri la sunreĝino, ; Diris: "Mi ne plorus tiom, se ĉeestus amatino".

'177 Freŝaj flokoj de la neĝo kaj la prujno kovris rozon, ; Iufoje li ĉagrenis kaj trapiki volis koron, ; Diris: "Mondo centobligis miajn plagon kaj angoron, ; Ne ĝojigas min la harpo, nek la ŝalmo aŭ la gloro".

'178 Rozo – li de sun' disiĝis, ĉiam pli kaj pli ĝi velkis, ; Sed ne vane li al koro multe plori malpermesis; Avtandil' – fremdulo migra, en fremdlandoj iun serĉis, ; Pri serĉato demandadis, trovi lin sencese penis.

'179 Dum serĉado liaj larmoj fluis al saleta maro, ; Lia lito estis tero kaj kuseno propra mano, ; Li parolis: "Karulino, ne forgesos vin amanto. ; Mi por vi toleros ĉion – la mizeron kaj korbatojn".

'180 Li trarajdis tutan teron, ĉie serĉis nekonaton, ; Kaj ne estis iu loko, forgesita dum vagado, ; Sed al Avtandil' neniu ion diris pri l'serĉato; Iris jam la tria jaro, al li restis tri monatoj.

'181 Loko, kie trafis viro, estis la dezert' ĉagrena, ; Dum monato li ne vidis idon de Adam' gasteman, ; Eĉ Ramin kaj Vis* ne konis tian plagon abomenan, ; Tage, nokte li nur pensis pri la am' neforgesema.

'182 Dormolokon li elektis monton altan kiel turo, ; Avtandil' el tie vidis larĝan valon en naturo, ; Ĉe la mont' rivero fluis, pura kiel la lazuro, ; Ĝin borderis arbaretoj, nestis tie la vulturoj.

'183 Do komencis kavaliro nombri la restintajn tagojn, ; Kaj okazis, en dispono havis li nur du monatojn, ; "Estos mi trompinto fia – ne plenumos mi la taskon. ; Bonon la malbon' ne naskos, min dufoje la gepatroj".

'184 Lin turmentis tristaj pensoj, li meditis pri afero: ; "Se returnos mi malglorie, perdos tute mi esperon, ; Al reĝino ĉu mi povos diri la teruran veron? ; Mi ja serĉis kavaliron, sed ne trovis lin sur tero.

'185 ' Se mi ne revenos hejmen kaj ankoraŭ serĉi provos, ; Kaj pri la serĉato dume mi nenian scion trovos, ; Tempo pasos – Ŝermadin' jam kiel mortan min priploros, ; Al reĝ' Rostevan' li iros – la sciigon tristan portos.

'186 'Ŝermadin' rakontos ĉie pri tragika mia sorto, ; Ploros oni en la urboj, ploros ĉe la reĝa trono, ; Strange estos, se revenos el mortintoj mi – fantomo". ; Li, plorinte pensis tiel kaj malbenis tutan mondon.

'187 Avtandil' meditis: "Dio, kie estas la justeco? ; Kial mia migro restis sen rezulto, sen sukceso? ; Vi elŝiris el la koro mian ĝojon kaj viklecon. ; Mi – povrulo, ĉiam ploras, sed konservos la bravecon.

'188 ' Sed mi estu pacienca kaj al larmoj venu fino; Ja ankoraŭ mi ne mortas, kaj ne volas fari tion, ; Senrezultaj estos agoj, se ne helpas al mi dio; Homo ja ne ŝanĝas sorton, nek evitas la destinon.

'189 ' Mi, serĉante ja esploras tutan teron dum la migro, ; Sed nenion mi ekaŭdis pri la stranga kavaliro, ; Li verŝajne kadĵo* estis – ŝajne veris tia diro, ; Nun al mi ne helpas larmoj kaj ne donos la utilon".

'190 Li de monto malleviĝis kaj transrajdis jam arbaron, ; La ĉevalo nun trankvile galopadis tra herbaro; Vane senutile perdis la fortecon de manparo. ; Sur vizaĝo purkristala dense ĝermis giŝer-haroj.

'191 Li decidis vojon ŝanĝi, sed ekspiris kaj ekĝemis, ; Poste ĉirkaŭrigardinte, li al valo sin direktis; Dum monat' pri homa vivo ĉi nenia spur' atestis, ; Ĉirkaŭ li nur sangavidaj kaj kruelaj bestoj estis.

'192 Kvankam Avtandil', vagante pro sopiro sovaĝiĝis, ; Tamen li bezonis manĝon, kiel leĝ' Adama diktis, ; Prenis sagon tiel longan, kiel mem Rostom* ne vidis, ; Mortiginte beston tie, ĝin sur fajro li rostigis.

'193 Li forlasis la ĉevalon, por paŝtiĝi ĉe verdaĵo, ; Kun la apetito manĝis la viandon de ĉasaĵo, ; Kaj subite malproksime li ekvidis la estaĵojn, ; Eble iris ses rabistoj, kiel montris eksteraĵo.

'194 Avtandil' pafarkon prenis kaj singarde proksimiĝis, ; Du barbuloj kun senbarba juna ulo kune iris, ; De junulo kapo sangis, ĝin li per la mano ŝirmis, ; Ili ploris kaj ĝemadis, kaj la sangon lian viŝis.

'195 Kriis Avtandil': "Hej, fratoj, eble vi rabistoj estas?" ; Jen respondis unu viro: "Maltrankvilo ne necesas, ; Vidu, nia kuniranto pro la vundo tre suferas, ; Kaj vi povas al ni helpi, ĉu vi vidas, frato svenas".

'196 Avtandil' alproksimiĝis, kun la viroj ekparolis, ; Vidis, ili malfeliĉaj kun malvarmaj larmoj ploris, ; "Ni, tri fratoj, kune ĉasis" – unu frato tuj rakontis, ; "Venas ni el Ĥatalando, kie urbon dio donis".

'197 "Ni alvenis, ĉar ĉi tie por ĉasado estas lokoj, ; Kaj kuniris multaj trupoj ĝis riveraj ŝtonaj bordoj, ; Dum monato tuta ĉasis ni sukcese en la boskoj, ; Kaj abunde fluis sango de kaprinoj, antilopoj".

'198 "Ni – tri fratoj, ĝuste trafis, ja mem dio vidis tion, ; Kaj sukcesis ni mortigi multajn centojn da kaprinoj, ; Fanfaroni ni komencis kaj akiris malamikon, ; "Faris mi pli bone" – diris firme ĉiu el la trio.

'199 ' Ni hodiaŭ hejmen sendis la ĉasistojn, cervofelojn, ; Kaj ni diris: "Senprokraste ni, ekscios tutan veron, ; Ni ĉi tie restu solaj por ĉasadi kelkan tempon; Mortigitaj bestoj montros, kiu havis la sukceson".

'200 ' La portistoj de armiloj – tri ĉasistoj ĉe ni restis, ; Trupon nian ni forsendis, kaj nenion ĝi suspektis, ; Ĉasis ni en la arbaro, animalojn ĉie vekis, ; Kaj mortigis multajn bestojn, birdojn, kiuj alte ŝvebis.

'201 ' Sed subite ĉi aperis vojaĝanto sur ĉevalo, ; Felon de la tigro portis de vireco idealo, ; Nigra estis kiel peĉo, kvarpieda animalo, ; Estis li mirakle bela, la fantomo en realo.

'202 ' Vidis ni okulojn liajn, brilis ili kiel fulmo, ; Diris ni: "Li estas suno, se ne estas ĉielulo". ; Kaj ekvolis ni lin kapti, ni aŭdacis – la stultuloj. ; Tiel ĝemas ni nuntempe, larmoj fluas el okuloj.

'203 ' Mi – plej aĝa frato, diris: "Ni ne povas lin ekkapti", ; Sed al meza nia frato la ĉevalo lia plaĉis, ; La plej juna nia frato volis tuj kun li batali, Sed fiere kaj majeste kavaliro pluen rajdis.

'204 ' Kristalvitro kaj rubeno plibeligis la vizaĝon; Tamen niaj dolĉaj revoj baldaŭ iĝis nur rompaĵoj, ; Ne eldiris li la frazon, estis kiel la sovaĝo, ; Ni ricevis skurĝo-baton, ĉar li agis sen domaĝo.

'205 ' Al plej juna nia frato lasis ni kun li kvereli, ; Kaj la frat', kriinte: "Haltu!", vane provis lin deteni, ; Sed la kavaliro glavon el glavango ne eltrenis, ; Nur per skurĝo lin bategis – sur la kapo sang' aperis.

'206 ' Skurĝobato estis tia, ke ĝi kaŭzis tujan svenon, ; Kaj simile al kadavro, frato falis sur la teron, ; La fremdulo malhonoris lin kaj punis per sufero, ; Kaj de ni en malproksimon li forrajdis kun fiero.

'207 ' Jen ĉi tiu kavaliro malrapide forgalopis, ; Al la suno li similis kaj la teron li dekoris". ; Kaj al Avtandil' la homoj lin ĉe horizonto montris, ; Tiun, kiu foren rajdis, kiel suno tie trotis.

'208 "Ne necesas nun la ploro," – bone Avtandil' komprenis, ; Li ne vane vagabondis, kaj ne vane larmojn verŝis. ; "Vi atingis vian celon, vi retrovis, kion perdis, ; Do forgesu pri mizero, kiun vi antaŭe spertis."

'209 Avtandil' respondis: "Fratoj, mi – senhejma vagabondo, ; Longe serĉis sen ripozo tiun saman strangan homon, ; Mi de vi eksciis ĉion, estis grava la rakonto, ; Vivu ĉiu en la paco, en frateco kaj konkordo.

'210 ' Kiel vi al mi redonis la esperon per parolo, ; Same mi deziras kore al vundito la konsolon; Mi de vi eksciis, kion serĉis longe kun fervoro, ; – Dio donu – preteriru vin ĉagreno kaj angoro".

'211 Avtandil', dirinte tion, sprone batis la ĉevalon, ; Nun li flugis kiel falko, kiu ĉasas en la falo, ; Flugis, kiel luno plena, kiun tiras sunbrilado, ; Persekutis la rajdanton kaj estingis sian flamon.

'212 Avtandil', proksimiĝante, la danĝeron ne ignoras; "De malsaĝa parolado frenezul' pli furiozas. ; Saĝa homo sinregadon en malfacilaĵoj montras, ; Ne atentis bagatelojn kaj pro ili ne nervozas.

'213 ' La fremdulo certe estas frenezulo senprudenta, ; Ĉar al si nenium lasas kaj la homojn ne atentis, ; Unu do el ni eĉ murdi povas en impet' kolera". ; Tial Avtandil' singarde la rajdanton kaŝe sekvas.

'214 Avtandil' meditas: "Tial devas mi prudente agi; Kiu ajn li estus, tamen sian neston devas havi, ; Kaj li rajdu, kien volas, kiom li intencas vagi; Mi en lia hejmo provos la decidon ĝustan fari".

'215 Du tagnoktonjn la fremdulon Avtandil' senĉese sekvis, ; Ili rajdis ne manĝinte, pro malsato tre suferis, ; Sed ne haltis kavaliro, kvazaŭ lacon li ne sentis, ; Ambaŭ rajdis kaj per larmoj kampojn laŭ la vojo verŝis.

'216 Ili rajdis tutan tagon kaj vespere rokojn vidis, ; Inter rokoj estis grotoj kaj rivero ĉi rapidis, ; plej diversaj vegetaĵoj dense ĉe la bord' radikis, ; Kaj grandegaj arboj tie la vidaĵon plibeligis.

'217 Tigrofela kavaliro al kaverno sin direktis; Avtandil' deĉevaliĝis, grandan arbon li elektis, ; Ĝin surgrimpis kaj de tie ĉirkaŭaĵon li observis, ; Sed pri tiu observado la rajdanto ne suspektis.

'218 Kaj eliris jen virino, kiu nigran veston portis, ; Ŝi renkontis kavaliro, "Tariel'!" ŝi lin alvokis, ; Alrajdinte tre malĝoje, li al ŝi pafarkon donis, ; La virino multe ploris, sed lin kisis kaj konsolis.

'219 Poste viro – nekonato tiel laŭte alparolis: ; "Vi, Asmat' – fratino mia, niaj pontoj maren dronis, ; Perdis ni virinon tiun, kiun mi antaŭe gloris". ; La virin' kaj tiu viro ambaŭ senkonsole ploris.

'220 De la haroj elŝiritaj la kaverno plidensiĝis, ; Ili ploris, sin brakumis, reciproke larmojn viŝis, ; Eĥo de la ĝemoj, krioj Avtandilon jam atingis, ; Kiu sur la branĉo sidis, ĉion vidis kaj tre miris.

'221 Kvankam estis tre ĉargrena, ŝi forprenis jungilaron, ; Kaj alligis la ĉevalon ĉe la arbo en la valo, ; En kaverno nun eniris tiu nekonata paro, ; Kaj de tie ne eliris ili plu dum tiu tago.

'222 Avtandil' malpacienas, la enigmon ne divenas; Mateniĝas, la virino el kaverno jam alvenas, ; Lerte bridas ŝi ĉevalon kaj ĝin je la brido tenas, ; La kirason feran donas, animalon bone selas.

'223 Tigrofela kavaliro restis en kaverno tagon, ; Poste ili adiaŭis, estis tio vera dramo, ; Kaj lastfoje enbrakiĝis, ŝi malligis la ĉevalon, ; Trista estis la virino – elŝiradis ŝi la harojn.

'224 Avtandil' denove vidis la vizaĝon de l'fortulo. ; Kaj eldiris: "Jen descendis de ĉielo hela suno." ; Kun lipharoj sed senbarba, forton montris la staturo, ; Ke leonon, kiel kapron li sufokus en brakumo.

'225 Adiaŭis kaj forlasis li la lokon kun malplaĉo, ; Kaj atingis la kamparon, kie kreskis la herbaĉoj. ; Avtandil' rimarkis ĉion, sin kaŝinte sur la branĉo, ; Pensis li: "Jen dio donas per diveno bonan ŝancon.

'226 ' Ĉu pli grandan favoraĵon al mi povis montri dio? ; Kaptos mi virinon tiun, ŝi al mi rakontos ĉion, ; Pri la stranga kavaliro la misteran historion. ; Ne uzonte mian glavon, mi akiros bonan scion".

, & Interparolo kun Asmat' en la kaverno:

'227 Avtandil' malsupreniris, la ĉevalon li malligis, ; Kaj rajdante la kaverton sen danĝero li atingis; Tuj elkuris la virino, pensis, Taniel' reiris, ; Al ŝi ŝajnis – la vizaĝo suna jen denove brilis.

'228 Pli atente rigardinte, ŝi la viron ne rekonis, ; Avtandil' deĉevaliĝis, ŝin facile kapti volis, ; Do ekkriis ŝi terure kaj forkuri vane provis, ; Per kriego de l'virino la ĉirkaŭaj rokoj sonis.

'229 Avtandil' ŝin lerte kaptis, kiel aglo la koturnon, ; Ŝi baraktis kaj vizaĝo ŝia palis kiel muro, ; Vane vokis Tanielon savi ŝin de la teruro, ; Peto de la aliulo estis por ŝi la torturo.

'230 "Eksilentu kaj ne krii, mi ne estas la rabisto; Vidis mi la rozojn palajn kaj vizaĝon en la tristo, ; Vi rakontu pri l'cipreso – sunsimila batalisto ; Kaj trankvile estu tute – mi ne estas la murdisto".

'231 La virino tamen ploris kaj respondis tute klare: ; "Se ne estas vi freneza, devas agi ne vulgare, ; Vi de mi ekscii volas lian historion vane, ; Kaj ne petu – la rakonto dolorigus min amare".

'232 Ŝi ripetis: "Kion volas, nekonata vi fremdulo? ; Tiun tristan historion ne priskribas ia plumo, ; Vi respondon ne ricevos, aroganta kuraĝulo, ; Mi preferas silentadon kaj ne cedos al postuloj".

'233 "–Vi ne scias, ho, virino pri vagado nek suferoj, ; Kiujn spertis mi, serĉante tiun viron sur la tero, ; Mi finfine lin ektrovis, do al mi rakontu veron, ; Mi ne povas hejmen iri nun, estante ĉe mistero".

'234 Kaj denove ŝi respondis: "Mi ne scias vin, nek konas, ; Mia suno nun forestas, do vi min ofendi povas, ; Parolado jam sufiĉas, mi respondon kurtan donas ; – Mi pri li nenion diras, vi do faru, kion volas".

'235 Sur genuoj li petegis kaj klarigis sen eraro, ; Tamen faris tion vane – inter ili restis baro, ; Koleriĝis kavaliro, sange brilis okulparo, ; Al la gorg' ponardon metis, ŝin ekprenis je la haroj.

'236 Li ekkriis: "Ĉu vi vidas mian akran tranĉarmilon? ; Por vi estos ja pli bone ĉion diri kun facilo, ; Aŭ mi murdos vin ĉi tie kiel lian kunulinon, ; Pri deven' de kavaliro donu vi al mi konsilon".

'237 La virin' respondis: "Tia manier' malbone estos; Se vi min ne murdos haste – viva mi kaj sana restos; Kial mi rakontos ion, se danĝeron mi ne sentos, ; Sed mortintoj ja silentas kaj la murd' al vi ne helpas.

'238 ' Diru, kiel vi min trovis, aroganta nekonato, ; Al vi mi neniam donos bezonatan informadon, ; Mi oferos propran korpon por distranĉi per ponardo, ; Vi mortigos min facile per kruela via mano.

'239 ' Vi ne pensu, ke la morto por ni estos turmentado, ; Min vi savos de plorĝemoj kaj sekiĝos larma maro, ; Por mi mondo ne valoras pli ol sekiĝinta kano, ; Kial devas mi konfidi, vin, hazardan nekonaton?"

'240 Avtandil' ekpensis jene: "Mi ne gajnos per tranĉilo; Mi ne tiel devas agi, sed per saĝo kaj trankvilo". ; Li ellasis ŝin el manoj, mem eksidis en proksimo ; Kaj ekĝemis: "Kion faru mi kun mia malfacilo?"

'241 Malserena, maltrankvila ankaŭ la virin' eksidis; Avtandil' apude ploris kaj nenion plu li diris; En ĝardeno de la rozoj larma lago kolektiĝis; Ankaŭ ŝi ekploris tiam, ŝia koro jam mildiĝis.

'242 Ekkompatis la virino, mem plorante pro kunsento, ; Sed ŝi sidis kiel fremda kaj ne rompis la silenton; Kavaliro nun komprenis – "Jam pardonis ŝi ofendon", ; – Kaj falinte sur genuoj, li ripetis sian peton:

'243 "Por vi estos malfacile min rigardi kiel fraton, ; Mi ofendis vin kruele, eĉ minacis per ponardo, ; Tamen min pardonu kore kaj aŭskultu kun kompatato, ; Ĉar sepfoje homo devas ja pardoni al pekanto.

'244 ' Certe, mi al vi ne povis plaĉi pro konduto fia, ; Sed komprenu vi miĝnuron – senesperan kaj pasian; Nur vi povas al mi helpi kaj neniu hom' alia; Mi al vi animon mian donos por bonkoro via".

'245 Ekaŭdinte pri la amo, pli profunde ŝi ekspiris ; Kaj pli laŭte ŝi ekploris, larmoj flamon ne estingis, ; La aludo pri la amo ŝian koron kompatigis, ; – Do sendube dio helpis kaj la celon li atingis.

'246 Avtandil' komprenis jenon: "Vorto – "Amo" ŝin paligas, ; Sekve, havas ŝi amaton, tion larmoj ja indikas"; Kaj li diris: "Ho, fratino, kiu amas – kompatindas, ; Li eĉ morton ofte serĉas kaj malofte ĝin evitas.

'247 ' Estas arda mi miĝnuro, frenezulo pro la amo, ; Mia suno min forsendis por trovi nekonaton, ; Eĉ nubegoj ne penetras, kie estis mia mano, ; Fine trovis mi ĉi tie viajn korojn, amoflamon.

'248 ' La vizaĝ' de tiu viro firme sidas en animo, ; Mi ne vane frenezulas, la sufer' ne havas limon, ; Vi aŭ kaptu min por ĉiam, aŭ donacu al mi vivon, ; Aŭ mortigu min, fratino, se ĝin volas la destino".

'249 La virino nun respondis per la vort' la plej agrabla: ; "Amon vian mi komprenis, estas eble ĝi fatala, ; Vi kondukis malamike, por mi tio estas klara, ; Trovis vi en mi fratinton, fidelkoran, veran, raran.

'250 ' Se vi estas tiel pura, kiel forta en la amo, ; Estos mi sklavino via kaj fratino por ĉiamo, ; Kaj mi faros por vi ĉion, eĉ min murdos dia flamo, ; Mi al vi fordonos vivon, mia kara fremdlandano.

'251 ' Nun se vi laŭ miaj vortoj ĉion faros kun sincero, ; Vi renkontos tiun, kiu mem rakontos pri mistero; Se vi ne obeos – tiam vi ne trovos lin sur tero, ; Vi malbonos tutan mondon kaj vi mortos sen espero".

'252 Li respondis: "Ho, fratino, mi rakontos unu fablon: ; – Iam ien kune iris amikece du paŝantoj, ; Unu vidis, ke en puton falis lia kuniranto, ; Ploris, kriis tiu, kiu restis supre ĉe la rando.

'253 ' Li konsolis: "Kamarado, vi atendu iomete, ; Iros mi por serĉi ŝnuron, sidu tie intertempe". ; En la puto dua ridis, kaj respondis elokvente: ; "Mi nenien povas fuĝi, do atentos mi vin certe".

'254 ' Mi similas al la homo, kiu sidis en la puto, ; Por la kolo mia tenas, vi mallongan, fortan ŝnuron, ; Vi bonege scias, kiel min sanigi – frenezulon, ; Kaj al via kavaliro ne minacas persekuto".

'255 Ŝi respondis: "Al mi plaĉas via saĝa parolado, ; Vi sendube estas brava kavaliro, mia frato, ; Multe vi ĝis nun suferis pro mistera nekonato, ; Do aŭskultu, vi jam trovis de la tigro-fel' portanton.

'256 ' Pri la kavaliro' nenie la sciigon vi ricevos; Nur li mem rakonti povos, se mi diros, vi ne kredos, ; Kiom ajn da tempo pasus, vi silente resti devos, ; Plore ne frostigu rozon, kaj atendu – li revenos.

'257 ' Se vi volas, nun mi povas al vi diri niajn nomojn, ; Estas "Tariel" nomata tiu nekonata homo, ; Mi – Asmat' kun li dividas la mizeron kaj doloron, ; Plimultigas mi ĝemadon, forbruligas min angoro.

'258 ' Pli ne volas mi rakonti kaj ne estas ja neceso, ; Tra la kampoj daŭre migras li, enkorpiĝinta belo, ; Kaj alportas la necesan mortigitan li la beston; Mi ne scias, ĉu li venos baldaŭ aŭ post longa tempo.

'259 ' Mi vin petas, paciencu, ne rapidu kun foriro, ; Kiam venos li denove, trovos bonan mi eliron, ; Faros mi, ke li ekŝatu vin – la belan kavaliro; Li pri si rakontos ĉion – poste vi al amatino".

'260 Aŭskultinte la virinon, li aprobis ŝian planon; Kaj subite de rivero vent' alportis foran plaŭdon; Kaj al ili ŝajnis tie – Tariel' elplonĝis akvon, ; Ambaŭ do reiris haste, ke ne vidu lin en kavo.

'261 La virino diris: "Vere, dio mem al vi favoras, ; Tamen dume vi vin kaŝu, kiam la rajdanto foras; Fremdajn homojn li evitas kaj nenien vidi volas, ; Trankviligi mi lin povas kaj koleron mi konsolas".

'262 Kaj ŝi kaŝis Avtandilon en kaverno sen prokrasto; La veninto surteriĝis de ĉevalo sen la hasto, ; Kaj denove fluis larmoj, kuniĝante kun marvasto; Avtandil' el la kaŝejo bone vidis strangan gaston.

'263 Pro la larmoj kristalvitro en sukcenon transformiĝis, ; Ili ambaŭ longe ploris, la ĉevalon ŝi alligis, ; Poste prenis ŝi armilon, Avtandil' ĉi tion vidis, ; Fine venis la silento, ili ambaŭ trankviliĝis.

'264 Ĉion vidis la arabo, kion faris kavaliro, ; Al li tigran felon sternis la zorgema servantino, ; Nun sidiĝis kavaliro, lin turmentis la sopiro, ; Sur vizaĝo restis klara, de la varmaj larmoj signo.

'265 Poste la virino zorge ekbruligis lignofajron, ; Pensis ŝi – li eble manĝos la peceton da rostaĵo; Ŝi proponis ĝin al viro, tiu ĉi komencis manĝon, ; Sed ne havis apetiton kaj elkraĉis la viandon.

'266 Li kuŝiĝis, ekdormetis kaj minutoj kelkaj pasis, ; Sed subite li ekstremis kaj de la kuŝejo saltis, ; Kun ĝemkrio sian bruston, kapon per la pugno batis; La virin' vidante tion, la vizaĝon al si gratis.

'267 Ŝi demandis: "Kial baldaŭ vi ĉi tien regalopis? ; Ĉu al vi okazis io?" kaj la kavalir' respondis: ; "Iun reĝon dum ĉasado sur kamparo mi renkontis, ; Multaj trupoj kaj servistoj kun ĉasistoj lin eskortis.

'268 ' La ĉagreno min do kaptis, kiam mi ekvidis homojn, ; Tamen mi ne proksimiĝis, ĉar ne volis mi renkonton; Mi forkuris en arbaron kaj min kaŝis inter rokoj; Kiam ili estis fore, mi daŭrigis mian vojon".

'269 Kaj eldiris la virino: "Frato, vi ne estas prava, ; Vi vagadas inter bestoj – estas do eraro grava, ; Ke evitas vi la homojn, dronas en turmento ama; Tiel vi al ŝi ne helpas, kaj migrado iĝos vana.

'270 ' Vi trarajdis tutan mondon, sed ne trovis proksimulon, ; Kiu povus vin konsoli kaj mildigi amo-vundon, ; Kiu akompanus ĉien kaj konsilus pri konduto; Se vi mortos, ŝi pereos – ĉu atingos vi rezulton?"

'271 Taniel' respondis triste: "Bona estas via koro, ; Mi ne trovas kuracilon por mildigi la doloron, ; Ĉu sur tero eblas trovi dignan homon, kiel oron? ; Mi ekĝojos tiam, kiam la anim' forlasos korpon.

'272 ' Mi ne vidis tian homon, kiun povus mi simili, ; Sed mi volus tion fari kaj kun iu ekamiki, ; Tamen kiu kun mi volas la venenon kune trinki? ; Nur vi povas, amikino, mian koron resanigi".

'273 "Ne koleru", ŝi respondis, "Mi vin, frato, kore petas, ; Kiel dio mem decidis, mi veziro via estas, ; Ĉion kaŝi ja ne eblas, bono ĉiam reaperas, ; – Do ne taŭgas la troaĵo, ĉar al vi ĝi ne konvenas".

'274 Diris li: "Fratino mia, mi vin bone ne komprenas, ; Dignan homon ie trovi ĉu sen dio vere eblas? ; Volas mi feliĉa esti, tamen dio do malhelpas, ; Mi – pekanto, sovaĝiĝis, certe kulpo mia estas".

'275 Kuraĝiĝis la virino kaj al li decidis diri: ; "Estas vi feliĉa, frato, mi ne volas malrapidi, ; Tuj mi alkondukos homon, kaj vi povos lin ekvidi; Nur promesu lin ne tuŝi, ne komencu malamiki".

'276 Ne rifuzis kavaliro, diris: "Estos promesite; Ĵuras mi per amo mia, mi akceptos lin estime; Estu certa, mi ofendos lin neniam kaj nenie, ; Mi lin amos kiel fraton kaj rilatos nur amike."

, & Renkonto de Taniel' kun Avtandil' :

'277 Ŝi ekstaris kaj foriris por alvoki la junulon. ; "Li ne koleriĝis." Diris ŝi pri sia sovaĝulo, ; Je la mano prenis viron, kiu helis kiel luno; Taniel' vidanta gaston, lin komparis kun la suno.

'278 Taniel' renkontis ilin kaj du sunojn ŝi ekvidis ; Aŭ la lunojn sen la nuboj, tiel belaj estis ili, ; Kiel poploj staris sveltaj, kiel sep planedoj brilis; Mi ne povas vorton trovi, kiel ilin ŝi admiris.

'279 Kvankam estis nekonataj, unu la alian kisis, ; Inter rozoj blankaj dentoj kiel perloj ekradiis; Reciproke brakuminte, ili ploure emociis, ; Kaj rubeno de l'vizaĝoj en sukconon transformiĝis.

'280 Mano je la mano prenis, koro kun la koro batis, ; Kaj sidiĝis ili kune, en okuloj larmojn havis, ; Nur Asmat' konsolis ilin, korajn vortojn ŝi ne ŝparis: ; "Ĉesu fine vin turmenti, suno devas hele flagri".

'281 Roz' de Taniel' ne velkis kaj sur ĝin nur prujne falis; Trankviliĝis kaj sincere Avtandilon li demandis: ; "Kiu estas vi, de kie, kiel la kavernon trafis? ; Kio min koncernas – sciu, eĉ la morto min forlasis".

'282 Jen arabo elokvente al li donis la respondon, ; "Vin, leonon – kavaliron vidi havas mi honoron, ; Estas mi el Arabio, hejme havas gloron, oron, ; Sed miĝnuro mi fariĝis, arde flamas mia koro.

'283 ' Mi ekamis la filinon de la reĝo, de l'patrono; Scias jam la Arabio, ke heredas ŝi la tronon, ; Vin mi vidis dum ĉasado kiel viron aŭ fantomon; Vi memoras – tiam murdis vi per skurĝo dek du homojn.

'284 ' Ĉe la fonto ni vin vidis, sed ni trovis malkonfidon, ; Reĝo nia koleriĝis, vin alvokis por klarigo, ; Poste sendis reĝ' servistojn, por vin kapti – inkogniton. ; Tiam sur la teron sprucis sango de persekutintoj.

'285 ' La senditojn senkapigis vi per skurĝo, ne per glavo, ; Kaj rapide forgalopis, estis vana la serĉado, ; Kiel kadĵ' vi malaperis, time tremis niaj sklavoĵ; Nin pli multe kolerigis kaj mirigis tiaj agoj.

'286 ' Koleriĝis nia reĝo, ĉar li estis tre memvola, ; Vin neniu povis trovi, fino estis do malbona, ; Vin neniu homo vidis, estis malaper' fantoma; Tiam serĉi min forsendis la reĝino unusola.

'287 ' Ŝi ordonis al mi trovi nekonatan kavaliron, ; Kaj promesis eĉ plenumi mian revon kaj deziron, ; Poste diris, ke mi devas dum tri jaroj esti viro; Kiel mi eltenis ĉion – eĉ mi mem nun sentas miron.

'288 ' Inter rokoj kaj arbaroj migris mi – la vagabondo, ; Dum tri jaroj mi suferis, sed ne trovis al vi vojon, ; Tamen vidis mi tri fratojn, tranĉis vi al unu dorson, ; Sed aliaj al mi montris lokon de l'kaverno pordon".

'289 Taniel' memoris bone kunpuŝiĝon ĉe l'rivero, ; "Ne forgesis mi ĉasadon, de la reĝo korseveron, ; Ploris mi, perdinte amon, malbenante tutan teron; Miajn agojn do instigis pereiga malespero.

'290 ' Kion volis de mi reĝo – Rostevan' la agresinto? ; Vi vivĝojaj amuziĝis en kamparo kun ĉasistoj. ; Kuraĝuloj, vi ekvolis el mi fari la kaptiton, ; Vi ricevis nur kadavrojn, sed ne min – liberan idon.

'291 ' Vian reĝon mi rimarkis, ne intencis mi lin murdi, ; Mi domaĝis la monarkon kaj ne volis mi lin tuŝi, ; Do mi haste forgalopis, mi ne povis lin insulti, ; Min ĉevalo bona helpis, kvazaŭ nevidebla flugis.

'292 ' Kiam malamik' minace super mi per sabro svingas, ; Lerte mi de li forkuras kaj nur venton li atingas. ; Kun rabistoj mi kvereli ĝenerale ne kutimas, ; Sed ne ŝatas mi la homon, kiu voĉon plialtigas.

'293 ' Mi bonvenon al vi diras en sovaĝan hejmon mian; Vidas mi cipreson sveltan, sunvizaĝan, brilradian, ; Ŝajne vi suferis multe, la mizeron spertis ĉian, ; Oni pene trovas homon de mem dio forlasitan".

'294 Avtandil' respondis: "Vere tiajn laŭdojn mi ne indas; Vi heroo estas tia, kiu gloron do meritas, ; Ĉar vi personigas sunon, kiu de ĉiel' radias, ; Kaj la larmoj vin ne ŝanĝas, kiam vi tra mondo migras.

'295 ' Ĉi hodiaŭ mi forgesas la ĉagrenon, turmentadon, ; Vian volon mi nun sekvos, ĉar finiĝis la serĉado. ; Antaŭ vitro kaj emajlo superecon havas jado, ; Vi kun mi preferas esti kiel bona kamarado".

'296 Al li Taniel' respondis: "Vian koron mi nun sentas, ; Kaj sincera amikeco por mi valorajo estas. ; Leĝo de la vivo diktas: "La miĝnur' miĝnuron helpas", ; Sed, perdinte amatinon, kion vi de mi ricevas?

'297 ' Vi min serĉis sur la tero, ĉar ordonis la reĝino. ; Dank' al dio, vi min trovis, al vagado venis fino. ; Ĉu kapablos mi rakonti pri hindia leonino? ; Se mi al vi ĉion diros – el mi fajro faros cindron".

'298 Sed Asmat' post tiuj vortoj kuraĝigi lin komencis; "– Ho, leono, vi rakontu kaj ne pensu prisilenti; Vidu, petas kavaliro por vi sian kapon perdi, ; Li eksciis vian vivon, eble povos al ni helpi.

'299 ' Li, veninte min petegis, ke pri vi mi diru ion. ; Eble venos trankviliĝo kaj vi mem malkovru ĉion. ; Vi rakontu al amiko vian tristan historion, ; Ne ignoru la eblecon, kiun sendas al vi dio".

'300 Tanielon privigliĝis kuraĝigaj ŝiaj vortoj. ; "Vi, Asmat', bonege scias, kial ploris mia koro, ; Kaj sen amo nek foriros, nek mildiĝos la doloro. ; Jen akiris mi amikon – li kunsentos nian ploron.

'301 ' Kiam amos reciproke kaj du homoj do fratiĝos, ; Por la frato aŭ fratino ili morton rekte vidos, ; Ne forlasos kaj batalos, se amiko malfeliĉos, ; Kiel donos vivon dio, se alian ne mortigos?"

'302 Ankaŭ al Asmat' li diris: "Vi alportu akvon, ambron, ; Se mi svenos, rakontante, verŝu ĝin sur palan vangon; Se la koro mia krevos pro doloro kaj am-ardo, ; Min priploru kaj plenumi la bonfaron sur kadavro".

'303 Taniel' nun prepariĝis por malĝoja vivrakonto; Flanken ĵetis tigran felon, estis preta por parolo, ; Sed denove ekscitiĝis pro abundaj rememoroj, ; Kaj denove lian bruston ŝiris senkonsola ploro.

'304 Do komencis kun la larmoj Tariel' la lamentadon: ; "Ho, ŝatata amatino, vi perdiĝis por vidado, ; Mia vivo kaj espero, mia amo, edenarbo, ; Kie kaŝis de l'amanto vin kruela sorto-bato?"

, & Rakonto de Tariel' pri sia sorto:

'305 "Vi aŭskultu, mi rakontos pri tragika mia vivo, ; Kvankam tion fari, certe, estas granda malfacilo; Mi ne povas ŝin plu vidi – sopiratan amatinon, ; Kiu prenis kaj sklavigis mian koron kaj animon.

'306 ' Tiam reĝis en Hindio sep monarkoj jam grizharaj, ; Tamen super kvin el ili – Parsadan' la senkompara, ; Estis li hercule forta, tre fiera, malavara, ; La leono, militestro, kun vizaĝo sune klara.

'307 ' Mia patro estis reĝo tie en la sepa regno, ; Saridan' – jen lia nomo, kiu estis suvereno. ; Kontraŭ li armilon levi do neniu havis tenton, ; Li tre ŝatis la ĉasadon, ne toleris la ofendon.

'308 ' Kaj la patro jam maljuna enuiĝis, sentis splenon, ; Pensis li: "Mi ĉion havas, mi konkeris multajn terojn, ; Malamikoj ne ribelas, sed agnoskas mian venkon; Mi al Parsadan' kliniĝos kaj al li transdonos regnon".

'309 ' Li al Parsadan' decidis sendi homon kun letero; "Antaŭ vi, fortega reĝo, mi kliniĝas ĝis la tero. ; Prenu ankaŭ mian regnon en la tuthindian sferon ; Kaj por ĉiam nin prilumu amikeco kaj sincero".

'310 ' La proponon tuj akceptis Parsadan' kun granda ĝojo; Li respondis : "Mi vin dankas pro kortuŝaj viaj vortoj; Vi – al mi egala reĝo, jen konfidas vian sorton; Venu, estu mia frato, ne forgesu bonan moron".

'311 ' Parsadan' honoris patron per titolo amirbaro*, ; Ĝi la sama estas, kiel via amirspasalaro, ; Plue sian vastan landon administris mia patro; Kvankam li ne estis reĝo, li konservis sian rajton.

'312 ' Reĝo pri la patr' fieris, lin al si egala traktis, ; Ofte pensis al aliaj, tia amirbaro mankis, ; Ili ĉiam estis kune, malamikon kune batis; Mi la patron ne similis, tion vere mi konstatis.

'313 ' Parsadan' kaj la reĝino volis havi la gefilojn, ; Tamen ilin malĝojigis, ke al ili mankis idoj, ; Tiutempe mi naskiĝis, malaperis la sopiro – ; En decido min filigi, ili trovis la eliron.

'314 ' Mi fariĝis vera filo, oni donis edukadon, ; Devis mi ellerni ĉion kaj unue militarton; Maturiĝis mi – leono kaj beliĝis kiel astro, ; La saĝuloj min instruis poste, kiel gvidi ŝtaton.

'315 ' Vi, Asmat', konfirmi povas, kiel poste mi forvelkis, ; Kvankam mi dum infaneco matensunon mem superis, ; Tiam ĉiu pri mi diris: "En edeno li elkreskis"; Nun de mi de tiu tempo nur mizera ombro restis.

'316 ' Kiam iĝis mi kvinjara, gravediĝis la reĝino, ; Grandanime al ŝi donis dio veran sunfilinon..."; Svenis li, rekonsciiĝis lin Asmat', kaj post ekspiro ; Li daŭrigis: "Ĉarme bela ŝi jam estis en lulilo.

'317 ' Do senfortaj estas vortoj, por priskribi reĝidino, ; Parsadan' tagnokte drinkis, festo ĉi ne havis finon, ; Reĝoj venis alilandaj kaj esprimis la estimon, ; Hinda reĝ' disdonis oron kaj kontentis per destino.

'318 ' Post finiĝo de festenoj komenciĝis edukado, ; La gereĝoj nin tre amis eĉ en la plej alta grado, ; Kiel suno ŝi jam brilis kaj de astroj miriado, ; Nun mi nomon ŝian diros, ne sufiĉas sinregado".

'319 Memorinte ŝian nomon, Tariel' subite svenis, ; Lin Asmat' prizorgi devis, en karafo akvon prenis, ; Per malvarmaj akvogutoj kavaliron ŝi subtenis, ; "Do aŭskultu", flustris viro, "Mia lasta tago venis.

'320 ' Nestan-Dareĝan' nomiĝis la estonta mia amo, ; Venkis lunon kaj kun suno konkuradis ŝia ĉarmo; Estis ŝi humila, milda kaj mirigis ŝia saĝo. ; Ne vidinte ŝin, mi pensis – jen senĝoje pasis tago.

'321 ' Maturiĝis ŝi kaj jaroj ankaŭ min fortulo faris, ; Reĝo vidis – venis tempo ŝin reĝino jam proklami; Min redonis al la patro, devis mi lin akompani, ; Mi pilkludis kaj leonojn, kiel katojn povis bati.

'322 ' Por filino reĝo turon kun arkaĵoj oraj faris, ; Bezoara* estis ŝtono, ĉion la ruben' ornamis, ; Ĉe eniro, en baseno kun rozakvo oni naĝis, ; Tie vivis la fraŭlino, kiun mi jam arde amis.

'323 ' Tage, nokte incensadis oni mirtan odorfumon, ; Kaj Nestan' promenis sube, belvestita en veluro; Apud ŝi Davar – onklino, la vidvin' el kadĵa turo, ; Ŝin instruis pri la moroj – reĝan havis ŝi futuron.

'324 ' En palaco ĉie kaŝis la belegaj orteksaĵoj, ; Ŝin prizorgis Asmat bone, ludis nardon sen finaĵo. ; Ĝis ekfloris belulino – tiu Gabaonkreskaĵo*. ; Do neniu homo vidis ŝian korpon kaj vizaĝon.

'325 ' Dekkvinjara min edukis reĝo kiel propran filon, ; Tage, nokte min instruis, kiel uzi tranĉarmilon, ; Mi leonan havis forton, kaj la sunan lumis brilon, ; Dum konkuroj la unua estis ĉiam kun facile.

'326 ' Dum ĉasado birdojn, bestojn ne mistrafis miaj sagoj, ; Krome mi majstrece lerte ludis pilkon sur majdanoj*, ; Ofte drinkis kaj festenis inter gajaj kamaradoj, ; Tamen de Nestan' vizaĝo al mi portis suferadojn.

'327 ' Mi eksciis, ke subite mia kara patro mortis, ; En palaco de la reĝo gajaj kantoj plu ne sonis; Nur fiuloj – malamikoj pri la mort' malice ĝojis, ; Sed fidelaj kamaradoj Saridanon nun priploris.

'328 ' Efemero de la mondo lin funebris tutan jaron, ; En soleco mi fermiĝis, ne sekiĝis miaj larmoj. ; Fine venis de la reĝo jen al mi delegitaro: ; "Filo Tariel', ne ploru kaj sekigu okulharojn.

'329 ' ' Ploras ankaŭ ni, perdinte egalulon kaj najbaron". ; Kaj la reĝo min konsolis, esperiĝis kiel patro, ; Li al mi proponis regi, kiel hinda amirbaro, ; Diris: "Devas anstataŭi vi la bravan Saridanon".

'330 ' Post ĉi vortoj mi ankoraŭ pli amare do ekploris, ; Sed al Parsadan' la ĥasoj alsenditaj min kunportis; La gereĝoj ambaŭ kune en palaco min renkontis, ; Ili patre min kisadis, per festeno min honoris.

'331 ' La reĝino kaj la reĝo min prizorgis kun atento, ; Ke mi restu amirbaro, li ripetis sian peton; Mi ne volis – min timiĝis la graveco de l'posteno, ; Sed finfine mi kapjesis, do esprimis la konsenton.

'332 ' Eble ion mi forgesis – multaj jaroj jam forpasis, ; Sed al vi mi diros ĉion, kio mian vivon ŝanĝis; Falsa estas mondo nia, nur malbonon faras, faris. ; Kaj fajreroj ĝiaj ardaj min tro ofte ĝuste trafis".

, & Rakonto pri la amo de Tariel':

'333 Tariel' iome haltis, poste tiel li konfesis: ; "Unu tagon mi kaj reĝo de ĉasado jam revenis, ; "Ni vizitu la filonon", diris li, je l'mano prenis. ; Do ne miru, ke la vivon la memor' al mi venenis.

'334 ' Kaj ekvidis mi ĝardenon, mi neniam vidis tian, ; Ĉirkaŭ ni sur branĉoj pepis, trilis birdoj fantaziaj, ; En basenoj la fontanoj ŝprucis rozan akvon sian, ; Sur eniroj de la turoj pendis orteksaĵoj brilaj.

'335 ' "Turaĉbirdojn* al ŝi donu", estis de la reĝ' propono, ; Mi obeis, kune paŝis kun la reĝo al renkonto ... ; Kaj de tiam mi per larmoj pagas al kruela mondo; Ja necesas diamanto, por trapiki ŝtonan koron.

'336 ' Sciis mi, ke reĝo kaŝis la filonon de rigardo, ; La kurtenon li malfermis, por enlasi sunbriladon; Al Asmat' ordonis reĝo, ke ŝi portu la birdaron ; Kaj transdonu: "Turaĉbirdojn al vi sendas amirbaro".

'337 ' Jen Asmat' kurtenon levis, mi ekvidis Dareĝanon, ; Mian koron per ponardo vundis bela do rigardo, ; Enmanigis la turaĉojn kaj eksentis mi la ardon; Kaj de tiam min eterne jam bruligas amo-flamo.

'338 ' Kie estas nun okuloj, kiuj sunon mem estingiĝis?" ; Diris Tariel' kaj svenis – travivaĵoj tre ekscitis. ; Avtandil', Asmat' ekploris, eĥo plendon disvastigis; Jen denove liaj manoj, kiel mortaj senfortiĝis.

'339 Lin Asmat' per akvo verŝis, por sveninton revivigi, ; Reakiris li konscion, sed ne baldaŭ trankviliĝis; Longe ĝemis kavaliro kaj finfine li sidiĝis, ; "Ŝin memori mi ne povas", rakontante tiam diris.

'340 "Kiu ĝojas kaj kontentas nur pri vivo efemera, ; Ne evitos li perfidon de la mondo ĉi severa, ; La saĝuloj estas tiuj, kiuj neas mondon tedan; Nun aŭskultu vi daŭrigon de la historio vera.

'341 ' Mi transdonis turaĉbirdojn, ne memoras, diris kion, ; Poste perdis ekvilibron kaj samtempe la konscion; Kiam mi rekonciiĝis, ĉie vidis la eksciton, ; En tumulto homoj ĝemis, diris: "Kia tragedio!"

'342 ' En la ĉambron luksan, grandan oni min do enlitigis, ; Parsadan' ĉe lito ploris, pri la sano informiĝis, ; La vizaĝon li gratvundis, mem reĝin' al mi rapidis, ; "Tion sorĉis Belzevulo*", alvenintaj mukroj* diris.

'343 ' Ĉirkaŭprenis min la reĝo, ĉar min vivan li ekvidis, ; "Filo mia, diru ion", – Per la ĝojo voĉo kriis, ; Ne intencis mi respondi, nur ekstremis kaj ekspiris, ; Poste falis mi denove, miaj pensoj deŝiriĝis.

'344 ' Jen mulimoj* kaj la mukroj ĉirkaŭ mi atente staris, ; Ili legis sanktan libron, kiun en la mano havis, ; Ili pelis la satanon kaj ankoraŭ ion faris; Restis mi malsana tie, dum tri tagoj mi ne manĝis.

'345 ' Kuracistoj tiam diris: "Tio estas ne malsano, ; Lia korpo estas sana, nur bruligas koron flamo"; Jen mi en la lito saltis, jen denove perdis kapon, ; La reĝino multe ploris kaj plenigis larmoj maron.

'346 ' Dum tri tagoj kuŝis tie mi nek viva, nek mortulo, ; Poste mi komprenis ĉion, kiam pasis frenezumo, ; Ho, mi pensis, mi pereos tie de interna brulo; Mi petegis dion doni paciencon kaj indulgon.

'347 ' Kaj mi preĝis : "Dio, donu helpon al mi kaj la sanon, ; Ke mi povu hejmen iri de la reĝaj korteganoj, ; Ĝis ĉi tie ne divenis ili mian ardan amon, ; Kaj sanigis dio mian koron, kapon por ĉiamo".

'348 ' Jam promeni mi komencis, venis de la reĝ' senditoj, ; La reĝino mem alkuris, poste sekvis la veziroj, ; Estis tie vera ĝojo, ĉiu sendis bondezirojn, ; Parsadan' al dio dankis pro la sano-reakiro.

'349 ' De du flankoj sidis gastoj, ili kuracilon donis, ; "Mi jam ne malsanas, reĝo!" jen kuraĝe mi respondis. ; Poste mi ĉevalon petis kaj rajdadi iom volis ; Kaj, saltinte sur la selon, mi ĉevalon mian spronis.

'350 ' Ni galopis, mi kaj reĝo, kampon, valon preterpasis, ; Poste hejmen ni revenis, reĝo al palaco rajdis; Mi eniris mian ĉambron, tamen tre malbone fartis; Pensis mi, ke morto venas kaj por tio min preparis.

'351 ' La koloro de kristalo kiel la ŝafrano* brilis, ; Kaj dek miloj da tranĉiloj en la koron enpikiĝis. ; Venis iu min serĉanta, dormolokon li atingis, ; Mi ankoraŭ ne komprenis, kiu, kial min vizitis.

'352 ' De Asmat' sendito venis, li transdonis la paperon; Mirigita kun korbato mi, tralegis la leteron, ; Ne en tiu koro, tamen, ekbruligis mi am-senton, ; Dio vidas – ne intencis mi ŝin puŝi al turmento.

'353 ' Min mirigis, kiel povis ŝi konfesi pri la amo, ; Sed ne taŭgis ne respondi, ĉar ŝi eble perdis kapon, ; Malespere ŝi komenci povus eĉ kalumniadon, ; Kaj mi skribis la respondon – nur ĝentilan kaj sen flato.

'354 ' Tagoj kaj semajnoj pasis, la pasio pligrandiĝis, ; Militistoj, pilkludantoj ne ĝojigis, nur incitis, ; Mi evitis la palacon, kuracistoj min vizitis, ; Kaj mi pagis por la ĝojo, kiun mi antaŭe vidis.

'355 ' La krepusko replenigis mian koron kaj la kapon, ; Tamen kuracistoj tute ne komprenis la malsanon, ; Kaj ellasi ili volis superfluan de la sango; Mi konsentis, ke nur ili ne divenu pri la amo.

'356 ' Kiam mi kun man' vundita sur la lito laca kuŝis, ; Venis sklavo kaj sekrete en oreleon mian flustris: ; "De Asmat' jen homo venis" kaj al mi lin alkondukis; "Kion ŝi denove volas" – malkontenta mi cerbumis.

'357 ' La leteron li transdonis, mi atente ĝin tralegis, ; Ke ŝi volas min ekvidi, tion bone mi komprenis, ; Kaj respondis: "Por klarigo de rilatoj tempo venis, ; Ni intervidiĝos certe, kiel vi pri tio petis".

'358 ' Tamen mi hezite pensis: "Aventuro havos finon, ; Nun mi estas amirbaro, de la reĝo elektito, ; Se klariĝos, ke mi estas deloganto de l'knabino, ; Tio kaŭzos malhonoron kaj verŝajne la ekzilon".

'359 ' Venis de la reĝo homo, diris: "Volas li vin vidi", ; La monarko volis scii, ĉu mi jam rekonsciiĝis. ; Mi respondis : "Post ellaso de la sang' mi renaskiĝis ; Kaj esperas, ke jam baldaŭ mi vin povas reviziti".

'360 ' Jen mi estas apud reĝo, li amike min invitas, ; Sen pafarko en la selon sur ĉevalo li sidiĝas, ; La ĉasadon mem komencas kaj turaĉojn neniigas, ; Jen ĉasistoj "Brave, Brave!" ne flateme laŭte krias.

'361 ' Ni revenis, ĉar laciĝis, estis fino de ĉasado, ; Hejme mi festenis gaje, harpistinoj kantis kantojn, ; Kaj la reĝ' disdonis oron, diamantojn sur manplato. ; Ĉiu estis tre kontenta, ne forgesis tiun tagon.

'362 ' Mi drinkadis kaj ĉasaĵon manĝis pladon post la plado, ; Ne estingis mian flamon tamen ŝajna diboĉado; La festenon mi daŭrigis hejme kun la kamaradoj, ; Tiel volis kaŝi amon kaj konservi sinregadon.

'363 ' Trezoristo al mi flustris interesan do informon: ; "Volas vidi vin virino, kiu staras trans la pordo, ; Kaŝvualon bele portas, kiel estas nia ordo". ; Mi respondis : "Ŝi eniru, donas mi ja la konkordon".

'364 ' Kaj ekstaris ĉiuj gastoj por forlasi la festenon, ; Kriis mi: "Vi ne foriru, mi revenos post soleno". ; Iris mi al dormoloko, iu gardis la pordegon, ; Mi ne volis malbonagi kaj konservi la sinregon.

'365 ' Kliniĝinte min salutis kaj parolis la virino: ; "Vin vidanta ĉiu devas esti danka al destino". ; Min mirigis, ke knabino jen kliniĝis antaŭ viro; Se ŝi bone scius morojn, ŝi silentus kun estimo.

'366 ' Mi eksidis sur la sofo, ĉe tapiŝo ŝi ĉi staris, ; Kaj ne volis proksimiĝi, tion bone mi rimarkis, ; Kaj mi diris: "Kial tie staras vi, se min ekamis?" ; Ne respondis la virino, kaj paroli ŝi ne hastis.

'367 ' Fine ŝi silentis diris: "Mi ruĝiĝas pro la honto, ; Se vi pensas, ke amante mi petegis pri renkonto. ; Tamen min kortuŝas via sinregado kaj bonkoro, ; Do al sola dio estu danko kaj eterna gloro.

'368 ' Mi ĉi tie time tremas, pro hontemo kap' doloras; Ne koleru, mi, sklavino nur leteron doni povas, ; Mia granda sinjorino tre kaŝeme vin alvokas, ; Do vi legu, kion skribas tiu, kiu ami volas".

,& La unua letero de Nestan' al sia amato:

'369 "Mi komprenis , ke leteron sendis mia vivturmento, ; "Ho, leono, suna lumo" – skribis ŝi kun arda sento, ; "Mi por ĉiam estas via, forlasu vin lamento, ; Kaj Asmat' alion diros, ŝin aŭskultu kun atento.

'370 ' ' Ĉu en morto kaj en sveno oni trovas amon veran? ; Vi preferu al mi montri heroaĵon eĉ danĝeran, ; Ĥatalando* jen tributon plu ne pagas la moneran, ; Prenu ĝin pro la konduto aroganta, malsincera.

'371 ' ' Mi edzino via estos, ĉiam revas mi pri tio, ; Sed kuraĝon mi ne havis pri la amo diri ion, ; Mi en palankeno* sidis, aŭdis vian

historion, ; Kaj eksciis pri sufero, kion kaŭzis la pasio.

'372 ' ' Atenteme, do aŭskultu, kion diros amantino, ; Vi subpremos Ĥatalandon dum sukcesa militiro. ; Plori kaj velkigi rozojn – senutilas, kavaliro. ; Mi ja faris por vi ĉion, mem heligis sunsubiron".

'373 ' Kaj Asmat' rakontis ĉion, kio mankis en letero; Mi fariĝis plej feliĉa homo sur la tuta tero, ; En la brust' la koro batis, ĉar revenis la espero, ; Kristalvitris miaj vangoj kaj subenis en aero".

,& La unua letero de Taniel' al sia amatino:

'374 "Traleginte la leteron, mi ĝin metis sur okulojn; Mi respondis : "Kara mia, lun' por mi fariĝis suno; Vi ne vidis malbonaĵon de amanta vin miĝnuro; Mi min sentas en la sonĝo, vi min faris feliĉulo".

'375 ' Al Asmat' mi diris jene: "Pli paroli mi ne povas, ; Al ŝi vi raportu: "Suno, la ĉielon vi dekoras, ; Revivigas min mortulon, nun la vivo altvaloras, ; Mian taskon mi plenumos, kiun vi al mi ordonas."

'376 ' Sed Asmat' ankoraŭ flustris: "Vi vin gardu, ŝi tre petas, ; Ke neni, do eksciu, kion vi en koro sentas; En neceso vi ŝajnigu, ke vi nur kun mi koketas, ; Al mi skribu la leterojn kaj nur min ekvidi strebas".

'377 ' Al mi plaĉis la konsilo, mi akceptis ĝin volonte; Ja ne vane eĉ la suno antaŭ ŝi paliĝis honte. ; Reviviĝis mia koro, ĝi batadis nevolonte. ; Neniĝis ŝi mallumon – estis mem la sun' alvorte.

'378 ' Plenon de valoraj ŝtonoj, oran prenis mi amforon, ; Al Asmat' donaci volis, kiel diktis nia moro, ; Sed rifuzis la virino: "Ne necesas por la koro". ; Ŝi elektis unu ringon kaj aldiris : "Por memoro".

'379 ' Kaj foriris la virino, glavo koron pli ne tranĉis, ; La feliĉo mem alvenis – al mi fajro ne minacis, ; Mi revenis al amikoj kaj festenis, gaje kantis; Kiam ili adiaŭis, sen donacoj mi ne lasis".

, & La letero de Tariel' al Ĥatalandanoj :

'380 "Sendis mi leteron jenan al najbara Ĥatalando; ; "Hinda reĝo estas riĉa kaj potenca la reganto; Tiu, kiu lin agnoskas, ne mizeras en malsato; ; Al ribelaj malamikoj li ne montras la kompaton.

'381 ' ' Niaj fratoj kaj patronoj, ne evitu do konflikton; Devas vi al ni alveni post de nia manuskripto. ; Se vi malobeos, tiam vin detruos la milito; La pli bone estas paca kunvivado kaj konfido".

'382 ' Kiam nia kuriero kun letero forrapidis, ; Mi denove en palaco nur festenis, gaje ridis, ; Ĉar mi estis feliĉulo, havis kion mi deziris; Tamen iam pro la duboj la humoro malboniĝis.

'383 ' Mi denove volis migri, min ekregis la tragiko; Tiam min ne povis distri, nek festenoj, nek amikoj. ; Ne sukcesis al mi bridi nek mildigi en kor' pikon, ; Tiun mondon mi malbenis, turmentita de abdiko".

, & Nestan-Dareĝan' invitas Tarielon :

'384 "Foje kun humoro aĉa de l'palaco mi revenis, ; Enlitiĝis, sed ne dormis, ĉar pri ŝi konstante revis, ; La leteron esperigan mi ankoraŭ fojon legis, ; Kaj subite la servisto apud mia lit' aperis.

'385 "Sklavo de Asmat' alvenis" – konfidence li raportis; La leteron al mi novan la veninto do alportis, ; Kompreneble, skribis tiu, kiu al mi ĝojon donis; Ŝi invitis – mi forrajdis kaj la sklavo min eskortis.

'386 ' En ĝardenon mi eniris kaj neniun tie vidis, ; Nur Asmat', fratino kara, laŭ aleo alrapidis; Ŝi ridetis: "Amo-sagon mi el via kor' elŝiris, ; Iru, kaj ekvidu rozon, kiu vidi vin deziris.

'387 ' Levis ŝi tapiŝon pezan – min en ĉambron akompanis, ; Tie estis palankeno, la rubenoj ĝin ornamis, ; Mi ekvidis ŝin sidantan – sunradioj ŝiaj ĉarmis, ; La okuloj nigraj brilis – ŝi afable min rigardis.

'388 ' Ŝi silentis, min rigardis, palis de vizaĝ' marmoro, ; En okuloj ŝiaj vidis mi adoron kaj favoron, ; Kaj ekflustris poste Asmat : "Ame batas ŝia koro, ; Tamen nun foriru, frato, ĉar ŝin ĝenas via oro".

'389 ' Min Asmat' forakompanas kaj mi – malfeliĉa pensas: ; "Ho, destin' – vi donas ĝojon kaj samtempe ĝin forprenas, ; Jen mi vidas amatinon kaj ĉielan bonon sentas, ; Jen denove pro disiĝo mi sopiras kaj suferas".

'390 ' Sed Asmat' konsolis kore, kondukante min – ĉagrenan: ; "Vi forgesu malsukceson – estis ŝi neparolema, ; Kaj ne tristu, ĉar vi scias – ŝi travivas amon veran; Pro singeno ŝi silentas, krome estas ŝi fiera".

'391 ' Mi petegis : "Ho, fratino, estu vi por mi balzamo ; Kaj forsanu min, miĝnuron de mortiga amo-flamo; Skribu vi pri ŝi leterojn, mi atentos ĉiun tagon , ; Min ĝojigos ĉiu vorto, ĉiu faro kaj la ago".

'392 ' Reveninte en la ĉambron mi, de l'vangoj larmojn viŝis, ; Mi al dormoloko iris, sed pasio min bruligis; Sur vizaĝ' rubenkristala pro la ploro blua iĝis, ; Mateniĝon mi ne volis, nur krepuskon mi deziris".

, & La letero de Ĥatalandanoj al Tariel' :

'393 "Kuriero jen revenis kun leter' el Ĥatalando, ; Ili skribis arogante: "Hindoj estas invadantoj, ; Ankaŭ ni ja havas armon, fortikaĵojn kaj rajdantojn, ; Kiu estas via reĝo, ke sur nin li havas rajton?

'394 ' ' Mi – Ramaz, la ĥano regas, tial volas mi aldoni: ; Tre mirigis min la vortoj, kiujn mi en skribo trovis. ; Strange, ke vi aŭdacis pri alveno min ordoni, ; Vi ne skribu plu leterojn. Tiel vi nin malhonoris".

'395 ' Por kolekti miajn trupojn, mi forsendis marzapanon*. ; Mobilizis ni armeon, grandan, kiel astran svarmon, ; Do leviĝis kontraŭ ĥano ĉiu nia samlandano, ; De la batalontoj plenis inter montoj kaj la valoj.

'396 ' Jen aperis batalontoj, mi ekvidis la paradon, ; Kiel festo bela estis tiu granda kavalkado, ; Al mi plaĉis ĉevalvicoj, la rajdantoj kaj armado, ; La armeo nia granda estis preta por invado.

'397 ' Alte levis mi la reĝan, ruĝa-nigran la standardon, ; Kaj ordonis morgaŭ frue marŝi kontraŭ Ĥatalando. ; Mi ĉagrenis, ke denove malfavoras min fatalo ; Kaj forrajdis malfeliĉa ne vidante mian amon.

'398 ' Hejme mi denove tristis, ĉar ne vidis la eliron, ; Larmoj el okuloj fluis, estis kaŭzo la sopiro, ; Do por kio estas rozo al amanta kavaliro, ; Se ne eblas lin atingi kaj ĝi donas nur admiron".

,& Renkonto de Tariel' kun Nestan':

'399 "Min vizitis sklavo nigra – estis de Asmat' sendita, ; Ne atendis mi leteron kaj mi restis mirigita, ; La enhavo de la skribo ŝajnis al mi ne dubinda, ; Ŝi invitis min refoje: "Iru, faro estas kripta".

'400 ' Ree venis la sukceso, ne forgesis pri mi dio, ; Tie, apud la ĝardeno min atendis la virino, ; Estis ŝi Asmat' fidela, la malnova amikino, ; "Nun rapidu vi – leono, vin atendas ĉarmulino".

'401 ' Akompanis ŝi min rekte ĝis palaco por mi sankta, ; Kaj esperis ŝi – mem luno, Nestan-Dareĝan' – la ĉarma, ; Estis ŝi en verda vesto kaj radiis lumon klaran, ; Ĉarmis min per la talio per vizaĝo tre agrabla.

'402 ' Mi alpaŝis al tapiŝo kaj atingis dolĉan celon, ; Sur kuseno sidis tiu, kiu mem egaligis stelon, ; Mi tremetis kaj feliĉa sentis mi min en fabelo, ; Mia stel' vizaĝon kaŝis, per vualo kaj mantelo.

'403 ' Sur kuseno sidi kune poste Nestan' min invitis, ; Kaj ĝin sklave Asmat metis, vid-alvide ni eksidis, ; Mondon tiun mi malbenis, sed ĝi min nun ne afliktis, ; Certe, multe mi ekĝojis, voĉon ŝian mi diigis.

'404 ' Ŝi parolis: "Vi lastfoje estis multe ĉagrenita, ; Kaj malĝojis pro disiĝo kiel floro forvelkinta, ; La okuloj viaj larmis, faris vin tre subpremitan, ; Antaŭ vi mi hontis ege, kvankam restis mi ĉarmita.

'405 ' ' Tamen la virinon noblan plibeligas sindeteno, ; Pli malbone agas kiam ŝi silentas dum la spleno, ; Mi ridetis tiam, tamen sentis vere la ĉagrenon, ; Kaj alsendis mi virinon, por rakonti al vi veron.

'406 ' ' De la tag', ke mi vin amis, mi decidis esti via, ; Estu certa, mi ne faros la adulton – faron fian, ; Vin, karulo, mi tre amas, diras mi la vorton pian, ; Se mi flatas aŭ mensogas, entombigu dio min jam.

'407 ' ' Do mi sendas vin batali kontraŭ Ĥatalandsoldatoj; Donu dio al vi venkon kun fidelaj batalantoj, ; Vi militon nepre gajnos, mi revidos amoranton, ; Vi donacu vian koron kaj kunprenu mian amon".

'408 ' Mi respondis: "Estas preta por vi morti, amirbaro, ; Vi ja min tre ofte savis, mi ne dronis en la maro, ; Suno restis vi por ĉiam en la mondo de stelaro, ; Ĥatalandon mi detruos kun leon-militistaro.

'409 ' ' Vi donacon al mi donis, mem la reĝoj ĝin ne havas, ; Tion saman donas dio, grandanime ne avaras, ; Vi al mi similas, suno, ja radias, mia kara, ; Via estas mi por ĉiam, ĝis la tombo, tio klaras".

'410 ' Ni promeson sanktan donis je la libro de la ĵuro, ; Ŝi konfirmis amon sian – miĝnurino al miĝnuro. ; Diris ŝi : "Se mi ekamos iun viron en futuro, ; Dio punu min severe sen domaĝo, sen bedaŭro".

'411 ' Ni bongustajn fruktojn manĝis, ĝojis per la babilaĵo, ; Sed ne daŭris longe nia feliĉega travivaĵo, ; Poste ni disiĝi devis kun la larmoj sur vizaĝo, ; Sunradiojn mi kunprenis, bela estis tiu aĵo.

'412 ' Mi bedaŭris, ke disiĝis de la vangoj – la rubenoj, ; Por mi mondo renoviĝis, estis ĝi nuntempe gemo, ; Suno de ĉielo alta prilumigis la matenon, ; Miras mi, ke dum disiĝo ne forlasis min sinrego".

,& Militkampanjo de Tariel' en Ĥatalando:

'413 "Kaj matene mi ordonis: "Vi trumpetu per la kornoj"; Mi ne povas nun priskribi, kiel ĉi alvenis homoj, ; Kontraŭ fia Ĥatalando mi – leono havis fortojn, ; Trupoj marŝis malfacile – tie mankis bonaj vojoj.

'414 ' Ni trapaŝis hindajn limojn, ne renkontis la reziston, ; Mi nur vidis iun homon – estis de Ramaz sendito, ; Li komencis al mi flati, li parolis pri paciĝo: ; "Viaj hindaj kaproj manĝos niajn lupojn kun facililo".

'415 ' Kaj Ramaz per li transdonis or-brilantan koruptaĵon, ; Petis : "Ni ekstermu multe da soldatoj, fortikaĵoj, ; Prenu nian ĵuron, ke ni havos al vi nur omaĝon, ; Ni evitos la detruon kaj aldonos la havaĵon.

'416 ' ' Niajn pekojn vi pardonu, de vi petas ni indulgon, ; Estu vi al ni humana, ne necesas viaj trupoj, ; Neniigos nin milito kaj detruos la tumulto, ; Se vi venos al ni pace, ni transdonos al vi urbojn".

'417 ' ' La veziroj ĉirkaŭstaris, donis al mi la konsilon: ; "Tariel', vi estas juna kaj ne vidas la kaptilon; Scias ili, kiel trompi malamikon kun la brilo, ; Poste murdos vin – la ĉefon, perfiduloj per armilo.

'418 ' ' Vi esploru, ĉu la ĥano vere estas la trompulo, ; Kun kuraĝaj batalantoj senmaskigu mensogulon, ; Se sinceraj estas ili, ni ne tuŝos, certe, urbojn, ; Se mensogas ili, punu Ĥatalandon – senhontulon".

'419 ' ' Kun konsilo tia saĝa mi konsentis tre kontenta, ; Skribis mi al Ramaz noton: "Ĥan', vi estas reĝo sperta, ; Pli ol sango ni preferas bonan pacon amikecan. ; Kun taĉmento malmultnombra mi vizitos vin – gasteman".

'420 ' ' Nur tri centojn da soldatoj de la trupoj mi elektis, ; La plej fortajn por kampanjo tiu prenis, kiel decis, ; Ĉien post mi rajde sekvi mi la elektitojn petis, ; En okazo de bezono helpi ili al mi devis.

'421 ' ' Dum tri tagoj ni jam rajdis, la senditon novan vidis, ; Li donacon de la ĥano – oran veston enmanigis, ; "Ĥano nia kun vi volas kunfratiĝi", – li aldiris, ; "La donacojn multajn donos, se vi venos nin viziti".

'422 ' ' Ĥano diris: "Mi salutas vin, potenca amirbaro, ; Mi mem iras vin renkonti, kiel frato kaj najbaro". ; Mi respondis: "Ni alvenas kun sincera bona faro, ; Estu ni parencoj bonaj, kiel de gefratoj paro".

'423 ' ' Mi forrajdis, poste haltis ĉe densejo, por ripozi, ; Vidis la senditojn ĥanajn – sur ĉevaloj ili trotis, ; Nun Ramaz donacon novan – la ĉevalojn doni volis, ; "Ĥan' Ramaz pri vi nur revas", diris ili, sed mensogis.

'424 ' ' Mi ricevis la sendaĵojn – ĥano skribis flatajn vortojn; "Mi forlasis la palacon, morgaŭ havos ni renkonton". ; Mi konstruis belan tendon por la ĥatalandaj homoj, ; Kaj senditoj de la ĥano havis tie bonan dormon.

'425 ' ' Ĉiam spur' en vivo restas de bonfaro kaj la virto, ; Jen sekrete al mi venas unu el la ĥan-senditoj, ; "Via patro en juneco mia estis la savinto, ; Diras mi al vi sekrete, ke minacas vin perfido.

'426 ' ' Ĉe kortego min edukis Saridan' – mem via patro, ; Mi eksciis pri intrigoj de la ĥatalanda ĥano, ; Kaj alkuris por averti vin pri vera mortminaco, ; Ĉar ne volas mi ekvidi ĉi perfidon, fian agon.

'427 ' ' Ĥan' Ramaz ne pensas tute pri frateco, nek pri paco, ; Kaŝas li armeon grandan en arbara densa spaco, ; Vi rapide perdos kapon, se ne kredos al minaco, ; Mi esperas, vi komprenas, kiel uzi glavon, lancon.

'428 ' ' Tre amike li renkontos vin kaj viajn batalantojn, ; Li parolos, ke Hindio estas lia bonfaranto, ; Sed signalos li per fumo kaj alvokos la soldatojn, ; Ili vin ĉirkaŭos kaŝe kaj mortigos per glavbatoj".

'429 ' ' Al la homo bonintenca diris mi sinceran dankon, ; Ĉirkaŭbrakis kiel nian bonan, koran samlandanon. ; Mi promesis ne forgesi pri fidela lia ago ; Kaj konsilis lin foriri, por ne verŝi vane sangon.

'430 ' ' Ne malkaŝis mi sekreton, kiun fidis protektanto, ; Kaj decidis fari tiel, kiel diris konsilanto, ; Al la trupoj malproksimaj mi forsendis la komandon: ; "Al mi hastu senprokraste el foraĵo de la kampo!"

'431 ' ' Mi matene la senditojn forpermesis kun la peto: ; "Diru al Ramaz: renkonti lin mi rajdas kun taĉmento," ; Duontagon nesingarde vojis mi kun malatento, ; Pensis, se la sorto volas, ĝi mortigas en momento.

'432 ' ' Jen la polvo de la tero sin leviĝas dum tagiĝo, ; Mi ekpensis: "Ramaz – ĥano rajdas al interbatiĝo, ; Per la glavo mia havos perfidulo kapturiniĝon," ; "Al armilo!" – mi ordonis: "sanga estos renkontiĝo.

'433 ' ' Fratoj, sciuj – tiuj homoj estas fiaj perfiduloj, ; Do kuraĝaj kaj fortuloj estu en decida lukto. ; Dio prenos en ĉielon pereintan sentimulon, ; Por batalo venas tempo, ni ja estas kuraĝuloj".

'434 ' ' Mi ordonis: "Estu preta, ĉevalista avangardo! ; Ni hodiaŭ kunbatalos en kiraso, kun ponardoj, ; Prenu kaskojn kaj la ŝildojn, nepre ankaŭ akrajn sabrojn". ; Mi ordigis la taĉmentojn, niajn vicojn kaj la gardojn.

'435 ' ' Malamiko proksimiĝis, vidis tute nin armitajn, ; Jen leteron hom' prezentis: "Estis nia kor' vundita", ; Li senhonte tion skribis, Ramaz-ĥano hipokrita, ; "Mi vin vidas kun armiloj por milito destinitaj".

'436 ' Mi respondis: "Ni jam scias, ĥano, vian ĵuro-rompon, ; Via dolĉa parolado estas nur mensogaj vortoj, ; Ni batalu, se vi povas, sur la kampo inter montoj, ; Mi persone prenas sabron kaj batalos ĝis la morto".

'437 ' La sendito pli ne venis, ne necesis li finfine, ; Per la fum' signalis ili kaj aliaj vidis tie, ; Ni kaj niaj malamikoj staris pretaj vid-alvide, ; Malamiko jam alpaŝis, sed ni staris tre trankvile.

'438 ' Do mi petis akran glavon kaj surmetis feran kaskon, ; Strebis mi al la batalo, bone sciis militarton, ; Ĉiam pli proksimen rajdis mi al la ĥatalandanoj, ; Ili staris kiel muro, viciĝinte en vicaroj.

'439 ' "Frenezulo!" – ili diris, kiam mi alproksimiĝis, ; Batalanton sur ĉevalo per la glavo mi trapikis, ; La ĉeval' sur teron falis, la rajdanto renverŝiĝis, ; Lanc' rompiĝis, nun la sabron mi tuj prenis kaj aplikis.

'440 ' Mi min ĵetis sur perdrikojn kiel aglo sangavida, ; Mi renversis batalantojn en vicaro malamika, ; Homon al la homo puŝis, mont' fariĝis el vunditaj, ; Neniigis du taĉmentojn mi en ardo obsedita.

'441 ' Min ĉirkaŭis malamikoj, ĉiu kontraŭ mi batalis, ; Lerte mi per fortaj batoj ĥatalandajn homojn tranĉis, ; Terenfalis malamikoj, kiam mi per sabro falĉis. ; Kie ajn mi reaperis, ili kuris kaj mi hakis.

'442 ' Longe daŭris la batalo, ĝi finiĝis nur vespere, ; Kaj subite malamika skolto kriis senespere: ; "La ĉielo ne favoras, agas ĝi al ni kolere, ; Jen mi vidas polvonubon – la armeo rajdas vere..."

'443 ' Kun trumpetoj kaj tamburoj venis miaj trupoj urĝe, ; Tra la intermont' penetris, nokte rajdis ili kune, ; Tio estis granda helpo – tre necesa ja sendube, ; Kiam ili proksimiĝis, sentis ni nin do sekure.

'444 ' Malamikoj, ekvidinte niajn trupojn sur la valo, ; Estis pretaj por forkuro, donis la repaŝ-signalon; Interkrucis ni la glavojn – mi kaj ruza Ramaz-ĥano. ; Mi Ramazon terenĵetis, sed ne murdis lin per mano.

'445 ' Forkurantan malamikon kaptis nia ariergardo, ; Ĝi malliberigis ilin, ĉar kuraĝis avangardo. ; Do Ramaz malvenkon spertis de glorinda glav-ponardo, ; Kaj aŭdiĝis ĉie ĝemoj, al vunditoj mankis gardo.

'446 ' La ripozo por mi estis tre necesa, dezirinda, ; Post batalo senkompata, restis mi kun man' vundita, ; Ĉiuj diris : "Heroismo via estas admirinda". ; Gloris min kaj mian glavon, kaj atakon tre subitan.

'447 ' De honoroj kaj gratuloj mi ne vidis tute finon, ; Unuj benis min, aliaj kisis min kiel virinon, ; Nobelaroj – edukistoj ploris pro la korinklino. ; Miris, ke mi per armilo faris ĉie la ruinojn.

'448 ' Mi dissendis militistojn por kolekti la tributon; La loĝantoj ĉion donis – ili timis persekuton; Mi permesis verŝi sangon de malicaj perfiduloj, ; Kaj malfermis la pordegojn sen batalo multaj urboj.

'449 ' Al Ramaz mi diris tiel : "Vidas mi perfidajn agojn, ; Vi kaptito estas mia, por vi restas kelkaj tagoj, ; Ne fortigi la fortresojn vi ordonu al urbanoj, ; Mi alie ne kompatos vin kaj viajn samlandanojn".

'450 ' "Mi humile subordiĝos", – la estinta ĥano diris, ; "Donu mian nobelaron, ke mi povu utiligi; Mi lin sendos al fortresoj kun ordono ne rezisti; Via estas supereco, rajtas vi kondiĉojn dikti".

'451 ' Al Ramaz mi donis homon, tiu estis la veziro, ; Per totala kapitulac' do finiĝis militiro, ; Kaj fortresoj ĉiuj cedis, ĉar ne estis la eliro, ; Jen nekalkuleble granda ŝajnis la militakiro.

'452 ' Mi trarajdis tutan landon, la ŝlosilojn oni donis, ; Ferajn kestojn mi malfermis, la trezorojn ĉie trovis; "Vivu pace kaj sen timo" – al popolo mi parolis, ; "Mi venkinto, estas suno, sed briligi vin ne volis".

'453 ' Mi esploris la tenejojn de komenco ĝis la fino, ; Mi laciĝus kalkulante la trofeon kaj armilon; Ortekŝaĵon mi ekvidis, ŝalon kaj la pelerinon, ; Nekredeble ŝajnis bele – ĝi elvokis nur admiron.

'454 ' Ne komprenis mi, do, kiel oni faris tiun varon, ; Ĉiu ĝin vidante diris, ke ĝi estis dia faro, ; Ĉar nerimarkeblaj estis tie vefto, nek la varpo; Estis ĝi fortika, kvazaŭ oni fandis ĝin sur fajro.

'455 ' Tiun ŝtofon mi kunprenis por la suno kaj la stelo, ; Kaj por Parsadan' elektis la plej belan mi juvelon, ; Al Hindio mi forsendis mulajn kaj kamelajn gregojn, ; Ŝarĝis ilin per trezoroj kaj ekspedis al kortego".

. & La letero de Tariel' al reĝo de Hindio kaj reveno kun la venko:

'456 "Skribis mi : "Ho, mia reĝo, estu vi feliĉa, forta; ; La milito jam gajnita, pri la venko mi raportas; Ĥatalando niajn rajtojn kaj potencon reagnoskas. ; Mi kaptitan reĝon kune kun tributo hejmen portas".

'457 ' Ĥatalandon mi pacigis kaj forlasis ĝin – malbonon, ; Ne sufiĉis la kameloj por alporti la trezoron, ; Tiam mi ordonis ŝarĝi por trofeoj ankaŭ bovojn. ; Feliĉulo mi fariĝis, ĉar atingis mi la gloron.

'458 ' Portis mi el Ĥatalando la kaptitan suverenon; Parsadan' renkonte rajdis kun fiera patra sento, ; Ĉirkaŭprenis min kaj kisis, laŭdis min kaj la taĉmenton. ; Li revindis mian vundon, faciligis la turmenton.

'459 ' Parsadan' aranĝis tendon multkoloran sur majdano; Li tre volis min ekvidi, por eldiri grandan dankon, ; Apud reĝo mi sidiĝis, sentis varmon de rigardo, ; Reĝo volis per festeno, festi la solenan tagon.

'460 ' Tutan nokton ni festenis kaj tre ĝojis en tendaro, ; Nur matene urben venis, forlasinte gardistaron. ; Parsadan' ordonis tiam: "Vidi volas mi la ĥanon ; Kaj militkaptitojn, kiujn vi alprenis kiel sklavojn".

'461 ' Mi sidigis Ramaz-ĥanon kun la reĝo vid-al-vide, ; Parsadan' lin ekrigardis, ne kolere – bonanime, ; Kun la ĥano duvizaĝa li parolis altestime, ; Kavaliran noblan trajton montris li ne hipokrite.

'462 ' Parsadan' regalis ĥanon, restis bona kaj ĝentila, ; Parolado daŭris longe, estis ĝi sinceranima, ; Kaj matene lin invitis – malamikon jam venkitan. ; "Ĉu mi povas ĥanon puni?" min demandis reĝo mia.

'463 ' Mi respondis : "Homan pekon ĉiam ja absolvas dio; Ni pardonu grandanime, estas mia opinio". ; Al Ramaz li tiam diris: "Se forgesos vi ĥan' ĉion, ; Ni pardonos vin sincere kaj ne tuŝos vian vivon".

'464 ' Ĥano sin devigis pagi dek mil draĥmojn* por kompenso, ; Grandan kvanton da teksaĵoj – da brokato kaj sateno; Al la ĥano, liaj ĥasoj oni donis decan veston ; Kaj al ĉiu do permesis pace voji al la hejmo.

'465 ' Jen Ramaz humile danke antaŭ reĝo klinis kapon, ; Diris, ke perfidon sian tre bedaŭras kiel ĥano: ; "Se mi iam ekribelos – min mortigu sen kompato". ; Kaj kun siaj korteganoj li forlasis nian landon.

'466 ' Frumatene de la reĝo venis hom' en mian ĉambron ; Kaj transdonis: "En disiĝo ni ja estis tri monatoj, ; Do delonge mi ne vidis la ĉasaĵon sur la pato, ; Venu, kaj ni rajdos ĉasi, se nur vi ne sentas lacon".

'467 ' Mi vizitis la palacon. En la korto mi ekvidis ; Akcipitrojn kaj ĉasfalkojn, kaj gepardojn oni ligis; Reĝo – suno de Hindio, por ĉasado prete sidis, ; Min vidante, sian ĝojon per saluto li esprimis.

'468 ' Reĝo kun reĝino havis pri mi nur konversacion, ; "Tariel' min tre ĝojigis post milita kompanio, ; En malĝojo lia rido povas esti ambrozio. ; – Kion mi al vi nun diras, faru senprokraste tion.

'469 ' ' Mi al vi aferon diros, mi pri ĝi delonge pensas: ; Ja Nestan', filino nia, tronon de Hindi' heredas, ; Ŝin – edenan arbon montri al la homoj tempo estas, ; Do vespere ŝin sidigu apud vi, mi kore petas".

'470 ' Sur ĉevaloj ni foriris por ĉasado kaj amuzo, ; Ĉe ni estis multaj falkoj, akcipitroj kaj la hundoj, ; Post nelonge de ĉasado ni revenis en la urbon, ; Mankis tempo por amuzi sin en gaja pilko-ludo.

'471 ' Min rigardis tuta urbo de tegmentoj kaj balkonoj, ; Plibeligis min, venkinton, la vestaĵo kun butonoj, ; Mi aspektis kiel rozo kun roseroj kaj burĝonoj. ; La vidantoj min admiris, ja ne diras mi mensogon.

'472 ' La milita supervesto – ĝin al mi donacis ĥano, ; Estis tiel eleganta, ke mirigis la urbanojn. ; Reĝo de ĉevalo saltis, ni eniris en darbazon*, ; Kaj ekstremis, ekvidinte sunsimilan Dareĝanon.

'473 ' Nestansuno tie portis la oranĝan pelerinon, ; Ĉirkaŭ ŝi humile staris la ĥadumoj* – timigiloj, ; Domoj, stratoj de la urbo plenis de blindiga brilo, ; Ĉar radiis denteburo kaj koraloj de la lipoj.

'474 ' Min – vunditan la reĝino kisis kaj salutis kore, ; Ŝi demandis pri la sano, ĉirkaŭprenis min trifoje, ; Ŝi patrine min akceptis, komplimentis min milvoĉe: ; "Malamiko ne aŭdacos agi kontraŭ vi aroge".

'475 ' Oni min sidigis tie, kie mia kor' deziris, ; Estis mi feliĉa tiam – ĉar la sunon mian vidis, ; Mi kaŝeme ŝin rigardis, la okuloj ŝiaj brilis; Se rigardon ŝi deturnis, mia vivo vanta iĝis.

'476 ' La festeno estis tia, ke ĝis nun neniu vidis, ; El rubenkalikoj plenaj ni bongustan vinon drinkis; Reĝo ĉe la tablo estris kaj severe li ordigis; "Ne ellasi gaston hejmen, ĝis li gaja ne fariĝis".

'477 ' Mi, sidante ĉe la tablo, estis en feliĉa domo, ; Kiam ni interrigardis, batis forte niaj koroj, ; En frenezo mi evitis eĉ rigardi al la homoj. ; La renkonto kun la suno donis al mi raran ĝojon.

'478 "Vi ne kantu" – reĝo diris kaj mutriboj* interrompis, ; Poste ambaŭ reĝaj moŝtoj miajn agojn supergloris; "Ĝojas ni, sed malamikoj ĝoje esti do ne povis, ; Ĉiu, kiu vin laŭdegis, tiu vere ne kaĵolis.

'479 ' ' Mia devo estas doni al heroo or-vestaĵon, ; Sen la gloro vin ornamas, plibeligas la vizaĝon. ; Jen cent trezorujoj – ili bone taŭgas por havaĵo, ; Kaj vi kudru al vi veston laŭ bontrovo kaj la plaĉo".

'480 ' Mi ricevis cent ŝlosilojn de multegaj konservejoj, ; Kaj el tuta koro dankis riverence la gereĝojn, ; Ambaŭ sunoj ĉirkaŭprenis kaj min kisis kun sincero ; Kaj disdonis ordonacojn* al la trupoj kaj al estroj.

'481 ' Poste gastojn li sidigis kaj denove vinon drinkis, ; La grandegan venkofeston harpoj, flutoj plibeligis; La reĝino gastojn lasis, kiam tago vesperiĝis, ; Kaj aliaj ĝis aŭroro ĉe la tabloj kune sidis.

'482 ' Ni disiris, mi kalikon kun drinkaĵo plu ne prenis, ; Mi serĉadis dormolokon kaj denove flamon sentis; Sed ne povis mi ekdormi, ĉar pri ŝi sincere revis; La vizaĝ' de ĉarmulino tutan nokton min turmentis".

, & La letero de Nestan-Dareĵan al sia amanto:

'483 "Nokte en la ĉambron venis mia sklavo kun raporto: ; "Jen virino sub vualo, vin demandas ĉe la pordo." ; Mi komprenis, kiu estis, saltis kun batanta koro, ; Kaj Asmat' eniris ĉambron, reakiris mi la forton.

'484 ' Ŝi de mia suno venis, do ĝojigis la alveno; Mi ne lasis riverenci, sed ŝin kisis kun dankemo; Ŝin preninte je la mano, mi sidiĝis sur kusenon ; Kaj demandis, kiel fartas de cipreso juna ĝermo.

'485 ' Mi petegis: "Vi parolu nur pri mia amatino!" ; Ŝi respondis : "Mi sen flato ĉion diris ĝis la fino, ; Vi al ŝi treege plaĉis kiam estis en proksimo, ; Ŝi min sendis por esprimi sian senton kaj estimon".

'486 ' Kaj Asmat' leteron donis – estis ĝi de mia suno; Skribis ŝi – Nestan' sopire: "Mi revidis vin, belulo, ; Batalanton sur ĉevalo, la sveltecon de l'stature, ; Kaj sekiĝis miaj larmoj, tial dankas mi fortunon.

'487 ' ' Kvankam havas mi parolon por amanto kante glori, ; Mi ne povas en disiĝo vin sopiri kaj adori; Suno volas por leono rozĝardenon sian doni, ; Ĵuras mi per via suno – min neniu havos krom vi.

'488 ' ' Scias mi – vi ploras multe, sed al larmoj venos fino, ; Do hodiaŭ trankviliĝu kaj forigu la sopiron; Adorantoj niaj miras : "Do ĉe kiu pli da brilo?" ; La donacon vian havi – jen esprimis mi deziron.

'489 ' ' Vi donacu la rubandon, kiun vi sur ŝultroj tenas, ; Kaj vi ĝojos, ekvidinte, kiel ĝi al mi konvenas; Vi do portu braceleton, kiun mi per Asmat sendas, ; Kaj ĉi nokton en la vivo ne forgesi, vin mi petas.'"

, & Ploro de Tariel' kaj lia sveno:

'490 Poste Tariel' ekploris, pasintecon li memoris: ; "Jen brakringo, ĝin la suno sur la brako sia portis". ; Li demetis la brakringon, kaj ĝin kisis, poste ploris, ; Li, perdinte la konscion, kuŝis tie, kvazaŭ mortis.

'491 Kuŝis viro sen vivsignoj kaj similis al kadavro, ; Sur la brusto oni vidis du makulojn de membatoj, ; Kaj Asmat' ĝis sangofluo grate vundis siajn vangojn, ; Ŝi klopodis, penis helpi priverŝante lin per akvo.

'492 Kun kompatoj kaj kortuŝo Avtandil' ĉi tion vidis; Ŝiaj larmoj boris rokon, la fajregon ŝi estingis, ; Tariel' rekonsciiĝis kaj silente li aldiris: ; "Mi ankoraŭ vivas, sekve, la turmento ne finiĝis".

'493 Li ekstaris paliĝanta kvazaŭ post la furiozo, ; En ŝafranon pale blankan transformiĝis lia rozo; Li silente longe sidis, stranga estis tiu pozo, ; Kaj domaĝis, ke ne mortis – preterpasis la psikozo.

'494 Li al Avtandil' sin turnis, kiam reakiris fortojn; "Kvankam mi frenezas, tamen mi daŭrigos la rakonton, ; Historion pri virino, kiu pelas min en tombon, ; Kaj mi miras, ke ankoraŭ plue vivas mi – mortonto.

'495 ' Tiam mi ekĝojis ege, ke Asmat' fidela venis; Traleginte la leteron, la brakrington mi ricevis, ; Ĝin surmetis sur la brakon, la rubandon mi deprenis ; Kaj transdoni la belaĵon al la amatino petis".

,& Responda letero de Tariel' al sia amatino:

'496 "Al Nestan' mi skribis : "Suno, via brilo kaj radioj ; Frapis rekte al la koro, agis sur la ambicio. ; Freneziĝis mi de via rava ĉarmo kaj gracio, ; Kion povas mi donaci nun al vi anstataŭ tio?

'497 ' ' Unufoje de pereco, vi animon mian savis, ; Mi kun tiu pasinteco la nuntempon jam komparis; Sur la brako jen brakrigo – ĝin bonkore vi donacis, ; Mi feliĉas kaj antaŭe tian ĝojon ĉu mi havis?

'498 ' ' Sendas mi al vi rubandon – orteksajon altvaloran ; Kaj la robon samvaloran, vi ne trovos ja pli bonan. ; Vi ne lasu min turmenti en sopiro senkonsola – ; Revas mi nur pri rakonto, mi nur vin ekvidi volas".

'499 ' Kaj Asmat' foriris; tiam kaptis min facila dormo, ; Sed subite mi tremetis – vidis mi Nestan' en sonĝo; Revekiĝis mi – samtempe malaperis tiu sorĉo; Tutan nokton mi pasigis, ne aŭdinte ŝian voĉon".

,& Konsilo pri edziniĝo de Nestan-Dareĝan':

'500 "Mi ekaŭdis matenfrue: min invitas mem la reĝo, ; Tuj mi rajdis al palaco, min atendis jam la seĝo, ; La gereĝoj kun tri ĥasoj volis dikti ian leĝon, ; Sidis tie, ion diris, estis kiel dum la preĝo.

'501 ' Parsadan' komencis plendi pri monarka sort', destino, ; Diris : "Venas maljuneco malgraŭ volo kaj deziro, ; Kvankam estas ni feliĉaj, tamen ni ne havas filon, ; Sed kontentas, ke ĉielo donis al ni la filinon.

'502 ' ' Tamen por filino nia bezonata estas edzo, ; Ke heredu li la tronon, havu indan li potencon, ; Estu saĝa li – reganto, estu li la ekscelenco, ; Ke li povu malamikojn neniigi de komenco".

'503 ' Mi respondis: "Malfacilas mankon de la filo kaŝi, ; Sed sufiĉas por ni suno, kiun ĉiu devas ami; Ĉiu estus feliĉulo tiun belulinon havi, ; Vi mem scias ja pli bone, kiel la elekton fari".

'504 ' Komenciĝis konsilio pri la edzo de l'filino; Mia koro antaŭsentis – por la ĝojo venas fino; Reĝ' proponis unu homon - de Ĥorezma* ŝaĥo filon; Havi tian heredanton estus do por li utilo.

'505 ' Mi rimarkis – anticipu la decidon ili faris, ; Kaj interkonsente, unu al alia nun rigardis; Mi ne povis min proponi, al gereĝoj kontraŭstari, ; Do fariĝis mi nur cindro, ĉio nun por mi amaris.

'506 ' La reĝino ĝin konfirmis: "Ŝaĥo de Ĥorezmo fortas, ; Por Nestan' do lia filo estas edzo la plej bona". ; Kontraŭdiri mi ne povis, ĉar ŝi estis ĉiopova, ; Kaj konsentis mi – povrulo, faris memkondamnon mortan.

'507 ' Al Ĥorezma Ŝaĥo sendis ili kurierperanton, ; Petis Ŝaĥon: "La Hindio serĉas tronon, heredanton, ; Ni ne havas filon, tial serĉas lin en alilando; Via estu filo, reĝo, de Hindio posedanto".

'508 ' Do revenis la sendito kaj donacojn li alportis, ; Ege ĝojis ĥorezmŝaĥo, pro destino ne angoris, ; Diris la kontenta ŝaĥo: "Vi al mi feliĉon donis, ; Ĉu pri ĝi mi povis revii?" Do sincere li parolis.

'509 ' Kaj denove ili sendis kurieron al ŝaĥido, ; Petis senprokraste veni sen la timo, malkonfido, ; Mi ne povis plu elteni, iris laca al la lito, ; Koro batis kaj suferis, mi fariĝis turmentito".

,& Interparolo de Nestan' kun Tariel' kaj ilia decido:

'510 "Hejme sidis mi tre trista, min turmentis kordoloro; Sklavo de Asmat' alvenis – mi denove sentis forton, ; Al mi donis li leteron – ŝi priskribis sian sorton, ; Kaj ŝi petis min alveni, senprokraste por rakonto.

'511 ' Kaj mi tuj surĉevaliĝis, rajdis mi ĝis la ĝardeno, ; Proksimiĝis mi al turo, ne perdinte la esperon; Al Asmat' mi iris haste – ŝi atendis mian venon, ; Sur vizaĝo ŝia estis larmo-spuroj kaj ĉagreno.

'512 ' La aspekto ŝia trista malagrabla min impresis; Ŝi ja ĉiam estis gaja, sed nuntempe ne ridetis; Ne parolis ŝi, nur ploris, mi danĝeron antaŭsentis. ; Ne kuracis ŝi korvundon, maltrankvilon ne forprenis.

'513 ' Ŝia tristo miajn pensojn deflankigis kaj deprimis, ; Min Asmat' kondukis ĉambren, la kurtenon ŝi distiris; Mi eniris, vidis lunon kaj malĝojo tuj foriĝis, ; La radioj trafis koron, sed la koron ne varmigis.

'514 ' Lumo falis sur kurtenon, sed blindiga ĝi ne estis, ; Orteksaĵon donacitan ŝi videble jam neglektis, ; En la verda robo luno sur la taĥto triste ĝemis, ; La vizaĝon larmoj lavis, sed ĝi fulmis kaj ĉagrenis.

'515 ' Ĉi-momente ŝi similis al tigrino furioza, ; Kun ŝi estis nek la luno, nek ĉielo – la stelozaj, ; Min Asmat' sidigis tie sur la seĝon – la ripozan, ; Amatino mia ŝajnis tre kolera kaj nervoza.

'516 "Miras mi, ke vi alvenis" – ŝi proponis siajn pruvojn; "Perfidulo vi ja estas kaj samtempe ĵurrompulo; Tamen sciu pro turmentoj dio sendos al vi punon". ; Mi kuraĝis kontraŭdiri: "Mi ne scias mian kulpon.

'517 ' ' Mi ne povas min pravigi ne sciante la aferon. ; Kiun krimon mi do faris, kia estas mia peko?" ; Ŝi respondis: "Mensogulo, malfacilas ĉu diveno? ; Kiel povis mi vin fidi? Vi min trompis – jen la vero.

'518 ' ' Ĉu vi scias la novaĵon – por mi edzon oni serĉis; Vi ja tian konsilion ĉe gepatroj partoprenis, ; Vi trankvile tie sidis kaj kun ĉio ja konsentis; Ĉu vi diros, ke la ĵuron vi ne rompitis, sed konservis?

'519 ' ' Ĉu vi jam forgesis tute, kiel ploris vi pro amo, ; Kiel oni vin kuracis kaj vi ĝemis dum malsano? ; Vi nuntempe min rezignis, mensogulo, sen kompatato! ; Ankaŭ mi simile faros – vi meritos tian agon.

'520 ' ' Tamen sciu, ke ne gravas, kiu estos suvereno, ; Ĉar al mi nur apartenas la potenco en la regno; Sciu, do mensoga homo, ke alie ĉi ne estos, ; Iru for, ĉar vin egalas ankaŭ viaj aĉaj pensoj.

'521 ' ' Kaj ĝis kiam mi regados, estos vi ĉi tie nulo, ; El Hindio mi forpelos vin kiel virinaĉulon, ; Min similan vi nenie trovos, fia perfidulo." ; Taniel' denove ĝemis, fluis larmoj el okuloj.

'522 Li daŭrigis: "Post ĉi vortoj reakiris mi esperon, ; Mi denove povis vidi sunan lumon sur la tero. ; Sed, ho, ve, perdiĝis ĉio kaj postrestis nur sufero. ; Efemera mondo, kiom vi turmentos la oferon?

'523 ' Sur kuseno mi ekvidis sanktan libron – la Koranon* ; Prenis ĝin kaj gloris dion, poste gloris ŝin – la amon. ; Mi parolis: "Suno mia, min bruligas via flamo, ; Tamen mi ankoraŭ vivas, do aŭskultu akuzaton.

'524 ' ' Se mi diros falsan vorton, vantana flato aŭ mensogon, ; Punu min ĉielo alta, ĵetu min en fridan tombon. ; Vi ne juĝu sen aŭskulto – faris mi nenian trompon". ; Nun ŝi cedis kaj konsentis, finaŭskulti mian vorton.

'525 ' Mi daŭrigis: "Se perfidis mi kaj rompitis sanktan ĵuron, ; Senprokraste de ĉielo frapu min mortiga fulmo, ; Kiu povus anstataŭi vin, cipreson kaj la lunon? ; Vin perdinte mi ne vivos kaj fariĝos nur mortulo.

'526 ' ' Oni min invitis kiel atestanton dum konsilo, ; Sed pli frue la gereĝoj sciis ĉion pri decido. ; Mi aŭskultis kaj komprenis – vana estus enmiksiĝo. ; Ne konsentis mi en koro, sed ne montris kontraŭdiron.

'527 ' ' Kiel povis mi diskuti, se la reĝo ne komprenas, ; Ke Hindio heredanton de la trono ja posedas ; Kaj mi, Taniel', laŭ patro sola heredanto estas. ; Do mi sentis, ke nuntempe prisilenti al mi decas.

'528 ' ' Kontraŭdiro nur malhelpus, devus agi mi prudente, ; Ĉion bone primediti kaj ne fari senpripense; Mia koro furiozis, pelis vagi intertempe; Sed se vi min ne forlasos, ĉu mi vin rezignos certe?"

'529 ' Je la nomo de la amo mi jam faris hipokriton. ; Kaj de nun varmiĝis pluvo, estis rozoj jam savitoj, ; Mi denove vidis perlojn inter la koralaj lipoj. ; Ŝi eldiris: "Kiel povis mi akuzi pri perfido?

'530 ' ' Nun mi kredas viajn vortojn kaj ne restas ia dubo, ; Ĉar senkaŭze mi vin nomis ĵurrompulo, perfidulo. ; Iru, petu mian manon, estu reĝo-grandegulo. ; Ambaŭ ni sur trono sidos sen serĉado de fremdulo".

'531 ' Kaj denove post kolero venis paco kaj konkordo, ; Estis ŝi denove luno, brila suno kaj aŭroro; Ŝi sidigis min apude, tiel montris la favoron, ; Ŝi parolis kaj estingis brulan fajron en la koro.

'532 ' Poste diris ŝi: "Saĝulo ne kutimas tre rapidi, ; Tia homo ĉian planon povas bone realigi; Se forpelos vi fianĉon, reĝo povas koleriĝi, ; Kaj pereos nia lando, se komencos vi militi.

'533 ' ' Se enlasos vi ŝaĥidon – oni lin al mi edzigos, ; Ni ne trovos unuecon, rozon nian li frostigos, ; La invitoj, edzaferoj, ŝtatagadoj pligrandiĝos, ; Persajn ĥasojn ni abdikos, alilandul' ne ĝojiĝos".

'534 ' Mi respondis : "Dio gardu, ke mi lasu lin edziĝi; La venintojn ĉe landlimo mi scipovos fortimigi, ; Mian forton kaj kuraĝon povas vi sen dubo fidi, ; Kaj post tia renkontiĝo por nenio taŭgos ili."

'535 ' "Eble pensas mi virine" – mia amatino diras, ; "Vi ne tuŝu la eskorton, mi sangverŝon ne deziras, ; Murdu vi nur la fianĉon – kaj pli mi ne sangavidas, ; Eĉ la arbon sekiĝintan homa vero revivigas.

'536 ' ' Faru tiel, ho, leono, mi ne dubas pri la venko; La fianĉon murdu kaŝe, ne elvoku la suspekton; Lian trupon ne mortigu, ĝi ne estas bruta grego, ; Sed senkulpan homon murdi, estas ja grandega peko.

'537 ' ' Poste iru en palacon, diru al la suvereno: ; "Mi ne lasos, ke Hindion vi donacu al la persoj; De la patro mi heredis kaj posedas tiun teron; Se decidon vi ne ŝanĝos – ĉi postrestos nur dezerto".

'538 ' ' Sed ne diru pri la amo kaj ne petu mian manon, ; Tiel pli kredebla ŝajnos via prava postulado, ; Kaj vidante vin obstina, nepre cedos mia patro, ; Min proponos edziniĝi, kaj disfalos ĉiuj baroj".

'539 ' Al mi plaĉis tiu plano, ĝin plenumi mi decidis. ; Mi ekstaris por foriri – certe, multe mi rapidis. ; Min ŝi volis ĉirkaŭpreni, ŝia belo min altiris, ; Sed mi ne kuraĝis fari, kion ege mi deziris.

'540 ' Adiaŭis mi, foriris, gvidis min Asmat' ĉi-foje; Post disiĝo la sopiro pligrandiĝis eĉ miloble, ; Tamen ĝojo ne multiĝis, ĝi ekzistis unusole ; Malrapide mi revenis, tion faris mi nevole".

, & La alveno de ŝaĥido al Hindio por edziĝo kaj lia morto:

'541 "Jen anoncis kuriero: "Jam veturas la fianĉo," ; Kio lin atendas, certe, ne suspektis ŝaĥidaĉo. ; Parsadan' kontenta estis, ĝojis li pri la mesaĝo, ; Min alvokis per kapklino kaj sidigis kun la plaĉo.

'542 ' Li parolis: "Tian tagon decas montri la gajecon ; Kaj finiĝu la afero per la nupta rafineco; Ni dissendis kurierojn, ke alportu trezorkestojn, ; Ni disdonos la donacojn, ĉar ne decas avareco".

'543 ' Ĉie mi dissendis homojn por alporti la donacojn, ; Jen aperis la fianĉo – la ŝaĥido kun aŭdaco, ; Ni elrajdis por renkonti, malgrandiĝis la distanco, ; Kaj kunvenis multaj trupoj, okupantaj grandan spacon.

'544 ' "Vi aranĝu la tendaron!" – reĝ' ordonis al amaso, ; "Ke ŝaĥido povu tie liberiĝi de la laco; Lin renkontu niaj trupoj, vi ne iru al la gasto, ; Vi renkontos lin ĉi tie, jam venintan en palacon".

'545 ' Sur la kampo ni konstruis ruĝajn tendojn el atlaso; La fianĉo algalopis, sekvis lin popolamaso, ; Kolektiĝis ĥozzmanoj – militistoj kaj la ĥasoj, ; Trupoj en vicaroj staris, buntis vestoj kaj kiraso.

'546 ' Mi laciĝis pro laboroj kaj al hejmo nun rapidis, ; Dormi volis malfeliĉa, mi al mia sort' subiĝis; De Asmat' alvenis sklavo, li leteron enmanigis, ; Mi tralegis: "Venu urĝe, mi tre volas vin ekvidi".

'547 ' Senprokraste al reĝino mi direktis la ĉevalon. ; Al Asmat' mi diris: "Kial mi denove vidas larmojn?" ; Ŝi respondis: "Vi pli bone devus scii la kialon; Ja ne povas mi senĉese vin pravigi, viajn agojn".

'548 ' Ni eniris al Nestan', ŝi sidis kun faltita frunto; ; En la ĉambro estis lume, tute ne necesis suno, ; Ŝi demandis: "Kial longe vi prokrastas la plenumon? ; Ĉu denove vi min trompas? Ĉu vi serĉas la fortunon?"

'549 ' Tiaj vortoj min ofendis, mi subite ŝin forlasis, ; Nur ekkriis: "Vi tre bone scias, kiel vin mi amis, ; Ne necesas kuraĝigi, mi mem scias kion fari." ; Mi revenis hejmen preta tuj kaj decideme agi.

'550 ' Mi kolektis batalantojn, kriis : "Estu ĉiuj pretaj!" ; Kaŝe ni trarajdis urbon, estis tute nevideblaj. ; Trovis mi ŝaĥidan tendon, tie kuŝis li kvieta, ; Kaj mi murdis senkompate la junulon sendefendan.

'551 ' Tranĉis mi la tendon traŝe per tranĉilo trafa mia, ; Kaptis lin ĉe gamboj, kontraŭ stango frapis kapon lian, ; Ekkriegis la servistoj, ekvidinte murdon fian, ; Sed ĉevalo tuj forportis min de loko peka tia.

'552 ' Onidiro pri la murdo en tendaro disvastiĝis, ; Min postkuris lia gardo, ĝi min volis senkapigi, ; Sed persekutantojn ĉiujn mi per glavo neniigis; Mi ja havis la fortreson, ĝin sukcese mi atingis.

'553 ' Por kunvoki militistojn, mi dissendis kurierojn: ; "Kiu volas al mi helpi, venu urĝe al fortreso." ; Novaj trupoj persekutis, sed ne havis tio sencon, ; Ekvidinte la fortreson, ili perdis tuj esperon.

'554 ' Nokto pasis, frumatene mi post dormo ellitiĝis ; Nobelaron tri venintajn de la reĝo mi ekvidis; Ili diris liajn vortojn: "Kiel patro mi vin fidis, ; Kial do vi mian ĝojon senkompate neniigis?

'555 ' ' Kial mian gloran domon malhonoris vi per sango? ; Se vi volis la filinon, kial kaŝis vian amon? ; Vi ofendis min kaj honto kovris min kaj mian aĝon, ; Ni ne povas kune esti post farita krima ago".

'556 ' Mi respondis: "Ho, reganto, se ne havus mi la forton, ; Ĉu min ne bruligus plene arda flamo de la honto? ; Vi juĝisto, estu justa, tamen mi ne timas morton; Mi ne celis la filinon – tio estis veraj vortoj.

'557 ' ' Vi ja scias – en Hindio iam kelkaj reĝoj estis, ; Kaj nuntempe heredanto unusola mi postrestis, ; Ĉar aliaj ŝtataj homoj mortis – vi la tronojn prenis, ; Do laŭrajte hinda trono nur al mi ja apartenis.

'558 ' ' Mi sincere al vi diros – vi ne agis laŭ leĝaro, ; Havis vi nur Dareĝanon, estis ina la idaro, ; Mi vidinte la ŝaĥidon, montris mian kontraŭstaron, ; Al neniu mi do cedos tronon hindan kaj cidaron.

'559 ' ' Dareĝanon edzinigi tial mi eĉ ne postulas; Sed Hindio estas mia, mi pri tio ne diskutas; Pretendantojn mi mortigos – tion mi solene ĵuras; Mi batalos sola – helpon alilandan mi rifuzas.'"

,' & Taniel' ekscias pri malapero de Nestan-Dareĝan':

'560 "Post foriro de l' senditoj furiozi mi komencis ; Pri Nestan', pri ŝia sorto mi nenion scii povis; Mi leviĝis sur murego kaj de tie vidi volis ; Ebenajojn kaj la spacon, kiu min de ŝi izolis.

'561 ' Du piedirantojn vidis mi en tia malproksimo, ; Tiu estis unu viro, akompanis li virinon; Estis ŝi Asmat', rekonis mi ŝin – mian amikinon, ; Ŝiaj haroj distaŭzitaĵ, la vizaĝo montris triston.

'562 ' Mi rimarkis, ke vizaĝo ŝia estis tute flava. ; Mi el fora loko kriis: "Kio do okazis, kara!" ; Kaj, plorinte ŝi respondis: "Forte batis frapo rara, ; Dio punas nin pekantojn, iĝis nia viv' amara".

'563 ' Mi alproksimiĝis, petis: "Vi rakontu tutan veron." ; Tamen ploris ŝi amare, bruligata de la febro, ; Kaj ne povis trankviliĝi kaj paroli pri afero; De gratitaj vangoj gutis freŝa sango sur la teron.

'564 ' Poste ŝi komencis: "Diros mi al vi senkaŝe ĉion, ; Tamen ankaŭ vi kompatu malfeliĉan min – virinon, ; Mi petegas – estu bona kaj forprenu mian vivon, ; Ĉar ne volas mi ekzisti, kiam ĉio – nur ruinoj.

'565 ' ' Ĉiu sciis, kiu murdis la venintan ĥorezmanon; ; La sciigo pri la krimo kolerigis Parsadanon, ; Li kriegis kaj ordonis tuj al siaj korteganoj ; Trovi vin kaj alkonduki, ĉar vi estas la tirano.

'566 ' ' La serĉintoj do parolis, ke vi jam forlasis urbon; Kaj la reĝo tiam diris: "Klara estas tiu murdo: ; Amis li filinon mian, estas ĉi neniu dubo; Vidis mi – interrigardis ili ame per okuloj.

'567 ' ' ' Kaj mi ĵuras per la kapo – punos mi edukantinon, ; Kvankam ŝi parence estas kaj nomiĝas eĉ fratino. ; Mi ŝin petis boneduki Dareĝanheredantinon, ; Tamen ŝi difektis ĉion, faris el ŝi sataninon".

'568 ' ' Parsadan' kutimon havis – se li ĵuris per la kapo, ; Do neniu dubo restis – nepre sekvos plenumado; Iu ekaŭdinte ĵuron tuj raportis paroladon, ; Al Davar – al sorĉistino, kiu perdis sinregadon.

'569 ' ' Diris tiu fia homo al Davar : "La reĝo ĵure ; Nepre vin mortigi volas, devas vi vin savi kure". ; Ŝi respondis: "Dio vidas, ke mi min ne sentas kulpe, ; Sed mi faros, ke kulpuloj jam neniam estu kune".

'570 ' ' Sinjorino mia estis trista, kian vi restigis, ; Portis ŝi donacon vian, kiu multe ŝin beligis, ; Tamen ŝin Davar atakis, en insultoj sin ne bridis: ; "Vi putino, vi putino, reĝo volas min mortigi.

'571 ' ' ' Kial vi, putino vera, diris murdi la fianĉon? ; Kial mi pro tio devas pagi nun per mia sango? ; Reĝo pravos, sed ĉu sciis mi pri tiu krima ago? ; Dio donu kaj neniam vi revidu helan tagon".

'572 ' ' Kaptis ŝi Nestanon lerte kaj faligis sur la teron, ; Batis ŝin kaj piedfrapis en atako de kolero, ; Kaj Nestan' ne kontraŭdiris, nur ĝemadis pro sufero; Al la povrulino helpi estis vanaj niaj penoj.

'573 ' ' Satiĝinte de batado, vokis jen Davar du sklavojn. ; Ili estis du fortuloj kun vizaĝoj de la kadĵoj; Ili portis grandan keston kun fortikaj feraj kradoj, ; Puŝis tien tiun sunon kaj ekstaris kiel gardo.

'574 ' ' Kaj kunportis ili keston, fornavigis de marbordo; Nun Davar eldiris: "Tiel mi meritas jam la morton, ; Tamen ĝin mi ne atendas, ĝis la mano havas forton". ; Prenis ŝi tranĉilon akran kaj trapikis sian koron."

'575 ' ' Nun Asmat' komencis plendi, diris ŝi amarajn vortojn: ; "Murdu min – la pekanton, ĉar malbonas la informoj, ; Ne deziras mi la vivon, al mi tedas ĝiaj moroj," ; Tiel ŝi ĝemadis larme kaj elŝiris harajn flokojn.

'576 ' ' Diris mi: "Vin kial murdi? Mi ne vidas vian kulpon. ; Restas mia sola devo – trovi la perditan sunon, ; Kaj mi serĉos ĉiuloke de la nordo ĝis la sudo." ; Mia koro iĝis ŝtono kaj mi dronis en obskuro.

'577 ' ' Malfeliĉo min deprimis, tuta korpo febre tremis, ; Tamen mi al koro diris: "Vivu, vi ne devas sveni, ; Nun necese estas vagi kaj sencese ĉie serĉi. ; Por amikoj prui sian fidelecon tempo venis".

'578 ' ' Mi pretigis min forrajdi, baldaŭ sidis sur ĉevalo; Cent kaj sesdek militistojn prenis mi por akompano, ; Ni forlasis la fortreson kaj rapidis al la maro, ; Ĉe la bord' boaton trovis kaj komencis la serĉadon.

'579 ' ' En boaton mi sidiĝis kaj lamaron fornavigis; Ĉiun ŝipon mi esploris – eble la virinon vidis. ; Demandado estis vana, ĉar neniu ion scias. ; Ŝajne dio min forlasis – mi en malesper' meditis.

'580 ' ' Ni navigis tutan jaron, vidis marojn, oceanojn, ; Sed neniu pri l'virino donis ian informadon, ; Malfacilaj estis vojoj, mortis ĉiuj kunirantoj, ; Tamen ne akuzis dion, mi amanto kaj serĉanto.

'581 ' ' Albordiĝis poste laca kaj neniun pli mi havas, ; Sovaĝiĝis mia koro, tutan mondon mi malŝatas. ; Kvankam mi nun restis sola, sed ne venis tago lasta, ; Sed de ĉiuj ofenditan homon dio ne forlasas.

'582 ' ' Nur Asmat' kaj du servistoj restis ĉi dum nigraj tagoj, ; Ili donis la konsilojn, estis ankaŭ konsolantoj. ; Pri Nestan' ĝis nun mi aŭdis do nenian paroladon, ; Por mi ĝojo unusola restis nur amaraj larmoj".

, & Renkonto de Taniel' kun Nuradin-Pridon' :

'583 ' ' Rajdis mi dum tuta nokto kaj ekvidis mi ĝardenon, ; Proksimiĝis ni al urbo, vidis rokojn kun kavernoj. ; Volis mi eviti homojn – fajro brulis en interno, ; Kaj decidis mi ripozi sub arbegoj en la herbo.

'584 ' ' Sub la arbo mi dormetis, sklavoĵ mangis krudan panon, ; Poste mi leviĝis, sentis en la koro nur malvarmon, ; Jam trapasis multa tempo, mi ne havis informadon, ; Larmoj fluis el okuloj kaj priverŝis ili kampon.

'585 ' ' Foran krion mi ekaŭdis kaj ekvidis kavaliron. ; Laŭ la bordo de la maro rajdis nekonata viro; La vizaĝo lia sangis, ŝajne havis li konflikton, ; Li insultis kaj minacis nevidatan malamikon.

'586 ' ' Li posedis la ĉevalon, kiun vi ĉe mi nun vidas, ; Kaj galopis li kolera, kiel uragan' rapida. ; Per servisto al li estis mia peto transdonita: ; "Haltu kaj konfide diru, kial vi do ĉagreniĝas".

'587 ' ' Ne respondis li al sklavo, ne eldiris eĉ la vorton; Tiam mi sur la ĉevalo forrapidis al renkonto. ; "Haltu!" diris mi mallaŭte, "Volus mi interparolon", ; Li rigardis min, kaj haltis, tiel montris li favoron.

'588 ' Diris li: "Ĉu ne edeno elkreskigis tian arbon?"; Povas mi al vi rakonti kaj konfidi mian plagon. ; Miris mi, ke kontraŭ tigro la kaprinoj levis manon, ; Ili lerte min atakis – ne armitan, sen la glavo".

'589 ' Mi konsilis: "Trankviliĝu, ni ripozu ĉe ĝardeno, ; Ne evitas vera viro la militon en la regno". ; Mi kuniris kaj parolis amikece, sen kverelo, ; Sur vizaĝo lia legis mi konsenton kaj esperon.

'590 ' Mia sklavo – kuracisto ĉi rilate helpi povis, ; Li el vundoj sagojn tiris, do la vund' pli ne doloris; Mi demandis la vundinton, kiu estis, kion volis, ; Li konsentis diri ion, sed antaŭe multe ploris.

'591 ' Li respondis: "Mi mem volus scii vian historion, ; Kial velkis vi – la poplo*, kial faris sorto tion? ; Estis via rozo* bela, sed nun kovris ĝin glacio, ; La kandelon ekbruligis kaj ĝin estingis dio.

'592 ' ' Jen proksimas Mulgazanzar*, de ĉefurbo mia rando; Nuradin-Pridon' nomiĝas mi kaj estas ĉi reganto. ; Mi ja vidas – malfeliĉo gvidas vin en mian landon, ; Ĝi ne estas vasta, tamen belas la ĝardenoj, kampoj.

'593 ' ' Patro mia kaj la onkloj la proprajon ĉi posedis, ; Post la morto de la avo ĉi insulon mi heredis. ; Onklo ĝin perforte prenis, la kverelon ni komencis, ; Lokojn por ĉasadoj taŭgajn mi ne donis, li forprenis.

'594 ' ' Mi hodiaŭ bone ĉasis inter maro kaj rivero, ; Tamen logis min kaj tentis ankaŭ la insula tero, ; Sekvantaron mi restigis ĉi atendi ĝis vespero, ; Prenis mi nur kvin falkistojn kaj ignoris la danĝeron.

'595 ' ' Per boato transnavigis mi malgrandan markoleton, ; Sciis – tie regas onklo, sed ne timis bataleton, ; Mi ĉasadis tie birdojn, ĝoje kriis en impeto, ; Vane kriis mi ĉi tie, ĉie regis la kvieto.

'596 ' ' Sed okazis, ke la kuzojn la veninto kolerigis, ; Per boatoj ili kaŝe la insulon alnavigis, ; Kaj kun siaj militistoj min ĉasantan ĉirkaŭigis; Poste ili min atakis, eĉ mortigi min deziris.

'597 ' ' Mi ekaŭdis venĝo-krion, vidis ekbrilintajn glavojn, ; Kaj mi hastis al boato, rebatante atakantojn. ; Mi ordonis reen remi, akompanis min la sagoj, ; Kaj feliĉe – ne trapikis mian koron akraj lancoj.

'598 ' ' Tamen min la malamikoj en boato persekutis; Sed mi montris la fortecon, multajn atakintojn murdis, ; Jen la sagoj elĉerpiĝis, la rompita glavo kurtis, ; Kaj persekutanta aro min ne lasis, ne forkuris.

'599 ' ' Min ĉirkaŭis la parencoj, vidis mi, ke venis fino, ; Kun ĉevalo mi elsaltis el malgranda nia ŝipo, ; Mi transnaĝis la markolon, ne fariĝis mi viktimo, ; Persekutis min fiuloj – ilin murdas mi sen timo.

'600 ' ' Ne akuzas mi neniun, do plenumos veron sorto, ; Kaj mi ĵuras ilin puni – fiajn kuzojn, ankaŭ onklon. ; Ili spertos mian venĝon kaj eksentos mian forton, ; Baldaŭ korvoj kaj kornikoj manĝos do iliajn korpojn".

'601 ' Nuradin al mi ekplaĉis, li konkeris mian koron, ; Kaj amike mi lin petis: "Ne rapidu, kara homo, ; Estos mi helpanto via, trovos ili sian tombon, ; Tremos ili antaŭ reĝo kaj agnoskos vian povon.

'602 ' ' Mian vivon vi ne scias, ĉion poste mi rakontos, ; Mi detale ĉion diros, kiam pli da tempo trovos". ; Li respondis: "Frato mia, estas ĝoja la rakonto, ; Servos mi al vi fidela, por ĉiamo, ĝis la morto".

'603 ' La kastelon mi atingis, lian helan kaj malgrandan, ; Liaj homoj lin salutis – la renkonto estis varma, ; Pro kompatio ploris ĉiu, en la vundoj lin vidanta, ; Tamen ĝojo de popolo estis granda kaj altgrada.

'604 ' Ni al ili plaĉis multe, oni nomis min "La suno"; Kaj gasteme al mi sendis la gratulon kaj saluton; Urbon vidis mi tre riĉan, vidis multe da eburo, ; Vidis bonvestitajn homojn per la silko kaj veluro".

,& Tariel' helpas al Pridon':

'605 "Al Pridon' revenis fortoj kaj li povis jam militi, ; Jam kolektis la armeon kaj ŝiparon li ekipis; Kun envio ĉiuj homoj lian belstaturon vidis. ; Mi rakontos nun mallonge kiel kuzojn li subigis.

'606 ' Malamikoj ankaŭ pretis kaj surmetis kaskojn ferajn, ; Mi ekvidis ok boatojn, ĉiuj estis homoplenaj, ; Ili amikece remis, sed ni ankaŭ estis spertaj, ; Jen renversis mi boaton, dronis homoj militemaj.

'607 ' Mi la poŭpon jen atingis, kaptis duan do boaton, ; Ĝin renversis kaj dronigis, ne sentante la kompaton, ; La restintaj en paniko fuĝis en liberan maron; Ĉiu miris kaj laŭdegis mian forton kaj aŭdacon.

'608 ' La insulon mi atingis kaj sur firma tero paŝis, ; La batalo estis arda, Nuradin-Pridon' aŭdacis, ; Sur la tero estis tigro, en la maro ŝarke naĝis, ; La leono, sun', platano – li al mi multege plaĉis.

'609 ' Li persone onklojn, kuzojn de ĉevaloj terenĵetis, ; Kaj de ĉiuj brakojn hakis, povraj la kripluloj restis, ; Li kunligis la parencojn kaj en kaptitecon prenis, ; Malamiko ploris multe, sed amiko gaja estis.

'610 ' Fuĝis ĉien kaj sin kaŝis time malamikaj trupoj, ; Sen oferoj ni alrajdis, ekposedis ankaŭ urbon, ; Se rezistis iu – restis tiu kun rompitaĵ kruroj; La trofeoj estis grandaj – diamantoj kaj eburoj.

'611 ' Kaj Pridon' sigelis ĉiujn trezorejojn de la urbo, ; Venĝis li al la parencoj, kiuj estis avaruloj, ; Verŝis sangon malamikan, faris grandan li detruon, ; Kaj pri mi parolis jene: "Dio sendis vin – fortulon."

'612 ' Poste ni revenis urben, tie ĝoj-aklamon aŭdis, ; Kaj popolo la venkintojn salutante multe laŭdis, ; Volis ĉiu min ekvidi, festo sur la strato daŭris, ; Homoj gloris min sincere kaj dankeme min aplaŭdis.

'613 ' Pridon' estis gastiganto – liaj trupoj lin salutis, ; Kiel reĝon de la reĝoj min rigardis, multe bruis. ; Al la sklavoĵ miaj ili superecon atribuis. ; Ne ridetis mi, ĉar tie rememoroj min forbrulis."

, & Rakonto de Pridon' pri Nestan-Dareĝan':

'614 "Kun Pridon' mi unufoje ĉasis tie ĉe marbordo; Ni leviĝis sur monteton, por ekvidi ŝaŭmajn ondojn, ; Kaj Pridon' subite diris: "Se vi volos, mi rakontos, ; Kian strangan okazaĵon mi observis de ĉi-monto.

'615 ' ' Mi alrajdis kaj ekaŭdis – estis tio la sensaco; Foje al ĉi tiu loko min alportis la pegaso; Ĝi surtere flugis falke, naĝis kiel la anaso; De ĉi tie mi observis – milvo ŝvebis en la spaco.

'616 ' ' Vidis mi – sur maro flosis io viva aŭ neviva, ; Sed ne povis mi diveni – estis ĝi tre malproksima. ; Rekte al la bordo naĝis la estaĵo nevidita, ; Mi ne sciis, kio estis tiu aĵo tre enigma.

'617 ' ' Mi konjektis – eble birdo, eble naĝis iu besto, ; Pli proksime mi ekvidis – en boato estis kesto; Du nigruloj la boaton albordigis kaj per peno, ; En la kesto junknabino sidis de mirinda belo.

'618 ' ' Mi rimarkis, ke la negroj estis nigraj kiel gudro; Albordiĝis la boato kaj eliris du fortuloj, ; Elirigis la virinon, ŝi blindigis kiel suno, ; Havis densan harplektaĵon kaj diinan la staturon.

'619 ' ' Mi ekĝojis kaj ekflamis, negrojn vivajn kapti volis, ; Ekvidinte belulinon, ne ekami mi ne povis; Estis vere ŝi la rozo, neĝo ĝin neniam kovris, ; Mi ataki ilin volis, tion virin' ja valoris.

'620 ' ' Rekte al la alvenintoj la ĉevalon mi direktis, ; Tamen ili min vidante, en boaton tuj revenis, ; De la bordo sin forpuŝis en la maron kaj ekvelis; Brulis mi, sed sur la bordo sola restis kaj ĉagrenis".

'621 ' Ekaŭdinte tiujn vortojn, mi fariĝis frenezulo, ; Saltis mi de la ĉevalo, pugnofrapis mian bruston, ; Sango fluis de vizaĝo, mi ĝin gratis per la ungoj ; Kaj ekkriis: "Min mortigu – faris mi de ĉi konkludon".

'622 ' Al Pridon' tre stranga ŝajnis, kion mi ĉagrene faris, ; Kaj bedaŭris multe reĝo, mem ne sciis, kiel agis, ; De okuloj brilaj perloj sur la teron multe falis, ; Kiel filon min konsolis, kiel frato akompanis.

'623 ' "Ho, ĉagreno!" li ekkriis – "Kion faris mi – stultulo!" ; Mi respondis: "Ne bedaŭru, mi malsanas de ambrulo; Mia estis tiu luno, sciu bone, fratiĝulo, ; Al vi mi rakontos ĉion, do aŭskultu vi kunulon".

'624 ' Kaj sincere mi rakontis tutan mian historion; Li respondis: "Mi eraris, tamen mi ne havis scion, ; Ke vi estas reĝ' de reĝoj en Hindio, en patrio, ; Vin atendas krono, trono, gloro, ŝtato, familio.

'625 ' ' Dio kreis la feliĉon kaj al ni alsendas bonon, ; Li komence al la koro mem almetas akran dornon, ; Poste sendas grandanime sian bonon kaj favoron, ; Trankviligas la animon kaj forprenas la doloron".

'626 ' Al Pridon' mi diris jene, kiam urben ni revenis: ; "Vi, amiko unusola, plej fidela tie estis, ; Kaj ĝis nun al vi similan homon dio ne alsendis, ; Mi retrovis la esperon, ĉar la spuron ŝian sentis.

'627 ' ' Restos mi amiko via, ne portempa, sed por ĉiam, ; Al mi donu vi konsilon, kamarado estas vi jam. ; Kion fari, kien devus mi daŭrigi vojon migran? ; Se mi ŝin ne liberigos, vana estos vivo mia".

'628 ' Kaj Pridon' al miaj vortoj kun sincero jen respondis: ; "Vi, reganto de Hindio, per vizito min honoris, ; Kion de ŝanĝema sorto povus mi ankoraŭ voli? ; Kiel sklavo mi ĉi staras, por konsilon al vi doni.

'629 ' ' Tra haveno nia iras vojoj de la negocistoj, ; Ni novaĵojn ĉiujn scias, ĉar babilas la vendistoj, ; Eble fine vi ekscios, kie estas la rabistoj, ; Kaj al vi donacos dio kuracilon de la tristo.

'630 ' ' Ni dissendos boatistojn, multajn skoltojn en havenon, ; Kaj ordonos demandadi kaj trovi vian gemon; Restu dume vi ĉi tie havas de mi vi subtenon, ; Kiam ĝojo nin atingas, tuj foriĝas malkompreno".

'631 ' Al la homoj kunvokitaj la ordonon donis mastro: ; "Ĉien al vastegaj maroj vi navigu sen prokrasto, ; Serĉu, trovu belulinon de amata nia gasto, ; Cent tempestojn ne ektimu kaj plenumu vian taskon.

'632 ' ' Eksciinte ion novan, ne prokrastu kun reveno". ; Homoj de Pridon' vizitis ĉiun foran marhavenon; Certe, estis mi feliĉa, sentis lian mi subtenon, ; Mi atendis pacience – renaskiĝis la espero.

'633 ' Kaj Pridon' starigi tronon poste donis la ordonon; Diris li: "Pro forgesemo devas peti mi pardonon – ; Vi ja estas granda reĝo, do bezonas vi la tronon, ; Ke ĉi antaŭ via moŝto povu klini sin la homoj".

'634 ' Sed sufiĉas fanfaroni, jen revenis la senditoj, ; Ili vane sekcis ondojn, vojis ekster landaj limoj, ; Sed neniun spuron trovis de serĉata reĝidino, ; Do denove larmoj fluis kaj plorad' ne havis finon.

'635 ' Al Pridon' mi tiam diris: "Jen la tago plej terura. ; Atestanto estas dio, ke sen ŝi eĉ tago suna ; Al mi ŝajnas frida nokto, senespera kaj obskura; Malespero kaj malĝojo ankaŭ fortojn forkonsumas.

'636 ' ' Mi ne havas la informojn, kia mar' Nestanon kaŝis, ; Lasu min ŝin pli serĉadi, vi por mi ja ĉion faris". ; Sed Pridon', aŭdinte tion la trankvilon plu ne havis, ; Ploris multe kaj lamentis: "Frato mia min malamamis".

'637 ' Multe ni interparolis, sed mi resti ne konsentis, ; "Ne foriru, restu tie" – liaj trupoj min petegis, ; Militistoj surgenue kisis min kaj plore ĝemis, ; Ili volis per la manoj de foriro min reten.

'638 ' Mi respondis: "Malfacile estas vin forlasi, kara, ; Sed sen amo, amatino, ĝojo mia estas vanta; Kaptitino mi ne lasos, la decido ŝajnas sankta, ; Mi ne restos frat', ĉi tie, kaj por helpo vin mi dankas".

'639 ' Kaj Pridon' dum adiaŭo, jen donacis la ĉevalon, ; Diris: "Vi ĝin prenu, reĝo, bela estas animalo, ; Ĝi fidele al vi servos, ne perfidos dum batalo, ; Helpos grimpi sur la monton, portos vin tra vasta valo".

'640 ' Poste min li akompanis, kaj ni ambaŭ ploris multe, ; Ni haltinte interkisis kaj disiĝis tiam urĝe, ; Trupoj de Pridon' ĉeestis kaj sincere ploris kune; Prema estis la disiĝo kaj ĉagrenis ni profunde.

'641 ' Post disiĝo kun la reĝo mi daŭrigis la serĉadon, ; Vidis multajn mi popolojn, multajn marojn kaj la landojn, ; De neniŭ mi ricevis eĉ malgrandan informadon, ; Iĝis koro kiel ŝtono pro ĉagren' kaj ama ardo.

'642 ' Mi decidis plu ne migri kaj ne multe vagabondi, ; Pensis: "Eble inter bestoj povus mi trankvilon trovi, ; Al Asmat' kaj al servistoj en deprimi mi parolis: ; "Mi vin puŝis en mizero, kvankam tion mi ne volis.

'643 ' ' Nun forlasu min kaj zorgu nur pri via propra vivo, ; Ne atentu miajn larmojn, kiujn kaŭzas la deprimi." ; Tamen ili kune diris: "Ĉu vi perdis jam konfidon? ; Tiaj vortoj dolorigis niajn koron kaj animon.

'644 ' ' Ĉar krom vi ni ne bezonas la alian protektanton, ; Polvo de ĉevalaj hufoj viaj estas diamantoj, ; Do ni volas vin rigardi kiel belan bonfaranton, ; Tia fideleco pruvas, ke la viv' ne estas vanto".

'645 ' Ekaŭdinte tiajn vortojn mi ne povis ilin peli, ; Tamen ni forlasis lokojn, kiujn homo ofte tretis, ; En montaro izolita la loĝejon mi elektis, ; Kie cervoj kaj kaprinoj la najbaroj miaj estis.

'646 ' Trovis mi kavernon, kiun faris Devoj – la gigantoj, ; Devoj estas duonhomoj, kiuj loĝas en arbaroj. ; Ni atakis ilin urĝe kaj mortigis per la glavoj, ; Sed pereis en la lukto miaj sklavoj kaj servantoj.

'647 ' Do ekloĝis mi ĉi tie en kaverno akirita, ; Kiam helas la konscio – mi sur kampoj sole migras; Nur Asmat' per siaj zorgoj mian sorton faciligas; Tiel, morton atendante, mi ĝis nun apenaŭ vidas.

'648 ' Portas mi tigrinan felon, mi ĝin eble tial ŝatas, ; Ke Nestan' aspekton tian de tigrino ŝajne havas; Kaj Asmat' la veston kudras, min prizorgas – ne forlasas, ; Certe ŝi min – frenezulon, de la sinmortigo savas.

'649 ' Ne priskribos ŝian belon nek saĝulo, nek poeto, ; Do perdinte ŝin, ne povas, mi forgesi la suneton, ; Loĝas mi en sovaĝejo kaj fariĝis mem la besto, ; Ke alsendu dio morton – estas unusola peto."

'650 Per la pugno la vizaĝon batis malfeliĉa viro, ; Roz' flaviĝis kaj rubenoj iĝis pala simpla vitro; Avtandil' nun ankaŭ ploris, perdis sian li klarvidon, ; Poste Asmat' trankviligis malfeliĉan ternaskiton.

'651 "Avtandil', amiko mia, tia estas historio, ; Mi al vi rakontis ĉion – de komenco ĝis la fino, ; Povas vi reveni hejmen kaj revidi sunreĝinon, ; Vin sopiras via amo, vin atendas Arabio".

'652 Avtandil' al li respondis, ke ne volas li rapidi: ; "Mi ne estos ja feliĉa, se ne povos vin revidi; Min pardonu pro aŭdaco, tamen volas mi aldiri – ; Ja mortinta vi ne povos ŝian sorton faciligi.

'653 ' Kuracisto se malsanas, se li estas la plej fama, ; Li al si alian vokas, ke lin tiu faru sana, ; La rakonto pri malsano devas esti senerara, ; La konsil' de aliulo pli utilas se ne vana.

'654 ' Saĝa hom' centfoje pensas, nur stultulo unufoje, ; Per la homo ekscitema, multo ne finiĝas ĝoje. ; Ja ne povas tiu gajni, kiu sin turmentas plore. ; Dume devas mi foriri – mia sun' atendas longe.

'655 ' Volas mi revidi amon, plifortigi la esperon, ; Kaj pri vi rakonti ĉion, pri la am' kaj suno – perdo; Tamen vi ĉi tie sidu, mi revenos ja en vero, ; Ĵuras mi – ni estos kune en la ĝojo kaj sufero.

'656 ' De ĉi tie ne foriri donu al mi vi la vorton, ; Kaj mi ankaŭ tenos vorton kun sindono kaj honoro. ; Mi por vi oferos ĉion, eĉ la vivon kaj adoron, ; Agos kiel dio volus, ne permesos vian ploron".

'657 Tariel' respondis: "Kredas mi al vi, fidela frato, ; Kiel roz' de najtingalo, ni disiĝos sen kompatio. ; Vin forgesi mi ne povos, restas via mi ŝuldanto, ; Dio, donu la eblecon, vin revidi eden-planton.

'658 ' Kiam vi al mi revenos – estos la plej ĝoja tago, ; Kaj finiĝos en kamparo vana kaj sencela vago. ; Se mi rompos mian ĵuron – trafu min plej granda plago. ; Reveninte, vi forgesos la ĉagrenon, malbonagon".

'659 Kavaliroj ĵuris sankte, servi al la amikeco; Bele ruĝis la rubenoj, ambaŭ lumis de juneco. ; Unu la alian amis, ambaŭ plenis de impresoj, ; Tutan nokton do ne ĉesis la paroloj kaj konfesoj.

'660 Nokto pasis tre rapide – malaperis jen krepusko; Avtandil' amikon kisis kaj ekploris ĉe la brusto; Ankaŭ Tariel' malĝojis – perdis senson de la ĝusto. ; Tiel Avtandil' forrajdis kaj lin kaŝis la arbustoj.

'661 Nur Asmat' la forrajdanton akompanis kun aflikto, ; Ŝi petegis ne forgesi kaj reveni al amiko, ; La virino ploris multe, kriis kiel en paniko, ; Li promesis: "Mi revidos homon de tiu tragiko.

'662 ' Mi revenos sen prokrasto. Vi nur zorgu, ke la frato ; Ne ekpensu ŝanĝi lokon, nek forrajdu al vagado. ; Pacience min atendu tie ĉi dum du monatoj. ; Se ne venos mi, do sciu – trafis min malbona fato".

,& Reveno de Avtandil' al Arabio:

'663 Avtandil' forrajdis triste, koron premis la ĉagreno, ; La vizaĝon li gratvundis, sango gutis sur la teron; Tutan vojon tiun sangon lekis la sekvantaj bestoj, ; Kaj ĉevalo flugis tiel, kvazaŭ portis ĝin la vento.

'664 Jen li vidas siajn trupojn kaj la lokojn, kiujn lasis, ; Lin vidante, ĉiu ridis kaj salute lin aklamis, ; Tuj al Ŝermadin' rapidis kaj raporton ili faris, ; Diris: "Venis tiu homo, kiu longan tempon vagis".

'665 Riverencoj, ĉirkaŭprenoj, kisoj, poste ĝojaj larmoj, ; La manpremoj fortaj, gajaj, plenaj de kortuŝa varmo; Dank' al dio, ke ne sonĝo jen aperis en rigardo. ; Ŝermadin' feliĉa estis, viŝis la malsekajn vangojn.

'666 La junulo estis gaja pro sincera sindoneco, ; Ĉiujn li salutis kore, gloris dion pro potenco, ; Nobelaro lin trakisis kaj promesis fidelecon, ; Ĉie regis granda ĝojo – forgesinte universon.

'667 Iris ili al palaco, kiu staris ĉe la monto, ; Kaj vizitis lin urbanoj, volis vidi lin la homoj; Senprokraste li sidiĝis, por festeni kun la pompo, ; Lingvo estas tro malriĉa, por priskribi lian ĝojon.

'668 Li al Ŝermadin' rakontis ĉion, kion tie vidis, ; Kiel trovis kavaliron, kion tiu ĉi travivis. ; Memorante lin, li ploris kaj la larmojn ne haltigis, ; "Mi sen li ne vidis ĝojon" – Avtandil' malgaje diris.

'669 Poste Ŝermadin' al mastro mem rakontis la novaĵojn: ; "La foreston laŭ ordono mi konservis en la kaŝo". ; Avtandil' festenis tie kaj ripozis tutan tagon, ; Sed matene sur ĉevalo li komencis la vojaĝon.

'670 Li trankvile lasis tie sian propran citadelon, ; Ĉar ne volis li daŭrigi kun amikoj la festenon; Ŝermadin' antaŭe rajdis – li anoncis la revenon; Avtandil' rapidis vidi sian sunon, indiĝenojn.

'671 Li vasalon sian sendis al la reĝo kun raporto: ; "Vi, fiera feliĉulo, mi alportas bonan vorton, ; Mi ekvidis tiun, kiu ploris sole ĉe la fonto, ; Kaj rakontos al vi ĝoje, ke plenumis mi ordonon".

'672 Ŝermadin' ankoraŭ diris, plenuminte komision: ; "Vi atendu, reĝa moŝto, mem li diros al vi ĉion," ; Kaj feliĉa reĝ' respondis, ke li dankas altan dion, ; Ĉar li donis grandanime, kion preĝis la animo.

'673 Kaj al Tinatin' raportis Ŝermadin' pri kavaliro: ; "Avtandil' tuj sin prezentos, li meritas la admiron". ; Ekradiis suno brile, ĉar finiĝis la sopiro, ; Kaj ricevis la sendito belan veston kaj akiron.

'674 Rostevan' sur la ĉevalo al renkonto forrapidis; Sunvizaĝa kavaliro reĝan agon tre estimis; La veziroj, kavaliroj, nobelaro nun aliris, ; Inter ili estis tiuj, kiujn ĝojo ebriigis.

'675 Avtandil' deĉevaliĝis, riverence paŝon faris, ; Kisis lin la reĝo varme, ĉar spaspeton patre amis; Sur ĉevaloj nobelaro al palaco akompanis, ; La vizaĝojn de la homoj ĝojo kaj ridet' ornamis.

'676 La leono el leonoj sian sunon jen salutis, ; La kristalo, roz', giŝero sur vizaĝo bele ludis, ; Kaj reĝino sunradiis, kavaliron ŝi gratulis, ; Pro beleco kaj feliĉo la palaco sune lumis.

'677 Kaj aranĝis la festenon ili kun la regalado, ; Avtandil' kaj mem la reĝo sidis kiel filo – patro, ; Neĝ' al vintro, ros' al rozo – bele taŭgis la ornamo, ; Kaj disdonis ili perlojn kiel senvaloran draĥmon.

'678 Jen finiĝis la festeno kaj la gastoj hejmen iris, ; Nur la reĝ' kaj nobelaro ĉe la tabl' ankoraŭ sidis, ; Aŭskultante kun atento, kion Avtandil' travivis, ; Kiel strangan kavaliron li ektrovis kaj ekvidis.

'679 "Vi ne miru, se senĉese mi ĝemspiros dum rakonto. ; Nur al sun' egalas belo de l'vizaĝ' de tiu homo; Lin vidante kaj ravite, ĉiu perdas la memoron, ; Sed velkinta lia rozo tre suferas inter dornoj".

'680 Kiam mondo al la homo faras aĉan malutilon – ; Transformiĝas kan' en dornon, la kristalo en la vitron; Avtandil' kun larma roso rememoris renkontiton ; Kaj rakontis historion de Tariel' – turmentito.

'681 "De la Devoj li forprenis la kavernon en batalo, ; La virin' de l'amatino lin prizorgas kiel knabon, ; Mem li portas tigran felon, havas saman tigran ĉapon, ; Perdis tute li esperon kaj suferas ĉiun tagon".

'682 Aŭskultinte la rakonton, Tarielon ili sciis, ; Ke li personigis sunon, hindan tronon plibeligis; Gastoj restis tre kontentaj kaj al rakontinto diris: ; "Rava estas heroaĵo, grandan laŭdon li meritis".

'683 Do aŭdinte historion, gajis ankaŭ la reĝino; Avtandil' revenis hejmen, lin atendis la sklavinino. ; Diris : "Vin invitas suno, via kara amikino". ; Kaj feliĉa kavaliro dankis dion kaj destinon.

'684 Avtandil' kuraĝe iris, kor' de ĝojo estis plena; La leono sur la kampoj ĉiam vagas batalema, ; Kavaliro por la mondo ornamaĵo estas bela; Koro koron sentis bone, ĝi ne ŝajnis plu ribela.

'685 Tinatin' fiere sidis – suno de la universo, ; La sveltecon tian havis, kiel ĉe Eŭfrat' cipreso, ; Pri vizaĝa kristalvitro la poetoj verkus versojn; Nur saĝuloj de Ateno ŝin prilaudus kun sukceso.

'686 Kavaliron ŝi sidigis sur la seĝon vid-al-vide. ; Parolado iris gaje, tamen reĝe, altestime, ; Tinatin' demandis: "Diru, ĉu vi trovis lin finfine, ; La strangulon, kiun serĉis vi sindone kaj obstine?"

'687 Li respondis: "Kiam sorto por la homo bonon faras, ; La malbonon li forgesu kaj la tagon, kiu pasas; Mi renkontis viron – kvazaŭ la cipres' li ĉiun ravas, ; Estas bela kiel rozo, sed vizaĝon palan havas.

'688 ' Bela estas la cipreso, ĉar vizaĝon havis rozan, ; Tamen perdis li la forton kaj esperon vivodonan, ; Kiel min bruligas ankaŭ lin la fajro furioza". ; Kaj rakontis li denove historion senkonsolan.

'689 Li rakontis pri suferoj, kiujn spertis dum serĉado, ; Poste diris, kiel dio helpis trovi kamaradon: ; "Tariel' en mondo vidas efemeran kaj la vanton, ; Frenezulo vagas sole kiel besto en la kampo.

'690 ' Vi ne petu lin priskribi, estas vana la afero, ; Al vidinta lin ekplaĉos jam neniu sur la tero; Antaŭ li okuloj larmas kiel antaŭ sunapero, ; Sed ŝafranon el la rozo faris amo kaj sufero".

'691 Kaj rakontis li detale aventurojn kaj misterojn: ; "Kiel tigro li nun loĝas inter rokoj en kaverno, ; Akompanas lin virino, ŝi konsolas en mizero, ; Ho, destino, lin priplori devas ĉiu kun sincero".

'692 La virino finauskultis kaj komprenis ĉion bone, ; Ŝi heligis mondon tiel, kiel plena luno nokte, ; Diris: " Kiam kuracilon devas doni mi ĉi foje? ; Kiel mi lin povus helpi, se mi vivas aliloke?"

'693 Avtandil' respondis: "Viro devas teni sian vorton, ; Li por mi ja estas preta por bruligi propran korpon, ; Miaflanke, mi promesis ke ni havos la renkonton, ; Se mi ĵuron ne plenumos – prenu min do dia tondro.

'694 ' La amiko por amiko estas ĉio en la mondo, ; Koron por la kor' fordonas, amo devas esti ponto, ; Por miĝnur' miĝnuro estas de kunsent' vigliga fonto. ; Sen ĝi ĝojo – la malĝojo kaj gajeco nur la morto".

'695 Lia sun' al li respondis: "La sukceso estas granda, ; Vi, unue, ne perdiĝis, kaj amikon trovis karan, ; Due, amo plifortiĝis, kaj fariĝis ĝi pli arda; Ankaŭ mia kor' flamanta nun kuracbalzamon havas.

'696 ' Fato ŝanĝos homan sorton same kiel la vetero – ; Jen ĉielo sune brilas, jen ĝi tondras en kolero – ; Ĝis hodiaŭ mi suferis, nun foriris la danĝero. ; Kiam mondo gaje ridas, malaperu la infero.

'697 ' Havas vi tre bonan econ – teni kavaliran vorton, ; Se amiko ne fidelas, lian kapon kovras honto. ; Vi al li sindone helpas kaj ja kuracilon trovos, ; Tamen kiel mi sen suno en soleco vivi povos?"

'698 Avtandil' al tiuj vortoj la respondon saĝan trovas: ; "Apud vi al sep angoroj nun la okan mi aldonas: ; La glacio ne varmiĝas, kiam oni sur ĝi blovas; Senutilas kisi sunon, se ĝin havi hom' ne povas.

'699 ' Malfacile kaj sen ĝojo mi sur kampoj vagabondis, ; Amaj sagoj mian koron senkomplete trae boris, ; Miaj jaroj mallongiĝis, dio nur trionon donis; Kaŝi volis mi turmentojn, sed ĉu tie iun trompis?

'700 ' Mi aŭskultis tre atente vian dolĉan paroladon, ; Rozo en la dornoj kreskas, netuŝebla estas planto; Se vi kiel suno brilas, donu al mi sunan flamon, ; Iun signon vi donacu, por esperi pri la amo".

'701 Elokventa, digna estis bonfarinta kavaliro, ; Edukista lia vorto estis vera panegiro; Kaj ŝi donis la donacon – tio estis la safiro; Ili ambaŭ havis ĝojon – plimultigu ĝin, ho dio!

'702 Dolĉe estas, kiam homo havas la bonegan distron, ; La okuloj de giŝero, kiam vidas kristalvitron, ; Kiam en ĝardeno bela elkreskigas li plantidon, ; Sed amare estas, kiam viro perdas amatinon.

'703 Kaj ricevis la plezuron ili de rigardoj amaj; Poste Avtandil' foriris de disiĝo tre amara, ; Kaj denove sangaj larmoj gutis de vizaĝo pala; Diris li "De mia sango ĉu la mondo estas sata?"

'704 Do foriras kavaliro, sur la bruston pugne frapas, ; Pro la amo homo ploras, larme koron mola faras, ; Nubo kovras la ĉielon kaj sur teron ombro falas, ; La disiĝ' kun amatino al la sunsubir' egalas.

'705 Sange fluis liaj larmoj de okuloj sur la vango, ; Diris li: "La mondo nia pli signifas, ol gloramo, ; Tamen kial mian koron pikas senkompata sago? ; Ne vidante ŝin, ne vidus mi gajecon, helan tagon".

'706 "Tiu, kiu min kreskigis en edeno kiel arbon, ; Tiu sorto senkompate tranĉis min per akra sabro, ; Forbruligis min, kaptilo por la koro estis amo; Ĉiutagon mi komprenis – estas ĝi fabel' kaj vanto".

'707 Li priploris sian sorton, ĉar senfina estis tristo, ; El la brusto deprimita iris ĝemoj kaj ekspiroj, ; Ĉiam la disiĝon daŭran akompanas ja sopiro; Mondo nia senkompatas kaj severas la destino.

'708 Hejme trista kavaliro en la ĉambron fine venis, ; Kaj sendorman longan nokton nur pri Tinatin' li pensis; Kiel herbo sub la prujno li koloron tute perdis, ; Rozo bela en ĝardeno sen la suno baldaŭ velkis.

'709 "Homa koro malbenita – ĝi malsatas kaj avidas, ; Jen eltenas ĝi turmenton, jen denove gaje ridas, ; Ĝi ne taŭgas por mezuri, pro blindec' nenion vidas, ; Sed nek morto, nek reganto liberecon ĝian bridas".

'710 Lin inspiris tiaj vortoj, kiujn al si mem li diris, ; La donacon ŝian prenis kaj kun sento varma kisis, ; La safiron donacitan li sur ŝia mano vidis; Larmoj liaj la riveron Bison* multe pliriĝis.

'711 Frumatene li ricevis la inviton al ĉasado. ; Kvankam ne dorminte, tamen li foriris al palaco. ; En kortego kolektiĝis tie granda homamaso ; Kaj la reĝo sin pretigis rajdi ĉasi kun la gastoj.

'712 Rostevan' surĉevaliĝis, ĉie regis la soleno, ; Pro la bruoj de tamburoj tremis tie tuta tero, ; La vulturoj sunon kaŝis kaj la hundoj la densejon. ; Komenciĝis sangverŝado de la kaproj kaj la cervoj.

'713 Post ĉasado hejmeniris ĉiu gaja kaj kontenta, ; Ĉirkaŭ reĝo kolektiĝis nobelaro eminenta; Rostevan' en la palaco surtroniĝis jen majesta, ; Oni ludis sur la ĉango, daŭris la kantado festa.

'714 Rostevan' kaj kavaliro kune sidis kaj parolis, ; Inter lipoj kristalvitrojn kaj rubenojn ili montris, ; Nobelaro tie staris, ĉie la muzik' sonoritis, ; Nomo – "Tariel" senĉese dum festeno tie sonis.

'715 Avtandil' revenis trista, el okuloj falis larmoj, ; Estis laca, ekscitita, li nur vidis sian amon, ; Jen leviĝis, jen kuŝiĝis, jen li sentis la tremadon, ; Tamen dormo ne forpelis da malgajaj pensoj svarmon.

'716 Kuŝis kaj meditis viro : "Kion donos mi al koro? ; Mi foriris, sola restis, vana estis la adoro, ; Mi ne vidas ĉarmulinon, do min premas la angoro. ; Ho, se vidus mi en sonĝo amatinon – edenfloron".

'717 Tiel ploris kavaliro, ne forlasis lin la pensoj; Li komprenis – por la koro tre necesas pacienco; Se ne pacienci, tiam ĉu la vivo havas sencon? ; Se eltenos ni mizeron – feliĉegos providenco.

'718 Kaj denove li ripetis: "Koro, vivo estas dramo, ; Sed preferas mi ne morti, ne forbruli en la flamo, ; Kaŝi koran sentimenton ne portempe – por ĉiam; Por miĝnur' ne decas montri al la homoj sian amon".

, & Avtandil' petas veziron ricevi la permeson de Rostevan' por foriro:

'719 Mateniĝis, kavaliro sur ĉevalon tuj eksidis, ; Kaŝi sian ardan amon la junulo nun decidis, ; Li instruis koron sian: "Devas ĉion vi atingi". ; Al veziro sin direktis, kiun li ekvolis vidi.

'720 Jen veziro lin renkontas: "Venis suna mia gasto; Ĉiuj signoj ja atestas – dio sendas ne fiaskon". ; Gaston li akceptis varme kaj kortuŝe sen prokrasto, ; Dezirebla estas gasto, ĉiam li ĝojigas mastron.

'721 Al la gasto helpis mastro de ĉevalo lerte salti, ; De pordego ĝis la domo oni tapiŝ-padon faris; Kavaliro lumigis domon, lin veziro akompanis, ; Oni diris: "Rozo venis kaj ni rozodoron flaris".

'722 Li sidiĝis kaj admiris ekvidintaj lin okuloj, ; Nur ĝemspiris el profundo rigardantoj al la luno; Homoj, certe, volis resti kaj paroli kun belulo, ; Sed foriri ili devis – tia estis la postulo.

'723 Kiam gastoj jen foriris, Avtandil' al mastro diras: ; "Vin la reĝo tre estimas, ĉion ĉiam vi atingas; Estas vi unua homo – kun la reĝo vi amikas, ; Sciu, kio min turmentas kaj senĉese pereigas".

'724 "Mi suferas, ĉar ne vidas malproksiman mian fraton, ; Volas mi renkonton havi, sed al mi malhelpas fato; Li senfine min adoras kaj mi sentas lian varmon, ; Reciproke devas ami mi fidelan kamaradon."

'725 "Lin revidi estas mia korinklino kaj kompreno, ; Pri li pensas mi senĉese – ĉiun nokton kaj matenon, ; Dio kreis kiel sunon – lin belulon, Tarielon, ; Bona estas fratin' lia – la virin' sen diademo".

'726 "Dum disiĝo mi promesis vidi lin post kurta tempo, ; Frate diris, ke mi venos kaj heligos la tenebron, ; Ĵuris mi: "Por vi mi trovos la virinon kun la peno; Estas tempo jam foriri kaj plenumi mian devon".

'727 "Tutan veron mi rakontos, fanfarono estas fia; Li atendas kaj li scias – mi ne estas hom' perfida. ; Min devigas amikeco, sankta estas ĵuro mia; Ĵurrompul' neniam venkas, ĉar sukceson li ne indas".

'728 "Mi vin petas diri tion al la bona reĝo nia; Vi veziro estas saĝa kaj komprenas devon mian, ; Se permeson donos reĝo, estas preta iri mi jam; Helpu al mi, ĉar mi volas kamaradon trovi vivan".

'729 "Vi raportu: "Reĝa moŝto, gloras vin la terloĝantoj; Dio scias, mi ne povas tion diri sen tremado. ; Avtandil' senĉese pensas pri junulo, suferado, ; Li konkeris lian koron, la spaspet' ne vidas savon".

'730 "Reĝo, sen tigrافلulo – mia vivo senvaloras, ; Mia koro kun li batas kaj mi al li helpi volas, ; Helpo ĉiam estas nobla, ĝi unue reĝon gloras, ; Lasu dion mem decidi, ĉu mi resti viva povas".

'731 "Kaj por vi foriro lia ja ne kaŭzas malfeliĉon; Tio estas sankta ĵuro, nek frivolo, nek kaprico. ; Dio sendu al vi venkon, se plenumos vi kondiĉon ; Avtandilon nun forlasi, kvankam havas li oficon".

'732 "Mi al vi rakontos ĉion, altestima vi – veziro, ; Vi rapidu vidi reĝon kaj transdonu la deziron, ; Petu lin, min ne malhelpi kaj permesi la foriron. ; Vi centmil monerojn prenu, kiel mian dankesprimon".

'733 Ridetinte mastro diris : "Vi reprenu ormonerojn, ; Ja al mi sufiĉas tute, la konfido kaj sincero, ; Ĉar la reĝo eksciinte, kia estas la afero, ; Mem donacos al mi oron, ĉu ne estas tio vero?"

'734 "Ĵuras mi per kapo lia – reĝo murdos min, valetan, ; Ĉe vi restos via oro, min turmentas antaŭsento, ; Pagos mi per vivo mia dum vizito kaj akcepto, ; Do ne diros mi al reĝo vian tre aŭdacan peton".

'735 "Kial devas mi la vivon oferedoni por moneroj? ; Reĝo murdos min kaj diros: "Vi meritas la inferon." ; Ĉu mi agas kiel homo, kiu perdis la esperon? ; Mi preferas esti viva, diras mi nur puran veron".

'736 "Se mi reĝo vin forlasos, ĉu simile faros trupoj? ; Ĉu konsentos ili resti sen gvidanto, sen instruo? ; Tiam niaj malamikoj volus montri akrajn ungojn, ; Sed neniam transformiĝos la paseroj en vulturojn".

'737 Kavaliro nun ekploris kaj ĉagrene poste diris: ; "Vi ne scias amon tute, kaj mi devas ĝin klarigi. ; Eble vi neniam ĵuris, kun neniu ekamikis. ; Se vi spertis tion, diru, ĉu sen li mi povas vivi?"

'738 "Suno de ni jam turniĝos – tian havas ĝi naturon, ; Se ni helpos al la suno, ja foriros la obskuro, ; Nur mi mem bonege scias, kiu kaŭzas la torturon. ; Parolado kun fihomoj ja ne donas la plezuron".

'739 "Kiel povas reĝon helpi mi kun miaj amaj streboj? ; Niaj trupoj kaj la reĝo ne komprenos mian revon, ; Do pli bone estos iri kaj plenumi ĵuro – devon, ; Fideleco al la frato restos celo kaj espero".

'740 "Nun, veziro, ne konsentas mi kun via konsidero. ; Se en mia loko estus, en la vakson iĝus fero. ; Mi ne povus rekompenci liajn larmojn kaj suferon, ; Eĉ se fluus el okuloj ondoj de Geon*-rivero".

'741 "Sen permeso mi forkuros, rompos tradicion, moron, ; Mi ekvidos kamaradon kaj kuniĝos kor' kun koro, ; Scias mi, ke vin ne punos Rostevan' dum malhumoro, ; Lasu lin koleri multe, sed al mi ne faros bonon".

'742 La veziro diris:"Same via flamo min doloras, ; Malfacile estas vidi, kiel kavaliro ploras; Iufoje vort' damaĝas, iufoje belsonoras, ; Vidas mi, ke mia suno vian vivon lumi povas".

'743 Kiam la veziro finis sian saĝan paroladon, ; Por ekvidi Rostevanon li alvenis la palacon; La monark' sur trono sidis, brilis kiel dum parado, ; La veziro antaŭ reĝo perdis la parolkapablon.

'744 Kaj rimarkis reĝo ĝuste de vezir' malbonhumoron, ; Li demandis maltrankvile: "Kion volas vi, sinjoro?" ; La vezir' respondis time: "Gravan sentas mi doloron, ; Vi min punos, reĝa moŝto, ĉar al vi ne plaĉas vorto".

'745 "La ĉagreno estas granda"; diris triste la veziro, ; "Timas mi, sed mi nun venis por transdoni tian diron: ; Avtandil' – spaspeto nia, jen esprimis la deziron ; Rajdi por revidi tiun tigrefelan kavaliron".

'746 Kaj kun timo li rakontis, kion petis la spaspeto; Li daŭrigis: "Laŭ rakonto vi imaĝos la impeton, ; Kiel Avtandil' ĉagrenas, kian sentas li turmenton. ; Nun vi pravos, se min trafos via pun' por malprudento"

'747 Aŭskultinte la raporton, reĝ' paliĝis kaj ekstremis, ; Ŝajne li suferis multe, la rakonto lin turmentis: ; "Vi, malsaĝa kuraĝulo, kiel tion vi intencis? ; Fia homo ĉiam hastas al fiaĵo sin direkti".

'748 "Ĉu vi pensas, ke rakonto por mi estas tre agrabla? ; Al mi ŝajnas, ke vi restas tro memfida, aroganta. ; Kiel do kuraĝis diri tion via lango aĉa? ; Vi vezir' ne povas esti, ĉar vi antaŭ reĝ' malsaĝas".

'749 "Vi verŝajne ne pripensis, ke necesis sindeteno ; La malsaĝajn vortojn diri en la reĝa rezidejo. ; Mi preferus vin ne aŭdi, ŝtopi volus mi orelojn. ; Mi ne murdos vin, veziro, ĉar ne volas fari pekon".

'750 "Se ne estus vi sendito, morton kaŭzus tia blago: ; Senprokraste mi kondamnus al dehako vian kapon. ; Iru for, vi, malsaĝulo, ne forgesu tiun tagon; Kia homo, kia vorto, kia senpripensa ago".

'751 Reĝo ĵetis pezan seĝon kaj disrompis kontraŭ muro. ; La veziron li ne trafis, sed forpulis de okuloj. ; "Kiel vi aŭdacis diri, ke li faris forveturon?" ; Diris reĝo, kaj kun larmoj iris for malfeliĉulo.

'752 La veziro hejmen iris en humoro deprimita, ; Kiel vulpo paŝis viro kaj doloris kor' vundita; La eniro estis gaja kaj eliro malbenita, ; Homo mem al si malhelpas pli, ol ago hipokrita.

'753 Kaj irante li meditis: "Dio punis min pro pekoj; Kiel do mi miskalkulis, kion diros la kortego? ; Perdis mi, arogantulo, trankvilecon, feliĉegon, ; Kiu agas sen pripenso, tiu finas kun malvenko".

'754 La vezir' revenis hejmen forlasita de la fortoj ; Kaj al Avtandil' rakontis pri forpelo kaj malvolo, ; "Kiel povas mi vin danki? – Ĥaso estas mia nomo, ; Min respektis ĉiuj homoj, nun la kapon kovris honto".

'755 Ŝerce petas li la oron, kvankam tristas la vizaĝo: ; "Miras mi, povante ŝerci, mi do sentas la domaĝon. ; Nur promesi, sed ne doni – estas vere malbonaĵo; Oni diras:"En infero ankaŭ helpas koruptaĵo".

'756 "Reĝ' insultis min, mallaŭdis, li eĉ nomis min "Krimulo", ; Min akuzis pri fiaĵo kaj forpulis de lokuloj; Mi racion tute perdis, restis fia flataĉulo, ; Kaj mi miras, ke mi vivas post ĉi tiu aventuro".

'757 "Mi ja scias, kion faris, sed mi perdis la sinregon; Ĉar ne dubis mi pri tio, ke koleros ege reĝo. ; Ne evitos ja la homo baton de ĉielkolero. ; Mi volonte pro vi mortos – tio estas pura vero".

'758 Kavaliro diris, ke li por ĉasado iri devas; Najtingalo tiam mortas, kiam bela rozo velkas, ; Kaj roseron la birdeto por la floro ĉie serĉas; Se la akvo ne troveblas – tre ĉagrena birdo restas.

'759 "Sen amiko mi ne povas ĉi ripozi en plezuro, ; Mi preferas inter bestoj vagi kiel la migrulo. ; Ĉu mi taŭgas en deprimado esti la gvidant' por trupoj? ; Pli agrable vivi sola, ol kun malkontenta ulo".

'760 "Kiom ajn la reĝ' koleros, mi raportos pri foriro; Li ne scias, ke suferas Avtandil' – la kavaliro, ; Se la reĝo ne permesos – mem mi trovos la eliron; Se pereos mi – samtempe mortos revoj kaj deziroj".

'761 La vezir' aranĝis manĝon, mem regalis sen la laco, ; Avtandilon li honoris - estis tio la sensaco, ; Nur vespere forpermesis lin foriri kun donacoj; Ambaŭ dume eĉ forgesis malsukceson en palaco.

'762 Avtandil' post la reveno, sendis donon al veziro: ; Do cent miloj da moneroj estis de vezir' akiro, ; Tricent pecojn da teksaĵoj al li sendis kavaliro, ; Sesdek gemojn donis ankaŭ – la smeraldojn kaj safirojn.

'763 Li saluton sendis ankaŭ al vezir' – bonkora homo, ; Skribis:"Ĉu mi povas dece rekompenci vin por bono? ; Se mi restos viva tie, vi posedos mian koron, ; Por la am' mi donos amon, kiel diktas nia moro".

'764 Mi kantgloras Avtandil'—on, li bonkore faris multon, ; Digna estis kavaliro, saĝa kaj malavarulo, ; Helpi devas ĉiu homo – tia estas viv—regulo, ; Dum la plago tre necesas havi fraton, proksimulon.

, & Interparolado de Avtandil' kun Ŝermadin':

'765 Sunsimila kavaliro jen alvokis la servanton: ; " Ŝermadin', fidela mia, esperiga estas tago, ; Ĉar vi povas al mi montri, ke vi estas mia frato." ; Jen, ilian amikecon povas laŭdi vi, leganto.

'766 "Reĝ' ne volas kaj ne donas por foriro la permeson, ; Li ne scias, ke mi donis al la frato la promeson, ; Mi sen li ne povas vivi, diras mian mi konfeson; Ĉu pardonas iam dio al fiulo maljustecon?"

'767 "Mi neniam lin forgesos, tion firme mi parolas, ; Ĉar amiko en kaverno senespere, sole ploras, ; Propran vorton ĉiam tenas, kiu bonon fari povas, ; Antaŭ ĉio, mensogulo plejaltulon ne agnoskas".

'768 "Tri aferoj al amikoj pruvas veran amikecon: ; Jen unue: Disigitoj devas strebi al kunsento; Due, doni la donacojn, malavare kaj sen ĉeso; Trie, helpi kaj konsoli en bezono kaj neceso".

'769 "Sed sufiĉas paroladi, povas kurte mi klarigi: ; Trovos mi la kuracilon, se mi povos fraton vidi. ; La konsilon mian sekvu, devas vi kastelon gvidi, ; Ne forgesu la instruon, kiun mi intencas diri".

'770 "Sciu, do, ke tre necesas esti por la reĝ' subteno, ; Semu ĉie nur la bonon kaj la virton en la regno, ; Vi konservu la havaĵon, zorgu pri militaferoj, ; Kaj fervore, kiel tiam, vi daŭrigu vian servon".

'771 "Estu forta kaj defendu en batalo la landlimojn, ; Ne ofendu fidelulojn, malavaru ĝis kulmino, ; Kiam mi revenos hejmen, pagos mi por la meritoj. ; Ne perdiĝas bona servo, kiun faras subigito.

'772 Aŭskultinte paroladon, Ŝermadin' komencis plori: ; "Ne timigas min soleco – eblas plagon superforti, ; Sed sen vi restinta povas mi en malesperon droni; Prenu min, ni estos kune kaj vi povos min disponi".

'773 "Kiu aŭdas, ke la homo grandan vojon farus sola? ; Kiu aŭdis, ke la mastro sklavon ne kunpreni volas? ; Memorinte vin, perditan, mi ja estos senkonsola". ; Avtandil' al li respondis: "Vin kunpreni mi ne povas".

'774 "Mi ne dubas, ke sincere vi esprimis vian amon, ; Sed al kiu povas fidi mi la trupojn kaj la landon? ; Mi krom vi nenium scias kun fidela forta mano. ; Do ne petu, vi ĉi tie restos la anstataŭanto".

'775 "Mi, miĝnuro, tra la kampoj devas vagi sen konsolo, ; Varmaj larmoj plibeligas la miĝnuron—vagabondon, ; Por amanto la vagado estas lia sola sorto; Vi do vidas, tiel estas aranĝita nia mondo".

'776 "Min memoru kaj min amu, kiam mi jam fore estos, ; Mi mem servos min kaj zorgos, do la sklavo ne necesos, ; Kuraĝulon akompanos nur espero kaj braveco; Homon, kiu fie agos, mi ne ŝatos nek respektos".

'777 "Mi ne pensas, ke la mondo – nur kukumo tromatura, ; Kiam frat' bezonas helpon, mi neniam restas surda. ; Mi forrajdos kun permeso – donis ĝin estaĵo suna; Kiam mi de ŝi foriras, ĉu valoras hejm' plezura?"

'778 "Estu mia testamento por la reĝo Rostevano, ; Mi do petas lin prizorgi, mian burgon, vian sanon, ; Se mi mortos dum vagado, vi neniam faru samon, ; Nur priploru min sincere vi kaj miaj samlandanoj".

, & La testamento de Avtandil' al reĝo Rostevan':

'779 Avtandil' ĉe tabl' sidiĝis, triste skribis testamenton: ; "Reĝo mia, mi foriris kaŝe kaj sen ia peto, ; Ĉar mi devas trovi tiun, kiu indas la kunsenton, ; Benu min per fora vojo, kaj pardonu pro turmento".

'780 "Reĝo, scias mi, ke fine mi ne estos akuzito, ; Saĝa homo ne forlasos la amikon en aflikto. ; Volus mi Platonon* citi, kion diris li pri virto: ; "Karnon, poste la animon, fuŝas fia hipokrito".

'781 "Ĉiu scias – malfeliĉon kreas trompo kaj mensogo, ; Ne forgesos mi la fraton, ne havantan propran domon; Ja ne taŭgas filozofa, se ne naskas li la bonon, ; Tial studas ni sciencojn por atingi altan ordon".

'782 "Ĉu vi scias, kion skribas pri la amo apostoloj? ; Ili amon tre estimas, sciu bone sanktajn morojn, ; "Amo homon plialtigas, ja tintadas gajaj vortoj, ; Se vi tion ne komprenas, kion faros simplaj homoj?"

'783 "Kiu kreis min, li donis forton bati malamikon, ; Li, restante nevidebla, helpas nin per la racio, ; Kiel dio li starigas, montras de ebleco limon, ; Li el unu faras centon kaj el cent inverse tion.

'784 "Ne efektiĝas tio, kion dio ne ekvolas, ; Sen radioj de la suno roz-violetoj palkoloras, ; Sen la suno sur la tero oni nur obskuron trovas, ; Same mi sen la amiko vivi en solec' ne povas".

'785 "Petas mi pardonon, reĝo, eble estos vi kolera, ; Mi ne povis vin obei kaj fariĝi malfidela; Vundon mian mi kuracos dum foriro efemera, ; Kia ajn mi estos, tamen mi eksentos min libera".

'786 "Senutilas la ĉagreno kaj larmiga emocio, ; Kio estas destinita, ĉiam realiĝas tio, ; Al la homo bone decas pacienco, sed ne krio, ; Ĉar neniu ŝanĝi povas, kion antaŭvidas dio".

'787 "Plenumiĝu ĉio, kion de ĉielo vol' decidis; Estu certa – mi revenos kaj feliĉan vin revidos; Per bonfaro kaj per helpo al amiko mi utilos, ; Tia ago gajnos gloron kaj popolo min estimos".

'788 "Reĝo, murdu min, se poste mi malagos kaj malpravos. ; Ĉu foriro mia vian reĝan moŝton aĉon faros? ; Mi amikon ne perfidos, la decido tia klaros, ; Li akuzos min, alie post la morto kaj kondamnos".

'789 "La memoro pri amiko ne alportas malprofiton, ; Malestimas mi la homon – ĵurrompulon kaj malvirton; Ja ne povas mi lin trompi, de la suno sateliton, ; Ĉu valoras homo, kiu ne estimas la kaptiton?"

'790 "Ja nenio pli malbonas, ol timego sur vizaĝo, ; La timulon en batalo akompanas nur malplaĉo, ; Ĉu pli bonas vir' timulo aŭ ŝpinanta virinaĉo? ; Ol riĉaĵoj pli valoras glor' batala kaj kuraĝo".

'791 "Roka aŭ mallarĝa vojo mortalvenon ne haltigas, ; Mortohoro homon feblan al fortulo egaligas, ; Ĉar oldulon aŭ junulon fine tomba tero ligas, ; Glora morto pli ol vivo malhonora ĉiam dignas".

'792 "Hom' eraras, se la morton ĉiuhore ne atendas, ; Tiu nigra vizitanto sen invito sin prezentas, ; Antaŭ ni, ne invitite, tage, nokte ĝi aperas; Do se vi min ne revidos, sciu, mi en alto ŝvebas".

'793 "Se pereos mi en mondo efemera, malfavora, ; Ja neniu min priploros sur la tero fremda, fora, ; Kaj ne vindos per morttuko iu proksimulo bona; Vi min ne bedaŭru sole, reĝo nobla kaj bonkora".

'794 "Prenu miajn trezorkestojn, tie riĉas la enhavoj, ; Kaj disdonu al povruloj, liberigu ĉie sklavojn, ; Pliriĉigu vi la orfojn, ĉiujn sen la rajtoj, havoj, ; Min memoros ili kore, por mi preĝos kun la larmoj".

'795 "Mian monon kaj trezoron, se ne havos la valoron, ; Utiligu por bonfaro, por konstruo de la pontoj, ; Kaj ne ŝparu la havaĵon, ne avaru dum disdono, ; Ĉar krom vi neniu estas pli proksima, kara homo".

'796 "La leteron ne atendu de mi – de la paladino; Do mi ĉion nun aldiris, mi konfidis la animon. ; Min ne venkos la satano, mi ne sentas dubon, timon. ; Per la preĝo kaj pardono montru vi al mi estimon".

'797 "Mi vin petas, al servanto – Ŝermadino estu bona; Liaj zorgoj plimultiĝis, ĉar de nun li restas sola. ; Ne forlasu lin, ho, reĝo, protektema kaj favora, ; Se li ploros, trovu vorton kuraĝigan kaj konsolan".

'798 "Do mi finas testamenton, kiun skribis mia mano; Edukinto mia kara, mi deziras al vi sanon, ; Ne necesa estas dume la funebro, nek la samo, ; Mi transdonas la saluton al fidelaj samlandanoj".

'799 Li al Ŝermadin' transdonis la skribitan testamenton ; Kaj aldiris: " Ĝin vi portu kaj prezentu al regento. ; Vi vasalo estis mia, fidelulo kun prudento". ; Kaj ekĝemis ili kune kun la larmoj, granda sento.

, & Preĝo de Avtandil':

'800 Preĝas, diras kavaliro: "Plejaltul' de universo! ; Jen alsendas vi suferon, jen alportas la sukceson, ; Vi patron' neekkonebla, ĉie via supereco, ; Donu venki la pasion, ĉar vi personigas menson.

'801 "Dio, dio, suvereno sur la mondo kaj sur reĝoj, ; Vi ja kreis miĝnuradon* – ; determinis ĝian leĝon, ; Vi konservu mian amon, petas mi per mia preĝo, ; Kiun donis mia suno – sidas ŝi sur reĝa seĝo".

'802 "Krom vi mi neniun havas, bona favoranto dio! ; Kvankam multon mi jam spertis, sed vi helpu min en scio, ; Min permesu trankviligi de marondoj ekspansion, ; Oferaĵon mi alportos, se revidos la patron".

'803 Poste li surĉevaliĝis kaj sekrete forrapidis, ; Ŝermadin' la manon svingis kaj varmegajn larmojn viŝis, ; Li – servanto multe ploris kaj sin bati ne hontiĝis, ; Ĉar li restis sen patrono – lia ĝojo neniĝis.

& Rostevan' ekscias, ke Avtandil' sekrete foriris:

'804 Nun ni povas ĉion diri pri forir' de l'kavaliro, ; Tag' sekvanta por la reĝo estis plago kaj sopiro. ; Li kolera ellitiĝis, estis kiel en deliro, ; Kaj ordonis li severe: "Alkonduku la veziron".

'805 Vidas reĝo, kiel neĝo pala estis la veziro, ; Pardonpetis lin la reĝo: "Mi forgesis vian diron, ; Vi ofendis min – la reĝon, estis tio la surprizo, ; Mi insultis, ĉar aŭskulti vin ne havis mi deziron".

'806 "Ĉu memoras vi, veziro, kion volis la spaspeto? ; Veron diras la saĝuloj: "Plagon kreas la ofendo"; Vi neniam agu tiel, kaj precipe dum akcepto. ; – Nun ripetu la rakonton, kia estis malprudento".

'807 Kaj vezir' denove diris pri la nova mirindaĵo, ; Al spaspet' transdonis reĝo per veziro la mesaĝon: ; "Estus mi la jud' – Levito*, se mi trovus en li saĝon, ; Plu ne diru pri foriro, tio estas la ruziĝo".

'808 Elirinte la veziro ĉie serĉis la spaspeton; Sklavoj diris, ke sekrete li forlasis la kortegon. ; La vezir' ektimis multe kaj parolis en ĉagreno: ; "Kiu volas diri veron al la nia suvereno?"

'809 Ne revenis la veziro, do la reĝo sklavon sendis; Onidiro disvastiĝis, ke spaspeto malaperis; Rostevan' ne sciis, tamen fine tion li suspektis: ; "Li de mi foriris kaŝe" – reĝa moŝto jam konjektis.

'810 Rostevan' la kapon klinis, ĉar zorganton plu ne vidis, ; "Mi ordonas tre severe!" li al sklavo tion diris, ; La veziro – mensogulo al mi devas tuj rapidi". ; Ekaŭdinte la ordonon, paliĝinta li aliris.

'811 Antaŭ reĝo jen li staras kaj la reĝo lin demandas: ; "Ĉu foriris nia suno, kiel lun' aspekton ŝanĝas?" ; La veziro timas, tamen jam mensogi ne kuraĝas: ; "Jes, la luno plu ne lumas, ĝin nubegoj nigraj kaŝas".

'812 Kiam reĝo lin aŭskultis, li ekploris pri junulo: ; "Mian karan edukiton plu ne vidos la okuloj". ; Li ŝiradis barbon sian, kriis kiel frenezulo: ; "Kien vi de ni foriris, kial kaŝis vi la lumon?"

'813 "Ĝis vi portas propran kapon, vi ne estas la solulo, ; Tamen kion mi nun faros, se ĉirkaŭis min mallumo? ; Foririnte, vi min faris malfeliĉa sola ulo, ; Ĝis revenos vi denove, ne forlasis min torturo".

'814 "Mi ne vidos lin – gajulon, revenantan post ĉasado, ; Mi ne aŭdos lian voĉon sur la kampo aŭ la valo, ; Mi ne vidos lin, ludantan kun la pilko sur majdano, ; Kaj sen li mi kion faros kun la tron' kaj mia amo?"

'815 "Avtandil', mi bone scias, vi ne mortos pro malsato, ; Havas vi sufiĉe multe da bonegaj akraj sagoj, ; Dio estas grandanima, faciligos vian plagon; Se vi mortos, kiu ploros dum funebra mia tago?"

'816 Nun alvenis korteganoj, kun la reĝo ĉiu ploris, ; Viroj siajn barbojn ŝiris, la funebrojn reĝ' anoncis, ; Oni vidis ĉie larmojn, ilin neniun konsolis, ; Ĉiu diris: "Sun' perdiĝis, kvazaŭ en la maron dronis".

'817 Reĝ' vidante korteganoj, kun ĉagren' al ili diris: ; "Jen vi vidas – nia suno nin forlasis kaj foriris. ; Ĉu ni faris iun pekon, ĉu junulo ofendiĝis? ; Kion diri al la trupoj? militistoj lin estimis".

'818 Kiam ĉiu ĉesis plori, ilin reĝo ekdemandis: ; "Ĉu foriris knabo sole, eble iu akompanis? ; Ŝermadin' aliris tiam, testamenton li ja havis, ; Ĝin al reĝo li transdonis kaj amare lamentadis.

'819 Diris li : "La testamenton trovis mi ĉe lia lito, ; Tie ploris sklavoj, ili harojn ŝiris en paniko, ; Li foriris, min forlasis, ne komprenis min – amikon. ; Rostevan', se vi min murdos – estos ĝusta la verdikto".

'820 Reĝo legis testamenton kaj denove ĉiuj ploris, ; "Mi vestaĵon helan porti malpermesas", – li ordonis; "Preĝu orfoj kaj vidvinoj – petu dion lin favori. ; Tiel niaj preĝoj helpu lin al sia celo voji".

, & Foriro de Avtandil' por la dua renkonto kun Taniel':

'821 Hele brilas luno, kiam malproksimas ĝi de suno, ; Se denove sun' proksimas, de la luno restas spuro; Sed sen suno rozo velkas, ĝin forglutas la obskuro, ; Kaj suferas dum disiĝo amatino kaj miĝnuro.

'822 Nun mi volas la rakonton mem pri Avtandil' daŭrigi, ; Pri la plor' de kavaliro mia plum' ne povas skribi, ; Dion petis kavaliro, sunon – Tinatin' sanktigi, ; Li nur ŝin antaŭe vidis, ĉar ŝi sunon personigis.

'823 Li silentis, ĉar suferis pro la sama maltrankvilo, ; Larmoj fluis en abundo, kiel en rivero Tigro; Li per la okuloj serĉis malproksiman lumigilon, ; Iutempe, kie rajdi, ne komprenis kavaliro.

'824 Diris li: "Ho, amo mia, ne forgesos mi vin tute, ; Min malbonos la ĉielo, se ne amos mi profunde, ; La okuloj miaj volas vin denove vidi urĝe, ; Mi obeos al la amo, ĉiam estas ĝi apude".

'825 "Mi ne scias, kion fari dume ĝis intervidiĝo, ; Mi ne kaŝas, iutempe pensas mi pri sinmortigo. ; Tamen vi ja tre malĝojos, ricevinte la sciigon, ; Do preferas mi nur plori, tio estos faciligo".

'826 Diris li: "Vi, suno hela, personigas sunan nokton*. ; Reprezentas senfinecon, unikaĵon en la mondo, ; Vin obeas ja la astroj kaj plenumas vian ordon.; Dum migrado mia fora vi prilumu mian sorton".

'827 "Filozofoj iam diris: "Personigas suno dion", ; Nun konsolu min ligitan per katenoj de pasio. ; Serĉis mi la kristalvitron – perdis la ĝiŝeron, ĉion. ; Ne eltenis mi apude, min turmentas agonio".

'828 Li degelis kiel vakso, lin ĉagrenis vivestingo, ; Forgalopis li rapide, ĉar li timis malfruiĝon, ; Kiam noktaj belaj steloj flagris sur ĉiela nigro, ; Li kun ŝi komparis astrojn, revis pri intervidiĝo.

'829 Avtandil' al luno diris: "Mi je dio vin akuzas, ; Donacinte al ni amon, sendas vi suferon, ruzas; Vi mem havas kuracilon, gemiĝnuroj ĝin ja uzas, ; Al ni homoj sendi amon vi neniam, do rifuzas".

'830 Tage li suferis multe, nokte ĝojis pri la steloj, ; Ondetaron li observis, kiam estis ĉe rivero, ; Kun ĝi miksis kavaliro siajn larmojn de ĉagreno, ; Post ripozo frumatene li jam estis en la selo.

'831 Tiel ploris kaj ĝemadis la cipressimila viro; Ĉe la roko en la valo li mortigis la kaprinon, ; Rostis beston kaj ĝin manĝis, kiel estis vivkutimo, ; Diris: "Lasis mi la rozon, nun ĉagrenas la animo".

'832. Malfacilas nun priskribi, kion li plorante diris, ; Kiel gratis la vizaĝon, kiel al amik' rapidis; Post vagado kaj mizero la kavernon li ekvidis, ; Kaj ekĝojis kavaliro, ĉar la celo jam proksimis.

'833 Kiam lin Asmat' ekvidis, ŝi eliris por renkonto, ; Pro la ĝojo ŝi ne povis elparoli eĉ la vorton. ; Avtandil' ŝin kisis varme, gaje batis lia koro – ; Estis tre agrable vidi fratigulon kaj sinjoron.

'834 Li demandis: "Kie estas via mastro – mia frato?" ; Kun la larmoj ŝi respondis: "Mi ne scias lian staton, ; Ĉar foriris kavaliro, kaj forlasis min zorgato, ; Mi nenion scias, kara, estas unu jam monato".

'835 La respond' por Avtandilo estis kiel lanca piko; Diris li: "Fratino mia, kion faris la amiko? ; Li ne tenis sian vorton – rompis tiel la etikon, ; Mi ne ŝanĝis mian ĵuron – mi alvenis, havis riskon".

'836 "Mi sen li ne povas vivi kaj tre volis lin revidi, ; Ĉiam mi pri li memoris, de la reĝo mi foriris; Li ne povis sanktan ĵuron rompi kaj min malestimi, ; Tamen devas mi ne miri – ĉion mi de sorto vidis".

'837 "Avtandil', vi estas prava", tiel diris amikino, ; "Vi ne pensu, ke mi flatas, havas mi nur antaŭtimon; Frato mia freneziĝas kaj ne havas kuracilon, ; Li atendas malfeliĉa, sian lastan tago-finon".

'838 "Estas en la interligo: kor', racio kaj konscio, ; Kor' foriras, ĝin tuj sekvas la konscio kaj racio, ; Do senkora hom' ne homas, li evitas la socion, ; Vi ne scias, en la frato kia brulas incendio".

'839 "Vi indignas tute prava, ĉar ne trovis vi amikon, ; Tamen mi ne povas diri, kian havis li konvinkon, ; Jen li estas bona homo, jen perfidas lia psiko, ; Mi ja scias lin tre bone, konas lian romantikon".

'840 "Ĉu imagon iu havas pri la suferad' simila? ; Ne nur homoj, eĉ la ŝtonoj tremus pro turmentoj tiaj, ; Kaj superbordiĝus Tigro* de varmigaj larmoj liaj. ; Ĉiu estas la saĝulo dum batalo de aliaj".

'841 "Kiam li de mi forrajdis, mi demandis atenteme: ; "Kion devos mi respondi, kiam venos frato ree?" ; Li respondis: "Se li venos, vi aldiru tion plene: ; En densejo, ĉi proksime lin mi trovos ĝustatempe".

'842 "Mi ne rompos ĵuron sanktan dume mi ĉi tie restos; Ĝis la tempo konsentita mi atendos kaj suferos; Se li trovos min mortinta – kaŝu min en fridan teron, ; Se mi vivos – li ekmiru, sed ne havas mi esperon.

'843 "Li foriris, mi ĉi restis kaj jam perdis paciencon, ; Mi suferas, freneziĝas kaj turmentas min diseco, ; Suno mia malaperis, vivo plu ne havas sencon, ; Eĉ la morto min forgesis, vidu vi la realecon".

'844 "En Ĉinio sur la ŝtono la surskribon oni vidas: ; "Se amikon vi ne serĉas, al vi mem mi malamikas". ; Kiu estis bela rozo, la ŝafranon li imitas, ; Vi necese fraton serĉu – tion amikec' devigas".

'845 "Pravas vi, fratino mia, li ne estas akuzato, ; Sed pripensu, kion faris mi, spaspeto de la ŝtato; Kiel cervo al la akvo mi vagadis kun la hasto, ; Mi ne perdis paciencon kaj konstante serĉis fraton".

'846 "Mi forlasis la reĝinon – lalon en la kristalvitro, ; Kun ŝi mi ne povis esti kaj satigi korinklinon, ; Ĉagrenigis mi la reĝon, kiu nomis min "La filo", ; Por la amo mi repagis per sendanko kaj foriro".

'847 "Do mi estas nedankema, ĉar forlasis edukinton, ; Forlasinte amatinon, mi ne indas la pravigon, ; Rostevan' mi patre amis, donis ĉiam la sciigon, ; Sed mi tute arogante rompis tiun fortan ligan".

'848 "Ho, fratino, ĉu vi vidas, mi suferas pro bonfaro; Ne timigis min vojaĝo, vin mi trovis sen eraro, ; Sed de mi serĉata homo malaperis en arbaro, ; Kaj mi ploras tute sola, estas preta ŝiri harojn".

'849 "Sed ni finu paroladon, vane perdis mi la tempon, ; Ne bedaŭras mi paseon kaj plenumos mian devon. ; Volas sekvi mi saĝulojn kaj ne perdos mi sinregon, ; Serĉos mi la fraton mian sen ofendo kaj timego".

'850 Li nenion diris, ploris, kaj la vojon plu daŭrigis, ; La kavernojn preterpasis, tra la kamp' kaj kanoj iris, ; Vento kiel besto hurlis, rozajn vangojn glaciigis, ; Avtandil' sin demandadis: "Kial sorto min priridis?"

'851 "Antaŭ vi, ho, plejaltulo, ĉu mi, mizerulo, pekas, ; Ke vi min de proksimuloj longe disigitan tenas? ; Restas mi nur unu homo, sed pri du senĉese pensas, ; Kaj por ambaŭ mian vivon senhezite mi oferas".

'852 "Per la fasko de la rozoj vundis li min ĝis la morto, ; Ne plenumis li la ĵuron, sed mi tenas mian vorton. ; Sen amiko ja ne donas ĝojon efemera mondo, ; Kaj ne povas mi amiki kore kun alia homo".

'853 "Strange estas, kiam viro ĉagreniĝas senespere; Ĉu alportis larmo venkon? Kial plori antaŭ tempe? ; Pli valoras por feliĉo lukti, ĝin atingi ree, ; Do mi trovos lin – la sunon, kvankam malfacile, pene".

'854 Avtandil' komencis serĉi, forviŝinte larmajn vangojn, ; Li kriadis, laŭte vokis, ĉien turnis la rigardon. ; Dum tri tagoj li trarajdis multajn valojn kaj arbarojn, ; Sed ne trovis li amikon – triste tenis jungilaron.

'855 Li ekpreĝis: "Alta dio, ĉu vi trovis min fihomo? ; Kial vi min tiel punas kaj kondamnas al doloro? ; Vi, juĝisto ĉiovida, finaŭskultu vagabondon: ; Mallongigu vivon mian, donu ĝojon en la koro".

,& Avtandil' trovas senkonscian Tarielon:

'856 Rajdas brava kavaliro, ploras kaj ne scias vojon, ; Li subite vidis ion en la verda intermonto; Tio estas la ĉevalo – nigra kiel la fantomo, ; Diris li: "Mi trovis fraton, se ne estas mi en dormo".

'857 Li revidis la ĉevalon, ĝoje batis lia koro, ; Pligrandiĝis la feliĉo, kaj ne dek, sed eĉ mil fojon. ; Nun heliĝis kristalvitro, la giŝero en la oro, ; Li forrajdis kiel vento, por ekvidi tiun homon.

'858 Tarielon ekvidante, restis li tre surprizita;
; Kuŝis Tariel' senmove, ŝajnis – li ne estis
viva. ; La kolumo disŝirita, la hararo distaŭzita,
– ; Tariel' nenion sentis, ne aspektis vivsimila.
.....

'859 Apud li leono kuŝis ĉe la glavo
sangkovrita, ; De alia lia flanko kuŝis tigro
mortigita, ; La okuloj liaj larmis, kvankam
ŝajnis nun persistaj, ; Nevidebla fajro manĝis
lian koron obseditan.

'860 Eĉ ne povis la palpebron li surlevi, ne
moviĝis, ; Vivon poiome perdis, al la morto
proksimiĝis, ; Avtandil' per nomo vokis, lin
klopodis paroligi; Tiu kiel morta kuŝis, kaj
nenio lin agitis.

'861 Avtandil' per la maniko zorge viŝis liajn
larmojn, ; Poste apud li sidiĝas, vokas, skuas
per la manoj: ; "Ĉu vi tute ne rekonas
Avtandilon, vian fraton?" ; Tariel' nenion
aŭdis, ne direktis la rigardon.

'862 Ĉio vere estis tiel, kiel mi al vi priskribis,
; La zorgad' ne restis vana, fine bone ĝi efikis:
; Tariel' rekonis fraton, ĉirkaŭprenis lin kaj
kisis; Dio estas atestanto – tiaj homoj ne
naskiĝis.

'863 Tariel' parolis: "Frato, mi ne rompis mian
ĵuron – ; Mi prokrastis mian morton ĝis alvenis
vi – la suno. ; Nun forlasu min, amiko, mi
foriras en obskuron, ; Sed mi petas, entombigu
min post fino de torturo".

'864 Avtandil' respondis frate: "Kial faras vi
fiagon? ; Ĉiu estis la miĝnuro, sentis la
brulegan flamon, ; Tamen kiu senprudente
pereigis sin pro amo? ; Kial morton vi deziras,
vin fordonas al satano?

'865 ' Sciu bone, kion diras la saĝuloj pri
vireco: ; "Ne konvenas ploro, ĝemo al la viro
kun braveco"; Kontraŭstaru malfeliĉon kiel
muro de fortreso, ; Ofte nian plagon kaŭzas
nur la propra malsaĝeco.

'866 ' Vi ja estas la saĝulo, sed ne sekvas la
admonon, ; Ploras vi en sovaĝejo kaj similas al
fantomo; Se malamas vi la mondon, vi ne
trovos aman fonton, ; Vane kapon vi turmentas
kaj evitas vane homon.

'867 ' Ĉiu estis la miĝnuro kaj suferis lia koro,
; Kaj turmentis ĉiun amo, la disiĝo, malfavoro;
Ĉu okazis io grava, ke vi tute perdis forton? ;
Sciu, ke neniu plukis rozon sen pikantaj
dornoj.

'868 ' Oni volas scii, kiel bela rozo altvaloras, ;
Kaj tre miris, kial planto tiel senkompate
dornas; Li respondis: "La dolĉecon oni en
amaro trovas, ; Se facile atingeblas, belo tre
malmulte kostas".

'869 ' Se asertas tion rozo – senanima florfolio,
; Kiu povas do esperi nuran ĝojon sen envio? ;
Ĉu satana faro povas esti bono, antaŭ ĉio? ;
Kial mondon vi akuzas, ne vidante harmonion?
.....

'870 ' Do aŭskultu min atente, ni surĉevaliĝu,
frato, ; Lasu vian antaŭjuĝon, ne akuzu nur la
faton, ; Al deziroj kaj pasioj montru fortan
kontraŭstaron. ; Ĉio, kion vi parolis, estas vero
kaj ne flato".

'871 "Kion povas mi respondi?" – diris Tariel'
al frato, ; "Ne komprenas mi la vortojn, ĉar en
kapo havas ardon; Al vi ŝajnas tre facila la
sufero kaj la plago. ; Eble en ĉielo trovos
vivoĝojn mi – pekanto.

'872 ' Kaj mortante, mi nur preĝas, havas solan
mi deziron, ; Ke la paradizon vidu ni miĝnuroj
kaj martiroj, ; Ke ni tie plu ne konu, kio estas
la sopiro, ; Mi nur petas enterigi min ĉi tie,
kavaliro.

'873 ' La renkonton de miĝnuroj mem ĉielo do
sanktigas, ; Ŝi min certe vidi volas kaj al ŝi mi
rekte iras; Dum renkonto ni ekploros, kiel ama
par' kutimas. ; Cent konsilojn aŭskultante,
agu, kiel koro diras.

'874 ' Tamen bone sciu, frato, diras mi al vi la
veron, ; Morto super mi jam ŝvebas, vi ne havu
plu esperon; Ne bezonas vi mortinton aŭ
vivantan en mizero. ; Mi jam plu ne apartenas
al la homoj de la tero.

'875 ' Do mi mortos kaj ne volas mi atente vin
aŭskulti, ; Mi jam vidas mortalvenon,
mortanĝelo jam alflugis. ; Vivo plu ne havas
sencon, mia tago jam krepuskis, ; Iras mi en
fridan teron, kien miaj larmoj fluis.

'876 ' Kia saĝo, kiu saĝas? ĉu prudentas
frenezulo? ; Se mi povus min ekregi, eble
taŭgus ĉi reguloj. ; Sed la rozo ĉiam velkas,
kiam ne sufiĉas suno. ; Ne turmentu min,
forlasu, volas fermi mi okulojn".

'877 Avtandil' denove petis la mortontan
fanatikon: ; "Se vi mortos, tio estos ankaŭ por
mi la tragiko, ; Do vi mem al vi ne estu
senprudenta malamiko". ; Tariel' atendis finon
– vana estis la konvinko.

'878 "Se ne volas vi aŭskulti, mi forlasos vin por ĉiam, ; Mi ne tedos al vi multe, la mortinto estas vi jam, ; Se preferas vi la morton, mortu kiel rozo dia, ; Mi nur havas unu peton, la respondon donu vian.

'879 ' Hejme lasis mi virinon, havas ŝi la rozvizaĝon, ; Kristalvitrajn havas vangojn kaj ĝiŝerajn harplektaĵojn, ; Mia reĝo malpermesis fari tiun ĉi vojaĝon, ; Ankaŭ vi min nun repuŝas – min flamigas la domaĝo.

'880 ' Ne forsendu sen rezulto min al mia patrolando, ; Nun surĉevaliĝu, frato, mi ekvidos vin – rajdanton; Eble mia plag' foriĝos, trankviliĝos mia ardo. ; Tiam mi de vi foriros kaj vi agu laŭ la stato".

'881 Sur ĉevalon nun eksidi petis li la kamaradon, ; Ĉar li sciis – fihumoron plibonigos la rajdado, ; Senvigleco apatia malaperos en movado; Fine Tariel' obeis, cedis al peteg' de frato.

'882 Tariel' konsente diris: "Alkonduku la ĉevalon". ; Avtandil' rimarkis bone, ke revenis vivkapablo, ; Helpis li la kavaliron sidi sur la animalo, ; Malrapide rajdis ili, vigla iĝis veturado.

'883 Avtandil' rakontis ion gaje al la ĉagrenulo; La plej bona kuracilo estis ŝerco de gajulo. ; Aŭskultante tion, povis plijuniĝi eĉ olduloj; La ĉagreno do foriĝis – sereniĝis la okuloj.

'884 La arabo do rimarkis, ke alvenis plibonigo. ; La vizaĝo rericevis rozkoloron kaj trankvilon. ; Li ja estis kuracisto, uzis bonan kuracilon, ; Ĉar dirita saĝa vorto savis vivon kun facilo.

'885 Avtandil' atingis celon kaj daŭrigis paroladon; "Mi vin petas, vi respondu dum facila nia vado, ; Ĉu vi amas la brakringon, kiun portas sur la mano, ; Kiun de Nestan' ricevis, kiel signon de la amo?"

'886 Tariel' respondis firme: "La brakringo donacita ; Pli valoras ol la vivo, se la vivo ion indas; Tio estas evidenta, diskutadon ne meritas. ; Aŭskultado kontraŭ plaĉo – kiel manĝo tre acida".

'887 "Mi esperis de vi aŭdi la respondon ĝuste tian" – ; Diris Avtandil' al frato – al la reĝo senpatria, – ; "Pli ol tiun ringon taksu zorgojn de fratino via, ; Kaj ne perdu ŝin por ĉiam, elektinte vojon fian.

'888 ' Portas vi la braceleton, ĝin faritan laŭ kutimo; Ĉiu aĵo, kvankam bela, sed ne havas ĝi animon, ; Kaj Asmat' ja estas homo, ŝi al vi ofertas vivon; Kiel frato estu bona al Asmat' – al karulino.

'889 ' Ŝi ja estis perantino inter vi kaj via amo, ; Rendevuojn ŝi aranĝis, kiam vin bruligis flamo, ; Por Nestan' ŝi anstataŭis de l'patrino koron, manon. ; Vi senkore ŝin forgesis, faris ne hoNestan' agon".

'890 Li respondis: "Vi sendube, frato, pravas kaj sinceras, ; Ŝi memoras mian sunon, ŝi pri mi konstante pensas. ; Ne esperis mi plu vivi, sed por savi min vi venas, ; Do ni rajdu al fratino, kiu certe nin atendas".

'891 Ili rajdis kaj parolis – Avtandil' kaj amirbaro, ; Malfacilas eĉ priskribi du belulojn, indan paron: ; Dentoj kiel perloj brilis, lipoj kiel la rozaro; Dolĉa vorto elirigas la serpenton el la kavo.

'892 Avtandil' aldiras: "Helpos mi per korpo kaj animo, ; Nur vi kontraŭ vi ne agu, tio estas fia krimo, ; Sen la pensoj de saĝuloj ja ne taŭgas ia scio, ; De trezoro forkaŝita ĉu sentebblas la utilo?"

'893 "Nur malhelpas kaj difektas malespero kaj ĉagreno. ; Se ne volas providenco, do neniue aŭdas ĝemon. ; Eĉ la rozo dum tri tagoj volas vidi sunaperon. ; Estu certa – dio sendos al vi venkon kaj sukceson".

'894 Diris Tariel': "Mi dankas, la konsilo al mi plaĉas, ; Saĝa amas instruiston kaj malsaĝa lin malŝatas; Min mirigas viaj vortoj, ĉar vi mem sopiron havas. ; Ankaŭ vin bruligas amo, sed akuzi vi kuraĝas.

'895 ' En la fajro abelvakso ja degelas kaj fandiĝas, ; Sed la fajro akvon timas, ĉar la akvo ĝin estingas. ; Ni kompatas en alia, kio nin mem maltrankvilas. ; Kial vi do ne komprenis, kio mian koron ŝiras?"

, & La rakonto de Tariel', kiel li mortigis leonon kaj tigrinon:

'896 "Mi rakontos pri eventoj sen mensogo kaj mistiko, ; Poste juĝu min, ho, frato, juste, saĝe, laŭ konvinko. ; Malrapide pasis tagoj, mi atendis vin, amiko, ; Sed ne povis hejme sidi – migri volis pro aflikto.

'897 ' Preterpasis mi densejojn, inter montoj sole iris, ; En la valo la tigrinon kun leono mi ekvidis; Ŝajnis al mi, ke la bestoj kiel homoj amikiĝis, ; Sed mi ŝanĝis opinion – la fiaĵo min mirigis.

'898 ' Do la bestoj sin amuzis kaj komence sen kolero, ; Per piedo batis unu, dua ĵetis ĝin sur teron, ; La tigrino sin defendis – la virina karaktero, ; Sed kolero de leono restis do por mi mistero.

'899 ' "Vi fibesto estas vera!" kriis mi al la leono, ; "Vi ofendis amikinojn, tio estas ja malgloro". ; Mi atakis la leonon kaj kondamnis ĝin al morto – ; Mi per glavo forte batis kaj forlasis ĝin la mondon.

'900 ' Ĵetis mi la glavon teren per la varma sang' kovritan; Volis kisi mi tigrinon kaj memoris amon mian, ; Tamen muĝis kaj gratvundis min tigrino malhumila ; Kaj ne perdis paciencon, min kolero kaptis tiam.

'901 ' Trankviligi la tigrinon mi sendube vane penis, ; Do strangolis mi la beston kaj kolere teren ĵetis; Kun Nestan' kverelo nia en memoro reaperis, ; Kaj mi miris, ke mi ploris – mi apenaŭ viva restis.

'902 ' Jen, amiko, la rakonto pri senĉesa mia plago, ; Ĉu por vi ĝi estas stranga, ke mi tute perdis kapon? ; Adiaŭas mi kun vivo, morto prenu la pekanton". ; Kaj povrulo ekplorinte finis sian rakontadon.

'903 Kune ploris la arabo, falis larmoj pro kompatato; Li konsolis: "Paciencu, estu forta, mia frato. ; Dio amon ja valoras, li ĝin provas nun per plago. ; Se li volus vin disigi, ne alsendus li la amon".

'904 "Plago kaj sopiro oftas en la vivo de miĝnuro; Kvankam li komence ploras, poste lin vizitas suno. ; Nin al morto proksimigas ofte ama aventuro, ; Ĝi saĝulon faras stulta, kaj instruas malsaĝulon".

, & Rakonto, kiel kavaliroj alrajdis la kavernon, kie ili renkontis Asmaton:

'905 Poste ili trankviliĝis kaj ekvojis al kaverno, ; Kaj Asmat' ekĝojis ege, ekvidinte la revenon. ; Ĝojaj larmoj de l' rakonto plibeligis tiun scenon, ; Ĉiuj interkisis frate kaj foriĝis la ĉagreno.

'906 Ŝi ekkriis: "Mia dio, en la lingvo mankas vortoj, ; Por vin glori pro boneco, pro sendita luma ĝojo, ; Kiel povus mi eldiri mian dankon al sinjoro, ; Ke ne lasis li min morti en soleco sen konsolo".

'907 Taniel' respondis: "Tial multe ploris mi, fratino, – ; Pagas ni per nia ploro, por antaŭa gaja rido; Tia estas leĝ' de l'mondo jam konata de antikvo. ; Mi bedaŭras vin, sed morto por mi estas aĉa fino.

'908 ' Ĉu elverŝas akvon vane ege soifanta homo? ; Kial miaj du okuloj larmas de senĉesa ploro? ; Murdas nin la senakveco – ie estas freŝa fonto, ; Ve, mi perdis ekflorintan junan rozon kaj perl-oron".

'909 Ankaŭ Avtandil' memoris sian sunan ĉarmulinon, ; Diris li : "Ho, amatino, sen vi splenas la animo, ; Malproksimas la patrio, mi ne vidas la reĝinon; Se vi povus scii, kiel min turmentas korinklino".

'910 "Kiel povas rozo pensi, ke sen suno bonas vivo? ; Kio estos, se la sunon ni entute plu ne vidos? ; Koro, estu forta kiel roko sur montardeklivo – ; Eble vidos vi la amon kaj ne estos la viktimo".

'911 Eksilentis ili, tamen flamo brulis en interno. ; Poste ĉiuj tri ekspiris kaj eniris la kavernon. ; La mastrino sur la plankon lerte sternis tigran felon; Eksidinte, kavaliroj plu daŭrigis la konverson*.

'912 Vespermanĝa estis tempo, ŝi fritostis la ĉasaĵon, ; Sed kalikoj tie mankis, sen pan' estis la manĝaĵo; Kiam Taniel' ricevis la bongustan ĉi rostaĵon, ; Eĉ peceton kiel draĥmo li ne glutis la nutraĵon.

'913 Bone, kiam hom' konfidis koron al la kompanio, ; Kaj eldiras, kio premas, sen hezita afekcio. ; Faciligas tio plagon kaj estingas incendion; La feliĉo estas granda liberiĝo de nescio.

'914 Du leonoj kune estis en kaverno dum la nokto; Paroladis la herooj, ĉiu pri la propraj zorgoj. ; Mateniĝis, sed ne decis en kaverno soni vortoj, ; Kaj ripetis ili ĵuron – kune lukti por la gloro.

'915 Taniel' eldiris tiam: "Ne necesas la konfeso – ; Ĉar al mi faritan bonon vin nur dio rekompensas. ; Mi nur ĵuras al vi, frato, ĵuro estas la fortreso, ; Ni mirindan amikecon ne fordonu al forgeso.

'916 ' Nun aŭskultu mian peton, vi ja estas mia frato; Fajron, kiu min brulegas, sendas la kruela fato, ; Kaj ne povas ŝin atingi via helpo nek kompatato. ; Vi revenu tien, kie vin atendas via astro.

'917 ' Malfacile min kuracus la kreinto, des pli – homo. ; Tial ĉiujn mi evitas kaj vagadas mi – fantomo; Mi antaŭe agis saĝe, ne necesis la admono. ; Nun kondukas mi freneze, ne havante propran domon".

'918 Avtandil' al li respondis: "Kion povas mi rediri? ; Ja vi mem antaŭnelonge vortojn de saĝulo citis. ; Dio nepre vin kuracos, vian vundon li jam vidis; Ĉiopova plejaltulo ĉion kreis kaj kreskigis.

'919 ' Ĉu li kreis vin por tio, ke turmentu vin pasio? ; Ke vi nur senĉese ploru, ne vidante la feliĉon? ; Ĉu miĝnuro iu iam ne suferis pro disiĝo? ; Mi ne kredas, ke vi mortos kaj la amon ne revidos.

'920 ' Vera viro, antaŭ ĉio, kontraŭstaras al la spleno, ; Lin ne rompas malfeliĉo, li ne timas mortalvenon; Dio estas malavaro kaj la mondo miskompreno. ; La konsilojn ne aŭskultas kaj ne lernas nur azeno.

'921 ' Finaŭskultu, kiam homo al vi diras saĝan penson; Petis mi la sunon mian doni por foriri' permeson. ; Mi parolis: "Mia koro nur malvarma cindro restos, ; Se amikon mi ne helpas, forgesinte fidelecon."

'922 ' Ŝi min laŭdis: "Ravas via bonkoreco kaj kuraĝo; Fideleco kaj helpemo al mi kaj al ĉiu plaĉos". ; Mi foriris kun permeso, kiel min konsilis saĝo. ; Kion diros mi veninte sen rezultoj en palacon?

'923 ' Vi aŭskultu kaj komprenu tre utilan paroladon, ; Nur la saĝa homo povas venki malfavoran faton. ; Rozarbusto ja ne floras sen la suna radiado. ; Se vi mem al vi ne helpas, mi subtenos kiel frato.

'924 ' Estu tie, kiel volas, vivu tiel, kiel povas, ; Se vi volas – agu saĝe, kiel mi al vi parolas, ; Tamen estu ĉiam rekta, mi ekzemplon al vi donas, ; Nur ne mortu, estu forta, kiel dio nin ordonas.

'925 ' Mi nur petas - vi ĉi tie min atendu unu jaron; Mi revenos, kolektinte ĉiuloke la novaĵon. ; Tempo, kiam rozoj floras, estos la reven-signalto; Atentigu vin rozfloroj, kiel fora hundbojado.

'926 ' Tamen, se mi ne revenos ĝis la tempo konsentita, ; Sciuj – mi sendube mortis kaj mi jam ne estas viva. ; Tiam agu laŭ la plaĉo, kiel diros koro via: ; Se vi volos – povos ĝoji aŭ priplori, kiel indas.

'927 ' Ne ĉagrenu, frato mia, diris mi nur puran veron, ; Forirante, mi ne scias, ĉu mi mortos aŭ revenos, ; Prisilenti mi ne povas – estas homoj ni, ne bestoj; Sorton mian scias dio kaj eterna firmamento."

'928 Taniel' respondis: "Vane mi ne povas al vi tedi; Kio estis jam dirita, ne necesas ĝin ripeti. ; Se amiko ne konsentas, la alia devas cedi. ; Fine ĉio iĝos klara, kio longe min obsedis.

'929 ' Kiam veron vi atingos, vi sendube min komprenos; Por mi tute ja egalas, kia vivo mia estos. ; Kiel vi konsilas – ĉiam tiel mi konduki penas. ; Mi ne scias, kiom longe la solecon mi eltenos".

'930 Parolado jam finiĝis kaj konkludon ili faris, ; Forrajdinte sur kamparon, ili tie iom ĉasis, ; Kaj revenis al kaverno, tie bone vespermanĝis, ; Sed proksimis la disiĝo – tristo ilin ne forlasis.

'931 Ankaŭ vi, leganto, ploru, tio donos faciligon. ; Kion faras homoj, kiam koroj perdas interligon? ; La disiĝo ofte povas kaŭzi morton por amiko. ; Kiu tion ne travivis, ne komprenos li aflikton.

'932 Mateniĝis kaj denove ili frate interkisis, ; Avtandil', Asmat' kaj hindo al destino nun subiĝis, ; Ploris multe la gefratoj, la disiĝo korojn ŝiris. ; Al leonoj furiozaj kavaliroj nun similis.

'933 Kun ĝemkrioj jen forlasas la kaverton kavaliroj, ; Kaj Asmat', plorante sekvas: "Ho, denove la foriro. ; Ĉielastroj, vi forbrulis de mortigaj sunradioj. ; Nur turmento kaj sufero nun plenigos mian vivon".

'934 Forgalopis ili kune, poste haltis ĉe la maro, ; Solaj estis kavaliroj, mankis nun kunsekvantaro; Nokte ili ne disiĝis, sidis kune ĉe la fajro, ; Pro disiĝo multe ploris tiu ĉagrenita paro.

'935 Avtandil' al frato diris: "Ni ĉesigu nian ploron; Mi ne povas vin kompreni, kial lasis vi Pridonon, ; Mi esperas ĉe li trovi grandan helpon kaj informon, ; Kaj intencas lin viziti, do bonvolu, diri vojon".

'936 Taniel' klarigis vojon al la fora oriento, ;
"Vi necese trovos fraton sur la sama
kontinento. ; Kiam vi lin vidis, diru: "Estas lia
viv' turmento". ; Li sendube vin akceptos kun
amika vera sento".

'937 Kaj malsataj kavaliroj per pafark' mortigis
beston, ; Poste rostis la kaprinon, sed malgaja
restis festo, ; Nokte ili dormis kune – lasta
estis la ĉeesto, ; Fia mondo – ĝi donacas jen
trankvilon, jen tempeston.

'938 Enbrakiĝis kavaliroj, kiam venis ĉielruĝo,
; Eĉ en hom' kun ŝtona koro tio vekus la
kortuŝon; La river' da larmoj fluis antaŭ ĉi
perforta fuĝo. ; Staris rekte Brust' al brusto du
miĝnuroj sen rifuĝo.

'939 Nun aliris ili lokon, kie kreskis
kanarbaroj, ; Ĉagreniĝis fratiĝuloj kaj elŝiris
siajn harojn. ; Tre kortuŝe do disiĝis du
junuloj, veraj fratoj, ; Unu la alian kisis,
svingis longe per la manoj.

& La foriro de Avtandil' al Pridon':

'940 Kial efemera mondo nin skuadi vi
fervoras, ; Ĉiu, kiu vin konfidis, kiel mi amare
ploras, ; Vi ĵetadas homon ĉien, lian volon vi
ignoras, ; Repuŝitan de vi homon sola dio nur
favoras.

'941 Avtandil' amare ploras, aŭdas lin eĉ la
ĉielo: ; "Ploris mi en Arabio, nun mi ploras en
la selo, ; Grava estis renkontiĝo kaj pli
malfeliĉa celo; Estas granda diferenco inter
homoj sur la tero".

'942 Kavalir' denove ploris, sangajn larmojn
lekis bestoj, ; Persekutis lin memoroj, tondraj
fulmoj kaj tempestoj, ; Tinatin' lin suferigis,
sentis akre li foreston. ; Kristalvitraj dentoj
brilis en la roza vanga nesto.

'943 Roza branĉo jam sekiĝis kaj kliniĝis la
cipreso, ; La smeraldo kaj rubeno plu ne havis
jam sukceson, ; Tamen diris kavaliro: "Morto
estas la perverso, ; Perdus mi la karan sunon,
malpleniĝis universo".

'944 Avtandil' al suno diris: "Jen mi vin kun ŝi
komparas – ; Ambaŭ vi radias brile, ambaŭ
tagon luma faras. ; Min ĝojigas la aspekto,
kiun vi ĉiela havas; Tamen malgraŭ via ardo
kial koro nun malvarmas?"

'945 "Se la suno malproksimas, ĝi malvarmon
al ni sendas; Kion devas tiu fari, kiu eĉ du
sunojn perdas? ; Ne ĉagrenas nur la roko, ĉar
nenion ŝtono sentas; Vundon ne kuracas lanco,
ĝi nur tranĉas kaj difektas".

'946 Vojaĝanto plu parolis: "Suno, estas vi
reĝino, ; Mi vin gloras, ĉielkorpo, ĉiopova vi
diino! ; Vi altigas deprimitajn kaj donacas la
feliĉon, ; Ne disigu min de amo, ne forprenu
tagan brilon".

'947 "Ho, Zual* – Saturno, venu, la ĉagrenon
proksimigu, ; Nigre farbu mian koron, kaj
nebulon plimultigu, ; Kiel ŝarĝo sur azeno –
malfeliĉon al mi ligu; La reĝinon ekvidinte –
"Nur pri vi li ploras", diru".

'948 "Ho, Muŝtar*, vi Jupitero, dia estas vi
juĝisto, ; Faru ĉie, kie povas la justecon kaj la
virton, ; Ne pravigu la fiulon, kaj ne peku per
animo, ; Kaj komprenu min – vunditon,
malproksima lumigilo".

'949 "Ho, Mariĥ*, la ruĝa Marso, min trapiku
per la lanco, ; Proksimiĝu al mi lerte, kaj
farbigu min per sango, ; Vi al ŝi rakontu ĉion,
pri amanto kaj pri sklavo, ; Malfeliĉas mi,
povrulo, kaj ne vidas tute savon".

'950 "Aspiroz* - Venero*, helpu, min bruligas
fajro ŝia, ; De rubenaj ŝiaj lipoj estas tute mi
ebria, ; Nur al vi kun danko sentas ŝuldon la
belec' virina, ; Sed min vi freneza faras, poste
lasas min – pasian".

'951 "Otarido*, vi Merkuro, sola vi al mi
similas, ; Suno turnas min, renkontas, poste
tute forbruligas, ; Pri suferoj miaj skribu, se la
inkon vi aplikas, ; Faru ĝin el miaj larmoj, se
min – plumon do utilas".

'952 "Ekkompatu min, vi – luno, kiel vi mi
malpliigis, ; Min la suno maldikigas kaj
denove mi dikiĝas, ; Diru al la amatino, kiel
mi nun malfeliĉas, ; Ke suferas mi ĉi tie, nur
por ŝi solece vivas".

'953 "Jen atestas sep planedoj, kiuj sur ĉielo
vagas; Otarid, Zual' kaj suno, kaj Muŝtar' min
akompanas, ; Aspiroz', Mariĥ kaj suno pro
sufero min kompatas, ; Iru ĉiuj, al ŝi diru, kiel
mi en fajro flamas".

'954 Li al ŝia koro turnas: "Kial vi de larmoj
plenas? ; Ĉu utilon ili donis? Mi vin tute ne
komprenas. ; Scias ankaŭ mi, pri ŝiaj nigraj
haroj mi frenezas. ; Ni eltenu malfeliĉon, ĝoj'
facile tolereblas".

'955 "Se mi restos viva tie, por afero estos bone, ; Do ne taŭgas ĉiam plori kaj plorĝemi senkonsole". ; Li pri sia sano pensis, eĉ ekkantis kanton sole; Najtingalo ŝajnis strigo, tiel kantis bardo dolĉe.

'956 Do aŭdinte liajn kantojn, bestoj el arbar' eliris, ; Pri dolĉeco de la voĉo en river' eĉ ŝtonoj miris, ; Kaj aŭskultis animaloj, ploris, kiam lin ekvidis. ; Liaj kantoj estis tristaj, ĉar pri amo li sopiris.

, & Avtandil' alvenas al Pridon':

'957 Avtandil' jam sepdek tagojn sekvis bordon de la maro. ; Li rimarkis – sur la ondoj proksimiĝas la ŝiparo, ; Kiam ili albordiĝis, li demandis maristaron: ; "Kies estas tiu lando, kian havas kutimfarojn?"

'958 La maristoj lin respondis: "Vi belulo estas vera, ; Al ni ŝajnas vi karulo, homo paca kaj sincera, ; Ĝis ĉi tia limo teroj al la turkoj apartenas, ; Tie komenciĝas lando, kie nin Pridono regas".

'959 "Nuradin-Pridon' ĉi tie estas nia reĝo brava, ; Kavaliro sen makulo – nobla, forta, malavara. ; Junan reĝon kolerigi la najbaroj ne aŭdacas. ; Li patrono nia estas, per radioj sunaj ravas".

'960 Tiam Avtandil' parolis: "Bonaj homoj, miaj fratoj, ; Mi ja serĉas vian reĝon, volas scii lian landon. ; Montru vojon kaj respondu, kiom daŭros la rajdado?" ; Kaj volonte vojon montris al rajdanto la ŝipanoj.

'961 "Al Pridon' vi rajdu rekte, kaj vi en ĉefurbon trafos; Ĝi nomiĝas Mulgazanzar – tie trovos vi palacon. ; De ĉi tie vi cipreso, ĝin atingos post dek tagoj. ; Tamen kial nin brulvundos de beleco via flamo".

'962 Li respondis: "Mi tre miras, ke konkeris mi la korojn, ; Rozoj miaj iĝis vintraj, ili perdis la kolorojn, ; Se vi vidus min antaŭe, dirus vi: "Vi estas oro". ; Tiam mi ornamis homojn, al vidintoj donis ĝojon".

'963 La urbanoj jam foriris, li daŭrigis sian vojon, ; La cipreso tiu svelta havis tamen feran koron; Galopadis li tra kampoj, sed turmentis lin angoro, ; La narcisoj de okuloj donis pluvon pro la ploro.

'964 Ĉiu miris, kiam vidis la belulon – vojaĝanton; Nekonatoj cedis vojon, lin karesis per rigardoj, ; Al li helpis reĝon trovi, agis kiel protektantoj, ; Malfacile adiaŭis, volis esti kunirantoj.

'965 Jen aperis Mulgazanzar, li ekvidis homajn grupojn, ; Ili estis la ĉasistoj kaj krom tio korteguloj, ; Lin ekvidis kaj ĉirkaŭis scivolemaj aliuloj. ; Ili ĉasis, sin amuzis, sonis krioj kaj ululoj.

'966 Li demandis unu junan pafarkiston el la trupoj: ; "Diru, kial tiel bruas kaj kriadas via grupo?" ; Li al Avtandil' respondis: "Ĉasas nia superulo, ; Nia reĝ' – Pridon' tre lertas kaj tre ŝatas ĉi okupon".

'967 Kavaliro tuj direktis al la trupoj la ĉevalon; Kiel pentri la staturon kaj transdoni lian ĉarmon? ; Ja sen li la homoj frostis, lin vidante, sentis ardon, ; Kaj parolkapablon perdis, kiu vidis sveltan kanon.

'968 Sed subite granda aglo ĵus aperis en ĉielo, ; Avtandil' pafarkon prenis, pafis al fluganta celo, ; Ĝin la sago ĝuste trafis kaj ĝi falis sur la teron, ; Li fortranĉis la flugilojn kaj rigardis kun fiero.

'969 Vidis tion la ĉasantoj, lin ĉirkaŭis kaj silentis, ; Ili vidis sur la herbon granda birdo jen falegis, ; "Kiu estas vi?" la homoj lin demandis kaj postsekvis; Ĉiu miris, lin adoris, kaj pri li nur bone pensis.

'970 Kaj Pridon' kun korteganoj staris tie sur monteto, ; Lin ĉirkaŭis kvardek homoj, gardis lin kiel protekto; Avtandil' nun al la reĝo sin direktis kun rideto, ; Tiu miris kaj koleris – lin ekregis malkvieto.

'971 Reĝo sendis sian sklavon: "Kio tie do okazis? ; Vi eksci, kial homoj sen permeso lokojn lasis? ; Sklav' rapide proksimiĝis, tamen mirigita haltis – ; Li ekvidis la cipreson kaj kiel mutulo gapis.

'972 Tamen Avtandil' komprenis, kion li ekscii volas, ; Kaj respondis: "Al la reĝo vi transdoni jenon povas: ; Mi – migrulo lasis hejmon, en la lando, kiu foras; Tariel' – amiko mia, eble reĝo lin memoras".

'973 Sklavo iris tre rapide kaj raportis al monarko: ; "Via reĝa moŝto, tie mi ekvidis la miraklon – ; El ĉielo jen descendis de la sun' kunvojĝanto; Li kun Tariel' amikis, kiu estis via frato".

'974 Ekaŭdinte tiun nomon, reĝo tuj mildigis voĉon, ; Li memoris fratiĝinton, en okuloj brilis roso, ; Per la blovo de la vento prujne kovris lian rozon. ; Unu al alia iris kaj parolis salutvortojn.

'975 Reĝo estis tre kontenta, ekvidinte kavaliron: ; "Diru, ĉu vi estas homo aŭ la suno havas filon?" ; Ĉirkaŭprenis li la gaston kun la ĝojo kaj admiro, ; Ambaŭ de ĉevaloj saltis, ambaŭ montris la estimon.

'976 Brakumadis kiel fratoj, kvankam estis nekonatoj, ; Avtandil' Pridonon gloris, reciproke li la fraton, ; Inter ili plifortiĝis la respekto sen la flato; Sciu, ofte vi ne vidos kune tiajn du titanojn.

'977 Kun Pridon' do egaligi estus vere malfacile, ; Tamen Avtandil' pro virtoj estimindas ja simile. ; Apud suno astroj perdas lumon sur ĉiel' finfine, ; Ĉu kandelo tage lumas? – Nokte ĝi radias brile.

'978 Ambaŭ saltis sur ĉevalojn, por viziti la palacon, ; Oni finis la ĉasadon kaj formetis sagojn, lancojn; Trupoj volis lin ekvidi, bravan kavaliron – gaston.; Ili miris: "Kie kreskis, kiu kreis tiun planton?"

'979 Avtandil' komencis: "Frato, volas mi rakonti ĉion, ; Kial venis mi ĉi tien, forlasinte la patrimon, ; Kial estas mi serĉanto, kia movas min pasio; Diros mi pri via frato kaj pri lia komision".

'980 "Venas mi de Arabio, certe estas indiĝeno. ; Rostevan' do min edukis – saĝa, forta suvereno. ; Avtandil' – jen mia nomo kaj nobela la deveno. ; Oni min estimis ĉie kaj ne kaŭzis la ofendon".

'981 "Foje reĝo min kunprenis por ĉasado sur la kampo; Ni ekvidis Tarielon kaj ekaŭdis la ploradon, ; Miris ni kaj lin alvokis – ne atentis nekonato, ; Kaj mi tiam ne eksciis, kia lin bruligis flamo".

'982 "Lin ekvolis reĝo kapti, al li sendis siajn sklavojn; Nekonato ilin murdis, ne uzinte eĉ la glavon, ; Kaj rapide forgalopis, lasis li por ni nur plagon; Ni por ĉiam memorfiksis malfeliĉan tiun tagon".

'983 "Estis reĝo ofendita, ke ne povis kapti viron, ; Sur ĉevalo sin direktis, por ekvidi kavaliron, ; Tariel' ekvidis reĝon, sed ne volis renkontiĝon, ; Kaj forkuris sur ĉevalo, ne doninte la klarigon".

'984 "Ni lin serĉis, sed ne trovis, pensis – li diablo estis, ; La nescio lin turmentis, reĝo nia tre ĉagrenis, ; Do toleri ni ne povis – la serĉado tre necesis, ; Dum tri jaroj mi vagadis, lin persone ĉie serĉis".

'985 "Dum tri jaroj mi ne dormis, sentis min en la forpelo; Homoj de la Ĥatalando helpis veni al la celo, – ; Trovis mi la rozon palan – homon en la tigra felo; Li ekamis min, karesis kaj nin ligis fora stelo".

'986 "Li de Devoj liberigis la kavernon per batalo. ; Vivas sole kun fratino, en ŝi vidas sian savon, ; Sed senĉese lian koron neniigas arda flamo, ; Kaj de la perdita amo restas li eterna sklavo".

'987 "Sole ploras en kaverno, atendante lin virino; Li alportas la ĉasaĵon kiel besto al la idoj, ; Ne toleras li la homojn, estas povra li ermito, ; Kaj malamas la homaron senespera kondamnito".

'988 "Li ne konis min antaŭe, sed konfidis al mi ĉion, ; Kaj rakontis pri la amo, pri tragika historio; Amatinon li ne vidas kaj mortigas lin pasio. ; Ĉion diri mi ne povus per la lango kaj racio".

'989 "Kaj senhalte li vagadis kiel luno inter nuboj, ; Sur ĉevalo via sidas, tamen sentas li enuon, ; Kiel besto estas sola, ne toleras homan bruon, ; Mi ne povis al li helpi, nek kuraci lian vundon".

'990 "Fajro de la kavaliro nun bruligas kaj mi ploras, ; Pro kompto al miĝnuro koro mia jam eksplodas. ; Mi ekvolis serĉi lokon, kie lia amo loĝas. ; Poste mi revenis hejmen kaj la reĝo min riproĉas".

'991 "Mi denove volis rajdi, sed la reĝo ne permesis, ; Mi forlasis trupojn miajn – ili al la reĝo plendis, ; Kaj sekrete mi foriris, Rostevanon tre ofendis. ; Fine trovis mi amikon kaj al brusto lin alpremis".

'992 "Pri interfratiĝo via, Tariel' al mi parolis, ; Nun mi estas tre feliĉa, ke mi vin sukcese trovis, ; Kie lian sunon serĉi, la konsilon li ne donis, ; Ŝi ja estas sunvirino, ŝin vidante ĉiu ĝojis".

'993 Kaj Pridon' aŭskultis ĉion, kion ĵus rakontis gasto. ; Ili ambaŭ ĉagreniĝis kortuŝitaj de kompto; Ploris koroj kaj memoris la amikon, lian plagon, ; Rozoj – vangoj malsekiĝis, ĉar ellasis akvon lagoj.

'994 Ankaŭ trupojn la malĝojo kiel mara ond' inundis; ; Unuj ŝiris siajn vestojn kaj aliaj sin gratvundis. ; Jam Pridon' sep jarojn solis, la amiko ne apudis. ; "Estas mondo ne fidinda kaj trompema" – li konkludis.

'995 "Tariel', vin dece glori mi ne povas, mankas vortoj, ; Suno estas vi por tero, ordon faras el senordo, ; Al la proksimumoj donas vi la ĝojon kaj konsolon, ; Vi por vojaĝantoj estas lumigilo dum la nokto".

'996 "Kiam ni disiĝis, frato, malŝatata iĝis vivo; Eble vi min eĉ forgesis, tamen mi memoras ĉion. ; Mi sen vi ne vivas gaje, tagoj perdas sian brilon, ; Tuta mondo malpleniĝis kaj postrestis apatio".

'997 Reĝo Pridon' tiujn vortojn elparolis kun lamento; Poste ili trankviliĝis, plu vojaĝis en silento. ; Avtandil' elvokis raven, ĉiu diris komplimenton. ; Nigrajn lagojn li modeste kovris per giŝer-tegmento.

'998 Jen enrajdis ili urbon, ĉie regis la soleno; Avtandil' palacon pompan jen ekvidis en ĝardeno. ; La servistoj belvestitaj nun preparis la festenon, ; Kiu vidis Avtandilon, tiu ĝojis pro alveno.

'999 Enirinte la palacon, ili metis la mantelojn; Nobeluloj po cent homoj staris flanke kiel steloj, ; Avtandil', Pridon' apude sidis inter la nobeloj, ; Kristalvitro kaj rubeno hele brilis kun juveloj.

'1000 Ili sidis ĉe la tabloj, manĝis, drinkis ĝis la fundo, ; Mem Pridon' regalis gaston, verŝis vinon en abundo. ; Sur la tablo estis ĉio, ne priskribos tion plumo; Ĉiu volis vidi gaston, pensis, ke li estis suno.

'1001 Kaj festeno daŭris tagon, nur matene ĝi finiĝis; Poste Avtandil' sin banis kaj Pridon' al li dediĉis ; La donacojn – per sateno altvalora lin vestigis, ; Zonis lin per ora zono, ĝi neordinare brilis.

'1002 Avtandil' ĉi tie restis kelkajn tagojn kiel gasto, ; Ludis kun Pridon' kaj ofte ili partoprenis ĉason. ; Ĝuste trafis li la beston, eĉ dum flugo la anason, ; En pafado kavaliro ja ne sentis embarason.

'1003 Poste gasto diris kore al gastema sia mastro: ; "Estas mi ĉe vi feliĉa, hele brilas mia astro, ; Tamen devas mi foriri kaj plenumi mian taskon; Kvankam premos min disiĝo, min atendas fora vasto".

'1004 "Kredu, frato, malfacile estas nun de vi foriri, ; Sed en mi ja brulas fajro, ĝin mi volas neniigi, ; Mi ĉi tie vane restos, devas celon mi atingi, ; Kie serĉi sunvirinon – jen mi petas vin konsili".

'1005 Reĝ' respondis: "Mi ne povas al la gasto kontraŭdiri, ; Scias mi, donita vorto nur devigas vin foriri. ; Dio estu la helpanto la virinon nepre vidi, ; Sed kun kiu en soleco povos mi sen vi amiki?"

'1006 "Mi ne povas vin retenigi kaj vin fari mensogulo; Tamen mi al vi donacos sklavojn kaj ĉevalon, mulon. ; Ili portos vian ŝarĝon kaj ne estos vi solulo. ; Tiel povos vi vojaĝi sen danĝeraj aventuroj".

'1007 Kaj Pridon' al kavaliro kvar fidelajn sklavojn donis, ; Li donacis la kirason – vojaĝanto ĝin bezonis, ; Kaj da oro sesdek litrojn* plene doni li ordonis, ; Fine belan rajdĉevalon al la gasto li proponis.

'1008 Oni ŝarĝis fortan mulon per diversa utilaĵo; Avtandilon akompanis reĝo Pridon' kun havaĵo. ; Jam proksimis la disiĝo kaj li diris dum vojaĝo: ; "Sen vi, suno, ĉe ni restos de la vintro la domaĝo".

'1009 Pri forraĵo inter homoj disvastiĝis onidiro, ; Kaj kunvenis la urbanoj, amasiĝis la vendistoj. ; Ili ploris, en aero laŭte sonis plendaj krioj; ; "Ni funebru, ĉar alvenis tempo de la sunsubiro".

'1010 Ili lasis la ĉefurbon, vidis bordon de la maro, ; Tiun saman lokon, kie albordiĝis la boato, ; Tie fluis sanga rojo el lageto de la larmoj. ; Tie ĉi Pridon' rakontis pri virino kaj la sklavoj:

'1011 "Jen ĉi tie mi rimarkis en boato sunvirinon, ; Nigrokulan, eburdantan, rubenvangan la diinon; Mi haltigis la ĉevalon, volis kapti ĉarmulinon, ; Tamen negroj min rimarkis – ilin glutis malproksimo".

'1012 Enbrakiĝis ili forte kaj amare verŝis larmojn, ; Interkisis kaj denove en la koroj brulis flamoj, ; Poste viroj adiaŭis kaj disiĝis kiel fratoj, ; Kaj Pridon', restinte sola, longe svingis per la manoj.

& Forveturo de Avtandil' por serĉado de Nestan-Dareĝan' kaj renkontiĝo kun la karavano:

'1013 Al la plena lun' similas vojaĝanta ĉi persono, ; Tinatin' en rememoroj al li donis grandan ĝojon, ; Kaj por si li gaje flustras: "Kial nin disigis sorto? ; Nur vi havas kuracilon por sanigi mian koron.

'1014 ' Forbruligas min tri flamoj de frateco – amikeco; Kial mia koro forta disrompiĝis en tri pecojn? ; Unu frap' ne povas fari eĉ tri vundojn per intenco. ; Estas vi la sola kaŭzo de amaraj miaj sentoj".

'1015 Avtandil', kvar sklavoj kune, rajdas laŭ la mara bordo, ; Serĉas li por la amiko la balzamon, vivo-fonton; Tage, nokte li nur ploras, sed ne perdas la volforton, ; Pensas, ke ne indas multe la pekanta tiu mondo.

'1016 Avtandil' demandis ĉiun renkontitan vojaĝanton ; Pri Nestan' – kaptita suno. Tiel pasis jam cent tagoj. ; Li leviĝis sur monteton kaj ekvidis karavanon, ; Staris tie sur la sablo ĉagrenitaj komercantoj.

'1017 La kameloj, negocistoj staris ĉe la blua maro; Ili tre maltrankviliĝis, ĉar valorajn havis varojn, ; Kavalir' saluton donis al la riĉa personaro, ; Kaj demandis: "Ĉu vi estas posedantoj de ĉararo?"

'1018 Saĝa hom' – Usam* nomita, estis karavana ĉefo. ; Kavaliron li respondis kiel indas, kun respekto. ; "Vidas mi, vi suno estas, ni bezonas vian helpon; Ni rakontos al vi ĉion, vi nur saltu de la selo.

'1019 ' Ni vojaĝas el Bagdado* sendefendaj komercantoj, ; Ni neniam drinkis vinon, ĉar ni estas islamanoj. ; Ni vojaĝas por negoci al la reĝo de la maroj. ; Sur kameloj niaj kuŝas multaj kaj valoraj varoj.

'1020 ' Sur marbordo ni subite trovis senkonscian homon; Helpis ni malfeliĉulon, li demandis kelkajn vortojn. ; Kaj ni volis scii, kion serĉas li sur mara bordo, ; Li respondis: "Negocistoj, renkontiĝis mi kun morto".

'1021 ' Li rakontis: "Karavano nia venis tra la maro, ; Estis ĝi de Egiptio kaj transportis juvelaron, ; Puŝ-frakasis nian ŝipon la piratoj per la trabo, ; Jen mi restis duonmorta kaj pereis kamaradoj".

'1022 ' Vi, leono kaj la suno, tial haltis ni ĉi tie; Malprofito nin atendas, se revenos senutile. ; Ja ne povas ni daŭrigi nian vojon do trankvile, ; Ni timegas la piratojn kaj atendas sendecide".

'1023 Li respondis: "Malespero tre malhelpas al eskorto; Tion ne evitas homo, kion sendas al ni sorto, ; Mi promesas vin defendi kaj ne ŝpari mian forton, ; Se atakos min piratoj, ilin do atendos morto".

'1024 Homoj de la karavano certe restis tre kontentaj. ; Ili diris: "Vojo estos sendanĝera, evidenta, ; Ŝajne estas nekonato en militaferoj sperta, ; Li protektos karavanon, kaj ni restos netuŝeblaj".

'1025 Fornavigis ili kune kun kuraĝa kavaliro, ; Plu ne timis komercistoj la atakon de vampiroj, ; Sed aperis sur la ondoj flagoj de rabistaj viroj, ; Havis ŝipo pezan trabon por la mara militiro.

'1026 La piratoj laŭte kriis kaj trumpetis en aero, ; Sur boato komercistoj treme sentis la danĝeron. ; Avtandil' kuraĝe diris: " Havu, fratoj vi esperon, ; Neniigos mi piratojn, kaj ne vidos ili teron".

'1027 "Se ne volos providenco – ne meritos mi laŭdegon, ; Eĉ se min atakos trupoj, de planedo amasego, ; Kaj ne estos destinita, min ne savos eĉ sinrego. ; Kiu tion scias bone, ne agnoskos li timegon".

'1028 "Negocistoj, vi ja estas ne stultuloj, nur timuloj ; De la saĝoj vi vin kaŝu, ĉie en boatanguloj. ; Kiel sole mi batalos, vi observu per okuloj. ; Vidos vi, ilian ŝipon kolorigos sangaj gutoj".

'1029 Prenis li bastonon feran, glavon, lancon kaj la ŝildon, ; Sur la pruo de la ŝipo li atendis malamikon, ; Frapis lerte la piratojn per terura li armilo, ; Sub la batoj de la glavo ili ĝemis en paniko.

'1030 La piratoj – marŝtelistoj grakis kiel la kornikoj, ; Ili volis uzi trabon, faris tion ne sen risko, ; Avtandil' per fera stango ne allasis la trapikon, ; Dekstren kaj maldekstren frapis, defendante la amikojn.

'1031 Avtandil' la trabon rompis, la boaton sian savis, ; La rabistoj ektiminte baldaŭ retiriĝi planis, ; Tamen tio ne sukcesis, nun ilia ŝipo knaris; Kavaliro ĉiujn punis kaj piratoj maren falis.

'1032 Murdis li la marrabistojn kiel en arbar' kaprinojn, ; Kelkajn de la ŝip' forpuŝis, ili dronis kun la krio, ; Ok piratojn sur dek frapis, estis tio aĉa fino, ; Kaj en mar' vunditoj falis, dronis kiel la viktimoj.

'1033 Avtandil' sukcese venkis, savis li la karavanon, ; Kaj restintaj kelkaj petis: "Nin ne murdu, svelta kano!" ; Grandanime li ne tuŝis la petintajn nur ŝipanojn, ; Vere diris apostoloj: "la timego naskas amon".

'1034 Homo, ĉesu fanfaroni pri la forto via granda, ; Forto estas senutila, ĉar sen dio restas vanta, ; Dikajn arbojn forbruligas la fajrero eĉ malgranda; Se mem dio vin protektas, via frapo estos grava.

'1035 Avtandil' sur tiu ŝipo trovis multe da bonaĵoj. ; Li kunigis la boatojn, prenis militakiraĵojn. ; Do tiam multege ĝojis, ekvidinte heroaĵon, ; Sian dankon kore diris, nomis tion mirindaĵo.

'1036 Por kantglori Avtandilon oni devas scii lingvojn, ; Eĉ mil lingvoj ne sufiĉus por priskribi batalinton, ; "Glor' al dio! laŭte kriis la povruloj al savinto, ; "La malhelan nokton ŝanĝis suno hela kaj la virto'.

'1037 Negocistoj lin ĉirkaŭis, kisis la piedojn, manojn, ; Lin laŭdegis el la koro, malavaris la donacojn, ; Eĉ saĝulo, lin vidante, perdis la parolkapablon ; Ili diris: "Ni, povruloj, liberiĝis de l'minaco".

'1038 Kavaliro nun al dio diris dankon kun la sento: ; "Kreis li en universo ĉiopove ĉiun enton, ; En ĉielo registriĝas ĉiu fakto kaj evento, ; Kaj saĝulo kredas tion per la scio kaj prudento.

'1039 ' Ni – la homoj antaŭ dio havas devon do en vero, ; Mi persone estas polvo, povra parto de la tero, ; Nun mi murdis malamikon kaj forigis la danĝeron, ; Kaj trofeojn mi ricevis – ŝipon plenan de perleroj".

'1040 Bone, kiam kuraĝulon vidas dio – la kreinto. ; Kiam li elstaras inter la aliaj batalintoj. ; Ili gloras lin – venkinton, ĉar mem estas la venkintojn; Plibeligas lin armilo, kiam estas li vundito.

'1041 Ili ŝipon de piratoj tuj esploris sen prokrasto, ; Trovis tie la trezoron, kiun ŝutis en la sakojn, ; Kaj al si transportis ĉion, lasis nur la feran ankron. ; Poste ili forbruligis fian ŝipon de piratoj.

'1042 Kaj Usam prononcis vorton je la nomo de aliaj: ; "Estas forta via koro, sed tre molaj ŝajnas niaj, ; Ĉio, kien ĉi ni havas, kompreneble estas via, ; Se vi donos al ni ion, ni dankemaj restos ĉiam".

'1043 Avtandil' respondis kurte: "Fratoj, havu paciencon, ; Viajn larmojn vidis dio, li plenumis la justecon, ; Vin sendube savis dio, mi nur faris la komplezon, ; Do por mi sufiĉas ĉiam la ĉevalo kaj la selo.

'1044 ' Se dezirus mi riĉaĵon, ĝin mi havas en patrio: ; La tapiŝojn, la teksaĵojn – ĉion por la ambicio. ; Ne necesas por mi oro, senutilas por mi scio, ; Havas mi alian devon, konas mi abnegacion.

'1045 ' Estu vi trankvilaj ĉiu – mi ne prenos valoraĵon, ; Prenu ĉiu, kion volas laŭ deziro kaj la plaĉo. ; Sed mi havas unu peton kaj facilas plenumado. ; La afero mia dume ne permesas la malkaŝon.

'1046 ' Dume diru al neniu, ke mi estas sikario; Diru, ke mi estas simple negocisto laŭ metio, ; Mi min vestos kiel membro de vendista familio, ; Vi konservu la sekreton, plu deziras mi nenion".

'1047 Ĉiu estis tre feliĉa en savita karavano, ; Ĉiu al li diris dankon: "Preĝas ni por via sano; Por ni estas vi heroo, ora suno, svelta kano, ; Al vi servas ni kun danko, vi meritas grandan amon".

'1048 Do daŭrigas la vojaĝon, plu navigis la boato, ; Taros* donis bonan venton, helpis li al vojaĝantoj, ; Gloris ili Avtandilon kaj forgesis pri piratoj, ; Kaj prezentis al heroo la perlerojn sen la flato.

, & Rakonto pri tio, kiel Avtandil' venis Gulanŝaron:

'1049 Avtandil' transŝipis maron kaj ekvidis Gulanŝaron*, ; Ĉirkaŭitan de ĝardenoj, arbaretoj kaj arbaroj; Multkoloraj floroj floris, kreskis pompe arbetaroj; Pri beleco de la urbo miris tuta ŝipanaro.

'1050 Tri ŝnuregoj forte ligis la boaton ĉe ĝardeno; Komercistan veston portis Avtandil' dum la alveno; Alrapidis tuj ŝarĝistoj, prenis sakojn ĉe rimenoj ; Kaj komencis la komercon kavalir' en la haveno.

'1051 Proksimiĝas al li homo, ĝardenisto kun admiro, ; Avtandilon li rigardis, pensis, estis li veziro; Kavaliro ekparolis, demandadis tiun viron; "Diru, kies hom' vi estas, kiu regas la foiron?

'1052 ' Kaj rakontu pri negoco, kiuj varoj pli valoras, ; Kiel statas ofertado, kio la profiton donas?" ; Ĝardenisto diris simple: La vizaĝo via bonas, ; Do rakontos mi senkaŝe, kion scias mi kaj konas.

'1053 ' Dek monatojn vi bezonas por trairi niajn limojn; Gulanŝaro – la ĉefurbo lumas kiel lumigilo, ; Tra la maro nin vizitas multaj ŝipoj, veturiloj, ; Melik – Surĥav, reĝo nia, estas plena de la brilo.

'1054 ' Rejuniĝas en la urbo eĉ kadukaj maljunuloj; Ni pasigas tempon gaje, ĝuas koroj kaj okuloj, ; Vintre kaj somere floras ĉarmaj rozoj por miĝnuroj. ; Kaj envias al ni ĉiu, kiu konas feliĉulojn.

'1055 ' Negocistoj vendas varojn kaj la monon ili gajnas, ; Iu havas malprofiton, iu monon multe ŝparas, ; Malriĉulo dum monato jam riĉaĵon grandan havas; Oni sendas al ni varojn, kiujn ni ĉi akaparas.

'1056 ' Mi prizorgas la ĝardenon de Usen', vi lin ekvidos. ; Estas li en nia urbo ĉefo de la negocistoj; Lia estas la ĝardeno, apud kiu ankras ŝipo. ; Mi rakontos, ke vi sciu, pri la ordoj kaj kutimoj.

'1057 ' Kiam venas alilandaj negocistoj Gulanŝaron, ; Al Usen' prezentas ili artikolojn, komercaĵojn, ; Li aĉetas por la reĝo la plej bonajn el la varoj. ; Poste oni povas vendi ĉion sen limigoj, baroj.

'1058 ' Devo de la ĉefo estas honorigi dignajn gastojn; Li akceptos vin afable, kiel siajn samlandanojn, ; Nun ĉi tie li ne estas, eble serĉas la ŝipanojn, ; Li solene vin renkontos, ĉar tre amas vojaĝantojn.

'1059 ' Fatma-Ĥatun* hejme estas – de la komercist' edzino, ; La mastrino tre gastema, bonfaranta gajulino. ; Mi informos ŝin pri gasto – ŝi rapide donos signon, ; Kaj akceptos vin afable, por la gasto faros ĉion".

'1060 Avtandil' respondas: "Iru, faru kiel vi nun diris"; Ĝardenisto tre rapide al mastrino sia iris; "Fatma-Ĥatun, estu gaja, mem la suno vin vizitis; Estas eble li saĝulo, helan lumon li radiis.

'1061 ' Li en sia lando estas ĉefo de la karavano, ; Li septaga luno estas, svelta kiel la platano, ; Plibeligas lin vestaĵo kun belega filigrano, ; Li demandis min pri prezoj kaj pri niaj kunurbanoj".

'1062 Fatma-Ĥatun tre ekĝojis kaj alsendis dudek sklavojn, ; Kaj malŝarĝis ili sakojn, plenajn de valoraj varoj; Antaŭ ŝi aperis homo rubenvanga, svelta kano. ; Liaj paŝoj ŝajnis tigras kaj leonaj estis manoj.

'1063 Disvastiĝis onidiro en la urbo Gulanŝaro, ; Kolektiĝis sur la stratoj scivolema junularo. ; Ĉiuj lin rigardis mire, esprimante sian ravon, ; Kaj virinoj ekmalŝatis siajn edzojn post komparo.

'1064 Lin renkontis sinjorino de la urbo Gulanŝaro, ; Ŝi salutis ĉe pordego kun servantoj, sekvantaro, ; Bonvenigis kaj en ĉambron enkondukis lin kun varoj; Ne ĉagrenis pri vizito la mastrino kaj najbaroj.

'1065 Kvankam ŝi ne estis juna, ŝi sufiĉe restis bela, ; Nigrokula, rondvizaĝa, svelta kaj de ĉarmo plena. ; Ŝatis dancojn, gajajn kantojn, drinkis vinon petolema; Ŝin ornamis bela vesto por mastrino tre konvena.

'1066 Kaj vespere Fatma-Ĥatun regaladis karan gaston, ; Li donacis siaflanke la valoran diamanton, ; Do agrabla estis Fatma, multe kostis regalado. ; Por ripozo li foriris post gustumo de la pladoj.

'1067 Li matene montris ĉion, kion havis en la sakoj. ; Por la reĝo elektitaj estis la plej bonaj varoj. ; Flustris li al komercistoj, kiujn savis li en maro: ; "Vi sekreton mian tenu kaj komencu la vendadon".

'1068 Li sin vestis kiel vera negocisto Gulanŝara; Iutempe li invitis la mastrinon malavaran, ; Ofte sidis ili kune kiel paro senkompara; Kiel Vis frenezis Fatma, Avtandil' do estis kara.

,& Amo de Fatma al Avtandil':

'1069 Se nur eblas, pli utilas iri for de belulino; Enŝteliĝos ŝi animen, ebriigos kiel vino, ; Kaj subite vin perfidos, ja konatas ĉi inklino; Do ne fidu, ne malkaŝu la sekreton al virino.

'1070 La pasi' ekregis Fatman, ŝin brulegis arda flamo; Pligrandiĝis la turmento ĉiun nokton, ĉiun tagon, ; Vane penis ŝi sin venki, vane volis kaŝi amon; "Kion fari?" ŝi demandis kaj plenigis larmoj maron.

'1071 "Se al li mi diros ĉion, ĉu li taksos min honora? ; Se silentos mi, ĉu povos mi elteni brulon koran? ; Do mi diros: Eble sorto estos nun al mi favora. ; Devas ni al kuracisto diri, kio nin doloras".

,& Amletero de Fatma al Avtandil':

'1072 Skribis Fatma amleteron tre intiman al amato, ; Ŝi priskribis siajn sentojn kaj senfinan suferadon, ; La leteroj tiaj estas kortuŝeblaj paroladoj, ; Ilin tamen ne disŝiras adoranto kaj leganto.

'1073 "Suno mia, dio kreis vin por esti lumigilo, ; Tamen dum disiĝo donas vi malĝojon en animo, ; Forbruligas via ardo tiujn, kiuj – en proksimo, ; Kaj pri vi fieras astroj, ili ĝuas vian brilon.

'1074 ' Kiu vin ekvidas foje, tiun kaptas ama ardo; Estas rozo vi kaj tamen vi ne havas najtingalon, ; Antaŭ vi forvelkas floroj, velkas ankaŭ mia amo. ; Mi cindriĝos pro sopiro, ne vidante sunan tagon.

'1075 ' Mi leteron skribas time – dio estas atestanto, ; Paciencon mi jam perdis, ho, vi mia deloganto; Viaj okulharoj pikas, vundas koron la rigardo; Savu min de frenezaĵo, mia kara vojaĝanto.

'1076 ' Ĝis alvenos la respondo mi ĉi tie restos viva; Mi esperos, ke min savos ĉiopova forto dia, ; Ĝemas koro, sed ne volas mi forlasi mondon tian; Al mi vivon aŭ la morton donu per letero via".

'1077 Finiĝinte la leteron, sendis ŝi al adresato; Li trankvile ĝin tralegis, al li ŝajnis tio flato, ; "Ŝi ne scias mian koron, ke ĝi plenas jam de amo, ; Havas mi la amatinon, ne bezonas amrilatojn".

'1078 Kaj li diris:"La korniko de la rozo kion volas? ; Sur la rozo najtingala trilo dume ne sonoras. ; La flataĵo ĉiam kurtas, finrezulton ĝi ne donas, ; Kian ŝi absurdon skribas, povas esti ŝi mensogas".

'1079 En kor' li mallaŭdis Fatman kaj ne donis la konkordon, ; Li eĉ volis ŝin mallaŭdi pro perdita ŝia honto, ; Poste ŝanĝis pozicion, li pripensis siajn vortojn ; Kaj konkludis: "Povas esti, helpos ŝi al la klopodoj.

'1080 ' La virino ĉion konas kaj ŝi vidas multajn homojn, ; Tiun lokon ja vizitas de ŝipanoj tuta hordo, ; Por atingi celon mian, havos mi kun ŝi konkordon, ; Por mi ŝi utila estos kaj malfermos al mi pordon.

'1081 ' Se virino iun amas, ŝi forgesas tutan mondon, ; Ŝi ne timas malhonoron, ŝi ne sentas eĉ la honton. ; Ŝi konfidas la sekretojn, ne avaras pri informoj, ; Do pli bone ne kvereli, sed eluzi tiun forton.

'1082 ' Ĉar nenio ja sukcesas, se ĉielo ne favoras; Bezonaĵon mi ne havas, posedatan ne bezonas, ; Tiu mond' krepusko estas, oni tian ĝin ekkonas; Kio estas en la kruĉo, ĝi nur tion verŝe donas".

,& La letero de Avtandil' al Fatma:

'1083 Skribis li al ŝi respondon: "Legis mi leteron vian, ; Vi plifruis amkonfesi, ĉar mi mem tre amas vin jam; Kiel vi, mi ankaŭ volas, ke ni kune estu ĉiam, ; Renkontiĝo do okazos, ĉar ni havas amon pian".

'1084 La leteron ŝi tralegis kun la ĝojo kaj plezuro, ; Kaj respondis: "De la larmoj vi sekigis la okulojn; Mi vespere estos sola kaj atendos vin, belulo. ; Post alveno de krepusko iru do al mi, karulo".

'1085 Kiam fine venis nokto, li al rendevu' rapidis, ; Sed de Fatma sklavo venis kaj al kavaliro diris: ; "Ŝi ne povas nun akcepti, petas dume ne viziti". ; Avtandil' ekmiris ege, tamen hejmen ne reiris.

'1086 Invitito ne foriris, kvankam la invit' nuliĝis, ; Li eniris, vidis – Fatma ĉagrenite tie sidis, ; Kaj rimarkis kavaliro – la virin' maltrankviliĝis, ; Penis ŝi ne montri tion, timis kaj nenion diris.

'1087 Sed sidiĝis ili kune, interkisis, ludis, ŝercis, ; Kaj subite juna viro pordon de la ĉambr' malfermis, ; Li eniris kun la sklavo, ŝildon kaj la glavon tenis; Ekvidinte Avtandilon, vir' ektremis, kvazaŭ svenis.

'1088 Nun Fatma' ektimis multe, ŝia korpo time tremis, ; Gasto staris mirigita, fine ĉion li komprenis; "Ne malhelpos mi vin ĝui". Li kolere vortojn ĵetis; "Tamen morgaŭ vi bedauros, ke junulon tiun prenis.

'1089 ' Malhonoris vi min ege, vi malĉasta kunulino, ; Tamen morgaŭ vi ricevos de mi punon, fia ino, ; Jen la ĵuro – mi vin igos vori viajn proprajn idojn. ; Se ne venĝos mi pro tio, kraĉu vi al mi, putino".

'1090 Tiel diris nekonato kaj brufermis forte pordon; Povra Fatma, furiozis, ŝi suferis pro la honto, ; Brue fluis larmoj ŝiaj, kiel el subtera fonto, ; Kaj ŝi kriis emocie: "Superĵetu min per ŝtonoj".

'1091 Ploris ŝi kaj laŭte kriis: "Mi mortigis mian edzon, ; Pereigis mi infanojn miajn per malfideleco, ; Tute perdis mi propraĵon, nomon pro senmoraleco, ; Proksimuloj kaj parencoj min forlasos kaj forgesos".

'1092 Avtandil' tre miris, kvankam li atente ŝin aŭskultis: ; "Ne komprenas mi – virino, kial tiu viro bruis, ; Kial li al vi minacis kaj pri kio li aludis; Trankviliĝu kaj rakontu, kial tiel vi kondutis?"

'1093 Ŝi respondis: "Ho, leono, perdis tute mi racion, ; Ne demandu, kara mia, estas mi en afekcio, ; Mi infanojn pereigis – tio estas tragedio, ; Mi ne kaŝis amon al vi, restas aĉa historio.

'1094 ' Do meritas punon homo, kiu havas longan langon, ; Ne kaŝinta la sekreton, havas truon en la kapo. ; Mi rakontos al vi ĉion, se vi helpos min en plago; Oni ne kuracas homon, kiu trinkas propran sangon.

'1095 ' Mi vin petas, eĉ petegas – estu vi la sikario, ; Vi hodiaŭ nokte murdu Ĉaŝnagiron* antaŭ ĉio, ; Vi min savos kaj infanojn, ankaŭ la reputacion; Post reveno mi rakontos al vi tiun historion.

'1096 ' Se vi lin ne murdos, tiam tuj forlasu Gulanŝaron, ; Vi kunprenu viajn varojn kaj navigu en la maron, ; Miaj pekoj al vi portos malfeliĉon, grandan plagon. ; Min atendas nur perejo, se li faros malbonagon".

'1097 Kiam brava kavaliro la parolon finaŭskultis, ; Li leviĝis de la seĝo, iom pensis kaj konkludis: ; "Ne ekscii tutan veron, tio ja signifas stulti; Sekve pro neceso ŝian peton devos mi plenumi".

'1098 Poste al Fatma' li diris: "Vi nur donu la gvidanton, ; Kiu al mi montros vojon, kie loĝas la blufanto, ; Mi en li ne vidas forton aŭ danĝeran konkuranton, ; Nun mi iras, trankviliĝu, kaj ne venĝos deloganto".

'1099 Fatma donis al li sklavon por almontri rektan vojon, ; Kaj ekkriis: "Malesperon malgrandigis viaj vortoj. ; Sciu donacitan ringon mian portas tiu homo; Vi reprenu ĝin de fingro, kiam la fiulo mortos".

'1100 Avtandil' tra urbo iris, ĉio ŝajnis mirinda. ; Sur la bordo de la maro staris domo, konstruita ; El verd-ruĝaj ŝtonoj belaj, kun balkonoj altlevitaj; Sube estis luksaj ĉambroj, plenaj de meblaro inda.

'1101 Sunsimilan kavaliron alkondukis tien sklavo ; Kaj ekflustris en orelon: "Jen serĉata la verando. ; Tie alte en balkono povas sidi la serĉato; Se ne tie – vi lin trovos ĉi-malsupre en la ĉambro".

'1102 Ĉe la pordo du servantoj kuŝis – estis la gardistoj, ; Ilin kaptis kaj sufokis ŝtelirinta li – murdisto, ; Kapon al la kapo puŝis, tia estis la verdikto, ; Kaj miksiĝis cerb' kun haroj per nur unu lerta svingo.

'1103 Sola kaj kolera kuŝis la junulo en la ĉambro; Avtandil' eniris tien, sur la mano ruĝis sango. ; Kaptis li kuŝanton lerte, lin faligis sur la plankon ; Kaj fortulo tre facile lin mortpikis per ponardo.

'1104 Estis Avtandil' la suno, en batalo tamen besto, ; Ĉaŝnagiran fingron tranĉis por ĝin meti en la keston. ; Poste prenis la kadavron, maren ĵetis tra fenestro; Kaj bezonis Ĉaŝnagiĝo nek la tombon, nek mortveston.

'1105 Tre rapide kavaliro la rivalon neniigis; Ĉio pasis en silento kaj neniu tion vidis. ; Poste Avtandil' al Fatma laŭ la sama voj' reiris ; Kaj de tiam belan rozon jam neniu plu ekscitis.

'1106 Al Fatma' revenis suno, estis forta kiel tigro, ; Diris: "Mi jam murdis tiun, kiu portis oran ringon, ; Sklavo estas atestanto, kiam mi fortranĉis fingron, ; Vidu la ponardon sangan – morta estas Ĉaŝnagiĝo.

'1107 ' Kial estis vi ĉagrena, vi rakontu, mi vin petas, ; Kial li al vi minacis, diru, se rakont' ne tedas". ; Fatma-Ĥatun* surgenue diris: "Vi savinto estas, ; Vi redonis la feliĉon, la ĉielo jam serenas.

'1108 ' Mi kun edzo kaj infanoj renaskiĝis jam denove, ; Vin – leonon devas glori ni sen ĉese ĉiuhore; Ĉar la malamiko nia pli ne agos jam aroge, ; Nun aŭskultu historion, mi rakontos ĝin volonte".

& Fatma rakontas pri sorto de Nestan-Dareĝan':

'1109 "Tago de Navrozo* estas sankta tago en la urbo, ; Ĉar neniu ĉi komercas, nek intencas forveturon; Ĉiu sin belvestas tiam en la silko kaj purpuro, ; La gereĝoj ĉi aranĝas grandan feston kaj konkurojn.

'1110 ' Tiun tagon komercistoj donas al la reĝ' donacojn, ; Ankaŭ reĝo disdonadas la donacojn en palaco, ; Kaj dek tagojn tiam daŭras festo kun kantado, dancoj, ; Por pilkludo, galopado estas tie granda spaco.

'1111 ' Mia edz' Useno gvidas tien famajn negocistojn, ; Sub gvidado mia iras en palacon la edzinoj; Ankaŭ mi prezentas tie la donacojn al reĝino, ; Kaj revenas hejmen gajaj kaj kontentaj ĉarmulinoj.

'1112 ' Estis tago de Navrozo. Kun donacoj ni alvenis; La gereĝoj tre afable en palaco nin akceptis, ; Ankaŭ ili malavaris, kiel al monarkoj decis. ; Ni feliĉaj hejmen iris, poste tie ni festenis.

'1113 ' Vesperigis, en ĝardeno ni distrigis ĝis forgeso, ; Tie dancis ni kaj ludis kaj daŭrigis gajan feston. ; Mildaj voĉoj de kantistoj plezurigis eĉ la menson, ; Mi feliĉa ridis, kantis kaj ŝanĝadis mian veston.

'1114 ' La ĝardeno estis bela, tie staris sveltaj domoj, ; Al la maro direktitaj estis turoj kaj balkonoj, ; Mi kunprenis la ĥatunojn, kie kreskis la ebonoj, ; Kaj disdonis la dolĉaĵojn, rozojn kaj aliajn donojn.

'1115 ' Mi regalis la gastinojn, kiel diktis ambicio, ; Ĉiu sentis sin feliĉa – estis gaja kompanio; Poste mi malbonhumoris, sentis mem ne sciis kion, ; Kaj disiris miaj gastoj, rimarkinte bone tion.

'1116 ' Mi malfermis la fenestron kaj rigardis al la maro, ; Pligrandiĝis la sopiro, sube ŝaŭmis ondetaro, ; Kaj subite mi rimarkis malproksime strangan faron, ; Mi ne povis ĝin rekoni, ĉar malhelpis la malklaro.

'1117 ' Proksimiĝis la boato, ĝi alvenis al la bordo, ; Tri personoj tie sidis kaj similis al fantomoj, ; Du de ili albordiĝis kaj verŝajne serĉis vojon; Ion kaŝis tiuj negroj, eble tio estis homo.

'1118 ' Eltirinte la boaton sur la bordon ĉe ĝardeno, ; Ĉirkaŭrigardinte agis tre singarde tiuj negroj, ; Sed nenie do rimarkis ili homon, nek danĝeron. ; Tamen mi observis ilin, min kaŝinte post kurteno.

'1119 ' Tiam negroj grandan kofron el boato surbordigis ; Kaj malfermis ĝin, de tie belulino jen eliris, ; Estis ŝi en verda vesto, tamen pelerino nigris; Suno povis kontentiĝi, se ĝi povus ŝin simili.

'1120 ' Ŝi sin turnis miaflanken kaj ĉirkaŭe lumis ĉio, ; En la nokto hele brilis ŝiaj vangoj kaj tempioj; Mi fermetis la okulojn kiel antaŭ sunradioj ; Kaj ferminte pordon kaŝe, plu observis la vizion.

'1121 ' Mi ordonis al kvar sklavoj, kiuj staris apud pordo: ; "Ĉu vi vidas kaptitinojn? – negroj prenis ŝin sen honto, ; Iru kaj demandu ilin, kia ŝin alportis ondo, ; Se konsentos ili vendi, ne avaros ni la oron.

'1122 ' Se ne vendos ŝin la negroj, prenu tiam belulinon. ; Vi mortigu nigrajn sklavojn, sed alportu karulinon", ; Miaj homoj estas pretaj tuj forpreni kaptitinojn; Negroj ne konsentis vendi, do ĉagrena estis fino.

'1123 ' Tra fenestro mi ekvidis, ke kverelo komenciĝis ; Mi ekkriis: "Murdu ilin!" – sklavoj peton realigis, ; En la maron ĵeti korpojn senprokraste, mi ja diris, ; Alkondukis ŝin la sklavoj kaj miraklon mi ekvidis.

'1124 ' Malfacile estas diri, kian vidis mi miraklon, ; Se ŝi estis suno, tiam ŝanĝu nomon nia astro. ; Ĉu elteni aŭ priskribi iu povis tian ĉarmon? ; Se lumego min brulegos ne kontraŭos mi al fato".

'1125 Tion ĉi dirinte, Fatma grate vundis la vizaĝon, ; Ankaŭ Avtandil' ne povis plu reteni varmajn larmojn. ; Ili nur pri si forgesis, ambaŭ sentis ŝian varmon, ; Freŝan neĝon de l'vizaĝoj degeligis kora ardo.

'1126 Poste kavaliro petis: "Vi rakontu ĝis la fino". ; Ŝi daŭrigis: "Mi renkontis varme tiun belulinon, ; Mi trakisis ŝian korpon, forte premis al la sino, ; Ŝin sidigis, trankviligis, ke ŝi venku sian timon.

'1127 ' Mi parolis: "Diru, kiu estas vi, radia suno? ; Kien vi kondukis vivon? Ĉu travivis vi teruron?" ; Sed mi vane demandadis – ŝi silentis kiel muro, ; Kaj mi vidis sur la fonton – larmoj fluis el okuloj.

'1128 ' Mi multfoje demandadis, sed silentis ŝi denove; Eble tial ŝi ploregis, ĉar en kofro sidis longe, ; Fluo de narcisoj gutis sur rubenoj ĉiufoje, ; Mi rigardis kaj kompato tuŝis mian koron forte.

'1129 ' Ŝi finfine ekparolis: "Vi patrino estas mia, ; Ĉu rakonto nekredbla estos deca kaj utila? ; Min kondamnis al ekzilo mia sorto tragedia, ; Ne demandu min pri tio – ĉio estis puno dia."

'1130 ' Mi komprenis, ke ne devis tuŝi koron de virino, ; Sunleviĝon plifruigas do neniu kaj nenio, ; Ĉio havas sian tempon, la komencon kaj la finon. ; Por demandoj fruas tempo, kiel mi forgesis tion?

'1131 ' Mi kaŝejon al ŝi donis, havis mi pri tio rajton; Mi apenaŭ povis kaŝi ŝian lumon, radiadon, ; Mi pendigis la kurtenojn densajn, pezajn el brokato; Ŝiaj larmoj falis hajle, rozo frostis de malvarmo.

'1132 ' Mi alportis hejmen sveltan, kiel poplo ĉarmulinon, ; Kaŝis ŝin en unu ĉambro, al ŝi sentis korinklinon, ; Mi konservis la sekreton, diris mi pri ŝi nenion; Ŝin prizorgis unu negro kaj mi faris la vizitojn.

'1133 ' Kion diri, estis stranga de la kaptitin' konduto, ; Tage, nokte ŝi nur ploris, eble timis persekuton. ; Mi petegis: "Trankviliĝu" – ĉio restis sen rezulto. ; Mi sen ŝi hodiaŭ vivas, miaj tagoj – nur tumulto.

'1134 ' Kiam mi vizitis ĉambron, vidis lagojn de la larmoj, ; Ĉirkaŭ la okuloj nigraj pendis la giŝeraj lancoj, ; El inkokoloraj lagoj fluis fonto per kaskadoj, ; Brilradiis perlaj dentoj tra rubenoj kaj koraloj.

'1135 ' Mi ne povis ŝin demandi, ĉar ne ĉesis ŝia ploro; Se mi nur komencis: "Diru, kio premas vian koron?" ; Tuj denove sango fluis ŝpruce el fragila poplo. ; Ĉu eltenus tiom korpo, se ne estus ĝi el ŝtono?

'1136 ' Ŝi ne volis kuŝi mole, litkovrilon ŝi rifuzis, ; Ĉiam sidis en la vesto, eĉ kusenon ŝi ne uzis – ; Metis brakon sub la kapo kaj dormante tiel kuŝis; Post milfoja peto manĝi, nur peceton ŝi forglutis.

'1137 ' Devas al vi mi rakonti, kian portis ŝi vestaĵon; Mi en vivo vidis multe da valoroj raraj aĵoj, ; Sed ne povis mi diveni la konsiston de teksaĵoj – ; Havis ĝi molecon teksan kaj fortecon de forĝaĵo.

'1138 ' Tiel loĝis sunvirino kaŝe kiel kaptitino; Ne konfesis mi al edzo – vendus li la karulinon ; Aŭ rakontus al la reĝo, el ŝi farus kromvirinon. ; Do prizorgis mi ŝin ame, ĉar ŝi nomis min: "Patrino".

'1139 ' Sed mi pensis: "Al la edzo se ne diros mi la veron, ; Kiel povos mi al povra kaptitino doni helpon? ; Kaj se iel li ekscios, li min murdos en kolero, ; Kiom longe mi sukcesos en la ĉambro kaŝi stelon?

'1140 ' Longe pensis mi pri tio kaj ne trovis la eliron; Ĉion diri al la edzo poste faris mi decidon. ; Mi lin petos ĉion kaŝi, li ne faros la perfidon; Se li ĵuros, pri sekreto ne komencos la babilon.

'1141 ' Mi, veninte al la edzo, diris kun kares' kaj flato: ; "Volas mi sekreton diri al vi – mia edz' amato, ; Tamen ĵuru, ke neniu ĝin ekscios iun tagon". ; Kaj li ĵuris: "Kontraŭ rokon mi frakasu mian kapon".

'1142 ' Kion fari? La sekreton mi konservos ĝis la morto, ; Mi silentos kiel ŝtono, donas mi honoran vorton". ; Al Usen' mi diris ĉion kaj aldonis post rakonto: ; "Sekvu min kaj sunvirinon mi al vi, karulo, montros".

'1143 ' Iris ni al ŝia ĉambro, kie sidis la virino; Ekvidinte ŝin, la edzo, eĉ ekstremis de radioj. ; "Ĉu mi vidas ne miraklon?" li eligis ravan krion, ; "Se mi vidas terestaĵon, punu min plejalta dio".

'1144 ' Mi respondis: "Pri virino fakte scias mi nenion ; Kaj ne povas mi rakonti ŝian propran historion. ; Ni demandu la virinon, kian havas ŝi pasion, ; Eble fine ŝi rakontos pri gepatroj kaj patrio".

'1145 ' Mi demandis, sed modesto de l'virino estis granda, ; Diris ni: "Sufero via faras vivon tre amara; Diru, kiel vin kuraci, por vin vidi gaja, klara; Viaj vangoj rozaj estis, nun fariĝas la ŝafranaj".

'1146 ' Mi ne sciis, ĉu komprenis ŝi sincerajn niajn vortojn; Rozpetaloj – lipoj kaŝis perlajn dentojn sen parolo, ; Harplektaĵoj – la serpentoj jen plektiĝis en senordo, ; Drako sunon mallumigis, ni suferis pro angoro.

'1147 ' Tamen restis sen respondo niaj petoj kaj demandoj; Sidis ŝi kiel tigrino malserena en la ĉambro. ; Ŝajnis, ni doloron kaŭzis, ĉar denove fluis larmoj; Ŝi eldiris: "Ne demandu, lasu min kun mia plago".

'1148 ' Ankaŭ ni komencis plori, ne havinte la respondon, ; Kaj bedaŭris, ke denove ni elvokis nur la ploron. ; Ni ŝin petis trankviliĝi, ame montris ni konsolon, ; Kaj proponis manĝi fruktojn – ne akceptis ŝi la donon.

'1149 ' Edzo diris: "Liberigis ŝi min de grandega plago, ; Ĉu la mortemulo povas kisi ŝian sunan vangon? ; Kaj merite ploras tiu, kiun vundis ŝia sago. ; Mi preferas ŝin al ĉiu, diras mi sen ia blago".

'1150 ' Longe ni rigardis sunon kaj foriris malfacile, ; Ni feliĉis, ŝin vidante, adiaŭis kun ŝi triste; Post komercaferoj tagaj ni vizitis ŝin humile, ; Ni pro ŝi forgesis ĉion kaj vivadis maltrankvile.

'1151 ' Do la tempo iris vante, sekvis tago post la tago; Jen la edzo diris: "Longe mi ne vidis la monarkon; Vi permesu preni donojn kaj viziti favoranton," ; Mi konsentis: "Iru, kara, dio estu protektanto."

'1152 ' Li preparis la donacojn - diamantojn kaj rubenojn; Mi tre petis: "Vi silentu, kaj precipe dum soleno." ; Li denove sankte ĵuris: "Havas mi la sindetenon, ; Mi ne diros, eĉ se oni kaŭzos morton kun turmento".

'1153 ' Li aperis en palaco, granda estis la festeno, ; Reĝo kaj Usen' apudis – la kudrilo kaj fadeno, ; Edzo donis la donacon, ĝin akceptis suvereno. ; Tamen ĉiu ebrulo ja forgesas la sinregon.

'1154 ' Reĝo estis ebrieta, drinkis multe da kalikoj; Poste mia edz' aperis, drinkis kun la geamikoj, ; Li forgesis la Koranon, sanktan Mekon* kaj etikon; Al azen' ne taŭgas kornoj kiel rozo al korniko.

'1155 ' Reĝo al Usen' ebria diris: "Ravas viaj gemoj; Kie prenas vi smeraldojn, tiujn perlojn kaj rubenojn? ; Ĵuras mi je mia kapo, vian havas mi subtenon, ; Mi ne povas vin superi per la kvanto de juveloj".

'1156 ' Nun Usen' al la monarko faris belan riverencon: ; "Estas vi ne reĝ', sed suno, donas vi al ni gajecon; Ĉu en ventro de l'patrino mi akiras la riĉecon? ; Ĉio iras de vi, reĝo, kaj de via bonkoreco.

'1157 ' ' Via danko ne necesas por rubenoj, nek por perloj; Estas gemo, antaŭ ĉio nur ja simpla bagatelo; Hejme kaŝas mi virinon, belan, kiel sun' kaj stelo; Fianĉino por reĝido taŭgas ŝia suna belo."

'1158 ' Tiel Usen min perfidis kaj forgesis konsciencan, ; Pri belega kaptitino li rakontis de komenco, ; Kaj la reĝo estis preta tuj aranĝi aŭdiencon, ; Li ordonis alkonduki ŝin al li sen pacienco.

'1159 ' Mi trankvila sidis hejme kaj ne pensis pri danĝero, ; Sed subite mi ekaŭdis bruon de ĉevalhufferoj, ; Kaj aperis la rajdantoj – sesdek reĝaj kurieroj; Ekvidinte mi ekpensis: "Ŝajnas gravas la afero".

'1160 ' Diris ĉefo de gardistoj duonvoĉe la ordonon: ; "Devas ni por la reĝido preni la belegan donon, ; Nun redonu ŝin rapide sen rezisto kaj mensogo". ; Mi preferis sur la kapon senti la ĉielan tondron.

'1161 ' Mi respondis: "Mi ne scias, kion vi ĉi tie volas?" ; Ili diris: "La virinon, kiu en la domo loĝas". ; Venis tago de pereco al la belulino povra, ; Kaj ektemis mia kapo, mi eksentis min senpova.

'1162 ' Enirinte, mi ekvidis ŝin denove en la larmoj. ; Diris mi: "Ho, mia suno, jen alvenis nigra tago. ; La destino sin fortunigas, la ĉielo sendas plagon; Reĝo volas vin ekvidi por esprimi la omaĝon".

'1163 ' Ŝi respondis: "Ho, fratino, vi ne estu malfeliĉa! ; Ĉion vidis mi en vivo, al la sorto mi ne fidis; Nin mirigu nur la bono, ĉu malbono miron indas? ; Do ne estas la novaĵo, kiam plago nin vizitas".

'1164 ' Plifortigis larmogutoj kaj similis perlan brilon, ; Ŝi ekstaris decideme, kvazaŭ estus ŝi tigrino, ; Ĝojon kaj malĝojon vidis ŝi abunde en la vivo. ; Petis ŝi de mi la ŝalon kaj surmetis pelerinon.

'1165 ' Mi foriris kaj malfermis mian keston de trezoroj, ; Prenis perlojn, diamantojn kaj almetis ankaŭ oron; Samvalora kun la urbo estis ĉiu juvelŝtono: ; Prenis ĉion belulino – kaŝis ilin en la zono.

'1166 ' Diris mi: "Vi utiligu tion dum minac' de morto". ; Kaj transdonis mian sunon en la manojn de eskorto. ; Oni batis sonorilojn, reĝo iris por renkonto; Ŝi la kapon mallevinte lante paŝis tra la korto.

'1167 ' Por ekvidi belulinon venis gastoj, korteguloj; La gardistoj pene povis fari ordon en tumulto. ; Kiam ŝin ekvidis reĝo, ŝi blindigis la okulojn, ; Kaj li diris: "Kial trafis vi ĉi tien, hela suno?"

'1168 ' Kiu vidis belulinon, tiu perdis sian kapon; ; Reĝo diris: "Jen finfine reakiris mi vidadon; Ŝin videble dio kreis, mi al li esprimas dankon; La miĝnuro ŝia devas vagabondi tra la kampoj".

'1169 ' Kaj kontenta reĝ' sidiĝis apud bela virgulino; ; Li multfoje ŝin demandis: "Eble estas vi reĝino?"; ; Ŝi silentis, tamen lumis kiel hela sundiino; ; Kaj senvorte sidis trista en belega pelerino.

'1170 ' Ne aŭskultis, ne komprenis ŝi la reĝan paroladon; ; Ŝia koro malproksime estis en alia lando; Rozo fermis la petalojn, kaŝis ankaŭ perlan ĉarmon; ; Tamen ĉiu miris tie, kiu spektis la miraklon.

'1171 ' Diris reĝo: "Kiel povus ni kompreni tiun kazon? ; El du opinioj unu estas vero kaj ne falso – ; Aŭ ŝi pensas pri miĝnuro, tiel palas la vizaĝo; ; Kaj neniu volas vidi – estas mondo nur fiaĵo.

'1172 ' ' Aŭ ŝi estas saĝulino – de ĉielo vidas mondon; ; Ŝi ne sentas eĉ la triston, nek komprenas teran ĝojon; ; Konsideras ŝi la vivon, kiel la fabelan sorton; ; Ŝvebas ŝi en siaj revoj, kiel en ĉiel' kolombo.

'1173 ' ' Jen revenos filo mia kun la venko el milito; ; Mi al li fordonos sunon, plenan de la ĉarm' kaj virto; ; Eble tiam ŝi parolos, al silento venos fino. ; Ĝis reveno malproksimu luno de la sunvirino.

'1174 ' ' Diros mi: "La reĝa filo estos bona kavaliro; ; Juna, svelta kaj bonkora, servas nun en militiro; Patro lia – Melik Surhav trovis jen por li eliron; ; Por la filo – heredanto li jam trovis la akiron."

'1175 ' La virinoj de kortego vestis ŝin kun granda pompo; ; Kaj alportis la vestaĵon plenan de valoraj ŝtonoj; Ili metis sur la kapon el ruben' faritan kronon; ; Rozon de vizaĝ' ornamis kristalvitro kaj ebono.

'1176 ' Reĝ' ordonis tuj konstrui tronon el ormaterialo; Oni faris tion bele, estis de Mehreb* metalo; Kaj la reĝo de la maroj prenis sunon je la mano; ; Propramane ŝin sidigis sur la oran piedestalon.

'1177 ' Al eŭnukoj reĝ' ordonis stari apud ŝia pordo; ; Kaj li daŭris la festenon kiel decis, kun la pompo; ; Al Usen' li donis multe da rubenoj kaj da oro; ; La trumpetoj, tamburinoj tre dolĉigis reĝan koron.

'1178 ' Kaj denove la gajeco daŭris kaj ne havis finon; Sunvirino por si pensis: "Mi denove – kaptitino; Kie estis, kien portas senkompate min destino. ; Nun mi kion devas fari? – malfacila estas vivo".

'1179 ' Ŝi plu pensis: "Mi ne lasos, ke forvelku la beleco; Malamikojn venki tie, dio donis la eblecon. ; Memmortigo por sagaca homo, ja ne donas sencon; La saĝulo saĝon uzas en mizero kaj neceso".

'1180 ' Diris ŝi al la eŭnukoj: "Vi malfermu la okulojn – ; Mi ne volas edziniĝi – trompis vin la korteguloj; ; Kaj esperas reĝo vane, ke al mi aranĝas nupton; Vane li ordonis ludi per trumpetoj kaj la flutoj.

'1181 ' ' Mi ne estos la reĝino – bofilino de la reĝo; Kvankam la fianĉo sveltas kaj heredos patran seĝon; ; Havas mi alian amon, gvidas min alia leĝo; Kun vi vivi mi ne volas, estas mi viktimo de venĝo.

'1182 ' ' Mi mortigos min necese, pikos koron per ponardo; ; Kaj vin reĝo ĉiun murdos – la eŭnukojn kaj servantojn; Do aŭskultu min atente, mi posedas diamantojn; Ilin mi al vi fordonos, se vi helpas mian savon".

'1183 ' Malliginte sian zonon, prenis ŝi juvelojn, oron; ; Kaj aldonis multekostan el ruben' faritan kronon; ; Kun la vortoj: "Mi petegas – prenu vi ĉi tiun donon; ; Kaj permesu min foriri, dio ne forgesas bonon".

'1184 ' La trezoron neviditan do avidis la gardistoj; ; Kaj forgesis pri la reĝo kaj ne sentis tute timon – ; Senprokraste liberigis, forpermesis la virinon; Vidu, kion faras oro – ĝermo de satan-kutimo.

'1185 ' Malfeliĉa estas homo – de metalo flava sklavo; ; Ĝi kondamnas lin ĝis morto al avido kaj avaro. ; Avarulo ĉiam pensas – tro malmulte da metalo. ; Oro ligas al la tero kaj forprenas vivo-ravon.

'1186 ' Unu el eŭnikoj donis al virin' vestaĵon sian; ; Ŝi alivestiĝis lerte, sed vizaĝon havis viglan; ; Tra alia pordo kaŝe ili ŝin kondukis tiam. ; Luno estis jam savita de serpento tiu fia.

'1187 ' Kaj forkuris kune sklavoj, malaperis ĉia spuro; Mi ekaŭdis sur la pordo la frapadon en mallumo. ; Mi rekonis la virinon kaj ekĝojis la okulojn. ; Sed eniri ŝi ne povis, timis ŝi la perfidulon.

'1188 ' Diris ŝi: "Donaco via estis pago por libero; Dio rekompencu bonon sur ĉielo kaj sur tero; Nun al mi ĉevalon donu – ĉi atendas min danĝero. ; Mi forrajdos, dum la reĝo estos en la rev-espero."

'1189 ' En la ĉevalejo staris la ĉevalo plej rapida, ; Mi malligis ĝin kaj selis, ĉar ĝi estis tre fidinda; Kiel suno sur leono fuĝis la virin' decida, ; Do mi ne rikoltis tion, kio estis prisemita.

'1190 ' Kiam fuĝo iĝis klara, persekuto komerciĝis, ; Reĝaj homoj kaj gardistoj tutan urbon ĉirkaŭigis; Ili ankaŭ min demandis, sed mi diris, ke ne sciis: ; "Serĉu ĉie, se vi trovos, poste povos min murdigi".

'1191 ' Ili serĉis, sed ne trovis, vana estis persekuto; Kaj de tiam nia reĝo tre malĝojas, ĉesis ludoj; La kortego ja funebris, ĉar fiaskis reĝa nupto, ; "Nia suno malaperis kaj al ni jam mankas lumo".

'1192 ' Pri la sorto de la luno ion poste mi rakontos, ; Diros ankaŭ, kiu estis tiu aĉa vir' fripono, ; Estis mi por li porkino kaj li por mi la virporko; Timo viron malhonoras, por putin' sidvango – honto.

'1193 ' Mia edzo jam maljunas, ne parolas pri la amo, ; Do mi trovis Ĉaŝnagiron, tiun junan korteganon. ; Ni fariĝis amorantoj, sed mi nun ne verŝas larmojn. ; Ho, se donus al mi iu nun gustumi lian sangon.

'1194 ' Unufoje mi konfidis al junulo historion, ; Kiel helpis mi la fuĝon de la ĉarma fianĉino. ; Li komencis min ĉantaĝi kiel fia mizogino; Ho, vi savis min de honto kaj finiĝis bone ĉio.

'1195 ' Li minacis min denunci, kiam ofte ni kverelis. ; Mi vin vokis, ĉar ne sciis, ke intencas li alveni. ; Kiam tion mi eksciis, mi ja devis vin reteni, ; Por averti pri danĝero, mi al vi serviston sendis.

'1196 ' Malgraŭ tio vi alvenis kaj alportis helan sunon, ; Sed ekvidis vin ĉi tie aĉa kaj malica hundo; La kverelon mi tre timis dum sekreta rendezuo, ; Ĉar soifis mian morton tiu fia dia puno.

'1197 ' Se li estus vivrestinta – al la reĝo ĉion dirus, ; Min, infanojn, familion senkompatate li perfidus, ; Ege koleriĝus reĝo, mian domon neniigus, ; Laŭ ordono per ŝtonĵetoj ili ĉiujn nin mortigus.

'1198 ' Rekompencu vin ĉielo – mi ne povas tion fari; De serpento abomena sinofere min vi savis. ; Do hodiaŭ mi denove la sukcesan tagon havis, ; Pli ne timas mi la morton, ĉar la fato min kompatis".

'1199 ' Avtandil' al ŝi respondis: "Estis ja sentenco tia: ; Plej danĝera malamiko – la amik' estinta via, ; Saĝa hom' al eksamiko tro konfidas do neniam. ; Vi ne timu, li nuntempe estas nur kadavro fia.

'1200 ' Vi rakontu, post la fuĝo de la ĉarma kaptitino, ; Ĉu ricevis vi informon, ĉu pri ŝi eksciis ion?" ; Tamen Fatma nur ekploris, memorinte la diinon: ; "Kiam suno malaperis, estingiĝis la radio".

, & Malliberigo de Nestan-Dareĝan':

'1201 ' Trompa mondo efemera, vi similas al satano, ; Vi malicas kaj ne estas ekkonebla por profano. ; Kie kaŝas sunsimilan la vizaĝon por ĉiamo? ; Nun mi scias, ke en vivo ĉio estas vanta dramo.

'1202 ' Diris Fatma: "Malaperis mia suno, Nestan' ĉarma, ; Mia vivo kaj animo ŝvebas en obskur' malvarma, ; Kaj de tiam ĉiutage min bruligis flamo arda, ; Kaj ne povis mi sekigi sur la vangoj fonton larman.

'1203 ' Mi ne amas plu infanojn, nek la perfidulon – edzon, ; Tage, nokte min turmentas ŝia sorto kaj beleco, ; Al Usen' mi havis senton de malamo kaj perverso, ; Ne kuraĝas perfidulo al mi veni sen permeso.

'1204 ' Foje iris mi vespere kaj rigardis sunsubiron, ; Haltis mi ĉe tranoktejo, kie staris iuj viroj. ; Ŝin denove mi memoris kaj min ronĝis la sopiro, ; Diris mi: "Ho, malbenita vira ĵuro kaj perfido".

'1205 ' Vidis mi: kun du servistoj venis nekonata homo, ; Lia vesto estis bona, ĉe aliaj – el la tolo. ; Ili portis provianton, ĉar malsatis post la vojo, ; Poste ĉiuj manĝis, trinkis, gaje fluis la paroloj.

'1206 ' Mi komencis subaŭskulti kaj venintoj nun parolis: ; "Ni hazarde renkontiĝis, kiam tra dezerto vojis, ; Kaj ni unu la alian ĝis hodiaŭ ja ne konis, ; Tial aventurojn siajn decus tie ĉi rakonti".

'1207 ' Tiel sidis vojaĝantoj, ĉiu diris sian vorton: ; Venis vico, ekparolis tiu bonvestita homo: ; "Fratoj, ŝutis vi nur grenon, antaŭ vi mi metos oron, ; Ĉar plej interesa estos aventura ĉi rakonto.

'1208 ' ' Servis mi ĉe granda reĝo, ĉe reganto de la kadĵoj, ; Kaj okazis, ke sur ilin falis de ĉielo plago, ; Mortis li – ilia reĝo, de la orfoj protektanto, ; Nun fratino prenis zorgojn pri reĝidoj kaj regado.

'1209 ' ' Dularduĥt – baptnomo ŝia, estis forta kiel ŝtono, ; Kiu volis ŝin frapvenki, ŝi el tiu faris polvon; De Rosan, aliaj nevoj estas Dularduĥt patrono, ; Fakte ŝi reĝino estas kaj okupas kadĵan tronon.

'1210 ' ' Ni eksciis, ke trans maro jen fratino ŝia mortis, ; Kaj kunvenis la veziroj la eventon priparoli: ; Kiel decus regantinon nian pri la mort' informi; Estis ĉi Roŝak, ni tiun kiel militestron konis.

'1211 ' ' Li parolis: "Mi ne ŝatas multe plori kaj ĝemadi, ; Do mi iros en la valon kaj komencos tie rabi; Kiam riĉa mi revenos, estos tempo forvojaĝi. ; La reĝin' vizitos tombon, mi ŝin povos akompani".

'1212 ' ' Kaj li diris al helpantoj: "Iru kune por la rabo". ; Prenis li cent militistojn – forta estis nia bando, ; Tage, nokte karavanojn ni atakis dum vojaĝo, ; Rabis ĉiun, prenis ĉion, amasiĝis akiraĵo.

'1213 ' ' Estis nokto tre malhela, tra la kampo bando iris; Ni subite vidis lumon, kiu en foraj ekbrilis. ; Pensis ni: "Ĉu tio eblas, ke la suno supreniĝis?" ; Ni diverse divenadis, sed respondon ni ne sciis.

'1214 ' ' Unuj diris: "La aŭroro" kaj aliaj: "Plena luno". ; Ni decidis proksimiĝi – rekte vidi per okuloj. ; Ni ĉirkaŭis, volis scii, kio estis nokta suno. ; Ni ekaŭdis homan voĉon, kiu venis el la lumo.

'1215 ' ' "Kiuj estas vi, rajdantoj?" – nin demandis la sinjoro, ; "Mi al kadĵolando rajdas kiel la ambasadoro". ; Ni al li alproksimiĝis, ekaŭdinte tiajn vortojn ; Kaj ekvidis ni rajdanton, kies bel' prilumis nokton.

'1216 ' ' Vere estis li sunplena, ĉar lumigis ĉirkaŭaĵon, ; La flagrado de radioj kreis senkomparan ĉarmon, ; Sed li multe ne parolis, volis kaŝi ekscitaĵon, ; Brilis dentoj de eburoj, roze lumis la vizaĝo.

'1217 ' ' Paroligis ni estaĵon sunsimilan, demandadis; Li ne estis militisto – tion bone ni rimarkis, ; Kaj Roŝak divenis tiam – antaŭ ni virino rajdis; Ni ŝin faris kaptitino kaj forrajdi ŝin ne lasis.

'1218 ' ' Ni ne ĉesis demandadi tiun, kiu estis suno; Diru: Kiu kaj de kie estas vi, donanta lumon? ; Sed anstataŭ la respondo komenciĝis larmofluo, ; Triste estas en la faŭko de serpento vidi lunon.

'1219 ' ' Ŝi al ni nenion diris, ne malkaŝis la sekreton, ; Tre malgaja ŝi aspektis, ne akceptis la kunsenton, ; Faltis frunton, malserenis, certe sentis la turmenton; Hipnotigis ŝi rigardojn, kvazaŭ estis mem serpento.

'1220 ' ' Kaj Riŝak ordonis: "Ĉesu ŝin turmenti per demandoj; Ŝia sorto estas aĉa, malfacilas aŭgurado. ; La reĝino tre volonte vidis belan sunbriladon, ; Dio al ŝi ĉiam sendas mirindaĵon kaj la ĉarmon.

'1221 ' ' ' La donacon sendis dio, ni transdonu al reĝino; Ŝi ja estos tre kontenta, ni ricevos dankesprimon. ; Se ni kaŝos, malgraŭ ĉio la reĝino ja ekscios; Tiam nin atendos puno kaj malglora, honta vivo".

'1222 ' ' Ni konsentis, ne kverelis kaj atendi ni ne povis, ; Prenis ŝin al kadĵolando tre rapide forgalopis, ; La virinon ne ofendis, paroligi ŝin ne provis; Povrulino multe ploris kaj nenion diri volis.

'1223 ' ' Tiam diris mi al Roŝak kaj al lia gardistaro, ; "Donu al vi mi permeson iri nun al Gulanŝaro, ; Kiel vera komercisto prenos mi la silkan varon, ; Poste hejme mi vojaĝos, ĉar mi havas tie faron." "

'1224 ' ' Al la aŭskultantoj plaĉis interesa ĉi rakonto; Ankaŭ mi esperon sentis kaj sekiĝis larmofonto; Kiu estis la virino, mi divenis post la vortoj, ; Iomete trankviliĝis, ĉar mi havis jam informon.

'1225 ' ' Mi alvokis tiun homon, lin sidigis, dolĉe petis, ; "Diru, kion vi rakontis, tio min ekinteresis". ; Kaj la tutan historion tiu hom' al mi ripetis; La espero renaskiĝis, mi denove vivon sentis.

'1226 ' ' Havis mi du sklavojn hejme, ili estis la sorĉistoj, ; Povis esti nevideblaj, flugis kiel akcipitroj; Mi al kadĵolando sendis tiujn nigrajn metiistojn. ; "Hastu, kaj pri la virino tie vi eksciu ĉion".

'1227 ' Reveninte post tri tagoj, ili faris la raporton: ; "Belulinon al reĝino sia montris tiuj homoj. ; La reĝino estis preta voji al fratina tombo. ; Al Rosan ŝin edzinigi Dularduĥt esprimis volon.

'1228 ' ' Ŝi anoncis la ordonon antaŭ sia forveturo; "Nun funebras mi kaj dume ne aranĝas mi la nupton, ; Tamen tuj post la reveno al Rosan mi donas sunon". ; Kaj ŝi fermis la virinon alte en kastela turo.

'1229 ' ' Ĉiuj, kiuj povas sorĉi, akompanas la reĝinon, ; Ĉar la vojo estas longa, sentas Dularduĥt la timon. ; En kastelo ŝi restigis plej kuraĝan militistojn; La foresto daŭros longe kun de kadĵoj leonino."

'1230 ' Ĝis hodiaŭ kadĵa urbo do ne scias la konkeron, ; Tie sur altegaj rokoj, kadĵoj faris la kastelon, ; Kaj al ĝi kondukas meze en la roko kaŝtunelo. ; Tie en soleco ploras forkaptita nia stelo.

'1231 ' La tunelon bone gardas de la kadĵoj granda vico, ; Dek mil deĵorantoj staras, ĉiu kadĵo la sorĉisto, ; Tri aliroj kaj ĉe ĉiuj staras tri mil pafarkistoj; Koro mia, vin lacigis vanta mondo kaj malvirto".

'1232 Finis Fatma la rakonton, ĉion diris pri virino, ; Kaj en si triumfis multe sunvizaĝa kavaliro, ; Li mallaŭte dion gloris, ĉar ektrovis kaptitino, ; Diris: "Venkos ni finfine, estos nia belulino".

'1233 Avtandil' al Fatma diris: "Estis bela la rakonto, ; Historio tiu estas por mi de feliĉo fonto. ; Tamen diru pri Kadĵio, ĉu la kadĵoj estas homoj? ; Ĉu al ni similas ili kaj ĉu havas homan korpon?

'1234 ' Mi kompatas belulinon, kiu tie nun suferas, ; Sed ĉu al senkornaj kadĵoj la virin' bezona estas?" ; Kaj respondis Fatma jene: "Vian miron mi komprenas, ; Tamen ili estas homoj, nur malbonas kaj koleras.

'1235 ' Oni nomas ilin kadĵoj, ĉar sur tiu roko loĝas, ; Unueca en amaso homoj, kiuj sorĉi povas; Malutilas ili ĉiun, sed neniu superfortas, ; Batalantoj kontraŭ ili nur malvenkon hontan trovas.

'1236 ' Ili faras la aferojn, ke apenaŭ kredas homoj, ; Jen ekzemple, en la maro ili faras grandan ŝtormon, ; Jen sekigas la riveron, povas iri super ondoj. ; Noktojn ŝanĝas en la tagojn, tagojn en malhelajn noktojn.

'1237 ' Oni diras, ke la kadĵoj havas tre malbonajn morojn, ; Tamen ili homoj estas, kiel ni posedas korpojn". ; Avtandil' kontenta estis, li ŝin dankis per la vortoj: ; "Mian flamon vi estingis, al mi nun ridetas sorto".

'1238 Avtandil' kun larmoj gloris dion arde kaj sincere: ; "Dio, helpas vi en plago, mi vin dankas laŭte, pense, ; Vin – eternan, nekoneblan kaj nepercepteblan sense; Via graco kaj favoro kiel pluvo falas dense".

'1239 Pro novaĵoj dion gloris Avtandil' kun varmaj larmoj, ; Tamen Fatma tre ĵaluzis, ŝin brulegis ama ardo; Avtandil' indiferentis, nur toleris ŝian amon, ; Fatma kisis, ĉirkaŭprenis, lin karesis ŝiaj manoj.

'1240 Tutan nokton ili kuŝis kiel viro kaj virino, ; Nevolonte kavaliro prenis ŝin al sia sino; Ektremetis lia korpo, li memoris Tinatino, ; Koro al la bestoj iris, besta iĝis korinklino.

'1241 Kaŝe ploris kavaliro, larmoj fluis al la maro, ; Al li ŝajnis, ke navigis la boat' en inka marĉo, ; Diris li: "Miĝnuroj, vidu, estas rozo mia paro, ; Sed sur sterko kiel korvo, sidas nun mi – najtingalo".

'1242 Varmaj liaj larmoj povis solvi ŝtonon kaj koralon, ; Kaj kaliko el giŝero ŝajnis larva akvofalo; Fatma ĝuis, ŝi imagis, ke ŝi sentas veran amon, ; Se korniko rozon trovas, pensas ĝi – "mi najtingalo".

'1243 Frumatene li sin banis kaj sentadis agrablaĵon, ; La virin' al li donacis belajn vestojn, ornamaĵon, ; Ŝi aldonis la ĉemizon kaj diversajn aromaĵojn; Ĝojoplena ŝi parolis: "Prenu ĉiujn tiujn aĵojn".

'1244 Avtandil' en si ekpensis: "Mi hodiaŭ diros ĉion". ; Li ne volis daŭre esti amoranto, komercisto, ; Kaj surmetis belan veston laŭ araba tradicio, ; Iĝis li la kavaliro – ne similis al vendisto.

'1245 Ŝi preparis regalaĵojn kaj invitis karan gaston, ; Jen aperis kavaliro, bonvestita, bela astro; Miris ŝi, ke lin ne vidas en vestaĵ' de komercistoj; "Tia vi al mi pli plaĉas" – diris Fatma sen la flato.

'1246 Ŝi admiris revan ĉarmon, kiun havis vir' plenaĝa, ; Ju pli li ne volis ami, des pli furiozis Fatma, ; Li en sia koro ridis, pensis: "Ŝajnas ŝi malsaĝa". ; Tamen ludis li miĝnuron, kvankam sento estis stranga.

'1247 Manĝis, poste li foriris, trovis sian dormolokon, ; Ebrieta dolĉe dormis kaj ne aŭdis marajn ondojn; Nur vespere li vekigis, havis bonan li humoron, ; Sklavon sendis al ŝi diri: "Venu, vi min sola trovos".

'1248 Fatma venis, li ekaŭdis paŝojn kaj sopirajn ĝemojn; "Ho, sendube min bruligos mia amo kaj la spleno"; Li sidigis ŝin apude sur tapiŝon kaj kusenon, ; Ŝiaj nigraj okulharoj ombris rozojn de ĝardeno.

'1249 Poste diris kavaliro: "Kulpas mi pri malsincero. ; Miaj vortoj vin tremigos, kiel mordo de serpento, ; Vi pri mi nenion scias, nun rakontos mi la veron. ; Fore loĝas mia amo, la turmento kaj espero.

'1250 ' Konsideras vi min homo, kiu havas karavanon, ; Fakte estas mi spaspeto de la reĝo Rostevano; Multaj trupoj min obeas, kiam donas mi komandon, ; Kaj de multaj trezorejoj estas mi la posedanto.

'1251 ' Vi sekreton bone kaŝis, ne perfidos vi amikon; Tie en la patrolando reĝo havas la filinon. ; Ŝia suno min bruligas kaj min fandas ŝia brilo, ; Ŝi min sendis kaj mi lasis la patrinon, ŝin – reĝinon.

'1252 ' Mi en laco serĉis ĉie tiun saman belulinon, ; Multe vagis mi en mondo, sed ne trovis la virinon: ; Sciis mi, pri ŝi sopiras en kaverno paladino*, ; Li sekiĝas en soleco, mem deziras vivo-finon".

'1253 Avtandil' al Fatma tutan historion nun rakontis, ; Ŝi pri Tariel' eksciis, kiu tigran felon portis. ; Avtandil' aldiris: "Fine mi ĉe vi balzamon trovis, ; Kaj vi helpis al la homo, kiun vi ĝis nun ne konis.

'1254 ' Donu, Fatma, vian manon, estu ni al li utila; Devas ni al ili helpi, al ĉielaj astroj brilaj. ; Se ni venkos, ni meritos gloron grandan kaj unikan, ; Eble fine la miĝnuroj trovos unu la alian.

'1255 ' Vian sklavon, la sorĉiston, sendos ni al kadĵa tero, ; Li al kaptitin' ilia enmanigos la leteron. ; Ankaŭ ŝi al ni respondos, ni ekscios tutan veron. ; Dio donu kaj ekaŭdu pri sukceso kaj libero."

'1256 Diras Fatma: "Dank' al dio, ke li donis bonan ŝancon. ; Jen ekaŭdis mi senmortan historion kaj novaĵon." ; Kaj ŝi vokis la sorĉiston korve nigran sian sklavon, ; Lin ordonis: "Vi denove tuj vizitu kadĵolandon.

'1257 ' Mi ekvidos, ho, sorĉisto, kian havas vi klarvidon, ; Hastu tien kaj forigu de Nestano sinmortigon, ; Vi informu tiun sunon: "Eblas ŝia liberigo!". " ; Sekvis la respondo: "Morgaŭ mi revenos kun sciigo".

,& La letero de Fatma al Nestan-Dareĝan':

'1258 Skribis Fatma: "Lumigilo de la tuta nia mondo, ; Se vi estas malproksime – froste tremas ĉiu homo; Ĉarmas ĉiun la vizaĝo, ravas ĉiun via vorto, ; Vi rubeno kaj kristalo, kunfanditaj en fandforno.

'1259 ' Vi al mi nenion diris pri suferoj kaj angoro, ; Nun mi scias tutan veron, trankviligis mia koro, ; Vi al Tariel' sciigon sendu kaj ĉesigu ploron; Dio vin ekvidos kune, lin la rozon, vin – violon.

'1260 ' Longe vin serĉadis lia tre fidela fratiĝinto, ; Nun en nia urbo estas tiu brava kavaliro; Avtandil' spaspeto estas en transmara Arabio. ; Nun mi petas la respondon, ĝuste vi priskribu ĉion.

'1261 ' Ni alsendis tiun sklavon por ekscii la novaĵon ; Pri kaptintoj vin – la kadĵoj, pri iliaj fortikaĵoj, ; Kie estas la reĝino? ĉu revenis hejmen kadĵoj? ; Kiom da gardistoj estas en la kadĵa ĉirkaŭaĵo?

'1262 ' Do pri Kadĵolando ĉion vi priskribu en letero ; Kaj por Tariel' aldonu ion per la kuriero, ; Reakiru vi la ĝojon kaj finiĝu la sufero; Se ĉielo tion volas, vi atingos la liberon".

'1263 Tiam Fatma la leteron al la sklavo enmanigis: ; "Vi transdonu ĝin al tiu, kiu ĉiam sune brilas". ; La sorĉisto en kovrilon sian nigran envolviĝis ; Kaj forflugis kiel birdo, la okuloj lin ne vidis.

'1264 Strebis li al celo kiel sago el streĉita arko; Jam vespere li atingis malproksiman Kadĵolandon, ; Preterpasis nevideble ĉe pordeg' starantan gardon, ; En kastel' fermitan sunon trovis li sen la serĉado.

'1265 Ŝi vidante hirtan negron, tre ektimis kaj ektremis; Ŝi ekpensis, ke la negro ŝin denove volas preni. ; Rozo kaj violoj ŝiaj en mallibereco svenis, ; Sed la negro ne minacis, tamen trankviligi penis.

'1266 Kaj trankvile sklavo diris: "Kio kaŭzas vian timon? ; Min al vi alsendis Fatma, kiu nomas vin filino. ; Jen letero tion pruvos kaj novaĵon bonan diros; Rozo, vi atendu sunon, por suferoj venos fino".

'1267 Ŝi – sunplena la leteron legis kaj forgesis sklavon, ; Skribo estis de ĥatuno, sentis ŝi patrinan amon, ; Legis ŝi kaj larmoj lavis ekscitigan ĉi mesaĝon, ; Kaj okuloj migdalfloraj sub giŝer' malfermis lagon.

'1268 Ŝi demandis sklavon: "Diru, ĉu vi estas kuriero? ; Kiu scias, ke mi vivas, ke ekzistas sur la tero?" ; Li respondis: "Mi parolos, kio estas pura vero; Suneklipson kaj funebrojn kaŭzis via malapero.

'1269 'Kor' de Fatma ekmalsanis, kiam vi forlasis domon, ; Salaj larmoj ŝiaj fluas, unuiĝas kun marondo. ; Foje mi pri vi al Fatma jam alportis la informon. ; Dio estas atestanto – ne finiĝas ŝia ploro.

'1270 'Iu kavaler' aperis – li al Fatma algalopis, ; Belvizaĝa estis viro, ĉion ŝi pri vi rakontis, ; Li fortegan manon havas, serĉas vin kaj jam ektrovis; Vin viziti en kastelo ili taskon al mi donis ".

'1271 Diris la virin': "Mi kredas, vera estas via vorto, ; Fatma ja nenion sciis, kie trovis mi la tombon, ; Mia kavaliro eble pri mi pensas eĉ en dormo, ; Kaj mi skribos, ke li sciis, kiel velkas mia koro".

, & La letero de Nestan-Dareĝan' al Fatma:

'1272 Sunvizaĝa skribis jenon: "Ho, patrino mia kara, ; Ĉu vi vidas, kion faras fato mia senkompara? ; Ho, ve, plimultiĝis miaj travivaĵoj tre amaraj, ; Tamen multe trankviligis min letero via rara.

'1273 ' Vi min savis de du negroj, faciligis la angoron, ; Tamen min la kadĵoj fermis en kastelon inter rokoj, ; Solan min atente gardas la kruela kadĵa hordo; La esperon mi jam perdis, vivo fermis al mi pardon.

'1274 ' Nun ankoraŭ kion skribi? – ne revenis la reĝino, ; Kaj kun ŝi forestas dume la plej spertaj el sorĉistoj, ; Multaj miloj da soldatoj gardas urbon kaj landlimojn, ; Mi ne kredas mian savon kaj kompaton de destino.

'1275 ' La serĉinto bonintenca, ne komprenas komplikecon, ; Li nur brulos en la flamo, li ne havos la sukceson; Tamen mi al li envias, ĉar li vidis sunbelecon; Mia vivo sen la suno – nur doloro en fortreso.

'1276 ' Mi ĉe vi antaŭe kaŝis mian vivon, mian amon, ; Ne sufiĉas al mi vortoj pligrandigi suferadon. ; Petu mian Tarielon min forlasi en la ardo, ; Per letero lin konvinku – vana estas la serĉado.

'1277 ' Ja sufiĉas mia plago, ĉesu li turmenton sian, ; Mi dufoje mortos, kiam mi ekvidos lin senviva. ; En prizono mia alta estas ja elir' nenia; Se ne veras tio – estu mi per ŝtonoj priĵetita.

'1278 ' Vi min petis al li sendi por memoro iun signon; Mi plezure faros tion, sendos pecon de kovrilo, ; Kavaliro al mi donis ĝin – la belan pelerinon; Kvankam estas peco nigra, kiel mia aĉa vivo".

, & La letero de Nestan-Dareĝan' al sia miĝnuro:

'1279 Jen sidiĝis ŝi plorante – la leteron al li skribis, ; Per la larmoj amoflamon kaj sopiron ŝi estingis; La letero ŝia povis koron de leganto piki. ; Inter rozpetaloj tristaj la kristalo denta brilis.

'1280 "Ho, amato, al vi skribas kun doloro via paro, ; Mia korpo servis plumon, kiel inko estis galo, ; Via koro anstataŭas la paperon por skribado, ; Nin – amantojn ja kunigis la eterno kaj fatalo.

'1281 ' Vi rigardu, kion faras efemera tiu mondo, ; Kiom ajn la suno lumas, sed por mi ĝi estas ombro, ; Mondo, kiel oni pensas, estas fonto de malbono, ; Kia trista, malfacila, sen vi estas mia sorto.

'1282 ' Nin disigis senkompate malbenita temp', destino, ; Kaj ne havis ni feliĉon realigi korinklinon, ; Kion devas fari koro, kiam ploras kaptitino, ; Ĝin trapikis via glavo – senkompata tranĉarmilo.

'1283 ' Ĵuras mi je via suno, mi ne pensis, ke vi vivas, ; Kio min koncernas, kara, la eliron mi ne vidas; Nun mi dion danke gloras, ke la veron mi jam scias, ; Mi denove ĝojon sentas, kaj ĉagreno jam foriĝas.

'1284 ' Via vivo por mi estas la eterna lumigilo ; Kvankam koro mia estas disŝirita per tranĉilo ; Min memoru, la perditan, ne forgesu miĝnurinon ; Kiu ĝermon de la amo plu prizorgas en ekzilo.

'1285 ' Skribi pri mi senutilas – trista estas realaĵo ; Tute nekredebla ŝajnas mia stranga travivaĵo. ; Savis min Fatma' de reĝo, tio estis heroaĵo ; Kaj denove min perfidis fia sorto, okazaĵo.

'1286 ' Nun la mondo plimultigis malfeliĉon mian grandan ; Ŝajnas, por mi ne sufiĉas batoj de la sorto vana ; Al la kadĵoj min forĵetis la destino senkompata. ; Kontraŭ mi do ĉio luktas kaj mi solas, mia kara.

'1287 ' Sidas mi en kastelturo, konstruita sur montego ; Tien iras voj' sekreta por la kadĵa amasego ; Tage, nokte la gardistoj ĉi deĵoras kiel grego. ; Kaj mortigas ili ĉiun, kiu venas al pordego.

'1288 ' KREDU min, karulo, kadĵoj estas fiaj virtuojoj ; Ve ne provu liberigi min el tiu ĉi prizono ; Vian morton ekvidinte, mortos ankaŭ via rozo. ; Estu forta kiel roko, sed min lasu en la prozo.

'1289 ' Vin forlasu la ĵaluzoj, vanaj duboj kaj la plendoj ; Al neniu aliulo apartenas la amego ; Por vi batas mia koro, por vi havas ĝi brulegon ; Mi alie min mortigos aŭ forsaltos de muregoj.

'1290 ' Mi je via suno ĵuras, ke fidelos via luno ; Eĉ se min delogi volos trio de belegaj sunoj ; En abismon mi min ĵetos, tiam preĝu, ho, karulo ; Ke flugiloj la animon levu al ĉiela lumo.

'1291 ' Preĝu al la alta dio, liberigi min de vanto ; Liberigi de aero, tero, fajro kaj de akvo* ; Donu li al mi flugilojn, por ekvidi la kreanton ; Tage, nokte min ĝojigos lumo de la sunbrilado.

'1292 ' Sen vi suno ne lumigas, estas vi parteto ĝia ; Ja kun ĝi vi unuiĝos en stelaro brilradia ; Kaj ekvidos vi min tie, vi prilumos koron mian ; Se amara estis vivo, dolĉa estu morto tia.

'1293 ' Mi ne timas jam la morton, ĉar al vi animon fidas ; Via am' en koro mia kaj ĝi restos ĉi kaŝita ; Rememoroj pri disiĝo la korvundon venenigas ; Sed ne ploru, klara mia, ke la vivon mi rezignas.

'1294 ' Vi rapidu al Hindio – mia patro serĉas helpo ; Malamikoj lin ĉirkaŭas kaj sieĝas la kastelon ; Vi konsolu maljunulon, faciligu la suferon ; Kiu lin pro mi turmentas, ne forgesu la elpelo.

'1295 ' Jam sufiĉas miaj plendoj pri la sorto kaj angoro ; Ĉiam vero eldirita venas al alia koro ; Mi por vi ĉi tie mortas, kaj pri mi ekgrakos korvo ; Sed dum vivas mi, ne ĉesas pri amato mia ploro.

1296 ' Jen la signo – eta peco detranĉita de la basko ; De konata pelerino – ĝi farita el atlaso ; Vi konservu la peceton – pruvon de esperfrakaso ; Nian amon ne favoris nek ĉielo, nek la astro".

'1297 La letero estis preta. Kiel sperta tajlorino ; Pecon de la pelerino ŝi fortranĉis per tondilo ; Nigraj longaj haroj kovris ŝultrojn de la belulino ; Ekodoris kvazaŭ poplo svelta aŭ korak-flugilo.

'1298 Nevideble flugis sklavo al la bela Gulanŝaro ; Kaj denove negro vidis la patronojn, samlandanojn. ; Avtandil' kaj Fatma dankis la kuraĝan nigran sklavon ; Gloris dion – bonfaranton kaj esprimis grandan ravon.

'1299 Avtandil' al Fatma diris: "Bona estas la aŭguro ; Mi ŝuldanto via estas, donas mi la sanktan ĵuron ; Mi necese devas iri alkonduki proksimulon ; Ni komence ekbatalos, poste prenos kadĵan urbon".

'1300 Fatma diris: "Ho, leono, el fajrero flamo iĝas ; Mian koron lum' forlasas, tial tago krepuskiĝas ; Sed pri mi ne zorgu – iru, kie via frato migras ; Se revenas kadĵoj hejmen, sciu, lukto malfacilas".

'1301 Avtandil' alvokis sklavojn, kiujn de Pridon' ricevis ; Diris: "Estis ni mortintoj, nun denove resurektis ; Ĉar ekaŭdis ni novaĵojn, kiujn longe ni atendis ; Malamiko ĝemos, kiel li antaŭe ploris, ĝemis.

'1302 ' Nun revenu kaj raportu al Pridon' pri antaŭgardo ; Mi ne povas lin ekvidi, mi rapidas al la frato. ; Diru, ke Pridon' fidela sin preparu por invado ; Mi al vi donacos ĉion, kion prenis de piratoj.

'1303 ' Granda estas mia ŝuldo por la helpo, gardo, risko ; Mian dankon mi esprimos, kiam vian reĝon vidos. ; Nun trezoron de piratoj inter vi mi disdividos. ; Pli ne povas mi donaci, sed ne kaŭzas mon-avido.

'1304 ' Mi ne estas en la hejmo, do ne povas vin riĉigi". ; Jen aldonis li la ŝipon, kiun tiam almilitis, ; Poste li ordonis preni la trezoron kaj reiri, ; Kaj transdoni la leteron al la reĝo komisiis.

,& La letero de Avtandil' al Pridon':

'1305 Skribis li: "Vi alta reĝo, estas plena de feliĉo, ; Vi, leono kaj la suno, sunradia vi tagiĝo, ; Sangon de la malamiko verŝas ĉiam sen laciĝo. ; Certe, vi memoras bone fraton kaj interfratiĝon.

'1306 ' Mi ĉi tie spertis multajn aventurojn kaj la plagojn, ; Sed nuntempe por mi lumas la feliĉaj, helaj tagoj, ; Spurojn de Nestan' ni trovis – ŝi okazis inter kadĵoj; Revivigas ŝi leonon kaj ĉesigos lian vagon.

'1307 ' Kadĵoj kaptis tiun sunon, tenas kiel kaptiton; En la urbon ni penetros kaj batalos ĝis la fino. ; De narcisoj gutas pluvo kaj malsekas roz' – viktimo; Nun feliĉe en vojaĝo estas kadĵoj kun reĝino.

'1308 ' Ĝojas mi kaj trankviliĝis, jam ne fluas niaj larmoj, ; Kie estas vi kaj frato, ja facilas ĉiuj agoj, ; Nia plano klara estas –ni forprenos ŝin de kadĵoj; Ne nur kadĵojn – rokojn rompos viaj glavoj kaj ponardoj.

'1309 ' Min pardonu, ne vizitos mi vin, mian proksimulon, ; Sed ni baldaŭ estos kune, ĉar kastel' enhavas lunon, ; Ni revidos nin kaj ĝojos, la venkintoj, feliĉuloj; Nun ni helpu nian fraton – tia estos viv-postulo.

'1310 ' Dankas mi pro bona gardo, sklavoj montris heroismon, ; Ili servis tre fidele sur la maroj kaj abismoj; Ja Pridon' edukis ilin, la kuraĝa pafarkisto; "Ĉiu naskas sin similan" – estas saĝa aforismo".

'1311 Li, fininte la leteron, ĝin kunrulis, ĉirkaŭligis, ; Al la sklavoj forirontaj la rulaĵon enmanigis, ; Al Pridon' rakonti ĉion, kio estis, li instigis; Meze de pordeg' purpura blankaj perloj ĉarme brilis.

'1312 Kavalir' facile trovis por vojaĝo grandan ŝipon. ; Kun vizaĝo de plenlumo nun navigis Avtandilo. ; Malfacile estis lasi Fatman – bonan amikion, ; La restintoj ploris multe, Fatma – kiel la vidvino.

'1313 Fatma kaj Usen', servantoj – ĉiuj dum foriro larmis, ; Ili diris: "Sunradia, kion do kun ni vi faris! ; Kial al disiĝo longa kaj obskur' vi nin kondamnis, ; Kial nin al tombo pelas, kio ĉi al vi ne plaĉis?"

,& Forveturo de Avtandil' el Gulanŝaro kaj renkontiĝo kun Tariel':

'1314 Avtandil' per ŝip' veturis maltrankvilan, salan maron, ; Poste trotis sur ĉevalo, sole, sen kunsekvantaro, ; Li al Tariel' rakontos pri sukceso kaj bonfaro; Nun rapidis al la frato li kun atenditaj brakoj.

'1315 La somero komenciĝis kaj verdaĵo ĉirkaŭkreskis, ; Signo de la rendevuo la florad' de rozoj estis, ; Al stelar' de Saratano* suno tre proksime venis; La aromon de la floroj Avtandil' volonte sentis.

'1316 La ĉielo el la nuboj ŝutis kristalvitran roson, ; Kisis li la rozpetalojn – lipoj mem ja estis rozoj; Li parolis: "La rigardo ĝuas vin, belegaj floroj, ; Mi anstataŭ ŝi plezuras, kaj mi sentas la favoron".

'1317 Intertempe li ekploris, larmojn viŝis per la fingroj, ; Li memoris Tarielon, sian proksimulon, hindon, ; Sur senvojaj kampoj havis li danĝerajn renkontiĝojn, ; Kiam vidis en arbustoj, murdis li leonon, tigron.

'1318 Jen kavernoj inter rokoj, kie vivis la amiko, ; Rajdis kun malpacienco, diris kiel fanatiko: ; "Nur ke mi lin trovu hejme kaj okazu interligo, ; Se ne trovos lin mi tie, vana estos la taktiko.

'1319 ' Li sendube ja ne amas longe sidi ĉi sen faro, ; Do verŝajne kiel besto li daŭrigas sian vagon. ; Mi lin serĉos en densejo, ĉe rivero inter kanoj". ; Kaj direktis li ĉevalon al arbaro, verdaj kampoj.

'1320 Gaje kantis la rajdanto, trote kuris la ĉevalo, ; Tarielon li vokadis, eĥon donis verda valo, ; Kaj la suno lin salutis, verde brilis la arbaro; Fine li ekvidis hindon kun la glavo en la mano.

'1321 Sango gutis de armilo – ĵus leonon li mortigis; Staris Tariel' kaj fine Avtandilon li ekvidis. ; La arbaro lin alvokis, ĉirkaŭpreni lin deziris; Hinda saltis super ŝtonoj, al amiko li rapidis.

'1322 Tariel' forĵetis glavon, gaje ridis la okuloj; De ĉevalo saltis tiu, ĉirkaŭprenis la karulon, ; Interkisis ili forte, kavaliroj – proksimuloj, ; Kaj sukere dolĉaj rozoj unuiĝis ĉe kunuloj.

'1323 Tariel' de ĝojo ploris, flustris li kortuŝajn vortojn; Sangaj larmoj do purpuris okulharojn kaj la brovojn. ; Kaj senĉesa font' akvumis al cipreso sveltan torson. ; "Mi vin vidas – la suferon anstataŭas granda ĝojo".

'1324 Ploras Tariel', sed staras la alia kun rideto, ; La koraloj malfermiĝis kaj ekbrilis fulme dentoj; Li parolas: "La novaĵoj bonaj indas la atenton; Kaj denove floros rozo, kaj ĝi plu neniam velkos".

'1325 Tariel' respondis: "Frato, la feliĉon vi alportas, ; Ĉar reveno via ege min ĝojigas kaj konsolas; La alian kuracilon dio doni jam ne povas; Perdiĝinton en la mondo ja neniam oni trovas".

'1326 Avtandil' rimarkis bone, ke ne kredas lin la frato, ; Li ne povis plu silenti – ĝojo strebas al la hasto, ; Do li montris la peceton, kiun tondis ŝi da basko; Tariel' ĝin tuj ekkonis, sen la peno, embaraso.

'1327 Li leteron ŝian kaptis kaj fariĝis frenezulo, ; Al la lipoj ĝin alpremis, ĉio dronis en nebulo, ; La animo jam foriris, plu ne vidis la okuloj; Nek Kais, nek Salamano* ne eltenus la torturon.

'1328 Avtandil' rigardis fraton, kiu falis sur la teron; Li alsaltis al sveninto, volis okazigi helpon, ; Sed klopodoj estis vanaj – tro efikis ĝojo cerbon, ; Viv' de Tariel' transiris al peceto kaj letero.

'1329 Avtandil' komencis plori pri svenema kamarado, ; Li komencis de la kapo ŝiri korvonigrajn harojn, ; Rubenlipojn rompis hindo per martelo – sia mano; Sangajn larmojn laŭ koloro mi komparas kun koraloj.

'1330 Li gratvundis la vizaĝon, sango fluis de la vangoj; ; "Nur stultulo povis fari tian senpripensan agon; Kial sur grandegan fajron mi subite verŝis akvon? ; La ĝojeg' neatendita frapas koron kiel plago.

'1331 ' Nur malgloro min atendas – mi mortigis mian fraton, ; Kaj ne eblas senkulpiĝo, mi ne trovos la kompaton; Frivolulo nur difektas – ĉiam versa tiu fakto; ; Malaprobos ni lantecon, sed pli bonas ĝi ol hasto".

'1332 Tariel' senspire kuŝis, kvazaŭ estis bruligita; Avtandil' forkuris serĉi akvon, estus ĝi utila; Akvo mankis, li alportis sangon de leon' mortinta, ; Kaj per ĝi ŝprucigis bruston – ago estis admirinda.

'1333 Sango de leono gutis sur la bruston de fortulo, ; Tariel' jen ekremetis, malfermiĝis la okuloj, ; Kun la peno li sidiĝis, jam foriĝis la nebuloj, ; Lazuriĝis lunradio, ĉar prilumis ĝin la suno.

'1334 Rozpetaloj vintre velkas kaj forfalas tute floroj, ; Kaj somere roz' forvelkas – pro sekeco perdas formojn, ; Tamen trilas najtingaloj, kiam fine venas nokto; Vund' doloras dum somero kiel dum decembra frostoj.

'1335 Same estas malfacile de la koro scii sorton; En la ĝojo, en la plago ne haltigas ĝin volforto. ; Tiu mondo ĉiam vundas ĝin kaj ankaŭ homan korpon; Kiu kun si malamikas, tiu fidu al la mondo.

'1336 Kaj denove la leteron legis li de sia suno, ; Sed la vortoj de l'letero faris lin nur frenezulo; Larmoj nebuligis mondon, krepuskigis tagan lumon. ; Fine Avtandil' ekstaris kaj ĉesigis larmofluon.

'1337 Li severe diris: "Frato, mi vin tute ne komprenas; Kial plori? De hodiaŭ nur ridet' al ni konvenas. ; Tuj ekstaru kaj ni iru, kie suno malliberas; Mi vin baldaŭ alkondukos, kie via koro strebas.

'1338 ' Ni pripensu, primeditu ĉion funde kun singardo, ; Poste ni surĉevaliĝu, rajdu ni al Kadĵolando. ; Gvidu saĝo kaj kuraĝo, falu malamikaj glavoj; Ni revenos kun la venko, tie restos nur kadavroj".

'1339 Tiam Tariel' komencis demandadi pri aferoj, ; Li ne svenis plu kaj estis ekster morto kaj danĝero, ; La vizaĝo reakiris la koloron de rubeno; Ja ne ĉiun homon benas la ĉielo kaj la tero.

'1340 Kun la frato li parolis, dankis lin per koraj vortoj; ; "Kiel povus mi esprimi dece al vi la favoron? ; Por sekiĝo pretaj plantoj estis vi freŝiga fonto, ; Vi haltigis larmojn miajn per vivdona via forto.

'1341 ' Faris vi por mi komplezon, rekompencos al vi dio, ; Por bonfaro pagos bonon kaj redonos al vi ĉion". ; Kaj sidante sur ĉevaloj ili gaje kantis ion; Nun Asmat' tre feliĉiĝis ekvidinte kavalirojn.

'1342 Ĉe la faŭko de l'kaverno jen Asmat' atendis sola; Ŝi ekkonis Tarielon, vidis Avtandilon ĝojan, ; La rajdantoj bele kantis, kiel birdoj dolĉevoĉaj, ; Kaj Asmat' ekstaris urĝe, la vidaĵo ŝajnis songa.

'1343 Ŝi antaŭe ĉiam vidis nur plorantan sian fraton, ; Nun ŝi miris, ĉar ekvidis la surprizan rezultaton, ; Ŝi eksaltis, ĉar ekvidis lin kun gaja kamarado, ; Ŝi ne sciis, kial ĝojis ŝia frato kaj zorgato.

'1344 Kavaliroj ekridetis, montris dentojn de eburo, ; "Ho, Asmat', post longa vago trovis sunon, mi miĝnuro; Dio estas niaflanke, kaj finiĝos jam torturo, ; Estingiĝos nia flamo, gaja estos la futuro".

'1345 Avtandil' deĉevaliĝis, enbrakigis la fratilon, ; Ŝi la fraton multe kisis, prenis lian tranĉarmilon, ; "Mi sen vi ploregis multe, ĝojas mi, vidante finon; Al mi diru la novaĵojn, kiel fartas virgulino?"

'1346 Avtandil' al ŝi transdonis la leteron de l'virino, ; Estis iam ŝi la luno, nuna kadĵa fianĉino, ; Diris li: "Rigardu bone – jen ni havas ŝian signon; Proksimiĝas suno nia kaj eterna lumigilo".

'1347 Tre facile ŝi rekonis de Nestan' skribmanieron, ; Kaj ekteremis, ne komprenis la enhavon de l'letero, ; Stranga sento ŝin ekkaptis, ŝi ne povis kredi veron, ; Diris: "Ĉu feliĉon tian al mi donos efemero?"

'1348 Avtandil' al ŝi respondis: "Tio veras, kara mia, ; La sufero jam foriĝas, estos ĝojo vere nia, ; Suno al ni proksimiĝis, por ni lumas brilo ĝia; La malbonon venkas bono, ĉar esencon havas tian".

'1349 Hinda reĝo ion gajan diris al Asmat' – fratino, ; Ili forte enbrakiĝis kaj la ĝoj' ne havis finon; Gutis roso diafana sur la rozon, kristalvitron; Ne forlasos dio homon, se nur hom' komprenas tion.

'1350 "Li por ni elektis bonon", - ĉiu plejaltulon gloris. ; "Nun mi vidas – vi do pravis, kiam ambaŭ min konsolis"; Al amikoj tion gaje hinda reĝo nun parolis. ; Ili iris en kaverton kaj Asmat' manĝeti donis.

'1351 Poste Tariel' rakontis historion pri devejo*. ; "Vi ne scias, ke de ili mi forprenis la kaverton. ; Mi la Devojn neniigis, kiuj havis trezorejojn. ; Ĝis hodiaŭ ne malfermis mi iliajn ferajn kestojn.

'1352 ' Mi suferis, do ne volis, ne bezonis mi trezoron, ; Nun ni iru al la kestoj, eble trovos tie oron". ; Avtandil' konsentis iri kaj Asmat' esprimis volon; En profundo de kaverno ili rompis kvardek pordojn.

'1353 Trovis ili la trezoron: estis oro kaj juveloj; Vidis ili diamantojn, kiuj brilis kiel steloj, ; Estis perloj tiel grandaj, kiel ovo de anseroj; Kiu povis trakalkuli la amason de rubenoj?

'1354 Kvardek ĉambroj estis plenaj de la kofroj kaj ferkestoj, ; Plenis ĉambro de armiloj, taŭgaj por militaferoj, ; Glavoj, lancoj tie kuŝis, ŝildoj kaj kiraskompletoj, ; Tamen unu kesto staris ĉi fermita kun sigelo.

'1355 Kaj surskribo diris jenon: "Ĉi troviĝas sorĉ-kirasoj, ; Basraj* glavoj, kiuj hakas diamanton kvazau vakson; Ĉio estos por milito inter Devoj kaj la kadĵoj. ; Kiu prenos ĝin pli frue, tiu reĝ-mortigon faros".

'1356 Geamikoj senprokraste jen malfermis feran kofron, ; Tie kuŝis bonkvalita armilar' por tri personoj, ; Glavoj, lancoj kaj ponardoj, ĉio, por atingi gloron, ; Sagoj, ŝildoj kaj pafarkoj por kuraĝaj bravaj homoj.

'1357 Ĉiu prenis la armilon, kaj atente ĝin esploris, ; Fortaj estis la kirasoj, glavo feron tranĉi povis, ; Kavaliroj tre kontentaj ĉion en bonstato trovis; Por batalo kontraŭ kadĵoj la trovaĵo altvaloris.

'1358 Ili diris: "Jen la signo por la venko kaj sukceso, ; Al ni dio ekrigardis kun favoro, bonkoreco". ; La armilon ili prenis, ne necesis la permeso; Por Pridon' donacon havis – tion diktis amikeco.

'1359 Do kunprenis ili oron, altvalorajn diamantojn, ; Ĉiujn kvardek trezorejojn sursigelis posedantoj, ; Avtandil' kuraĝe diris: " Ne demetos mi la glavon. ; Nokte ni ĉi tie restos, havos morgaŭ forvojaĝon".

,& Alveturo de Avtandil' kaj Tariel' al Nuradin-Pridon':

'1360 Ili kun Asmat' leviĝis kaj forrajdis frumatene; Sur la dorso de ĉevalo devis sidi ŝi laŭcele, ; Poste la ĉevalon trovis por la oro rekompence; Avtandil' gvidanto estis, sciis vojon dekomence.

'1361 Jen survoje kavaliroj vidis grandan ĉevalaron, ; Al Pridon' – ilia frato apartenis tiu aro; Tariel' proponon donis: "Ni forpelu la ĉevalojn; Ŝtelos ni ne serioze, tio estos ŝerca faro.

'1362 ' Pri forpelo de ĉevaloj tre rapide li ekscios, ; Ĉevalregon reakiri per milito li decidis, ; Sed anstataŭ la rabistoj li amikojn ĉi ekvidos; Gaja ŝerco ĉiam bonas kaj Pridon' kontenta ridos".

'1363 La plej bonajn el ĉevaloj lerte kaptis la amikoj; Tre ekmiris kaj al ili laŭte kriis la paŝtistoj; "Kial vi fiagon faras, vi ja ŝajnas kavaliroj; Posedanto estas reĝo, punos vian li deziron".

'1364 Tiam ili al paŝistoj jen direktis siajn lancojn, ; Tiaj kuris kaj kriegis: "Helpon, helpon!" kun grimaco, ; Malfeliĉaj kun timego kuris rekte al palaco, ; Al Pridon' rakontis ĉion pri la ŝtelo kaj minacoj.

'1365 Kaj Pridon' armilon kaptis, militistojn siajn vokis, ; Ĉiuj kune senprokraste al kamparo forgalopis; Tiuj sunoj, kiuj vintre de malvarmo ne frostmortis, ; Nun mallevis vizierojn kaj neniuj ilin konis.

'1366 Tariel' rekonis reĝon: jen li rajdas sen invito, ; Li deprenis kaskon, ridis, ekparolis al "Venkito": ; "Kion tio ĉi signifas? ĉu malplaĉas la vizito, ; Ke alrajdis vi renkonte tute preta al milito?"

'1367 De ĉeval' Pridon' desaltis, riverencis al amikoj, ; Ĉirkaŭprenis ilin forte, multe kisis kavalirojn, ; Kaj levinte manojn supren, li dankema gloris dion; Lin rekonis didebulojn kaj salutis kun la krioj.

'1368 Kaj Pridon' demandis: "Kial nur hodiaŭ vi alvenis? ; Mi delonge vin atendis, nun mi pretas al vi servi". ; Ŝajnis luno kaj du sunoj super horizont' sin levis, ; Poste ĉiuj tri beluloj al la urbo sin direktis.

'1369 En palacon sian belan alkondukis ilin Pridon', ; Apud si sidigis gastojn, fratiĝulon – Avtandilon, ; Sur velura seĝo sidis Tariel' – la turmentito; Ili al Pridon' donacis feran kaskon, glavon, ŝildon.

'1370 Kaj aldiris ili: "Kune ni ne havas pli da oro, ; Tamen multe da trezoroj tenas en alia loko". ; Ĝis la ter' Pridon' kliniĝis, dankis per afablaj vortoj; ; "La donaco via ĉiam plej valoras por la koro".

'1371 Kaj Pridon' – gastema donis la eblecon por ripozi, ; Disponigis la banejon, kie rozoj bonodoris; Belajn altvalorajn vestojn al amikoj li alportis, ; Orkalikon da juveloj kaj da perloj li aldonis.

'1372 Poste li parolis: "Eble vi min trovos ne gastema, ; Vi ne tedis al mi, gastoj, ĉar vi estas ĉiam kara. ; Sed al Kadĵolando vojo estas longa kaj ne glata; Se plifruos kadĵaj trupoj, finon havos ni amaran.

'1373 ' Multajn trupojn ni ne prenu, trident homoj do sufiĉos, ; Se plej bravaj plej kuraĝaj militistoj kune iros. ; En batalo kontraŭ kadĵoj ni la glavojn utiligos, ; Kaj rapide ĉarmulinon jam liberan ni ekvidos.

'1374 ' Mi jam estis ĉe la kadĵoj – alte staras la kastelo, ; Kaj altigas ĉirkaŭ rokoj, por surgrimpo mankas eblo; Kun batal' ni ne eniros, nur sekrete ni penetros; Grandan trupon ja ne eblas trakonduki tra tunelo".

'1375 Kaj konsentis la amikoj, preta estis la decido, ; Sed Asmaton ili lasis, ŝi ricevis orelingojn; Trident homojn ili prenis, ĉiuj tenis ĉevalbridojn, ; Do atingos ili celon kaj plenumos la deziron.

'1376 Ĉiuj tri kun militistoj transnavigis vastan maron, ; Ĉar Pridon' la vojon sciis, tage-nokte daŭris rajdo; Fine la gvidanto diris: "Sciu, jam proksimas kadĵoj; Por ke ili ne rimarku, nokte estos la vojaĝo".

'1377 Kun Pridon' konsentis ĉiu, sciis leĝojn de kverelo, ; Nokte ili haste rajdis, ĝis ekruĝis la ĉielo; Fine, jen vidiĝis urbo kaj gardistoj ĉe kastelo, ; Bruan kaj milvoĉan eĥon respegulis citadelo.

'1378 La eniron kadĵoj gardis kaj da ili estis miloj; Nun leonoj urbon vidis nur en pala luna brilo, ; Diris ili: "Tre necesas trovi bonan strategion, ; Cento povas milon venki, se militan havas scion".

, & Militkonsilo de Pridon':

'1379 Saĝa reĝ' Pridon' komencis kaj konsilis al amikoj: ; "Por militi kun la urbo devas uzi ni logikon, ; Ni ne povas rekte agi – supernombras malamiko, ; Se pordegon kadĵoj fermos, por ni estos la tragiko.

'1380 ' Iam en la patrolando gaja estis mi infano; Kiel knabo diligenta, mi ellernis multajn agojn: ; Sur ŝnurego kuris lerte, faris tre danĝerajn saltojn; Min vidante tion fari volis ĉiu samlandano.

'1381 ' Kiu povas bone ĵeti longan lazon, kaptoŝnuron, ; Tiu devas ĝin alkroĉi je krenel' de kastelmuro; Mi trakuros sur la ŝnuro kaj atingos kastelturon, ; Poste scios mi tre bone, kiel fari la teruron.

'1382 ' Ŝildon, glavon mi kunprenos kaj atingos citadelon, ; Poste mi desaltos rekte en la mezon de kastelo, ; Neniigos mi gardistojn kaj malfermos la pordegon, ; Vi rapidu, kamaradoj, kaj eniru en tunelon".

, & Militkonsilo de Avtandil':

'1383 Avtandil' respondis: "Kara, ni ne devas vin riproĉi, ; Volas vi per tigraj ungoj malamikon superforti; Ne akceptas ni konsilon, ĉar ĝi nin eĉ povas trompi; Aŭdu – densas la gardistoj, ne intencas ili dormi.

'1384 ' Pensas mi, ke tre malhelpos la tintado de armaĵo, ; Vin rimarkos kaj fortranĉos la ŝnuregon fiaj kadĵoj; Vi pereos en abismo, kaj ne helpos la kuraĝo; Por atingi nian celon, do necesas la ruzaĵo.

'1385 ' Devas vi vin kaŝi bone ĉi en nevidebla loko; La gardistoj ja ne tuŝas simplan vojaĝantan homon, ; Mi transvestos min konvene kiel de komerc' persono, ; La kirasojn kaj armilojn mia mul' surdorse portos.

'1386 ' Se ni tri ekiros kune, tiam nin rimarkos kadĵoj; Vestŝanĝita komercisto trompos per la eksteraĵo, ; Ni surmetos la kirasojn tie en interna kaŝo, ; Malamikon mi frakasos, proksimigos la finaĵon.

'1387 ' Mi interne murdos ilin, vi ekstere faru tion, ; La pordegon vi ataku, estu vi sovaĝaj tigroj; Mi disrompos la serurojn kaj malfermos la eniron; Tia estas mia plano, tian donas mi konsilon".

, & Militkonsilo de Tariel':

'1388 Diris Tariel' al fratoj: "Mi vin bone ne komprenas, ; Viaj vortoj kaj konsiloj al la kavaliroj decas; Scias mi, batalon ardan kaj la venkon vi esperas; Tre agrable kun vi resti, ĉar vi vian vorton tenas.

'1389 ' Sed aŭskultu, fratoj miaj, kion volas mi aldiri, ; Se Nestan' ekaŭdus bruon, ŝi ekvolos kaŭzon scii, ; Vi batalos kiel tigroj sed ŝi min ne povos vidi, ; Honto kovros nomon mian, ŝi komencos malestimi.

'1390 ' Mi preferas la batalon gvidi laŭ sekvanta plano: ; Ni po cent' da homoj prenos, kiam komenciĝos tago, ; Kiel vento sur ĉevaloj ni atakos de tri flankoj; Kadĵoj iros nin renkonti kaj ekbolos la batalo.

'1391 ' Ni impete ekatakos ilin, de pordeg' forpelos ; Du el ni ekstere restos, tria tra tunel' penetros, ; Tie li kaj liaj homoj la kastelon ekposedos ; Prenu ni armilojn niajn kaj necese tie venkos".

'1392 Nun Pridon' parolis jene: "Mi komprenis vian planon; Iam mi al vi donacis plej rapidan el ĉevaloj, ; Mi ne sciis pri batalo kontraŭ kadĵoj – la diabloj, ; Ĉar alie mi ne estus donacinta animalon".

'1393 Kompreneble, li nur ŝercis kaj ridetis la amikoj, ; Ĉar komprenas saĝaj homoj bonan ridon, gajan spriton; Bonhumoro ĉiam helpas, plibeligas kavaliron. ; Ili saltis de ĉevaloj por kontroli la armilojn.

'1394 Intertempe kavaliroj sin preparis por batalo, ; Kaj konkludis: "La plej bonan Tariel' proponis planon". ; Ili tricent kuraĝulojn disdividis en tri partojn, ; Poste ĉiuj enseliĝis kaj surmetis siajn kaskojn.

, & Konkero de Kadĵa kastelo kaj liberigo de Nestan-Dareĝan':

'1395 Tri kuraĝaj kavaliroj estis helaj kiel sunoj, ; Sep planedoj vojon montris, malavaris sian lumon; Sur ĉevalo nigra sidis Tariel' kun la kunuloj; Kaj minacis al la kadĵoj la rigardo de okuloj.

'1396 Kion poste mi rakontos, tion vidos firmamento; Furioze frapas pluvo kaj naskiĝas la torentoj, ; Ili strebas, furiozas kun la bruo kaj la vento, ; Kunfluente kun la maro trankviliĝas poste sentoj.

'1397 Al Pridon' kaj Avtandilo ja ridetas la fatalo, ; Sed kun Tariel' neniu volus lukti en batalo; Pro la sun' planedoj palas, ŝajnas luno la vasalo; Do atentu, aŭskultantoj – ni priskribos la realon.

'1398 Tri rajdantoj nun elektis tri pordegojn por konkero, ; Ilin sekvis tricent homoj, ne timantaj la danĝeron. ; Ĉiujn bone kaŝis nokto, arbaretoj kaj kavernoj; Post tagiĝo komenciĝis militiro por libero.

'1399 Ili kvazaŭ vojaĝantoj lante rajdis al kastelo, ; Ĉe gardistoj ne alvokis ian miron en mantelo, ; Gardo staris kaj babilis pri diversaj bagateloj. ; Nur proksime atakantoj fulme rajdis al tunelo.

'1400 Surmetinte kaskojn, ili etatakis, fajfis skurĝoj, ; Gardon de pordeg' forpuŝis kaj eniris kuraĝuloj, ; De tri flankoj tri taĉmentoj enpenetris en la urbon, ; La alarmsignalo tie eksonoris el la burgo.

'1401 Nun la kadĵojn laŭmerite dia puno fine trafis, ; Kronos* – la koleriĝinta brilajn sunradiojn kaŝis. ; Venĝis senkompate fato, firmamento mem surfalis; Kaj amasojn da kadavroj atakantoj ĉie lasis.

'1402 Tariel' terure kriis, ke la kadĵoj time svenis, ; Li per glavo la kirasojn hakis, kiel vakson sekcis; Tri pordegoj al impeto de la atakantoj cedis; Por konkeri la kastelon fine la momento venis.

'1403 Avtandil', Pridon' interne renkontiĝis ĉe kastelo, ; La mortintaj kadĵoj kuŝis, sanga iĝis la kverelo; Intervokis ili gaje, jam proksimis fina celo, ; Sed ne vidis ili fraton – vane serĉis Tarielon.

'1404 La amikoj lin ne trovis kaj ne estis iu spuro, ; Ili al kastelpordego iris, vidis nur detruon, ; Kun kirasoj dishakitaj kuŝis kadĵoj ĉe la muroj, ; Miloĵ da kadavroj aĉaj ne ekvidos plu la sunon.

'1405 Defendintoj de l'kastelo preskaŭ ĉiuj kuŝis mortaj, ; Ĝis piedoj dishakitaj per glavbatoj ege fortaj, ; La kastelpordego ŝajnis kvazaŭ post batego tondra; Tariel' trairis tie – ĉiuj signoj tion montras.

'1406 Ili pene trovis vojon tra tunelo sub la tero, ; Vidis sunon kun la luno, ŝi jam estis en libero. ; Tariel' forĵetis kaskon, tenis ŝin en ĉirkaŭpreno, ; Kol' ĉe kolo, brust' ĉe brusto alpremiĝis en la beno.

'1407 Ili pro la ĝojo ploris, unu la alian kisis, ; Kvazaŭ kun Muŝtar' Zualo – du planedoj unuiĝis, ; Rozo respogulis sunon, kiu sur ĉielo brilis; Vivo estis tre amara, nun feliĉa ĝi fariĝis.

'1408 Do senfinaj estis kisoj kaj ne ĉesis enbrakigoj, ; Rozpetaloj kungluiĝis, karesemaj estis cignoj; Avtandil', Pridon' alvenis – la amikoj kaj savintoj, ; Kaj estintan kaptitinion nun salutis la venkintoj.

'1409 Al kvar homoj sun' ridetis kaj deziris la feliĉon; Al savintoj siaj bravaj ŝi donacis varman kison – ; Tio estis ja merita kaj sincera dankesprimo; Ili ambaŭ ŝin respondis kun ĝojsento kaj estimo.

'1410 Ili kore nun salutis Tarielon, la cipreson, ; Lin gratulis pri la venko kaj ne ĉesis la gajeco; Ne bedaŭris kavaliroj longan vojon, fortostreĉon, ; Al la kadĵoj – kaproj montris la leonan nun bravecon.

'1411 Estis tricent atakantoj, restis nur centsesdek homoj; Do Pridon' eksentis perdojn sed ĝojigis venka gloro; Ili serĉis vivrestintojn kaj transdonis al la morto; La venkintoj en kaŝejoj trovis multe da trezoroj.

'1412 Grandaj estis la trofeoj, kolektitaj por transporto: ; Tri mil mulojn kaj kamelojn ŝarĝis ili per la kofroj; Tie kuŝis grandaj perloj, oro, multekostaj ŝtonoj. ; Por Nestan' dediĉis ili palankenon kun eskorto.

'1413 Sesdek homoj tie restis por la gard' de citadelo; Ili sunon jam kunprenis, portis ŝin en palankeno, ; Sin direktis al la bordo, al la mara suvereno – ; Fatman volis ili vidi – estis tio sankta devo.

, & Alveturo de Tariel' al la reĝo de la maroj:

'1414 Tariel' al mara reĝo nun forsendis kurieron, ; Skribis: "Via reĝa moŝto, mi konkeris kadĵajn terojn, ; Mi reprenis mian sunon, realigis mian revon; Nun mi volas kiel patron vidi vin, de l'maroj reĝon.

'1415 ' Mi konkeris Kadĵolandon, iĝis ĝia posedanto, ; Ĉio bona kaj sukcesa ligas min kun via lando, ; Fatma savis mian sunon, estas ĉiu atestanto. ; Mi ne scias, kiel povus mi esprimi mian dankon.

'1416 ' Al ni iru, ni rapidas vidi reĝon de la maroj; Mi donacas Kadĵolandon, prenu ĝin kun loĝantaro, ; Plifortigos vi la limojn de belega Gulanŝaro: ; Vi renkontu nin persone, prenu la kunsekvantaron.

'1417 ' Vi transdonu la saluton al Usen', al la edzino, ; Fatma estos tre feliĉa vidi ĉarman zorgatinon; Ĝis hodiaŭ ni ŝin konas kiel mian helpantinon, ; Ĝis frenezo ege amis ŝi Nestan', la kaptitinon".

'1418 Kiam reĝo la leteron prenis de la kuriero, ; Li atente ĝin tralegis kaj komprenis la misteron, ; Estis reĝo de la maroj tre kontenta – trovis veron: ; Li postulis la ĉevalon kaj sidiĝis en la selon.

'1419 Li decidis por fianĉo tie fari edziĝfeston, ; Do kunprenis valoraĵojn, grandan kvanton da ĝisero; Gaja Fatma rajdis kune – ŝi revidos ĉarman belon; Tagojn dek vojaĝo daŭris, ĝis atingis ili celon.

'1420 Tri rajdantoj alrekonte rajdis al la suvereno; Li salutis ilin kore, kisis kun estima sento, ; Tarielon li laŭdegis, tie diris komplimentojn. ; Ekvidinte ŝin, la reĝo ĝuis brilon kaj belecon.

'1421 Kiam Fatma ŝin denove vidis sana kaj libera, ; Kisis ŝi piedojn, manojn, la vizaĝon lumoplenan, ; Diris: "Dio, mi vin gloras, ja revenas tago hela; La malbono malaperas, ĉar ĝi estas efemera".

'1422 Kaj Nestan' ŝin ĉirkaŭprenis, kvazaŭ estus ŝi patrino: ; "Dio jen kompatas koron subpremitan kaj animon; Nun mi plenas kiel luno kaj ne sentas plu la timon, ; Sun' radias sur la rozon, estas mi feliĉulino".

'1423 Reĝo prenis la pokalon kaj li benis la miĝnurojn, ; La edziĝfesteno granda unuigis feliĉulojn, ; Por la konkerita lando fluis de donacoj pluvo, ; Sonoretis ormoneroj sub piedoj de kunuloj.

'1424 Amasiĝis tie silkoj, la veluroj kaj atlasoj, ; Ornamaĵoj kun juveloj, gulanŝaraj valoraĵoj; Tariel' ĉi prenis kronon, ĝin ornamis diamantoj; Trono estis el la oro kiel rara antikvaĵo.

'1425 Reĝo al Nestan' prezentis veston kun belega zono, ; Superŝutis ĝin la mastroj per rubenoj, juvelŝtonoj; Kavalir' kaj la virino nun sidiĝis sur la tronojn, ; Kaj vidantoj freneziĝis, ne detenis ili ĝojon.

'1426 Reĝo donis la donacojn al Pridon' kaj Avtandilo, ; Ili po ĉeval' ricevis kun valoraj seloj, bridoj, ; Ankaŭ vestojn li donacis kun agrablaj kolorbriloj; Riverencis ili, diris: "Nia dank' ne havas limojn".

'1427 Tariel' solene dankis grandan reĝon de la maroj; "Mi feliĉas, ĉar ekvidas mi vin kaj la karan paron, ; Due, nin vi superŝutis per favoro, juvelaroj. ; Certe, nia renkontiĝo estis tre bonega faro".

'1428 Reĝ' de maroj al li diris: "Mem vi estas reĝ' – leono, ; De proksime vi vivagas, dum disiĝo kaŭzas morton; Mi ne povis vin sufiĉe rekompenci por la bono; Kion faros post disiĝo sopiranta mia koro?"

'1429 Tariel' al Fatma diris: "Estas mia vi fratino, ; Ŝuldon grandan al vi pagi, havas sanktan mi deziron, ; Prenu do trezoron tutan, kiun donis militiro, ; Tamen restas mi ŝuldanto, ĉar por mi vi savis vivon".

'1430 Li denove dankas, tamen Fatma nur mallevis kapon: ; "Ĉi rakonto en la koro ekbruligas grandan flamon, ; Sed se vi min jam forlasas, pligrandiĝas mia plago; KuNestan'te mi – feliĉa kaj sen vi amaras tago".

'1431 Al la reĝ' de Gulanŝaro diris tri ĉielaj astroj, ; Kaj kristale brilis dentoj, lipoj ŝajnis rozpetaloj: ; "Ĝojas ni, sed mankas tempo, vane sonas la cimbaloj, ; Forpermesu nin, ni petas, sidas ni jam sur ĉevaloj.

'1432 ' Granda reĝo, nia patro kaj fidela bonfaranto, ; Ni bezonas grandan ŝipon por atingi nian landon". ; Reĝo diris: "Ĉion faros mi por miaj karaj gastoj, ; Se ne havas vi la tempon, povas iri sen prokrasto".

'1433 Ĉe marbordo en haveno reĝo donis bonan ŝipon, ; Ĉiu sentis, ke alvenis fino de intervidiĝo, ; Tariel' kaj fratoj liaj ŝiris harojn pro disiĝo, ; Fatma ploris, ŝiaj larmoj kaŭzis maran pligrandiĝon.

'1434 Jen sur mar' navigis fratoj, rememoris pasintecon ; Kaj ripetis siajn ĵurojn pri eterna amikeco; Tage kantis feliĉuloj, plibeligis ilin ŝercoj, ; Kaj radiojn de la lipoj respegulis rafineco.

'1435 Al Asmat' rememorinte ili sendis kurieron, ; Kaj rakontis pri batalo kaj pri venko en letero: ; "Suno vojas sur ĉielo, al mi venos kun fiero, ; Ni sen ŝi antaŭe frostis, nun ni sentas primaveron".

'1436 Laŭ la bordo de la maro sunon portis fratiĝuloj, ; Ŝi en palankeno sidis, lumon pli ne ombris nuboj; Kiel bonas kamaradoj, ŝercis, ridis feliĉuloj; Fine landon de Pridono jam ekvidis la okuloj.

'1437 Alveninte, nobelaro volis vidi karajn gastojn; Kaj Asmat' ĉeestis gaja, ŝi atendis sian astron, ; Enbrakigis ŝi Nestanon – ne disigus ilin fato; Nun Asmat' feliĉa estis ŝin ekvidi en bonstato.

'1438 Kaj Nestan' vizaĝon ŝian kovris per varmegaj kisoj, ; Diris: "Vi pro mi suferis, nun de plago venis fino, ; Mi denove povas ĝoji, ne avaras al mi dio, ; Tamen kiel mi repagos vin – sindonan amikino?"

'1439 Asmat diris: "Glor' al dio, ke mi vidas freŝan rozon. Ĝojas mi, ke la racio venkas homan furiozon; Kiam mi vin vidas gaja, tuj forgesas aĉan prozon". ; Amo inter reĝ' kaj sklavo estas bona do supozo.

'1440 Ilin gloris kaj laŭdegis kunveninta nobelaro, ; Kriis: "Dio nin ĝojigis, montris la ĉiel' kompaton, ; Ĉar ni povis vin ekvidi kaj estingi nian flamon; Dio povas resanigi vundojn, kiujn faras amo".

'1441 Kaj al Tariel' veninte, didebuloj kisis manon, ; Li respondis: "Viaj fratoj por ni perdis siajn kapojn, ; Kaj atingis ili gloron per senmortaj siaj agoj, ; En ĉielo trovis ĝojon kaj merit'is vian raven".

'1442 Sed la mort' de batalantoj por mi estas tragedio, ; Kvankam scias mi tre bone, ke akceptos ilin dio, ; Kaj esploris ĉi amare, Tariel' dirinte tion, ; De narcisoj blovis vento, roz' suferis de glacio.

'1443 Kaj kun li esploris kune ĉiuj homoj, didebuloj, ; Memorinte pereintojn, kiuj estis kuraĝuloj, ; Ili diris: "Kun la suno vin komparas la saĝuloj, ; Tial ne konvenas plori, kiam vidas vin okuloj.

'1444 ' Kiu do merit'as vian grandan ploron kaj suferon? ; Militist' preferas morti, sed ne treti vane teron". ; Kaj Pridon' konsole diris: "Ne necesas nun ĉagreno, ; Dio sendu al vi ĝojon, akompanu vin soleno!"

'1445 Ankaŭ Avtandil' eldiris karajn kondolencajn vortojn; Ili petis lin ne plori: "Militist' ne timas morton; Gravas, ke leono trovis sunon, de feliĉo fonton, ; Ni forviŝu niajn larmojn kaj forgesu aĉan sorton".

'1446 Ĝis Mulgazanzar' konata ili rajdis sur kameloj, ; Kaj eksonis en la urbo la tamburoj kaj trumpetoj, ; Ĉiuj ĝojis kaj aklamis, eĉ doloris la oreloj, ; Amasiĝis la urbanoj, nigraj sklavo kaj nobeloj.

'1447 Venis homoj el bazaro, el butikoj la vendistoj, ; Tie pene ordon faris granda rondo de gardistoj; Homamaso pligrandiĝis, staris viroj – pafarkistoj. ; La vidaĵo estis gaja kaj samtempe bonaj distroj.

'1448 Jen palaco de Pridono plena de riĉaĵoj, lukso, ; Tuj eliris multaj sklavo kun orzonoj tra la brustoj, ; Ili sternis la tapiŝojn el veluro kun la gusto, ; Kaj disŝutis reĝo oron – li sendube faris juston.

& La edziĝfesto de Tariel' kun Nestan-Dareĝan' en palaco de Pridon':

'1449 Por la hindoj tie staris blank-purpura reĝa trono, ; Ĝin ornamis ruĝaj, flavaj gemoj, altvaloraj ŝtonoj; Tron' por Avtandilo estis flava – nigra laŭ la moro; Ili venis kaj eksidis, eĉ spiradi ĉesis homoj.

'1450 Jen aperis la kantistoj kaj dolĉigis la orelojn, ; Edziĝfesto estis pompa, longe daŭris la festeno; Kreskis aro da donacoj de brokato kaj sateno; Al Nestan' ridet' konvenis, ĉar ĝi montris perlajn dentojn.

'1451 Kaj donacojn sendis Pridon', destinitajn por geedzoj. Dek grandegaj perloj estis kiel ovo de anseroj, ; Kvazaŭ hela suno brilis kaj radiis unu gemo, ; Ke ĉe ĝia lumo nokte oni farus la desegnon.

'1452 Ĉiu de Pridon' ricevis po belega koliero, ; Facetitaj diamantoj kovris ĉiun ekzempleron; Poste oni ĉi prezentis pezan kaj grandegan pleton, ; Al leono – Avtandilo ĝin donacis suvereno.

'1453 De belegaj grandaj perloj tiu pleto estis plena, ; Ĝin al Avtandil' prezentis reĝo kun parol' konvena; Domo plenis de veluro, de brokato orfadena; Tariel' majeste dankis en parol' neforgesebla.

'1454 Dum ok tagoj daŭris festo, interrompon ĝi ne konis; Ĉiutage al la gastoj mastro la donacojn donis, ; Tage, nokte en palaco ĉango bele tie sonis; Al Nestan' kaj Tarielo ŝajnis – ili ĉion songis.

'1455 Al Pridon' parolis foje Tarielo dum regalo: ; "Sinofere vi min helpis, ĉar kunigis nin fatalo; Por vi vivon kaj animon mi fordonus en realo, ; Mi jam mortis, sed vi trovis por la vundoj la balzamon.

'1456 ' Avtandil', por mi, vi scias, riskis, ne domaĝis kapon, ; Mi deziras reciproke rekompenci la arbaron; Iru kaj demandu, kion volus havi tiu kano; Kiel li estingis mian, mi estingos lian flamon.

'1457 ' "Diru, frato, kiel povus mi la helpon rekompenci; La ĉielo vin favoru – mi al di' ne ĉesos preĝi; Se ne povos mi plenumi, kion vi deziras peti, ; Mi ne vidu propran hejmon, mi ne povu ĝojon senti.

'1458 ' ' Diru, kion vi deziras, kian vi bezonas helpon? ; Pensas mi, ke por viziti Arabion venis tempo. ; Mi kun vi vojaĝos tien, kune agos ĝis la venko. ; Se edziĝi vi ne povos, vi ne havus tiun revon.""

'1459 Kaj Pridon' transdonis ĝuste tiujn vortojn al arabo; Avtandil' nun multe ridis, ekaŭdinte paroladon: ; "Ne necesas por mi helpo, ĉar ne estas mi serĉanto, : Ja ne estas mia suno kaptitin' de Kadĵolando.

'1460 ' Jam ŝi sidas sur la trono – la potenca regantino, ; Kaj neniu ŝin ofendas, ĉiu montras la estimon, ; Ne suferas ŝi de kadĵoj, estas forta leonino; Ne necesas al mi helpo, nur suffiĉas dankesprimio.

'1461 ' Se al mi feliĉon sendos miaj fato kaj destino ; Kaj la saman al mi donos ĉiopova alta dio, ; Tiam mi mortonto povos plene ĝui sunan brilon; Ĝis momento tia estos vivo vanta kaj ruino.

'1462 ' Jen al Tariel' respondo, ĝin transdoni mi vin petas: ; "Vi bonkora estas reĝo, tamen danko ne necesas. ; De naskiĝo ĝis la morto, mi nur sklavo via estas; Dio faru el mi polvon, se ne iĝos vi potenca.

'1463 ' ' Diris vi, ke vi deziras min kun suno unuigi; Tio decas al vi, frato, min vi volas plialtigi, ; Tamen tie ne necesas langon, glavon utiligi, ; Do preferas mi atendi kaj al providenco fidi.

'1464 ' ' Kaj mi povas nun aldoni – jen deziro mia granda: ; Mi tre volas vin ekvidi sur Hindia tron' sidanta, ; Ke apude sidu astro, sunan brilon radiantan, ; Ke punita estu ĉiu malamiko aroganta.

'1465 ' Nur post tio, kiam fine la deziro realiĝos, ; Mi revenos Arabion, al la suno proksimiĝos; Kiam ŝi ekvolos tion, mian flamon ŝi estingos. ; Mi de vi nenion volos, poste dankon vi esprimos.""

'1466 Kiam Tariel' aŭskultis transdonitan ĉi respondon, ; Diris li: "Se mi konsentos, tiu faro estos honto. ; Kiel trovis li balzamon savi min de vera morto, ; Same fidelulo trovu helpi pretajn niajn fortojn.

'1467 ' Iru al li kaj transdonu: "Mia vort' ne estas flato, ; Mi ne cedos, ĝis ne venos mi al reĝo Rostevano; Iam kelkajn liajn sklavojn ja mortigis mia mano; Nur pardonon ricevinte, mi revidos hindan landon".

'1468 ' Diru tiel: "Ne necesas plu traktadi, nek paroli, ; Ne prokrastos mi foriron – morgaŭ mi komencas voji; Saĝa reĝo de araboj ja ne povas vin ignori; Mi vin petos kaj petegos al spaspet' filinon doni.""

'1469 Kaj Pridon' ĉi tiujn vortojn rerakontis kaj aldiris: ; "Tariel' ne cedos certe, vane volas vi konvinki". ; Avtandil' ĉagrenis multe, lin denove flam' bruligis, ; Tamen kavaliro devas reĝojn ami kaj estimi.

'1470 Avtandil' vizitis hindon, liajn gambojn ĉirkaŭprenis, ; Petis lin sur la genuoj, la okulojn eĉ ne levis: ; "Kontraŭ Rostevan' ĉi jare mi nevole multe pekis; Ne devigu ĵuron rompi, lin denove malobei.

'1471 ' Fari, kiel vi deziras dia juĝo ne permesos; Kiel povas mi perfidi, rompi mian fidelecon, ; Tiun, kiu min edukis, mi intence ne ofendos, ; Ĉar servanto kontraŭ reĝo ja neniam glavon levos.

'1472 ' Do alie ĉio estos, se kun glavo vi alvenos, ; Sin deturnos la virino kaj mi mian amon perdos, ; Ŝi silentos, ne respondos, de kortego min forpelos, ; Kaj neniu la pardonon de la reĝ' al mi elpetos".

'1473 Tariel' ekridis gaje, aŭskultinte paroladon, ; Avtandilon enbrakigis kaj starigis sur la plankon: ; "Vi alportis la feliĉon, por mi savis mian amon, ; Reciproke mi donacos al vi gajan sunbriladon.

'1474 ' Mi ne ŝatas singardemon en rilatoj inter homoj, ; Mi ne amas tromemfidon, malserenon kaj angoron; Se amiko estas vera – strebas li al mia koro, ; Kaj se homo ne sinceras, li meritas nur ignoron.

'1475 ' Scias mi, ke la virino al vi sentas ardan amon. ; Ne ofendos ŝin vizito, ne estingos ŝian flamon; Kun la reĝo mi parolas nur sincere kaj sen flato, ; Mi nur volas lin ekvidi kaj honori lian agon.

'1476 'Kaj mi diros, mi petegos saĝan reĝon de araboj, ; Ke al vi li vole donu de filino sia manon; Se kuniĝo estas celo, kiel fari la obstaklon? ; Estos vi reĝino – reĝo, altaj poploj, sveltaj kanoj".

'1477 Kiam Avtandil' ekvidis – Tariel' ne amas cedi, ; Li konsentis, ĉar ne volis vane kun amik' kvereli; Tiam trupon de gardistoj por eskort' Pridon' elektis, ; Kaj li mem kun ili rajdis, do enuo ĉi forestis.

, & Alveno de tri kavaliroj al la kaverno kaj forveturo al Arabio:

'1478 Pri kaŝita tiu faro saĝa Divnos* bone diras: ; Dio kreas nur la bonon kaj malbonon neniigas, ; Li kurtigas la malbonon kaj la bonon plilongigas, ; Ĉar senliman perfektecon plejaltulo personigas.

'1479 Tri leonoj, tri sunplenaj jam elrajdis de reĝlando. ; Ili portis la virinon, la belegan por vidado, ; Haroj nigre brilis kiel la flugiloj de korako, ; Kaj rubenoj badaĥŝanaj plibeligis ŝiajn vangojn.

'1480 Sidis ŝi en palankeno, oni ĝin sur ŝultroj portis, ; Kaj survoje ili ĉasis, la ĉaskornoj ofte sonis; Kiu vidis belulinon, tiun ŝia ĉarmo sorĉis, ; Homoj iris ŝin ekvidi, laŭdis kaj donacojn donis.

'1481 Ŝajnis, ke la suno vojas kun la lunoj-kunirantoj, ; Tiel ili rajdis, ŝercis, vojaĝante multajn tagojn, ; Vojo iris tra dezertoj, tra senhomaj vastaj kampoj; Kaj konatajn rokojn vidis fine belaj geamantoj.

'1482 Tariel' al ili diris:"Mi hodiaŭ estas mastro; Iru, kie mi suferis dum freneza mia vago; Tie nin Asmat' regalos per viando de rostaĵo, ; Poste al vi mi donacos la diversan valorajon".

'1483 Ili venis al kaverno inter rokoj kaj arbaroj; Mortigitan cervon rostis la fratino por la fratoj, ; Kaj senĝene ili ŝercis kaj memoris bonajn agojn, ; Dankon diris al ĉielo por feliĉa tia tago.

'1484 Poste ili tra kavernoj iris, faris ĉi esploron, ; En kaŝejoj sigelitaj ili vidis la trezoron, ; Kies kvanto senmezura kaŭzis miron kaj stuporon; Nek envion, nek domaĝon ili montris en parolo.

'1485 Tariel' al ĉiu donis kaj donacojn malavaris, ; Rekompencis li gardistojn, kiuj ilin akompanis, ; Multajn sakojn li plenigis kaj trezoron ja ne ŝparis, ; Tamen ili malgrandiĝon de trezoro ne rimarkis.

'1486 Al Pridon' li diris: "Ĉiam estos via mi ŝuldanto; Oni diras, ke finfine ne pereas bonfaranto; Prenu tiun vi trezoron, kiom estas, tutan kvanton. ; Nun ĝi via estas, frato, portu ĝin en vian landon".

'1487 Kaj Pridon' kun riverenco diris sian dankan vorton: ; "Reĝ', ne pensu, ke mi estas avarulo aŭ despoto, ; Havas propran mi trezoron, ne necesas al mi oro; Kiam vidas vin mi belan, tiam ĝojas mia koro".

'1488 Poste ŝarĝis li kamelojn kaj forsendis karavanojn, ; Al la propra lando portis la oraĵojn, filigranojn; Nun la celo estis unu – "Rekte al araba lando!"; Kiel serpo de la luno nun fariĝis la arabo.

'1489 Jen finfine la araban limon ili proksimiĝis ; Kaj kastelojn kun vilaĝoj ofte ĉe la vojo vidis; Loĝantaro de la lando blue, verde ĉi vestiĝis, ; Kaj pri Avtandilo larmoj ĉie en abund' verŝigis.

'1490 Tariel' al Rostevano sendis homon kun letero: ; "Reĝo, estu grandanima, montru veran sincerecon; Volas vidi mi vin, reĝo, la palacon kaj fortresojn, ; Al vi montros rozburĝonon, kiu ĵus evitis velkon.

'1491 ' Vi ne estis tre kontenta, min vidinte dum ĉasado, ; Min ne vane volis kapti, ne sukcesis via plano. ; Tiam mi freneza estis, forte skurĝis mia mano – ; Mi mortigis multajn homojn, kiuj servis ĉe palaco.

'1492 ' Nun mi iom devojiĝis ĉar viziti vin deziras, ; Ke pardonu grandanime vi min pro la pek' farita; Ne prezentos mi donacojn, kiujn granda reĝo indas – ; Sola dono ĉe mi estas Avtandilo admirinda".

'1493 Kiam Rostevan' enhavon de la skribo jam eksciis, ; Lin ekregis tia ĝojo, ke neblas ĝin priskribi, ; Kaj ĉe Tinatin' la vangoj kiel matenruĝ' ekbrilis, ; Ombro de la okulharoj la rubenon plibeligis.

'1494 Nun komencis ĉiu ĝojo, sonis ĉie la timbaloj, ; Sonis ĉie gajaj voĉoj, kantis tie najtingaloj; Ektumultis militistoj, ekrapidis al ĉevaloj – ; Al la reĝoj homoj hastis, al virino en vualo.

'1495 Reĝo Rostevan' rapidis kun la estroj de la trupoj, ; Eksciinte de aliaj lokoj venis didebuloj, ; Ili gloris la ĉielon pro la retrovita suno: ; "La malbono estas kurta, bonon ĝuas jam okuloj".

'1496 Kiam Avtandil' rimarkis alrajdantan aron foran, ; Li al Tariel' parolis per silenta voĉ' senpova: ; "Ĉu vi vidas ebenaĵojn kun fluganta nuboj polva? ; Tio en fajregon ĵetas mian koron senkonsolan.

'1497 ' Tie rajdas edukinto por renkonti vin – la reĝon. ; Mi ne povas tien iri, mi ĉi tie dume restos. ; Iu homo iam ie ĉu similan honton sentos? ; Kun Pridon' vi iru kune, mi esperas vian helpon".

'1498 Tariel' respondis: "Frato, bona estas via penso, ; Dume restu vi ĉi tie, malproksime en soleco; Mi rakontos al la reĝo, ke suferas via menso, ; Kredas mi, vin unuigi kun la suno mi sukcesos".

'1499 Avtandil' – leono restis, li starigis tie tendon, ; Kaj Nestan' ne rajdis kune, ĉiun sorĉis ŝia belo, ; Blov' de ŝiaj okulharoj ŝajnis Aravi* venteto; Do al Rostevan' senkaŝe sin direktis hinda stelo.

'1500 Sekvis lin Pridon' fidela, ili rajdis tra la kampo; Rostevan' rekonis hindon, la staturon de reganto, ; Li estime riverencis, desaltinte de ĉevalo, ; Kaj salutis alvenintan hindan reĝon kiel patro.

'1501 Ankaŭ Tariel' salutis, file kisis maljunulon; Reciproke ĉirkaŭprenis hind – araba grandeguloj, ; Kaj parolis mirigita, ne kredante al okuloj: ; "Suno, kiam vi forestas, hela tago perdas lumon".

'1502 Arabreĝo hindan reĝon pririgardis kun la miro, ; Al li plaĉis la vizaĝo, forta brak' de l'kavaliro; Kaj Pridon' salutis reĝon, espriminte la estimon; Rostevan' malpacienca – li ne vidis Avtandilon.

'1503 Tarielon laŭdis reĝo, sed ne kaŝis la malĝojn; Hinda diris: "De hodiaŭ via estas mia koro, ; Sed ne laŭdu min tro multe, ne trotaksu mian gloron – ; Vi ja havas Avtandilon, ĉu li estas en memoro?

'1504 ' Vi ne miru, reĝa moŝto, ke nuntempe li forestas; Ni eksidu sur monteto, kiu jen proksime verdas; Mi malkaŝos tutan veron, kial Avtandil' ne venas; Havas mi al vi la peton, se nur peti vi permesas".

'1505 Kaj sidiĝis tie reĝoj, kie kreskis herbo densa; Tra vizaĝ' de Tarielo jen trakuris lumo pensa; Ĉiun ravis lia saĝo, same bonkondukt' prudenta; Li sin turnis al la reĝo kun parolo elokventa.

'1506 "Vi pardonu, reĝa moŝto, ke mi havas la kuraĝon, ; Tamen mi alvenis peti, alparoli vian saĝon; Kun mi petas mia suno – mia dia kreitaĵo, ; Ni suferis ambaŭ kune, faris longan do vojaĝon.

'1507 ' Do ni ambaŭ nun kuraĝas vin petegi tre sincere; Avtandil' min resanigis, ĉar li agis sinofere, ; Li forgesis sian plagon, kiu sekvis lin surtere; Tamen tutan historion nun aŭskulti estus tede.

'1508 ' Unu la alian amas – Tinatin' kaj Avtandilo. ; Scias mi, ĉar mi ja vidis, kiel ploris kavaliro. ; Petas mi sur la genuoj, reĝo, helpu la savinton; Al fortulo, kuraĝulo donu manon de filino.

'1509 ' Do nek longan, nek mallongan mi ne diros plu la vorton"; Prenis Tariel' la tukon, ĝin alligis ĉirkaŭ kolo, ; Poste li surgenuiĝis kaj atendis la favoron; Ĉiu miris kaj silentis, ĉar solena estis horo.

'1510 Lin vidante surgenuie, Rostevano konfuziĝis, ; Riverencis ĝis la tero kaj al Tarielo diris: ; "Reĝo, jen estintan ĝojon via ago neniigis, ; Senbezona humiliĝo vundis koron kaj afliktis.

'1511 ' Ja ne eblas, ke ignoru iu homo vian peton; Se ekvolas Avtandilo, mi fordonus filineton; Same farus mi, se skribe vi ordonus per letero, ; Ĉar al Avtandil' egala viro mankas sur la tero.

'1512 ' Kaj ne trovos mi bofilon, kiu estus pli valora; Tutan regnon jam heredis Tinatin', mi ŝin adoras; Mia rozo jam forvelkas kaj la ŝia nur burĝonas. ; Kiel povas mi malhelpi, kiam ŝi la samon volas.

'1513 ' Eĉ se vi proponus sklavon, mi fordonus la filinon, ; Kiu al vi kontraŭ-diris? – Eble nur frenezigiĝinto. ; Se ne amus mi spaspeton, ĉu mi sentus la disiĝon? ; Sur ĉielo dio vidas – mi sincere diras tion".

'1514 Ĉion Tariel' aŭskultis kaj komprenis la sukceson, ; Li denove dankis reĝon, faris ĉarman riverencon; Rostevan' la kapon klinis, montris sian afablecon; Ambaŭ estis tre kontentaj pri konkordo kaj indeco.

'1515 Tuj Pridon' surĉevaliĝis kaj al Avtandil' galopis, ; Sen prokrast' al kavaliro la novaĵon li transdonis, ; Kaj kun si lin alkondukis, kiel frato lin eskortis; Tamen Avtandil' al reĝo montri la vizaĝon hontis.

'1516 Lin vidinte reĝ' ekstaris, kavaliro jen alvenis, ; La vizaĝon tuko kaŝis, mute Avtandil' silentis; Jen nubegoj sunon kovris, rozo de la prujn' frostetis, ; Sed belecon lian kaŝi ja neniu fort' sukcesis.

'1517 Rostevan' lin volis kisi, plu ne fluis ardaĵ flamoj, ; Reĝajn krurojn ĉirkaŭprenis Avtandil' per siaj manoj; "Vi ekstaru!" reĝ' ekkriis, "vi plenumis gloran faron, ; Vi ne devas honton senti, ne meritas vi kondamnon."

'1518 Rostevan' lin ĉirkaŭprenis, longe kisis la vizaĝon: ; "Vi estingis flamon mian kaj dolĉigis la finaĵon; Estu certa, vi, leono, vin atendas agrablaĵo, ; Vi kuniĝos kun la suno, prenu mian heredaĵon".

'1519 Kaj li kore enbrakigis fortegulon kaj zorgaton, ; Lin li apud si sidigis, ne deturnis la rigardon, ; Avtandil' merite estis de la suno posedanto, ; Do agrabla estas ĝojo post venkita granda plago.

'1520 Avtandil' al reĝo diris: "Vana estas tempoperdo; Kial vi prokrastas vidi sunon de la oriento? ; Ni renkontu ŝin kun ĝojo kaj konduku al kortego, ; Ŝi radiu astran brilon, sentu ni ĉielan benon".

'1521 Avtandil' al Tarielo la deziron saman diris, ; Tri rajdantoj – Goliatoj* al Nestano proksimiĝis; Ili estis feliĉuloj, deziratan jam atingis, ; Do ne vanaj estis penoj, nun la suno gaje brilas.

'1522 Reĝ' haltigis la ĉevalon kaj salutis la hindinon, ; Lin blindigis hela brilo, kiu iris de virino; Forlasinte palankenon, reĝon kisis ĉarmulino; Konsterniĝis Rostevano, ĝojo estis en kulmino.

'1523 Diris li: "Ho, suno hela, kiel glori vin - sennuban? ; Kaŭzas vi, ke eĉ saĝuloj vin vidante frenezumas; Mi ne trovas la komparon, ĉi vi estas suna, luma? ; Rozoj, mi ne volas vidi, vin de ĉi momento nuna".

'1524 Ĉiun, kiu ŝin ekvidis, radiado ŝia sorĉis, ; Kiel suno ŝi blindigis, la okuloj ekdoloris; Koroj kvankam brulvunditaj, tamen ŝin sentante ĝojis, ; Kie ajn ŝi aperadis, homoj lasi ŝin ne volis.

'1525 Al palaco poste rajdis reĝoj kaj kunsekvantaro, ; Sep planedojn la rajdantoj komparadis kun la astroj, ; Sed ne eblas ja klarigi, nek esprimi ŝian ravon; Jen palaco kaj la homoj kri-salutis karajn gastojn.

'1526 Enirinte, kavaliroj, la reĝinon jen ekvidis, ; Ŝin la sceptro, ora krono, ornamaĵoj plibeligis, ; De vizaĝo ŝia suna en ĉambrego lume iĝis; Hinda reĝo kun edzino al la trono proksimiĝis.

'1527 La gereĝoj de Hindio donis al ŝi la saluton, ; Kisis ilin la reĝino kaj gratulis pro la nupto, ; Ili ĉiuj sunradiis kaj ne estingiĝis lumo, ; Giŝer' iĝis okulharo – kristalvitro bela frunto.

'1528 Tinatin' invitis ilin ekokupi reĝan tronon; Tariel' respondis: "Sidu tie vi kun ora krono; Nun la lok' al vi konvenas pli ol al ilia homo; Apud vi sidiĝi decas al leon' inter leonoj".

'1529 Tariel', Nestan' jen prenis je la mano la reĝinon, ; Apud ŝi sidigis ili ŝian amon – Avtandilon, ; Kaj belega estis paro – la leono, leonino, ; Mem Ramin kaj Vis al ili devus cedi en humilo.

'1530 Tinatin' tre konfuziĝis sidi apud vir' amata, ; Ŝia koro forte batis kaj vizaĝo iĝis pala; Diris Rostevan': "Filinjo, la afero estas klara; Ne pereas vera amo – oni diris saĝon raran.

'1531 ' Mi de nun al vi deziras la miljaran longan vivon, ; Sen suferoj sen turmentoj en feliĉo kaj estimo; Ĉiam estu vi senŝanĝaj kiel firmamenta firmo; Kiam fine venos tempo, faru mian enterigon".

'1532 Poste reĝ' ordonis: "Trupoj, vi salutu reĝon novan, ; Avtandil' – bofilo mia, estos reĝo la venonta, ; Maljuniĝis mi, la tronon al juneco mi fordonas; Servu vi al li fidele, tion mia koro volas".

'1533 Kapon klinis militestroj esprimante la estimon, ; "Polvo estu ni por tiu, kiu donis al ni vivon, ; Kiu punis ribelulon kaj karesis bonan viron, ; Kiu frapis malamikon kaj fortigis la amikon".

'1534 Ankaŭ Tariel' parolis, laŭdis la geedzan paron: ; "Vin – gereĝoj, mi kunigas – la feliĉo kronas amon, ; Vi fratino mia estas, ne portempe – por ĉiamo, ; Kaj por malamikoj viaj, mi ne sentos la kompaton".

& Edziĝofesto de Tinatin' kun Avtandil' ĉe la reĝo de araboj:

'1535 Avtandil' jam kiel reĝo sidas sur araba trono, ; Tie Tariel' apudas, sur la kapo havas kronon, ; Tinatin' kun amikino sidas apud la patrono, ; Ŝajnis, ke kvar sunoj venis de ĉielo al la homoj.

'1536 Oni donis regalaĵojn, tion kaŭzis la amego, ; Ili buĉis senkompate da brutaro tutan gregon, ; Venis tempo por donacoj, por servantoj feliĉego, ; Kaj triumfon de la amo pruvis reĝo kaj kortego.

'1537 El rubenoj estis glasoj, el smeraldoj – la fioloj, ; La vazaro multkolora havis fantaziajn formojn, ; Gastis tie didebuloj, aro da ambasadoroj; Ĉiu diris: "La gastemo ja sklavigas niajn korojn".

'1538 Sonis tie la cimbaloj, oni kantis belajn himnojn, ; Montoj de la oroj brilis kaj radiis rubenvitroj, ; Por drinkantoj tie fluis fontoj da bonega vino; Daŭris la festeno gaja de komenco ĝis la fino.

'1539 Nek blindulo, nek lamulo, ĉi ne restis en malsato; Oni ĵetis perlojn ĉie – en palaco, sur la stratoj; Eĉ laciĝis transportante ili oron kaj atlason. ; Dum tri tagoj en la festo estis Tariel' bofrato.

'1540 Rostevan' sekvantan tagon plu daŭrigis la festenon; Li al Tariel' parolis: "Via sun' elvokas svenon. ; Reĝo de la reĝoj estas en la mondo vi mem stelo, ; Spuroj de piedoj viaj por ni estu oraj ĉenoj.

'1541 ' Do al ni ne decas, reĝo, apud vi egale sidi". ; Rostevan' la hindan tronon sur pli alta ŝtupo fiksis, ; Pli malsupre por araboj tronajn seĝojn li starigis; Same dum donac-prezento Tarielon li distingis.

'1542 Rostevan' la gastojn distris, okupiĝis pri regalo, ; Jen alvenis li ĉe unu, jen ĉe la alia tablo, ; Montris li malavarecon, nun komencis la drinkado, ; Apud Avtandil' Pridono sidis, reĝ' de sia lando.

'1543 La eksreĝo Tarielon kun edzino tre honoris, ; Li tre ŝatis ilin ambaŭ kaj donacojn multajn donis, ; Tamen eĉ dekonan parton malfacilas ĉi elnombri; Estis sceptroj, oraj kronoj – ilin hindoj ja bezonis.

'1544 Kaj denove li prezentis diamantojn, kolierojn; Ovoj de fabela birdo estis mil mirindaj gemoj, ; Kiel ovoj de kolomboj estis mil grandegaj perloj, ; Mil ĉevaloj por rajdado konsistigis tutan gregon.

'1545 Pletojn dek Pridon' ricevis, ili de perleroj plenis, ; Dek ĉevalojn plej rapidajn Rostevan' por li elektis; Hinda reĝ' majeste dankis, al la mastro riverencis, ; Kvankam drinkis li la vinon, sed ebria li ne estis.

'1546 Sed ĉu indas plu rakonti? Tiel pasis la monato, ; Kaj ne ĉesis la festeno, gaje amuziĝis gastoj; Grandan gemon hind' ricevis de la krono posedanto, ; Gemo brilis kiel suno, estis ĝi el la grenato.

'1547 Tariel' similis rozon, kun agrabla bonodoro, ; Li jam volis hejmeniri, al la mastro sendis vortojn: ; "Mi feliĉas kuNestan'te, ni festenas ĉi sen zorgoj, ; Tamen dume mian regnon tretas malamikaj hordoj.

'1548 ' Celo de la sciencisto – neniigi malklerulojn; Malfeliĉo mia naskas la kompaton de kunuloj. ; Nun ni devas tre rapidi por ekvidi proksimulojn; Dio donos la eblecon por revidi vin, karulojn".

'1549 Rostevan' respondis: "Reĝo, mem vi scias la aferojn, ; Agu kiel vi deziras kaj forigu la danĝerojn, ; Avtandil' vin akompanas kun la trupoj, militestroj, ; Vi frakasu malamikojn, liberigu viajn terojn".

'1550 Avtandil' transdonis klare, kion Rostevan' respondis. ; Diris Tariel': "Mi petas pri kuniro vin ne zorgi, ; Sun' kaj luno ĵus kuniĝis, tial vi ne povas voji". ; Tamen Avtandil' ridetis: "Ne sukcesos vi min trompi!

'1551 ' Vi decidis min forlasi kun riproĉo, malfavoro, ; Sed vi pensos: "Li nur amas la edzinon kaj trezoron". ; Kiel povas mi disiĝi kun la plej proksima homo? ; Sed en malfeliĉo lasas la amikon nur fripono".

'1552 Tariel' ridinte montris rozon kaj la kristalvitron; ; "Pli ol vi, karulo mia, mi suferas pro foriro, ; Se vi volas, iru kune, estos tio granda virto", ; Avtandil' al trupoj diris: "Vi komencu la pretigon!"

'1553 Senprokraste li kunvokis militistojn el la lando; Okdek miloj da soldatoj venis kun ĥorezmaj armoj, ; Havis ili akrajn glavojn, la kirasojn, ferajn kaskojn; Tamen Rostevan' ne ĝojis, malsekiĝis liaj vangoj.

'1554 Enbrakiĝis dum disiĝo la virinoj – du reĝinoj, ; Ĵuris unu al alia ne forgesi la fratinton, ; Kunmetinte siajn kapojn, premiĝinte al la sino, ; Ili ploris; homoj sentis – jen alvenis suneklipso.

'1555 Kiam luno al la astro de mateno proksimiĝas, ; Ambaŭ ili estas belaj – ĉielkorpoj hele brilas; Se ne volas lun' foriri, la ĉielo ĝin devigas; Kiu volas ilin vidi, tiu sur montpinton grimpas.

'1556 Ĉielkorpojn kiu kreis, mem similas al la astroj; Ili vole ne disiĝas, sed obeas ili mastron; La virinoj enbrakiĝas kiel rozoj en la fasko, ; Kaj disiĝ' al ili ŝajnas certe kiel vivfrakaso.

'1557 Nestan-Dareĝan' lamentis: "Mi preferus vin ne scii, ; Tiam mi sen suno hela, povus pli trankvile vivi; Mi sen vi suferus multe, devas ni leterojn skribi, ; Ĉiam unu al alia, ni ne ĉesos ja sopiri".

'1558 Tinatin' respondis: "Suno, plezurigas vi la homojn: ; Kiel mi elteni povos la ĉagrenon kaj malĝojon? ; Mi ne vivon petos dion, nur ke li alsendu morton; Vivu tiom, kiom daŭras mia senkonsola ploro".

'1559 Interkisis lastan fojon kaj disiĝis du virinoj, ; La restinta per rigardo akompanis amikinojn, ; Kaj la dua multajn fojojn rerigardis dum foriro; Mi ne povus ĝin priskribi, eĉ se havus mi deziron.

'1560 Rostevan', la maljunulo dum disiĝo maltrankvilis, ; Li milfoje kriis, ĝemis kaj amarajn larmojn viŝis, : Kvazaŭ el kaldron' bolanta larma fonto elverŝiĝis; Tariel' malbonhumoris, la vizaĝo pala iĝis.

'1561 Tarielon, freŝan rozon, Rostevan' alprenis, kisis ; Kaj parolis: "Ĝis hodiaŭ, ni miraklon veran vidis; Pro disiĝo senkompata vivo mia mallongiĝis, ; Vi al mi donacis vivon, ĝin mem volas neniigi".

'1562 Hinda reĝo adiaŭis kaj sursaltis la ĉevalon; Ploris trupoj kaj pro larmoj malsekiĝis vasta valo, ; Ili diris: "Ho, la suno estas vi en la realo" ; Li respondis: "Vin vidante mi suferas kiel Salo*"

'1563 Sin ekipis kaj forrajdis tri kuraĝaj kavaliroj, ; Hinda – Tariel', Pridono kaj arabo – Avtandilo, ; Okdek miloj da soldatoj partoprenis militiron; Rajdis tri amantaj koroj, fideluloj dum foriro.

'1564 Tri monatojn rajdis ili, tre agrable tempo pasis, ; Homoj montris nur bonvenon, malamike ne atakis, ; Kiam renkontiĝis bestoj, vojaĝantoj ilin ĉasis, ; Nokte en tendar' festenis kaj per vino sin regalas.

, & La edziĝofesto de Tariel' kun Nestan':

'1565 Tariel', edzino lia, jam posedas, kion volas, ; Kaj sep tronoj de Hindio la plej grandan ĝojon donas; Dolĉe fluas vivo nuna, pasintecon ne memoras; Ne spertinte malfeliĉon, homo ĝojon ne ekkonas.

'1566 Vidu ilin – la belegajn, ili ombras mem la sunon; La trumpetoj sonis dolĉe, la cimbaloj kaj la flutoj; Ili prenis trezorejojn la ŝlosilojn de seruroj; "Jen la reĝo" kriis homoj kaj ripetis korteguloj.

'1567 Por Pridon' kaj Avtandilo du belegaj tronoj staris, ; Kaj popolo, nobelaro la monarkojn do akklamis; Ĉu sur tero estis homoj, kiuj ilin nun egalas? ; Reĝoj siajn aventurojn de la homoj jam ne kaŝis.

'1568 Ili drinkis, amuziĝis, ĝojis ĉiu hinda gasto, ; Pompa estis nuptofesto kaj bongustis ĉiu plado; Malavaris reĝoj, ĉiu do ricevis po donacoj; Malriĉuloj, almozuloj kore dankis al palaco.

'1569 Avtandil', Pridon' por hindoj vere estis ja savintoj; ; Hindoj kriis: "Ĉion bonan vi alportis, kavaliroj". ; Kaj rigardis ilin ĝoje, kaj plenumis la dezirojn; Ĉiutage ricevadis ili al festen' inviton.

'1570 Al Asmat' la hinda reĝo jen esprimis sian dankon: ; "Tio, kion vi jam faris, dube farus edukanto; Mi por ĉiam al vi donas sepan parton de la lando, ; Mi sidigos vin sur trono, tia estos mia pago.

'1571 ' Vi elektu plaĉan edzon kaj feliĉe regu landon, ; Vi vasalo estu nia, fidelulo kaj servanto". ; Ŝi al Tariel' piedojn kisis pro kortuŝa faro: ; "Restos mi sklavino via, ĝis la lasta mia tago".

'1572 Proksimiĝis jam la fino de gajega nuptofesto, ; Amuziĝis ili tie, ricevadis oron, gemojn; Belaj estis la donacoj – la ĉevaloj, brilaj perloj, ; Sed vizaĝ' de Avtandilo jam esprimis nur suferon.

'1573 Tariel' rimarkis bone, ke sopiras lia frato, ; Diris li: "En via koro vi riproĉas kamaradon; Vi sepfoje suferinte, trovis okan suferadon: ; Antaŭsentas mi disiĝon, ĉar finiĝas kunestado".

'1574 Kaj Pridon' esprimis volon jam komenci hejmeniron: ; "Ne forgesos mi la vojon, ofte faros mi viziton; Ĉian peton mi plenumos kun la peno kaj konfido, ; Mi deziras tion, kiel cervo fonton en la mito".

'1575 Tariel' tre petis fratojn ne forgesi proksimulon; "Iru nun, Pridon', sed venu, kiam lasos la okupoj; Avtandil', sen vi ne vidus mi, nek ĝojon nek plezuron; Kion fari – vin, leonon, volas vidi via luno".

'1576 Kaj por Rostevan' li donis multajn altvalorajn felojn, ; Vazojn, kiujn plibeligis facetitaj gemoj, perloj. ; "Tion ĉi de mi transdonu, iru, sciu – mi atendas"; Diris Avtandil': "Ho, frato, mi sen vi en foro velkos".

'1577 La reĝino al reĝino sendis pelton, pelerinon; Bela estis la teksaĵo, tian portis nur reĝinoj; Ŝi aldonis diamantojn, kiuj havis raran brilon, ; Ĉar videbla estis nokte kaj elvokis ĉies miron.

'1578 Venis horo de foriro, Avtandil' surĉevaliĝis, ; Adiaŭe frataj koroj lastan fojon proksimiĝis, ; Hindoj per varmegaj larmoj kampon tute malsekigis; Diris Avtandil': "La mondo mian koron venenigis".

'1579 Avtandil', Pridon' nelonge kune rajdis tra la kampo, ; Ilin jam disigis vojoj, ne retenis fratoj larmojn; Celo estis atingita kaj venkitaj ĉiuj baroj; Avtandil' revenis hejmen, ĉi atendis novaj faroj.

'1580 La reveno por araboj certe estis granda festo, ; Li revidis sian sunon, kiu mankis en foresto; Ambaŭ sur la trono sidis, ne forlasis ĝoja sento, ; Akompanis dia bono, la feliĉo kaj sukceso.

'1581 Kaj tri reĝoj bone vivis, ĉiu en la propra lando, ; Unu la alian vidis ofte, kiel vizitanto, ; Kune batis malamikon, ne malhelpis la distanco; Pligrandiĝis regnolimoj, kreskis da riĉaĵoj kvanto.

'1582 Kaj disŝutis saĝaj reĝoj, kiel neĝon la trezoron, ; Ne forgesis malriĉulojn, malfeliĉajn kaj la orfojn, ; La krimuloj multe timis, la ŝafidoj sentis forton, ; Lupoj kaj kaprinoj kune vivis tie en konkordo.

, & Epilogo:

'1583 Do finiĝis historio, pasis kiel nokta sonĝo, ; Ili vivis kaj forlasis efemeran nian mondon; Eĉ se vivo ŝajnas longa, kurtas ĝi por ĉiu homo; Iu mesĥo* – Rustaveli, verkis mi la vers-rakonton.

'1584 Por David – kartvela reĝo, kies vojon suno gvidas, ; La poemon mi kompilis kaj por distro ĝin dediĉas; Oriente, okcidente malamikon li timigas, ; Protektante bonan homon, perfidulon senkapigas.

'1585 Kiel mi prikantu liajn farojn, ankaŭ la kuraĝon? ; En la verko mi priskribas reĝojn de aliaj landoj, ; Vivkutimojn kaj la morojn, gloras mi ilian saĝon; Mi kun ĝojo kaj plezuro faris tiun rakontaĵon.

'1586 Tia estas nia mondo, ĝi konfidon ne meritas, ; Daŭras vivo palpebrumon, kaj forkuras, forrapidas, ; Kiu kion tie serĉas, la destino nur enigmas; Bone estas, kiam vivon paradizo daŭrigas.

'1587 Amiranon de Dareĝan' gloris do Mose Ĥoneli,* ; Pri Abdul-Mesio brile versis ja poet' Ŝavteli,* ; Dilargeton* disfamigis ; Kaj pri Tariel' kun larmoj kantis lia Rustaveli.)

<&Klarigoj:

- '2 Miĝnuro – suferanta enamiĝinto (arabe).
- '3 Rustaveli subkomprenas edzon de reĝino Tamari, Davidon.
- '5 Badaĥŝan – loko en Pamiro, kie oni elterigas rubenojn.
- '6 Tariel' – heroo de "Kavaliro en tigra felo".
- '8 Rustaveli subkomprenas reĝinon Tamari.
- '14 Ŝairi – verki ŝairon. (ŝairo – 16-silaba verso) ; Ĉogano – longa bastono, per kiu oni pilkludis sur ĉevaloj.
- '40 Spaspeto – ĉefo de militistaro ; Amirspasalaro – milita estro kaj ĉefo de armeo.
- '44 Ĥaso - proksimulo de la reĝo, kortegano.
- '54 Amilaĥor - ĉefo de ĉevalistoj ĉe kortego.
- '65 Farmano – ordono de irana ŝaĥo aŭ de turka sultano.
- '81 Nardoj – orientlanda ludo kun ĵetkuboj.
- '91 Ĉi verso havas unu troan baton. (MS)
- '97 Devo: fabela personaĵo el kartvela mitologio, simila al ciklopo.
- '100 Ĉango - speco de harpo.
- '136 Giŝero – nigra mineralo.
- '141 Eĝibo – pordisto ĉe kortego.
- '175 Dionos – pseŭdonomo de kartvela filozofo Petra Iveri (411-491). Aliaj tradukistoj opinias, ke tiu ĉi vorto signifas kolekton de versoj. ; Ezros Abraham-Qaraba poeto el Hispanio (1099-1174).
- '181 Ramin kaj Vis – herooj de poemo "Vis kaj Ramin" de Gurgeni.
- '189 Kadĵoj – duonhomoj laŭ kartvelaj fabeloj.
- '192 Rostom – ĉefa heroo de poemo de Firdusi – "Ŝah-name".
- '311 Amirbaro – ĉefo de la floto, admiralo.
- '322 Bezoaro – Substanco en la hepato de kaprinoj.
- '324 Gabaono – Monta regiono en Palestino,
- '326 Majdano – Placo por la ludo aŭ por bazaro.
- '335 Turaĉoj – speco de birdoj.
- '342 Belzevulo – malbona animo ĉe araboj ; Mukroj – muzulmanaj kuracistoj, pastroj kaj kompetentuloj de Korano.
- '344 Mulimo – maljuna helpanto de mulao.
- '351 Ŝafrano - planto.
- '370 Ĥatalando – norda Ĉinio,
- '371 Palankeno – portilo por reĝinoj.
- '395 Marzapano-vicreĝo.
- '464 Draĥmo – malgranda hinda moneto kaj unuo de pezo.
- '472 Darbazo – palaco (ĉi tie).
- '473 Ĥadumo- kastrita proksimulo de kortego.
- '478 Mutriboj – kantistoj.
- '480 Ordonaco – nekonata vorto (MS).
- '504 Ĥorezmo – potenca lando de 12-13-a j.c.
- '523 Korano – sankta libro ĉe muzulmanoj.
- '588,591 Rustaveli ofte komparas homojn kun arboj kaj floroj.
- '592 Mulgazanzar – fantazia urbo.
- '710 Bisono – fantazia rivero en paradizo.
- '740 Geon – malnova nomo de rivero Nilo.
- '780 Platono – greka filozofo de la 4-a jarcento antaŭ nia jarkalkulo.
- '801 Miĝnurado – amo (arabe).
- '807 Levito – juda personaĵo el "Biblio", kiu estis pekanto.
- '826 Rustaveli subkomprenas dion, kiu eterne estas kiel suno.
- '840 Tigro – rivero en Mezopotamio.
- '911 Konverso – konversacio. (MS)
- '947-951 Avtandil' ĉi tie tranombras planedojn.
- '950 Venero – Venuso. (MS)
- '1007 Litro – Malnova unuo de pezo.
- '1018 Usam – ĉefo de egiptaj komercistoj.
- '1019 Bagdado – ĉefurbo de araba Kalifejo.

'1048 Taros – la vetero. Oni opinias ankaŭ, ke "Taros" estas antikva pagana diaĵo, kiu personigas la lumon kaj la bonstaton.

'1049 Gulanŝaro – urbo de rozoj.

'1059 Ĥatun – sinjorino.

'1095 Ĉaŝnagiĝo – gustumisto ĉe palaco aŭ propra nomo.

'1107 Fatma-Ĥatun = Sinjorino Fatma en centraziaj lingvoj.

'1109 Navrozo – Tago de Navrozo estas la novjara persa festo, kiun oni celebras printempe.

'1154 Meko – sankta urbo de muzulmanoj, patrio de Mahomet.

'1176 Mehreb – malnova ĝenerala nomo por okcidentaj landoj.

'1252 Paladino: Mezepoka migranta kavaliro.

'1291 Nestan' subkomprenas elementojn, el kiuj, laŭ greka filozofio, konsistas mondo.

'1315 Saratano – Konstelacio de Kankro.

'1327 Kais kaj Salamano – Herooj de poemo de Nizami – "Leila kaj Meĝnun".

'1351 Devejo – Kaverno, kie loĝis Devoj.

'1355 Basra – Loko en Mezopotamio, kie oni faris akrajn tranĉarmilojn.

'1401 Kronos - Planedo Saturno

'1478 Divnos – Filozofa de kvina j.c. – aŭtoro de t.n. "Areopagetiko". Liaj verkoj havis grandan influon sur la filozofio de sekvantaj jarcentoj. Kiel klariĝis, sub tiu ĉi nomo estis kaŝita kartvela filozofa Petre Iveri (laŭ esploroj de Nucubidze kaj Honigman.)

'1499 Aravi – nomo de suda vento.

'1521 Goliato –mita heroo, kiu havis grandan forton.

'1562 Salo – literatura personaĵo el poemo "Kais kaj Salaman".

'1583 Meshoj – Loĝantoj de Mesheti – provinco en Kartvelio.

'1587 Ĥoneli Mose – Kartvela poeto, aŭtoro de "Amiran' Dareĝan'iani", ; Ŝavteli – kartvela verkisto de 12 j.c. – aŭtoro de "Abdulmesio". ; Sargis Tmogveli – La verkisto kaj samtempulo de Rustaveli – aŭtoro de perdita verko – "Dilargetiani".

>

<& Listo de partoj:

& Kavaliro en tигра felo:	1
(#Melodioj:.....)	1
(&Strofoj:.....)	1
,& Prologo:.....	1
,& Rakonto pri la araba reĝo Rostevano:	3
,& La ĉasado de Rostevan' kun Avtandil':.....	5
,& Pri tio, kiel arabreĝo ekvidis tigrofelulon:.....	5
,& Tinatin' sendas Avtandilon por serĉi tiun kavaliron:	7
,& La letero de Avtandil' al siaj homoj:	9
,& Forveturo de Avtandil', por serĉi la tigrofelulon:	10
,& Interparolo kun Asmat' en la kaverno:	13
,& Renkonto de Tariel' kun Avtandil':	15
,& Rakonto de Tariel' pri sia sorto:	17
,& Rakonto pri la amo de Tariel':	18
,& La unua letero de Nestan' al sia amato:	20
,& La unua letero de Tariel' al sia amatino:.....	20
,& La letero de Tariel' al ĥatalandanoj:	21
,& Nestan-Dareĝan' invitas Tarielon:	21
,& La letero de ĥatalandanoj al Tariel':	21
,& Renkonto de Tariel' kun Nestan':	22
,& Militkampanjo de Tariel' en Ĥatalando:.....	22
,& La letero de Tariel' al reĝo de Hindio kaj reveno kun la venko:	25
,& La letero de Nestan-Dareĝan al sia amanto:.....	26
,& Ploro de Tariel' kaj lia sveno:.....	26
,& Responda letero de Tariel' al sia amatino:.....	27
,& Konsilo pri edziniĝo de Nestan-Dareĝan':.....	27
,& Interparolo de Nestan' kun Tariel' kaj ilia decido:.....	27
,& La alveno de ŝahido al Hindio por edziĝo kaj lia morto:.....	29
,& Tariel' ekscias pri malapero de Nestan-Dareĝan':	30
,& Renkonto de Tariel' kun Nuradin-Pridon':	31
,& Tariel' helpas al Pridon':	32
,& Rakonto de Pridon' pri Nestan-Dareĝan':	33
,& Reveno de Avtandil' al Arabio:	35
,& Avtandil' petas veziron ricevi la permeson de Rostevan' por foriro:	38
,& Interparolado de Avtandil' kun Ŝermadin':	41
,& La testamento de Avtandil' al reĝo Rostevan':	41
,& Preĝo de Avtandil':	42
,& Rostevan' ekscias, ke Avtandil' sekrete foriris:	43
,& Foriro de Avtandil' por la dua renkonto kun Tariel':	44
,& Avtandil' trovas senkonscian Tarielon:	45

,& La rakonto de Tariel', kiel li mortigis leonon kaj tigrinon:.....	47
,& Rakonto, kiel kavaliroj alrajdis la kavernon, kie ili renkontis Asmaton:	48
,& La foriro de Avtandil' al Pridon':.....	50
,& Avtandil' alvenas al Pridon':.....	51
,& Forveturo de Avtandil' por serĉado de Nestan-Dareĝan' kaj renkontiĝo kun la karavano: ..	54
,& Rakonto pri tio, kiel Avtandil' venis Gulanŝaron:	55
,& Amo de Fatma al Avtandil':	56
,& Amletero de Fatma al Avtandil':	57
,& La letero de Avtandil' al Fatma:	57
,& Fatma rakontas pri sorto de Nestan-Dareĝan':.....	59
,& Malliberiĝo de Nestan-Dareĝan':	63
,& La letero de Fatma al Nestan-Dareĝan':	66
,& La letero de Nestan-Dareĝan' al Fatma:	67
,& La letero de Nestan-Dareĝan' al sia miĝnuro:	67
,& La letero de Avtandil' al Pridon':.....	69
,& Forveturo de Avtandil' el Gulanŝaro kaj renkontiĝo kun Tariel':	69
,& Alveturo de Avtandil' kaj Tariel' al Nuradin-Pridon':	71
,& Militkonsilo de Pridon':.....	72
,& Militkonsilo de Avtandil':	73
,& Militkonsilo de Tariel':.....	73
,& Konkero de Kadĵa kastelo kaj liberigo de Nestan-Dareĝan':.....	73
,& Alveturo de Tariel' al la reĝo de la maroj:.....	74
,& La edziĝfestoj de Tariel' kun Nestan-Dareĝan' en palaco de Pridon':	76
,& Alveno de tri kavaliroj al la kaverno kaj forveturo al Arabio:	78
,& Edziĝfestoj de Tinatin' kun Avtandil' ĉe la reĝo de araboj:.....	81
,& La edziĝfestoj de Tariel' kun Nestan':	82
,& Epilogo:.....	83
<&Klarigoj:.....	84
<& Listo de partoj:.....	86
>	87

>